

Ivo Lapenna

**Esploro
kaj
Dokumentado**



Prof. D-ro Ivo Lapenna (1909-1987)

Mondfama sciencisto. Profesoro de Internacia Juro ĉe la Universitato de Zagreb, Kroatio. Eksperto ĉe la Packonferenco en Parizo, 1946. En 1947/48 advokato-konsilisto, Albanio kontraŭ Britio, antaŭ la Internacia Kortumo en Hago. Membro de pluraj gravaj jursciencaj institutoj de la mondo. "Profesoro de Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro" ĉe la mondfama kaj prestiĝa *The London School of Economics and Political Science*, Universitato de Londono. Invitita kiel gastprofesoro en multnombraj universitatoj kaj jursciencaj institutoj en ĉiuj mondopartoj, i.a. *Harvard* kaj *Yale*. Granda verkisto en pluraj lingvoj. Eminentia violonĉelisto. Unu el la plej grandaj humanistoj de la mondo. Konata kiel "la arkitekto kaj la konstruinto de la moderna Esperanto-Movado".

Ivo Lapenna

**Esploro
kaj
Dokumentado**

**2014
Grafokom**

Ivo Lapenna
Esploro kaj Dokumentado

Redaktita kaj korektita represo de artikoloj el la rubriko
"Esploro kaj Dokumentado",
aperinta en la revuo "Horizonto" (1976-1987).

© **Birthe Lapenna**

Redaktis:
Birthe Lapenna

Grafike kaj teknike aranĝis:
Josip Pleadin

Eldonis kaj presis:
"Grafokom", Đurđevac (Kroatio)
sub aŭspicio de
"Fondaĵo Ivo Lapenna", Kopenhago (Danio)

**La libro estas eldonita okaze de la 60-jara datreveno
de la Rezolucio favore al Esperanto, akceptita en la
Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo, 1954.**

CIP zapis dostupan u računalnome katalogu
Nacionalne i sveučilišne knjižnice u Zagrebu
pod brojem 891916 .

ISBN 978-953-7818-06-7

ENKONDUKO

Birthe Lapenna

Prof. D-ro Ivo Lapenna (1909-1987) estas la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA. Liaj *Biografiaj Notoj* estas legeblaj en la hejmpaĝo de *Fondaĵo Ivo Lapenna*: <http://www.ivolapenna.org/>. Tie vi trovas ankaŭ parton de liaj verkoj en la Internacia Lingvo, Esperanto, inter ili la monumentan kaj historie gravegan *Esperanto en Perspektivo* (UEA, 1974). Ivo Lapenna estas ties iniciatinto kaj ĉefaŭtoro. Li ofte komunikis, ke sen liaj postaj dokumentaj verkoj *Hamburgo en Retrospektivo – Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en Universala Esperanto-Asocio* (dua kompletigita eldono, Eldonejo *Horizonto*, 1977) – kaj la rubriko "ED" (*Esploro kaj Dokumentado*) en la kultura kaj informa revuo de la "Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado" – *Horizonto*, 1976-1987 – la historio de la Esperanto-Movado ĝis 1987 ne estus kompleta. La verkoj *Esperanto en Perspektivo* kaj *Hamburgo en Retrospektivo* dum pluraj jaroj estas konsulteblaj en la supre menciita hejmpaĝo.

Okaze de la 60-jara datreveno de "la Venko en Montevideo, 1954", la *Fondaĵo Ivo Lapenna* decidis esprimi sian dankemon al Prof. D-ro Ivo Lapenna per la eldono de tiu ĉi grava historia verko: *Esploro kaj Dokumentado*. Sen lia senfina energio kaj liaj nekompareblaj kapablecoj kaj diplomateco la Ĝenerala Konferenco de Unesko (UNESCO) neniam estus akceptinta la faman Montevidean Rezolucion favore al Esperanto, kiu ĝis hodiaŭ malfermis ĉiujn pordojn – la plej gravan rezolucion iam ajn en la historio de la Internacia Lingvo.

Kopenhago F., la 15-an de decembro 2014.

Represo aŭ alimaniere lojala utiligo
de kiu ajn teksto el tiu ĉi libro
estas permesata kondiĉe,
ke la fonto estu indikita
kaj informo pri la utiligo estu sendita
al la eldoninto
aŭ posedanto de la aŭtoraj rajtoj.

ENHAVTABELO

	ENKONDUKO	3
1.1.	Malapero de CED kaj celo de tiu ĉi rubriko	13
1.2	Konsilo pri ĝisdatigo de <i>EeP</i>	14
1.3	Korekto de <i>HeR</i>	15
1.4	Peto al la redakcioj	16
1.5	Sekvanta numero	16
2.1.	Ekzemploj de sukcesa argumentado por Esperanto	16
2.1.1	Italio	16
2.1.2	Svislando	17
2.1.3	Francio	18
2.2	Esperanto en la Universitato de Clermont Ferrand	19
2.3	Interlingvistiko	19
2.4	Libro pri la lingvoj de Eŭropo	19
2.5	Aŭtoraj rajtoj de <i>"Esperanto en Perspektivo"</i>	20
3.1	Pliaj kontraŭneŭtralecaj dokumentoj	20
3.1.2	Programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR	21
3.1.3	Programo de ĈEA por la jaroj 1976-1980	22
3.1.4	Konciza komento	24
3.2	Ankoraŭ pri la aŭtoraj rajtoj de <i>"Esperanto en Perspektivo"</i>	24
4.1	Plia malkresko de la membronombro de UEA	25
4.2	Malfortigo de landaj organizaĵoj	26
4.3	Deklaro de la Estraro de UEA kaj MEM	27
5.1.	Esperanto-Dokumentoj de UEA	28
5.1.2	La "dokumentoj"	29
5.1.3	Konklude	32
5.2	Kontraŭstatuta nomigo de ĉefdelegito de UEA en USSR	33
6	Konfidenca dokumento pri la agado en Montevideo	34
6.1	Enkonduka rimarko	34
6.2	La dokumento	35
6.2.1	La unuaj kontaktoj (el la let. de 06.11.1954)	35

6.2.2	Delegacio post delegacio rifuzas proponi rezolucion (el letero de 16.11.1954)	36
6.2.3	Neeble trovi la delegacion (el let. de 23.11.1954)	36
6.2.4	Daŭre pli malbona situacio (el let. de 05.12.1954)	37
6.2.5	Fine, trovita: Meksikio (el la sama let. de 05.12.1954)	38
6.2.6	La Meksikia Rezolucio en la Programkomisiono (el la let. de 05.12.1954)	39
6.2.7	Voĉdono (el la sama let. de 05.12.1954)	41
6.2.8	Kio farebla ankoraŭ? (el la sama let. de 05.12.1954)	42
6.2.9	Venko! (el let. de 10.12.1954)	43
6.2.10	Ŝajne, perdita afero (el la let. de 13.12.1954)	44
6.2.11	La publika opinio ekmoviĝas (el la sama let. de 13.12.1954)	45
6.2.12	La vojo trovita (el la sama letero de 13.12.1954)	46
6.2.13	Efiko (el la sama let. de 13.12.1954)	47
6.2.14	Unesko klopodas korekti la eraron (el la sama let. de 13.12.1954)	47
6.2.15	Postulo pri revoĉdonigo akceptita (el la sala metero)	48
6.2.16	En la Pleno (el la sama let. de 13.12.1954)	49
6.2.17	"Triunfo del Esperanto" (el la sama letero)	51
6.3	Postnoto	51
7	Du pliaj malneŭtralaj landaj instancoj en UEA	53
7.1	Decido de la Komitato de UEA en Ateno	53
7.2	Konciza komento	53
7.3	Rekono de plia kontraŭstatuta decido	54
7.4	Plia komento	55
8	BEA reŝanĝis sian Statuton	56
9	Sovetaj juraj periodaĵoj pri la rolo de NRO-j	57
10	Plia malkresko de la membraro de UEA	59
11	Iom pri la Estrara Raporto de UEA por 1976-1977	60
11.1	Ĝenerale	60
11.2	Tro ampleksa	61
11.3	Tro koncize aŭ nenio	64
12	Prof. B. Popović eksiĝis el komitataneco de UEA	65
13	La rilatoj UEA-UNESKO aŭ plia falsado de historiaj faktoj	66
13.1	Unesko en Reykjavik	66
13.2	Dekadenco de Unesko	67
13.3	Falsado de historiaj faktoj	70
14	Tradukoj el Esperanto	72
14.1	<i>Retoriko</i> en la japana	72
14.2	Parto de <i>EeP</i> en la japana	73

15	Persekutoj	73
15.1	Jurij Belov	73
15.2	Konfiskoj	74
16	Kiel KEJA nombras siajn membrojn?	75
17	"Iniciato de UEA favore al Interlingua"?	76
18	La politiko de sekretaj kunvenoj daŭrigata	77
19	Persekutoj: J. Belov liberigita	78
20	Prof. B. Popović eksiĝas ankaŭ el siaj funkcioj el ISAE	79
21	Diskuti sen mistifikoj	79
22	Pliaj persekutoj de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio	81
23	<i>Espero Katolika</i> konfiskata en Ĉeĥoslovakio	83
24	Sovetaj esperantistoj ricevas instrukciojn	84
25	Koresponda Servo Mondskala	84
26	Delegitoj de UEA registrataj ĉe politika polico	84
27	Brita Esperanto-Asocio (BEA) celebris la centjaran datrevenon de Esperanto	86
28	Persekuto de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio	87
28.1	Kriminaljura proceso	87
28.2	Rezolucio de la Estraro de UEA	88
28.3	Kion nun opinias D-ro U. Lins?	89
29	Esperanto en bibliotekoj	90
30	Redakcia noto	90
31	Partipolitika programo de A.S.E.	90
32	Franca rotaria revuo pri Esperanto	93
33	Kontraŭstatuta elekto de la Estraro de la Akademio	93
33.1	Enkonduka rimarko	93
33.2	Anonco de la elekto kaj unuaj reagoj	94
33.3	Unusola listo kaj plia oficiala propono	94
33.4	Apogoj al la propono pri nuligo de la elekto	95
33.5	Rifuzo voĉdonigi la Akademion kaj lasta reago	95
33.6	Konkluda rimarko	99
34	Plia kontraŭneutraleca falsaĵo: faŝismo kulpas pro la persekutoj de esperantistoj en USSR	100
35	Esperantistoj Šváček kaj Srna kondamnitaj kondiĉe	102
36	Neŭtraleco forigita el art. 13 de la statutprojekto	103

37	Delegitoj de UEA denove registrataj ĉe politika polico	103
38	Nun ankaŭ Ĉinio atakata	105
39	Pliaj akademianoj malaprobas la kontraŭstatutan elekton	105
40	La Estrara raporto de UEA	106
41	Deklaro pri neŭtraleco de kandidato al komitatanececo B	107
42	Plia atako kontraŭ Usono kaj NATO-ŝtatojn	107
43	Daŭrigo de <i>ED</i>	108
44	Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-Movado	108
45	Batalanto por la neŭtraleco de UEA ne elektita Kom. B	109
46	Nova Estraro de UEA	110
47	UEA reprezentita en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO	111
48	Informado: nun kaj iam	111
48.1	Iamaj roloj de CED kaj IF	112
48.2	<i>The Guardian</i> kaj aliaj renomaj mondaj gazetoj	114
48.3	Nun pri Jugoslavio	115
48.4	Konklude	116
49	Du pliaj nacilingvaj tradukoj el Esperanto	117
49.1	Faka studo en la japana	117
49.2	Du ĉapitroj el <i>EeP</i> en la nederlanda	117
50	Profesia periodaĵo kun unika Esperanto-paĝo	119
51	Rekorda membronombro de UEA: plia rekorda blufu	119
52	Fragmento de granda plagiato	120
53	Interne de la Babela Turo	121
54	Esperanto por juraj celoj	122
55	Raporto de la Estraro de UEA por 1980	123
55.1	Enkonduka rimarko	123
55.2	Iom pri ĝeneralaĵoj kaj administrado	123
55.3	Pri informado kaj CED	124
55.4	Aliaj eroj	125
55.5	Financoj	126
56	Oficejo de UEA en Budapeŝto	128

57	Kontraŭ nukleaj armiloj - en Okcidenta Eŭropo	128
58	Plia sendependa instituto pri la politikiĝo de UEA	129
59	Senŝanĝe sub nova nomo	131
60	Pliaj pruvoj de la politikiĝo de TEJO	131
60.1	Celoj de MFDJ kaj TEJO: "Grandparte la samaj"	131
60.2	IUS kaj TEJO	132
60.3	Kio estas MFDJ kaj IUS?	132
61	Iom pli pri M.E.M.	133
61.1	Nova n-ro de "Paco"	133
61.2	M.E.M. ĉe la Monda Parlamento de Popoloj	133
62	IEAJ ne ekzistas - laŭ la <i>Jarlibro</i> de UEA	134
63	Konfirmo pri la nefunkciado de CED	134
64	Ankoraŭ pri la membro-nombro de UEA	135
65	Pri H. Hodler kaj la origino de "Esperanto"	137
66	"Esperanto" por komencantoj	137
67	Pliaj partipolitikaj agadoj en ĈSSR kaj GDR	138
68	Kontraŭstatuta membreco	139
69	Kontrakto SAT - MEM	139
70	En EEK altiĝas la kostoj de multlingveco	141
70.1	Enkonduka rimarko	141
70.2	Kostoj kaj aliaj problemoj	141
70.3	Komento	142
71	IM de UEA en 1981	143
72	Ĉirkaŭ 200 indiĝenaj lingvoj en Aŭstralio	144
73	ĈEA ligita al ŝtata/partia kulturpolitiko	145
74	Estrara raporto pri la agado de UEA en 1981	146
74.1	Generala rimarko	146
74.2	Iom pri la financoj	147
75	Inaŭgura kongresa parolado en nacia lingvo	148
76	Plia partipolitika kompromitiĝo de UEA mem	149
77	Sovetiaj frontorganizaĵoj en kontraktaj rilatoj kun UEA	150
78	Stratoj kaj placoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto (Enketo de <i>ED</i> : Renkonte al la Jubilea Jaro 1987)	151
79	Sovetiaj esperantistoj kontrolataj de KGB	153
80	Estrara raporto pri la agado de UEA en 1982	154

80.1	Ĝenerala rimarko	154
80.2	Kelkaj nekontesteblaj faktoj	155
80.3	Malĝustaĵoj, prisilentoj, nekontroleblaj aferoj	156
80.4	Membraro kaj financoj	157
80.5	Konkluda rimarko	159
81	Plia konfirmo pri la rolo de KGB inter la sovetia esperantistaro	159
82	Plia granda paŝo de UEA survoje al plena partipolitika kompromitiĝo	160
82.1	Paktado Packonsilio - UEA en Budapeŝto	160
82.2	UEA en intimaj riatoj kun Tri el la Dek	160
83	Freŝdataj informoj pri la lingvaj servoj de Eŭropa Konsilantaro kaj EEK	163
83.1	Rimarko	163
83.2	Eŭropa Konsilantaro	163
83.3	Eŭropa Ekonomia Komunaĵo (EEK)	164
84	Malĝustaĵoj, mankoj kaj nekomprenejoj en <i>"The Esperanto Movement"</i> (La Esperanto-Movado) de Peter C. Forster	165
84.1	Pri la verko ĝenerale	165
84.2	Iom pri la fontmaterialoj	166
84.3	Fundamenta eraro kaj ĝiaj sekvoj	167
84.4	Kelkaj el multaj aliaj malĝustaĵoj	170
84.5	Aparte iom pri Hamburgo (1974)	173
84.6	Konkluda rimarko	175
85	Esperanto en Montevideo (1954) laŭ la paperoj de Prof. Blinkenberg	175
85.1	Pri kio temas?	175
85.2	La "urugvajaj menuoj" en la Dosiero Blinkenberg	176
85.3	Komentoj	177
85.4	Prilingva postnoto	179
86	Sovetiisma propagando en la nederlanda KEG	180
87	Kontrakto pri kunlaboro inter UEA kaj la sovetiisma MEM	181
88	Stratoj, placoj kaj aliaj objektoj kun nomoj rilatantaj al Esperanto	182
89	Konferencoj kaj raportoj de CED en la angla aŭ CRD kontraŭ CED	183
89.1	CRD kontraŭ CED	183
89.2	Neutiligeblaj materialoj	184
89.3	Esperanto ne ekzistas	185

89.4	Ne nur intelekta stagno, sed intelekta malhonesteco	185
90	Pliaj lingvaj problemoj en EEK de Dek Du	186
90.1	Egalrajteco de lingvoj	186
90.2	Problemoj pro la dana kaj greka	187
90.3	Progresia kresko	187
90.4	Lasta momento por ekagi	188
91	Nova historia verko de M. Gjivoje (Ĝivoje) pri la jugoslavia Esperanto-Movado	188
91.1	Ĉirkaŭ 1200 biografioj	188
91.2	Kelkaj ekzemploj	189
91.3	"Instituto por oficialigo de Esperanto"	190
92	Unesko gratulas la centjaran jubileon	191
92.1	Teksto de la Rezolucio XI.4.4.218	191
92.2	Komentoj	192
93	Ankoraŭ iom pri Unesko	194
93.1	Usono kaj Britio atakitaj de UEA	194
93.2	Kio estas Unesko?	194
93.3	Kio estas Unesko hodiaŭ?	195
94	UEA: membroj kaj financoj	197
94.1	Nombro de individuaj membroj	197
94.2	Deficitoj	198
95	La puĉo en Pola Esperanto-Asocio (PEA)	198
95.1	Dokumentoj	198
95.2	Ĝenerala komento	199
95.3	Aparte pri PEA	200
95.4	Kio verŝajne okazos?	201
96	Pliaj dokumentoj pri la puĉo en PEA kaj pri la UK en Varsovio	201
96.1	Kial SAT ne rajtas kongresi en Pollando	201
96.2	La politika polico permesas al UEA kongresi en Varsovio	202
96.3	Reagoj en UEA	202
97	La financoj de UEA en katastrofa stato	204
98	Plia parto de " <i>Esperanto en Perspektivo</i> " en la nederlanda	206
99	Esperanto en internacia lingvistika bibliografio	206
100	Membraro de UEA en 1986	207
100.1	Pri la aligitaj membroj	207
100.2	Malkresko de la nombro de IM	208
101	La nova prezidanto de PEA pri neŭtraleco	209

102	Pozitivaj signoj en la C.O. de UEA	210
	Nomindekso	211
	Dankon	219
	La Arkivo de Prof. D-ro Ivo Lapenna nun en la Dana Ŝtata Arkivo	220

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Ivo Lapenna

1.1 Malapero de CED kaj celo de tiu ĉi rubriko

CED – Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo – estis fondita la 1-an de januaro 1952 kiel institucio de UEA. Ĝia baza celo estis esploradi ĉiujn aspektojn de la lingva problemo kaj aperte pledadi por la Internacia Lingvo per dokumentitaj faktoj kaj science bazitaj argumentoj. Per minimumaj financaj rimedoj ĝi efike plenumis sian rolon. Centoj da dokumentoj, publikigitaj en Esperanto kaj en la angla, en kelkaj kazoj ankaŭ en aliaj lingvoj, pluraj libroj kaj la periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo* multe kontribuis al disvastigo de la lingvo kaj al altigo de la prestiĝo de la Esperanto-Movado. La krono de ĝia laboro estas la 844-paĝa verkego *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* (fine de 1974), en kiu troviĝas ankaŭ koncizaj informoj pri la agadoj de CED en ĉap. 21.4.

Bedaŭrinde, rezulte de la hamburgaj eventoj ankaŭ CED ĉesis funkcii. Tio, kion la nuna gvidantaro de UEA ankoraŭ nomas CED, estas ne nur rekte kontraŭa al la strukturo, celoj kaj realigoj de la originala CED, sed ankaŭ grave danĝera por la interesoj de la Internacia Lingvo.

Kiel vidiĝas el la Raporto pri CED por 1974/75, CED ĉesis okupiĝi pri kolektado kaj katalogado de dokumentoj, verkado de studoj kaj artikoloj, kunmetado de statistikoj, publikigado de la regulaj CED-dokumentoj. Laŭ la Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko, akceptita de la Komitato en Hamburgo, CED devis entrepreni esplorojn, studojn kaj enketojn pri lingvo kaj rasismo (v. 2.3.1 kaj 2.3.2 de la Plano, publikigita en n-ro 5/1974 de *Esperanto*), sed ankaŭ tiurilate nenio estas farita. Tre multaj sindonaj esperantistoj siatempe donacis multajn librojn kaj materialojn por la Universala Ekspozicio de CED, dum la subskribinto mem oferis amason da tempo kaj energio por ĝin formi. Nun tiu valorega kolekto, per si mem dokumentego pri la Esperanta kulturo, estas senrespondece vendata, eble jam vendita.

Eĉ pli negativa ol neniofarado estas la Raporto "La Estonteco de CED" de la 20-a de marto 1975. Parte insulta por la antaŭhamburga CED kaj aliparte naive nescienca kaj fantazia, ĝi en ĉiu okazo definitive sigelas la sorton de CED senigante la neŭtralan Esperanto-Movadon de bone funkciinta scienca institucio: se la proponoj en la Raporto ne realiĝos (plej verŝajne), do okazos nenio; se ili realiĝus eĉ partete (plej nekredible), do CED fariĝus iaspeca nova IALA kun ĉiuj malutilaj sekvoj por Esperanto. Tion montras ankaŭ la Raporto pri kunveno de 29.07.1975 sub la nomo de CED. Tie oni parolis pri "planlingvoj" kaj la ĉeestantoj eĉ diskutis pri la "alternativo": "Ĉu CED estu institucio ĉefe pledanta por Esperanto, aŭ ĝi estu scienca institucio, kiu nur dugrade pledu por Esperanto kiel solvo de la lingva problemo". Do: aperte pledadi por Esperanto surbaze de faktoj kaj scienca argumentado, kiel faradis CED ĝis Hamburgo, estas implicite "nescienca"; male, tre "science" estas ludadi interlingvistikon, kontraŭscienze ne distingadi inter diversaj mortnaskitaj lingvoprojektoj, unuflanke, kaj nia vivanta Esperanto kun riĉa kultura enhavo, aliflanke, kaj nur kaŝe, preskaŭ honteme, "dugrade" pledadi por Esperanto. Tiu tuta interlingvistikomanio, abunde disvastiĝinta en tia kontraŭscienca formo tra la nuntempa Esperanto-Movado, estas per si mem malutilega por la Internacia Lingvo.

En tiaj kondiĉoj mi akceptis la proponon de la redakcio prizorgi tiun ĉi rubrikon. Kompreneble, ĝi neniel povos plenumi la ampleksajn taskojn, kiujn havis la ĝishamburga CED, sed ĝi almenaŭ klopodos iomete plenigi la ekestintan vakuon, por ke la laboro de multaj kompetentuloj dum tiom da jaroj ne estu perdita. En la rubriko regule aperados tre koncizaj informoj pri la plej ĉefaj aspektoj de la lingva problemo kaj pri la plej esencaj dokumentoj rilate la Internacian Lingvon. La rubriko aperte kaj senkompromise, tute konforme al la karaktero de *Horizonto*, pledos por la Zamenhofa Esperanto kiel la sola vere lingvo kaj vere internacia el ĉiuj vidpunktoj: interna strukturo, socia portanto, celo kaj praktika apliko.

1.2 Konsilo pri ĝisdatigado de *EeP*

Okaze de la transdono de la arkivo de CED al la direktoro de la CO fine de 1974, mi sugestis, ke estontece la regulaj CED-dokumentoj estu eldonataj laŭ la ĉapitroj kaj iliaj subdividoj de *Esperanto en Perspektivo* (*EeP*), tiel ke tiu gravega verko estu daŭre ĝisdatigata. Tio estus doninta ankaŭ enspezon, ĉar tre kredible la plimulto de la aĉetintoj de *EeP* volonte abonus tiajn dokumentojn. Bedaŭrinde, ankaŭ tiurilate nenio estas farita.

Restas, tamen, la ebleco, ke ĉiu posedanto de tiu verko, precipe la aktivuloj sur la kampo de informado, mem kompletigadu kaj ĝisdatigadu ĝin. Jen konsilo: Kiel eble plej dikan dosierujon oni dividu en 23 partojn laŭ la 23 ĉapitroj de EeP; kiam ajn oni sciĝas pri iu verko, studo, artikolo aŭ dokumento pri temo traktita en EeP, oni aŭ eltondu la koncernan tekston aŭ notu koncize sur aparta folio la titolon kaj esencan enhavon kun indiko kie troviĝas la tuta teksto; en ambaŭ kazoj oni indiku en la supra dekstra angulo la koncernajn ĉapitron, subĉapitron, sekcion kaj, eventuale, subsekcion laŭ la enhavtabelo de EeP, kaj enmetu la tekston aŭ noton en la ĝustan lokon de la dosierujo. Ekzemple, la tekston de la Leĝpropono n-ro 1667 de 16.05.1975 pri enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la francajn lernejojn, aperintan en pluraj periodaĵoj (interalie en *SAT-Amikaro* de decembro 1975) oni povas facile eltondi, signi per 4.6.2 kaj enmeti en parton 4 de la dosierujo. Alia ekzemplo: *Hamburgo en Retrospektivo* evidente ne povas esti metita en la dosierujon, sed oni povas fari noton kaj enmeti ĝin kiel 18.8 en parton 18; referenca noto kun signo 21.4 devus esti metita en parton 21 de la dosierujo.

Utiligante EeP por preparado de prelegoj, verkado de artikoloj aŭ similaj celoj oni ĉiam konsultu ankaŭ sian dosierujon por inkluzivigi la plej freŝdatajn faktojn.

1.3 Korekto de HeR

En la verko *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA* (HeR) enŝteliĝis 2-3 eraretoj, el kiuj unu estas sufiĉe grava. Sur p. 44 estas dirite, ke en 1974, do en la decida jaro antaŭ Hamburgo, la Estraro de TEJO (junulara sekcio de UEA) konsistis el "prezidantino F. Szabó-Felső kaj vicprezidanto H. Eichhorn, ambaŭ aktivaj membroj de la komunista partio; alia vicprezidanto T. Jansson, ĝenerala sekretario R. Triolle, kasisto J. M. Liouville-Cash, ĉiuj minimume fortaj 'simpatiantoj' ". Per sia letero de 16.10.1975 s-ro T. Jansson atentigis min, ke li ne estis nur 'simpatianto', sed ke ekde 1967 li "laboris/aktivis por la komunista partio en Svedio kaj organizaĵoj ligitaj al ĝi", kaj ke ekde 1969 li "estas aktiva membro de la sama partio". Tio signifas, ke en la antaŭhamburga periodo de la politika konspiro la prezidantino kaj ambau vicprezidantoj estis aktivaj membroj de la komunista partio, kaj la ĝenerala sekretario kaj kasisto minimume "simpatiantoj". La posedantoj de HeR bv. korekti. La 1-2 aliaj korektoj, tute sensignifaj, kaj pluraj novaj faktoj kaj dokumentoj aperos en la dua eldono de la verko.

1.4 Peto al la redakcioj

La redakcioj de ĉiuj Esperanto-periodaĵoj estas petataj regule sendadi al la persona adreso de la subskribinto (77, Grasmere Avenue, Wembley, Middx. HA9 8TF, Britio) siajn publikaĵojn, por ke li povu sekvi la evoluon interne de la Esperanto-Movado kaj adekvate redaktadi tiun ĉi rubrikon.

1.5 Sekvanta numero

La sekvanta numero estos plene dediĉita al kelkaj lastatempaj ekzemploj de sukcesa argumentado por la Internacia Lingvo en diversaj landoj.

2.1 Ekzemploj de sukcesa argumentado por Esperanto

Konforme al la promeso en 1.5 de tiu ĉi rubriko (ED), publikigita en *Horizonto* n-ro 1/76, ni prezentas sube kelkajn ekzemplojn de trafa argumentado por la Internacia Lingvo en publikaj diskutoj.

2.1.1 Italio. – La granda itala gazeto *Il Tempo* publikigis fine de 1975 tutan aron da artikoloj kaj leteroj al redakcio en ligo kun la diskuto pri la lingva problemoj kaj la dezirinda solvo. La argumentoj kaj kontraŭargumentoj turniĝis preskaŭ ekskluzive ĉirkaŭ Esperanto. Kiel kutime en tiaspecaj diskutoj, al la kritikantoj de la Internacia Lingvo mankis la necesaj scioj pri la strukturo de la lingvo kaj pri ĝiaj internacia karaktero, kultura enhavo kaj aktuala rolo kiel internacia instrumento de komunikado. Tio ĉiam faciligas replikon. Ekzemple, en n-ro 325 de 29.11.75 aperis longa artikolo-letero de E. Argentieri sub la titolo "Esperanto ne estas neŭtrala", en kiu la skribinto provas pravigi sian supraĵan aserton per la iam teda kaj pseŭdosciencia argumento ke Esperanto estas okcidenteŭropa, ĉar ĝiaj "gramatiko kaj vortaro estas tiaj". La reagoj de R. di Prinzio en n-ro 338 kaj, eĉ pli, tiu de A. Menabene en n-ro 342 de 16.12.75 estas tre bonaj por ordinara leganto de tiaspeca populara gazeto. En ambaŭ leteroj-artikoloj estas emfazita la fakto, ke Esperanto estas disvastiĝinta ankaŭ en la orienteŭropaj landoj (eĉ pli ol en Okcidenta Eŭropo), en Ĉinio, Japanio kaj aliaj landoj, kies lingvoj ne estas "okcidenteŭropaj". Menabene prave utiligis la okazon por menciigi la leĝproponon pri enkonduko de Esperanto en la francajn lernejojn, la uzon de Esperanto por la internaciaj rilatoj de Oomoto, la

instruadon de la lingvo en Universitato de Budapeŝto (kial ne menciĝis la aliajn universitatojn?) kaj la ampleksajn favorajn artikolojn en la vatikana *Osservatore Romano*. P. G. Saraggi, italo vivanta en Parizo en la n-ro 18.12.75 aldonis siajn spertojn de persono vivanta en fremda lingva medio.

La diskuto sendube elvokis interesiĝon de la legantaro. Tion pruvas ankaŭ la fakto, ke italaj geamikoj, neesperantistoj, sendis al mi la koncernajn numerojn de la gazeto. Estas nur iom bedaŭrinde, ke neniu el la reagintoj respondis al la malĝusta aserto de Argentieri, ke Esperanto estas laŭ sia strukturo okcidenteŭropa, cetere tute kontraŭscienca esprimo. Tiu demando estas amplekse pritraktita, interalie en la dokumento de la ĝishamburga CED A/IV/4-6 (*Jes, Esperanto Estas la Respondo al la Monda Lingva Problemo*), en *La Problemo de Lingva Komunikado en la Nuntempa Mondo* (CED, 1971), en 2.3.2 de *Esperanto en Perspektivo* (EeP) kaj en *Elektitaj Paroladoj* de la subskribinto, p. 48 k.s. Por reagadi kiel eble plej trafe oni devus utiligadi la jam ekzistantajn verkojn, studojn kaj artikolojn.

2.1.2 Svislando. – Tio kondukas al kelkaj bonegaj tekstoj, publikigitaj de *Kultura Centro Esperantista* (KCE) en La Chaux-de-Fonds, nuntempe unu el la plej gravaj kaj aktivaj institucioj de la neŭtrala Esperanto-Movado. Unue estu menciita la artikolo "Eŭropo Finis kun Sia Latina", aperinta en la germana *Die Rheinpfalz* kaj publikigita de KCE ankaŭ en franca traduko. La artikolo objekte rekonas, ke vere "babela konfuzo" paralizas ĉiam pli la funkciadon de Eŭropa Ekonomia Komunaĵo (EEK) kaj ke multaj eŭropaj parlamentanoj konsentas pri la bezono de komuna lingvo por Eŭropo. La ĉiama demando estas: kiu? Dum unuj pledas por la angla, aliaj volus simpligi la latinan kaj revivigi ĝin. Ne pro tiu utopia alternativo, sed pro kelkaj informoj pri la lingvaj servoj de la Komunaĵo (ekzemple 1.450 interpretistoj kaj tradukistoj) la artikolo estas interesa. Estas konsilinde signi ĝin per 1.2 kaj enmeti ĝin en la dosierujon pri ĝisdatigado de EeP laŭ la sugesto farita en 1.2 de la rubriko ED en *Horizonto* 1/76.

Bonega estas la aperta letero "Ĉu Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) Malsanas?", kiun Claude Piron adresis la 26-an de junio, 1975, al la Ĝenerala Direktoro de tiu organizaĵo kaj kiun KCE publikigis en la franca originalo kaj en Esperanta traduko. Ĝi enhavas multajn konkretajn informojn pri diversaj projektoj kaj aktivadoj, kiujn MOS devis forlasi pro manko de mono, dum samtempe ĝi decidis akcepti ankaŭ la ĉinan kaj araban kiel laborajn lingvojn, kio kostos al la Organizaĵo pliajn 12,500.000 sv. frankojn jare. Per tiu sumo oni povus savi la vivojn de 10

milionoj da trakomuloj. La letero energie pledas por radikala solvo de tiu neeltenebla lingva situacio. Tre bona aldono al 1.3.5 de EeP.

"Konfeso de Eŭropa Frenezulo" estas plia unuaranga artikolo de C. Piron. En tre sprita polemika maniero li pruvas la monde internacian strukturan karakteron de Esperanto per abundo da faktoj. Eĉ pli fortajn pruvojn pri la struktura internacieco de la Internacia Lingvo C. Piron donis en sia longa letero de la 5-a de majo 1975 al ĝeneva psikologino. La granda erudicio, perfekta scio de Esperanto kaj bonega kono de multaj lingvoj, inkluzive la ĉinan, ebligis al Piron ne nur potence prezenti la internaciecon de Esperanto, sed ankaŭ ĝiajn multflankajn avantaĝojn super la naciaj lingvoj, precipe la franca kaj la angla. La artikolo kaj la letero kompletigas la argumentojn en 2.3.2 de EeP.

En kelkaj svisaj gazetoj, inter kiuj ankaŭ en *Le Démocrate* de 16.09.75 kaj en *Nouvelle Revue de Lausanne* aperis artikolo de Jean-Paul Pellaton sub la titolo "Ĉu Esperanto en La Lernejon?", en kiu la aŭtoro asertas, interalie, ke "interlingua" estas supera pro la jam misfama t.n."tuja komprenebleco". Plian fojon C. Piron reagis per trafa artikolo "La Angla aŭ Esperanto?" en la samaj gazetoj. En ĝi li klare distingas, tute laŭ la linio de la ĝishamburga CED, esprimita ankaŭ en la supre menciita dokumento A/IV/4-6, inter la vivanta Esperanto kaj la mortnaskitaj projektoj de internacia lingvo. Li kompetente refutas la konatajn "riproĉojn" (akuzativo, ortografio), kiuj fakte estas ne malavantaĝoj, sed avantaĝoj de Esperanto el ĉiuj vidpunktoj. Tiu artikolo kompletigas 2.3 kaj 4.6 de EeP.

La fortaj argumentoj de Piron ricevas eĉ pli da forto pro lia pozicio de oficiala interpretisto en internaciaj organizaĵoj, precipe en MOS, kaj pro la fakto ke li nun ankaŭ instruas en la Fakultato de Psikologio kaj de Edukaj Sciencoj en la Universitato de Ĝenevo. Ĉiuj agadgrupoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado devus havigi la menciitajn artikolojn, studi ilin atente kaj utiligi por informado en la koncernaj sferoj aldone al la materialoj troviĝantaj en EeP. La adreso de KCE estas: Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, La Chaux-de-Fonds Svislando.

2.1.3 Francio. – En la pariza periodaĵo *30 Jours d'Europe* de septembro, 1975, Louis C. D. Joos publikigis ampleksan artikolon "La Babela Turo de la Eŭropaj Idiomoj" en kiu li pritraktas la ideon de komuna lingvo por EEK, ekzamenas la kvalitojn kaj ŝancojn de unuopaj eŭropaj lingvoj kaj venas al konkludo, ke necesas "krakigi la lingvan narcisismon", aŭ alivorte: ĉiu parolu sian lingvon, respektu la aliajn kaj klopodu almenaŭ kompreni ilin. La Internacian Lingvon li superece forĵetas, ĉar, laŭ li ĝi ne estas "portanto de civilizo"! Kompreneble, tia kontraŭscienca aserto, kiu

montras alispecan narcisismon kaj solvas nenion, elvokis multnombrajn reagojn, parte tre bonajn. Pluraj el ili estis publikigitaj en la postaj numeroj de la periodaĵo. La aliaj verŝajne aperos en la sekvantaj. La diskuto estas daŭrigata. Ni revenos al ĝi kaj entute al la lingva problemo en Eŭropo, ĉiam pli akuta, en unu el la sekvantaj numeroj de tiu ĉi rubriko.

2.2 Esperanto en la Universitato de Clermont Ferrand

Jam kelkajn jarojn bone funkcias lektorato de Esperanto en la kadro de la katedro pri anglistiko, kiun gvidas Prof. P. Janton. Laŭ la informo ĵus ricevita de Prof. Janton, la Internacia Lingvo estas instruata dum 4 horoj ĉiusemajne al du grupoj da studentoj: komencantoj (38) kaj progresantoj (8). La lernantoj en ambaŭ grupoj estas studentoj en la unua aŭ dua universitata studjaro. Esperanto estas nedeviga, sed, se elektita, ĝi estas ekzamena objekto. En EeP, 4.6.4, sur p. 106 bv. aldoni la supran informon tuj post 10. Aix-en-Provence.

2.3 Interlingvistiko

En *Filologo* n-ro 3/75 estas publikigita serioza kaj klera artikolo "Interlingvistiko", verkita de Atanas D. Atanasov, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Ĝi rilatas al 3.2.9.4 de EeP. Tia artikolo estas io tute alia ol la kontraŭscienca kaj danĝera "planlingvomano", kiu furoras en kelkaj medioj de la hodiaŭa Esperanto-Movado.

2.4 Libro pri la lingvoj de Eŭropo

En 1975 aperis en München interesa libro sub la titolo *Soziologie und Politik der Sprachen Europas* (Sociologio kaj Politiko de la Lingvoj de Eŭropo) de Harald Haarman. La verko prezentiĝas kiel ampleksa analizo de la lingva situacio en Eŭropo kaj de la lingvopolitiko en la modernaj eŭropaj ŝtatoj. La plej interesa parto estas la skiza trarigardo pri 67 lingvoj de Eŭropo kun koncizaj indikoj por ĉiu el ili pri la nombro de parolantoj, teritoria disvastigiteco, karakterizoj, deveno, formiĝo kiel norma lingvo kaj aliaj utilaj sciindaĵoj. El tiu vidpunkto – nur el tiu – la verko estas tre utila por ĉiuj studantoj de la lingva problemo en Eŭropo. La pozitivaj kaj negativaj flankoj de la libro, inkluzive plurajn erarojn pri faktoj, estas pritraktitaj en recenzo de la subskribinto, publikigita en *Dialogo* n-ro 4/75, oficiala organo de SEL.

2.5 Aŭtoraj rajtoj de "Esperanto en Perspektivo"

En *Esperanto* de januaro 1976 sur p. 3 aperis informo sub la titolo "Kompletigo de Esperanto en Perspektivo". Mi mem, kvankam ĉefredaktoro de EeP kaj verkinto de ĉirkaŭ duono de la tuta libro, sciis absolute nenion pri tiu projekto. La redakcio eĉ ne sendis al mi la koncernan numeron de *Esperanto*, por ke mi almenaŭ tiamaniere sciigu pri la afero. La aserto en la informo, ke "laŭ siatempa propono de la aŭtoroj (el kiuj Prof. Lapenna rezignis pri tantiemo de la eldono), la Estraro decidis meti 3 % de la vendoprezco en la konton de CED" estas malĝusta kaj misgvida. "La aŭtoroj" ne proponis, nek povis proponi kion ajn pri mia intence modesta parto de la tantiemo, kiun mi volis donaci al CED en la ĝishamburgaj baza strukturo, celoj kaj realigoj. Sekve, ankaŭ la Estraro ne rajtis fari kian ajn "decidon" tiurilate. Krome, mi mem, same kiel la du kunaŭtoroj, eksplicite rezervis la aŭtorajn rajtojn pri niaj respektivaj partoj. Pri ambaŭ demandoj – mia intencita, sed retirita donaco pro la neekzisto de la ĝishamburga CED kaj aŭtoraj rajtoj – mi sendis ĝustigon al la redakcio de *Esperanto* la 5-an de februaro 1976 kaj samtempe informis pri tio la Estraron de UEA, sed la nuna gvidantaro rifuzis publikigi ankaŭ tiun ĝustigon.

Ĉar la afero estas ankoraŭ diskutata kaj ekzistas espereto, ke la nuna Estraro de UEA konsciiĝos pri sia jura respondecado almenaŭ rilate mian rajton disponi laŭ mia bontrovo pri miaj materiaj kaj intelektaj propretoj, mi ne deziras prezenti la detalojn en la nuna stadio. Necesas, tamen, atentigi ĉiujn interesiĝantojn pri la situacio rilate la aŭtorajn rajtojn kaj pri la fakto, ke per mia letero de 14.02.76 al la prezidanto de UEA mi ankaŭ malpermesis la publikigon de la anoncita serio, kiu celas kompletigadi la verkon *Esperanto en Perspektivo*, "sed estas preta konsideri permeson, se oni informos min precize pri kio temas".

3.1 Pliaj kontraŭneŭtralecaj dokumentoj

3.1.1 Enkonduka rimarko. – En la verko *Hamburgo en Retrospektivo* (HeR) estas prezentitaj multnombraj dokumentoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA. Ĉap. 3 de la verko enhavas detalan analizon de la Programo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), plu aliĝinta asocio de UEA. Por bone kompreni la politikan kaj kontraŭneŭtralecan materialon, kiu estos prezentita kaj analizita sube, estas necese atente tralegi *HeR*. Utilas enkonduke rimarkigi, ke la Statuto de Bulgara Esperantista Asocio, kiel laste reviziita en 1972 dum la kongreso en Smoljan, la sama kiu akceptis la nunan Programon de BEA, eksplicite

mencias kiel unu el la celoj de tiu organizaĵo "eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj proleta internaciismo, de alligiteco al tendaro de l'socialismo...".

3.1.2 Programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. – Per sia letero de 01.07.1975, adresita al la Estraro kaj Komitato de UEA, kaj atinginta la aŭtoron de *HeR* post la publikigo de tiu verko, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko (CLEK) proponis, ke la Komitato de UEA decidu dum siaj kunsidoj en Kopenhago (1975) pri ĝia aliĝpeto "kiel kolektiva membro de UEA" ekde 01.01.1976. Al la propono estis aldonitaj diversaj dokumentoj, el kiuj la plej grava estas la "Gvidprincipoj por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR". Sur la unua paĝo troviĝas jena baza principo:

"La esperantistoj de GDR utiligas la Internacian Lingvon *por la ideologia batalo kontraŭ imperiismo* (de la okcidenta mondo, kompreneble – rim. de la red.). Ili *decide kontraŭas* ĉiujn variantojn de antikomunismo, reviziismo, konverĝa teorio kaj *neŭtralismo*. Ili aktivas por akceptigo de *paca kunekzistado inter diverssociaj ŝtatoj* (v. p. 50 de *HeR*), subtenas la *antiimperiisman liberigan batalon* kaj pledas por pli larĝa uzo de Esperanto serve al la paco kaj progreso. Ili kunlaboras kun ĉiuj *progresivaj* lingvoamikoj kaj organizaĵoj, kiuj sekvas la samajn aŭ similajn celojn." (Substrekitaj de la red.)

Temas pri tiu sama CLEK, en kies ŝtato la importado de la revuo *Esperanto* kaj de aliaj publikaĵoj de la neŭtrala ĝishamburga UEA estis malpermesita kaj la publikaĵoj mem estis konfiskataj.

Laŭ la Protokolo de la kunsidoj de la Komitato de UEA en Kopenhago, la aliĝpeto de CLEK eniris en la tagordon kiel p-to 31c. Pri tiu aliĝpeto la Komitato diskutis sabaton, jaŭdon kaj denove sabaton de la kongresa semajno, sed vane oni serĉas en la Protokolo iun ajn informon pri tiuj diskutoj. Partopreninto informis, ke fine oni prokrastis la decidon pri tiu aliĝpeto, sed en la Protokolo troviĝas absolute nenio pri la decido prokrasti la decidon. Fakte, tio estas plia falsado de la okazintaĵoj en la Komitato, ĉar gravaj faktoj estas prisilentitaj. Ankaŭ la septembra *Esperanto* raportis, ke "pliaj landaj asocioj petis aliĝon al UEA", sed diris nenion pri la sorto de tiuj aliĝpetoj. Plia prisilentado de gravaj faktoj.

Evidente, la Komitato de UEA, en sia nuna konsisto, ne povis rifuzi la aliĝpeton de CLEK, kies programo estas klare politika kaj tial evidente kontraŭa al art. 13 kaj 4 de la Statuto de UEA, sed ĝi ankaŭ ne kuraĝis akcepti tiun politikan organizaĵon kiel aliĝintan asocion, verŝajne pro la ekzisto de *HeR*. Tial la decido estis prokrastita. Fakte, la aliĝpeto devis esti tuj rifuzita konforme al la Statuto.

3.1.3 Programo de ĈEA por la jaroj 1976-1980. – Dum la Dua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, okazinta komence de februaro 1976 en Prago, estis akceptita la Programo de ĈEA por la jaroj 1976-1980. *Starto*, organo de ĈEA, publikigis en n-ro 1/1976 sur p. 4 koncizan resumon de la Programo. La publikigita resumo estas fakte falsaĵo, ĉar ĝi komplete kaŝas la politikan karakteron de la Programo. Anonima amiko de la neŭtrala Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio sendis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko la kompletan tekston. Jen resumo de la ĉefaj punktoj kun originalaj citaĵoj el la Programo mem. (Substrekitaj de la red.)

Jam sur la unua paĝo estas formulita la baza principo de agado:

"Kiel anoj de ŝtato, kiu konstruas modernan socialisman socion, bazitan sur la principoj de socialisma proprieto kaj *proletara internaciismo* sub la gvido de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, ni klopodos per *idee-politika* kaj organiza agado pri edukado de niaj anoj al konscia kaj aktiva ŝtataneco, al respektado de la principoj de demokratia centrismo kaj internacia solidareco en la spirito de la rezolucioj de la 15-a Kongreso de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio."

Sur la sama unua paĝo troviĝas direktivoj por "efika kunlaboro kun esperantistaj organizaĵoj eksterlande, unuavice kun Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj precipe en la landoj de socialisma socio". La celo estas ne daŭrigi la brilajn tradiciojn de la neŭtrala Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio, sed la "progresemajn tradiciojn de la laborista Esperanto-Movado". Pri la vera senco de la vortoj "progresemajn tradiciojn de la laborista Esperanto-Movado" v. 2.1 de *HeR*. La fina celo de tiu tuta agado estas "*plifortigi la aŭtoritaton de la socialismaj landoj en la tutmonda Esperanto-Movado*", alivorte eĉ pli firme ekregi en UEA.

En la p-to 3 la Programo instrukas pri la rolo de la Bulteno de ĈEA "kiel organiza kaj informa ligilo kaj samtempe kiel *idee-politika helpanto* de la Asocio al *sistema edukado* de lokaj grupoj kaj ĉiuj anoj en la spirito de principoj de socialisma patrioteco kaj *proletara internaciismo*".

La p-to 5 de la Programo rilatas al UEA kaj MEM, kiuj estas metitaj sur la saman nivelon kun la sama rango:

"En kunlaboro kun la kulminaj /superaj, rim. de la red./ internaciaj Esperanto-Organizaĵoj (UEA kaj MEM) atente sekvi laŭ la ebloj la disvastigon de nia anaro kaj la *reprezentiĝon en la gvidaj organoj de la menciitaj organizaĵoj*. Samtempe en la kadro de MEM kaj ankaŭ en duflankaj rilatoj kun la Esperantaj asocioj de socialismaj landoj, kaj ankaŭ en la organoj de UEA, atribui al la komuna batalo por la paco kaj por plialtigo de la prestiĝo de UEA en internacia skalo."

Kompreneble, ĉiuj prudentaj homoj en la mondo deziras pacon, sed en la Programo de ĈEA – same kiel en la programoj kaj praktikaj agadoj de la aliaj Esperanto-organizaĵoj en la blokaj landoj – ne temas pri tiu paco, sed pri paco laŭ la koncepto de MEM, siavice subigita al la Monda Packonsilio, siavice instrumento de la nuntempa soveta politiko. Tion aperte difinas la p-to 6 de la Programo:

"Kiel centron de la tuta agado de ĈEA kaj de ĉiuj niaj esperantistoj estas necese rigardi la aktivan laboron en la sfero de la paca movado. Ĝia iniciatanto plue fariĝos /plu estos, rim. de la red./ la porpaca sekcio de ĈEA, kiu okupas gravan pozicion kiel ĉenero de MEM, pere de kiu ĝi kunlaboras kun Monda Packonsilio... La sekcio atingas rimarkindajn rezultojn ankaŭ en konkreta kunlaboro kun Ĉeĥoslovaka Porpaca Movado en la batalo kontraŭ faŝismo en Ĉilio kaj kontraŭ imperiismo de Izraelio [Israelo] en arabaj landoj..."

Kiel oni vidas la "israela imperiismo" troviĝas ankaŭ en tiu ĉi Programo de landa asocio aliĝinta al UEA, al kiu apartenas ankaŭ Esperanto-Ligo en Israelo. Kiom longe ĝi ankoraŭ toleros tian politikan programon kontraŭ sia propra lando en la sino de UEA?

En la p-to 7 de la Programo estas pritraktitaj la kontaktoj inter la Junulara Komisiono de ĈEA kaj la Centra Komitato de la Asocio de Socialista Junularo en Ĉeĥoslovakio. La tasko estas – asertas la Programo – eduki la junularon al "praktika esprimado kaj validigo de la ideoj de socialisma patrioteco, proletara internaciismo kaj klasa koncepto de la mondo kaj ties problemoj".

Ŝajnas, ke eĉ dum amuziĝoj la esperantista junularo devas esti prilaborata en la senco de "proleta internaciismo" kaj "klasa koncepto de la mondo", ĉar la Programo eksplicite instrukas, ke dum la "amuziĝo de la junularo" necesas samtempe "edukadi el ties vicoj novajn adeptojn por sinsekva transprenado de pli superaj respondecaj taskoj kaj funkcioj en la tuta Esperanto-Movado". La p-toj 8-10 de la Programo rilatas precipe al la laboroj de la "metode-propaganda" kaj "politike eduka" komisionoj de ĈEA kun la celo "daŭre plialtigadi la politike-idean nivelon de la Movado kaj ties celtrafaj metodoj kaj formoj de la gvidado kaj propagando". Subvenciojn de la ŝtato "oni devus en la estonteco uzi por celtrafa financado de la gazeto *Paco*, propagandaj eldonaĵoj pri ĈSSR, politike-eduka agado kaj klerigado de ĈEA funkciuloj".

En la fina parto la Programo atakas la "esperantisman sektismon", kio en la lingvaĵo de la Programo evidente egalas al "abstrakta internaciismo, neŭtralismo, pacifismo, kosmopolitismo kaj aliaj malutilaj devojiĝoj" en la Programo de la Bulgara Esperantista Asocio (v. 3.2 de *HeR*, precipe p. 21). Ĝi aperte instrukas:

"La ideoj, politikaj kaj porlaboraj principoj de la agado, kiuj estas entenataj en ĉi tiu Programdeklaro, formas la fundamentan direktivon kaj gvidilon, kiun ni en la proksima periodo sekvos..."

3.1.4 Konciza komento. – Ne necesas esti politika sciencisto por kompreni, ke la supraj dokumentoj, same kiel la materialoj prezentitaj en *HeR*, estas nete politikaj kaj evidente kontraŭaj al la principo de politika neŭtraleco en la senco difinita en la Statuto de UEA. Tamen, por plene kompreni la tutan sencion de tiu politika agado necesas scii iom pli pri la politika signifo de la konceptoj de "paca kunekzistado", "proleta internaciismo", "konverĝa teorio", "klasa koncepto de la mondo" k.a., abunde utiligitaj ankaŭ ekster la analizitaj dokumentoj. Ĉi tie utilas nur mencii, ke la koncepto de "proleta internaciismo", kiel formulita en la nuntempaj politika kaj internacijura doktrinoj de Soveta Unio, estas malakceptitaj eĉ de pluraj komunistaj partioj (ekzemple la ĉina, jugoslavia, franca, itala k.a.) por ne paroli pri partioj kun aliaj politikaj programoj. La principo de "proleta internaciismo" kaj la kunligitaj principoj de "kunekzistado" kaj "klasbatalo" estas ekskluzivaj. Ili kontraŭas ne nur al la principo de neŭtraleco de UEA, sed ankaŭ al ĝia fundamenta celo: "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo" (art. 3.b de la Statuto). En 3.2 de *HeR* estas donitaj kelkaj difinoj pri la menciitaj konceptoj. Interesiĝantoj kun scio de la angla trovos pliajn informojn pri faktoj kaj analizojn en du artikoloj de la redaktoro de tiu ĉi rubriko: (i) *The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence*, publikigita en *International and Comparative Law Quarterly*, julio, 1963, p-oj 737-777; (ii) *The Soviet Concept of 'Socialist' International Law*, publikigita en *The Year Book of World Affairs*, 1975, p-oj 242-264. Ambaŭ publikaĵoj estas certe troveblaj en universitataj bibliotekoj.

3.2 Ankoraŭ pri la aŭtoraj rajtoj de "Esperanto en Perspektivo"

En 2.5 de tiu ĉi rubriko estas donitaj koncizaj informoj rilate la aŭtorajn rajtojn de la verko *Esperanto en Perspektivo*. En la fino estis dirite, ke "ekzistas espereto, ke la nuna Estraro de UEA konsciiĝos pri sia jura respondeco almenaŭ rilate mian rajton disponi laŭ mia bontrovo pri miaj materia kaj intelekta propretoj". Ŝajnas, ke eĉ tiu espereto nun malaperis. Sekve, mi informas ĉiujn interesiĝantojn, ke mi mem konservas ĉiujn miajn aŭtorajn rajtojn kaj ke, konforme al mia letero de

14.02.76 al la prezidanto de UEA, mi malpermesis la publikigon de la anoncita serio, kiu celas kompletigadi la verkon *Esperanto en Perspektivo*. Mi ripetas publike, ke mi estas preta konsideri permeson, se la nuna gvidantaro de UEA informos min pri kio precize temas.

4.1 Plia malkresko de la membronombro de UEA

En la artikolo "UEA en Danĝero de Malintegriĝo", publikigita en la aprila numero de *Esperanto*, 1974, kaj jam konata kiel la *Aprila Artikolo*, la redaktoro de tiu ĉi rubriko malkovris la ĉefajn trajtojn de la politika konspiro en UEA kaj admonis la membraron pri la katastrofo, kiu minacas ne nur la Asocion, sed eĉ la lingvon mem, "se oni ne haltigas plej energie tiun subfosan agadon". Inter alie estis antaŭvidite, ke "la individua membraro abunde forlasos la Asocion" (p. 63).

En artikolo kun titolo "Por ke Estu Tute Klare" (fakte: por ke plu estu malklare), verkita en pli ol malĝentila tono, la nuna redaktoro de *Esperanto* asertis, ke "la hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 ekzemplojn", ke "la samaj eventoj rezultigis ankaŭ almenaŭ 5 realigojn al UEA", kaj li superece-impertinente komentis: "Kaj kio!? Kion oni volas?" (*Esperanto*, n-ro 11/1974, p. 183). Pretere dirite, reago je tiu artikolo estis sendita al la redakcio de *Esperanto* la 21-an de novembro 1974, sed, kompreneble, la cenzuro en la nuna UEA malebligis ankaŭ ĝian publikigon laŭ la jam misfama formulo de la nuna Estraro: unue abunde disfamigadi malverojn kaj poste malpermesadi korektojn kvazaŭe por "eviti polemikadojn". La reago tamen aperis en la hispana *Boletín*, n-ro 1-2/1975, p. 21.

En *Horizonto* n-ro 3/1976 mi atentigis, ke en 1975 la membronombro de UEA denove malaltiĝis, sed ke precizaj informoj mankas, ĉar la statistiko por tiu jaro ankoraŭ ne estas publikigita (p. 50). Intertempe, en la aprila numero de *Esperanto* (p. 78), kiun la abonantoj, laŭ la nuna sistemo, ricevis nur komence de majo, aperis la statistiko pri la membraro de UEA en 1975.

Montriĝas, ke en 1974 UEA perdis precize 759 individuajn membrojn (IM) kaj en 1975 pliajn 418, tiel ke fine de 1975 ĝi havis entute nur 6.025 IM (inkluzive la "almenaŭ 5 realigojn" de la redaktoro de *Esperanto*), kompare kun 7.302 IM en 1973, la lasta jaro antaŭ Hamburgo. Tio signifas, ke en nuraj 2 jaroj sub la rego de politikaj intrigoj, malvero kaj nigriĝoj la "neta" perdo estis 1.177 individuaj membroj, eĉ senkonsidere al la fakto, ke el la 991 dumvivaj membroj multaj ne forlasis la Asocion

ĝuste tial, ĉar ili anticipis pagis la dumvivan kotizon (v. la finajn alineojn de 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*). Tiurilate UEA retroiris je "nuraj" 21 jaroj: ĝi estas la plej malalta nombro de IM ekde 1954, kiam, *dum sia suprenirado*, UEA estis atinginta 6.103 IM, do 78 pli ol en 1975.

Estas interese noti, ke eĉ la membronombro de "Societo Zamenhof", iniciatita kaj pompe anoncita de la nuna gvidantaro de UEA, malaltiĝis de 232 en 1974 al 123 en 1975, malgraŭ la alloga nomo kaj diversaj aliaj allogaĵoj, ekzemple "speciala akcepto por la membroj de la Societo ĉiujare en UK", aŭ la aparta "privilegio", absolute senprecedenca (!), "turni sin rekte al la prezidanto por ricevi aktualajn informojn aŭ fari sugestojn pri la Asocio" (*Esperanto*, n-ro 2/1975, p. 21).

La membroperdo de prekaŭ 20 % en solaj 2 jaroj estas nur unu el la multaj eksteraj signoj de la profunda interna krizo de UEA, kiun kaŭzis la hamburgaj eventoj kaj kiun neniam misprezentoj, tordado de faktoj kaj blufoj povas ŝanĝi.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 18.6 kaj 18.7 de *Esperanto en Perspektivo*.

4.2 Malfortiĝo de landaj organizaĵoj

La situacio en multaj okcidentaj landaj asocioj ne estas pli bona. La membronombro de la brita Asocio, iam unu el la plej solidaj, terure malaltiĝis al nuraj 869 (*Esperanto*, n-ro 4/1976, p. 78), dum ĝia organo *La Brita Esperantisto*, iam regule publikigata ĉiumonate, nun ne aperas dum monatoj; la franca asocio forlasis pli ol 200 membroj kaj ĝia organo aperadas sporade; la germana asocio jam delonge perdis sian organon GER kaj la statistiko pri ĝia membraro estas evidente blufa; el Usono ne venas vivosigno; *Sonorilo*, pli frue *Belga Esperantisto*, fondita en 1902 kiel *Belga Sonorilo*, ĉesis aperadi; la aliaj organoj de landaj asocioj (kun kelkaj esceptoj) fariĝas ĉiam pli malgrandaj, neregulaj, pale senenhavaj; ktp. Aliflanke, tute kompreneble, kreskas kaj prosperas la politike malneŭtralaj, luksaj periodaĵoj eldonataj de la blokaj landaj asocioj en UEA, abunde subvenciataj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj ĝuste por tiuj politikaj celoj. Tio kontribuas al endoktrinigado de politike nematuraj aŭ nesufiĉe orientitaj personoj en la okcidenta Esperanto-Movado kaj donas, bedaŭrinde, al la tuta Esperanto-Movado plian stampon de politika malneŭtraleco.

Tiu ĉi ero kompletigas la respektivajn sekciojn de Ĉap. 15.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

4.3 Deklaro de la Estraro de UEA kaj MEM

En 3.1.3 de ED (*Horizonto*, p. 65) ni atentigis, ke en la programo de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio por la jaroj 1976-1980 UEA kaj MEM troviĝas sur la sama nivelo kun la sama rango. Jen plia interesa koincido:

La Deklaro de la Estraro de UEA de 12.04.1976 (*Esperanto*, n-ro 4/1976, p. 62) tekstas laŭvorte:

"La Estraro de UEA konstatas, ke aperis en la Esperanto-Movado pluraj cirkuleroj kaj aliaj skribaĵoj, kiuj enhavas senbazajn akuzojn kontraŭ UEA kaj atakojn kontraŭ kelkaj ĝiaj membroj. La fakto, ke la Estraro ne respondas al tiuj asertoj, neniel implicas, ke ili enhavas iajn ajn verojn. La Estraro ne deziras foruzi tempon je polemikado, ĉar ĝi okupiĝas pri pozitiva laboro por Esperanto kaj fidus je la kapablo de la membraro de UEA juĝi la veron interalie per la oficialaj eldonaĵoj de UEA, pri kiuj la Estraro akceptas plenan respondecon."

Paco, la luksega organo de la MEM-sekcio de Germana Demokratia Respubliko (en kiu la antaŭhamburgaj *Esperanto* kaj aliaj publikaĵoj de UEA estis sisteme konfiskataj) skribis sur p. 35 de la eldono por 1975 jenon:

"Ĵus antaŭ la TEJO- kaj Universala Kongresoj en Danio, kiuj okazis en julio/aŭgusto 1975, aperis ellaboraĵo 'Hamburgo en Retrospektivo' de la eksprezidanto kun veraĵoj, duonveraĵoj, subŝovaĵoj, fantaziaĵoj kaj sekve maltrafaj konkludoj. Por kiu celo? Li ne forgesu ke, se li havus alian karakteron, li hodiaŭ povus esti influriĉa honorprezidanto de UEA. Provante lanĉi novan internacian Esperanto-organizon, tiel nomatan 'neŭtralan', li nur finfine povas fiaski."

Por ne forgesi: ĉiu leganto de *Horizonto* perfekte scias, ke mi mem ne nur ne "provis lanĉi" kian ajn novan organizaĵon, sed, tute male, konsilis al ĉiuj, kiuj deziris krei tian neŭtralan organizaĵon, ne fari tion, sed kolektiĝi ĉirkaŭ la politike neŭtrala *Horizonto*. Ĉiuj legintoj de mia ekŝiĝa letero, kiun la cenzuro en UEA malpermesis publikigi, scias same perfekte, ke mi ne nur rifuzis akcepti la honoran prezidantecon el la manoj de la politikaj komplotintoj kaj iliaj aliancanoj, sed ankaŭ ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj en UEA, fine de 1975 eĉ el la membreco. Per sia insista petego, ke mi akceptu la honoran prezidantecon en UEA, la komplotintoj kaj aliancanoj volis fakte atingi, ke per akcepto mi sankciu la tutan politikan puĉon kaj la kunligitajn gravajn malkorektaĵojn. Kompreneble, ĉar mi ne havas "alian karakteron", sed la propran karakteron de honesteco, veramo kaj lojaleco al la politike neŭtrala Esperanto-Movado, mi ne falis en la reton de la manovro.

Ni ne scias precize al kiuj "cirkuleroj kaj aliaj skribaĵoj" aludas la Deklaro de la nuna gvidantaro de UEA, sed tre kredeble inter ili troviĝas *Hamburgo en Retrospektivo*, kiun la organo de MEM eksplicite mencias, sed ellasas la subtitolon "Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA". La enhava simileco kaj tempa koincido de la du tekstoj – tiu de UEA kaj tiu de MEM – estas eĉ pli ol evidenta, se oni konsideras, ke Stanislav Swistak, estrarano de UEA pri informado, estas samtempe membro de la redakta komitato de *Paco*. Mi publike invitas la Estraron de UEA kaj la redaktan komitaton de *Paco* montri ne per neserioza, hipokrita fuĝado en abstraktan "nedeziron foruzi tempon je polemikado", sed per konkretaj pruvoj, ke unusola el la multnombraj pruvitaj faktoj kaj analizoj en *Hamburgo en Retrospektivo*, en tiu ĉi rubriko de *Horizonto*, aŭ en kiu ajn alia mia teksto, estas malĝusta, aŭ, por uzi la lingvaĵon de la malpaciga *Paco*, "duonveraĵo, subŝovaĵo, fantaziaĵo". Cetere, polemiko estas nenio alia ol skriba publika diskutado, do respektinda literatura formo, kiu ebligas al la legantoj pesi la faktojn kaj argumentojn, diference de la malrespektindaj klaĉadoj kaj nigrigadoj en "sekretaj kunvenoj", "strikte konfidencaj cirkuleroj" kaj "privataj" leteroj skribitaj sur la oficiala papero de UEA, tiel abunde praktikataj de la konspirintoj antaŭ Hamburgo kaj post ĝi. Anstataŭ elturniĝadi per la kvazaŭa "pozitiva laboro por Esperanto", kiu fakte ĉesis ekde Hamburgo, ĝi prefere almenaŭ provu pozitive labori kaj ĉesigu la cenzuron por ebligi liberan diskutadon pri la nuna profunda krizo.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo* kaj Ĉap. 21 de *Esperanto en Perspektivo*.

5.1 Esperanto-dokumentoj de UEA

5.1.1 Enkonduka rimarko. – Kiel konate, la ĝishamburga Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉesis ekzisti. Unu el ĝiaj multnombraj agadoj en la periodo de 1952 ĝis la fino de 1974 estis eldonado de dokumentoj pri la lingva problemo en mondaj kadroj kaj pri la Internacia Lingvo. Entute CED publikigis 325 dokumentojn aldone al pluraj libroj, apartaj studoj kaj aliaj materialoj (v. ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo*). En n-ro 1/76 de *Esperanto*, p. 3, estis publikigita informo, ke en 1976 aperos nova serio de dokumentoj sub la titolo Esperanto-Dokumentoj; ke tiujn dokumentojn eldonados UEA mem (ne CED); kaj ke "ili anstataŭos la dokumentojn, kiujn de 1951 ĝis 1974 eldonis CED". Estis ankaŭ dirite, ke "*ĉiu el la novaj dokumentoj enhavos referencon pri la ĉapitro de Esperanto en Perspektivo* (en la plua

teksto EeP), al kiu ĝi plej proksime rilatas, tiel ke la nova serio formos kvazaŭ konstante kreskantan suplementon de tiu grava manlibro”.

Pro la fakto, ke mi mem kaj la du kunaŭtoroj de EeP eksplicite rezervis la aŭtorajn rajtojn pri niaj respektivaj partoj, mi malpermesis la publikigon de Esperanto-Dokumentoj, sed mi deklaris kaj al la nuna gvidantaro de UEA kaj publike en *Horizonto* (v. 2.5 kaj 3.2 de tiu ĉi rubriko), ke mi estas preta konsideri permeson, se oni informos min pri kio fakte temas. La nuna gvidantaro ne informis min pri tio, nek havigis de mi la necesan permeson, sed kontraŭleĝe komencis eldonadi la novan serion. Ĝi eĉ ne sendis al mi unusolan ekzempleron, tiel ke almenaŭ laŭ tiu vojo mi kiel ĉefredaktoro kaj verkinto de ĉ. duono de EeP informiĝu pri la enhavo de la dokumentoj en la "nova serio", precipe pri tiuj rilatantaj al la partoj de EeP, verkitaj de mi mem. Eĉ senkonsidere al ĉio cetera, tiu intenca malobservo de elementa devo, respektata ĉie en la civilizita mondo, plian fojon reflektas la nivelon de intelekta honesteco de la respondeculoj. Lasante flanke en tiu ĉi kunteksto la juran aspekton de tiu ĉi nova afero en UEA, ĉi tie ni limigu nin nur al la enhavo de la dokumentoj E 1-3, kiuj ĵus venis en mian posedon.

5.1.2 La "dokumentoj". – Sub la titolo *Unesko kaj UEA*, la unua "dokumento" en la "nova serio" celas prezenti la "kontribuon de UEA al la laboro de Unesko inter 1954-1974". La aŭtoro ne estas indikita. La teksto estas ĉerpita el ĉap. 22.3 ("Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko") de EeP, do unu el la ĉapitroj, pri kiuj la redaktoro de tiu ĉi rubriko rezervis la aŭtorajn rajtojn. La kompilinto ne kapablis eĉ atente legi kaj inteligente resumi tiun parton de la verko. Jam sur p. 2 de la "dokumento" li faris gravegan eraron. Transskribinte laŭvorte la konatan Rezolucion de 10.12.1954, li asertas: "El tiu ĉi Rezolucio kreskis la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio". Interlingvistika Informa Servo de D-ro A. Bormann rapidis senkritike ripeti la malĝustajon: "El tio (la Rezolucio de 10.12.1954) rezultis konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko..." (n-ro 2/76, p. 25). Fakte, ekde 1954 multfoje estis dirite kaj en EeP ripetite, ke la konsultaj rilatoj kaj la Peticio estis du sendependaj demandoj (p. 767). UEA ricevis la konsultajn rilatojn jam la 25-an de novembro 1954, dum la Rezolucio estis fine akceptita nur la 10-an de decembro 1954, kiel pli ol klare prezentite en EeP (p-oj 768 kaj 772-73). La kompilinto skribas, ke "la Rezolucio kondukis al aktiva kunlaboro inter UEA kaj Unesko en multaj sferoj" kaj tuj mencias la "gravajn kampanjojn de Unesko", en kiuj UEA partoprenis. Efektive, la partopreno de UEA en tiuj kampanjoj okazis en la kadro de la konsultaj rilatoj, ne rezulte de la Rezolucio, kiu havis kaj plu konservas tute aliajn signifon kaj valoron (v. 2.3.5.1 kaj 2.3.5.2 de

EeP). Sur la sama p. 2 la "dokumento" mencias la fakton, ke la Plenuma Komitato de Unesko decidis en novembro 1959, ke D-ro Zamenhof estu deklarita unu el la grandaj personecoj de la homaro, kaj asertas, ke "tio estis nur unu ero el la programo vasta kaj varia por la Zamenhofa centjara jubileo, kiu okazis sub la aŭspicio de Internacia Patrona Komitato". Fakte, tiu "ero" tute ne troviĝas en la Programo por la Zamenhof-Jaro, ellaborita de la subskribinto kaj akceptita de la Internacia Organiza Komitato sub la prezidanteco de la tiama prezidanto de UEA Prof. D-ro G. Canuto, sed estis rezulto de alia agado de la subskribinto surbaze de la Rezolucio de 10.12.1954.

Se tiom da eraroj troviĝas en nuraj kelkaj linioj de unu paĝo, oni facile komprenos, ke la tuta "dokumento" de la komenco ĝis la fino estas plena de misprezentitaj faktoj, malĝustaĵoj, gravaj ellaso, konsciaj prisilentoj kaj rektaj malveroj. Ekzemple, tute ne estas menciitaj la grandaj kampanjoj de UEA okaze de Jaro de Homaj Rajtoj (1968), Jaro de Internacia Kunlaboro (1965), k.a.; nenia mencio pri la publikaĵoj de Unesko kaj UN en Esperanto je la kostoj de tiuj organizaĵoj; la informo pri la Kontraŭrasisma Jardeko estas simpla bluf, ĉar ĝis nun nenio estas farita por realigi tiun okazan planon, kiun iniciatis kaj ellaboris la subskribinto kaj kiun la Komitato de UEA akceptis en 1974. En tiu tuta "dokumento" pri Unesko kaj UEA, la rolo de la persono, kies agadoj en la nomo de UEA estis ligitaj al Unesko de 1950 ĝis aŭgusto 1974, estas komplete prisilentita. Fakte, tio ne plu estas nur prisilento, sed konscia falsiĝo. Eĉ la Bibliografio (p. 9) entenas erarojn kaj falsiĝojn: la verko *Esperanto en Perspektivo* ne estis "redaktita de Lapenna, Lins kaj Carlevaro", sed de mi kiel ĉefredaktoro kaj de Lins kiel redaktoro; tiu verko ne "enhavas detalan diskuton pri la rilatoj de UEA kaj Unesko", sed ĝi entenas absolute ĝustan prezenton de faktoj kaj analizojn de la decidoj de Unesko kaj de tiuj rilatoj en ĉap. 22 kaj en aliaj partoj, verkitaj ne "anonime", sed konkrete de la subskribinto; same tiel estas ellasita mia nomo kiel aŭtoro de *The International Language and Contribution of the Esperanto Movement to the Aims of Unesco* (RDC 4/1954), kaj forestas mencio, ke ĝi aperis ankaŭ en la franca, hispana kaj Esperanto; nenia informo pri la fakto, ke *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)* atingis 16 eldonojn en 13 lingvoj ĝis la fino de 1972 (*EzP*, p. 673); nenia mencio pri aliaj esencaj artikoloj kaj dokumentoj, sed, kompanse, tie troviĝas la verko de Fradier *Oriento kaj Okcidento al Reciproka Kompreno*, eldonita en Esperanto je la kostoj de Unesko en 1962, kiu tute ne apartenas al "bibliografio" (la fakto, ke ĝi troviĝas tie montras, ke la kompilinto nek legis ĝin, nek komprenis pri kio temas).

La kontribuo de UEA al la Monda Paco estas la titolo de n-ro 2. La aŭtoro estas U. Lins. Temas pri kompilaĵo, bazita parte sur tekstoj en *EeP* verkitaĵ de U. Lins, pri kiuj li prave konservis siajn aŭtorajn rajtojn kaj tial prave utiligis ilin, kaj grandparte sur ĉapitroj 12.9.1, 12.9.2, 13.2, 13.4, 22.2 k.a. (p-oj 365-368, 385, 388-390, 752-754) k.a., pri kiuj la subskribinto, same prave, rezervis siajn aŭtorajn rajtojn kaj kiujn la kompilinto senpermeso, do malprave, utiligis por sia kompilaĵo. La kompilinto utiligis ankaŭ la ampleksan dokumenton CED/Int./11 de la 8-a de oktobro 1960, sed tute ne menciis ĝin. P-to 3 de la kompilaĵo (Konkludo) estas laŭvorta transskribo de teksto sur p. 12, aldono A/de CED/Int./11, verkita de la subskribinto. Diference de n-ro 1, en tiu ĉi n-ro 2 de la "nova serio" forestas gravaj rektaj malĝustaĵoj, sed la kompilinto tamen prisilentis multajn esencajn faktojn lige kun la agadoj de UEA por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, internacia kompreniĝo kaj humaneca internaciismo en tuta historia epoko, nome ekde la mezo de 1947 ĝis la mezo de 1974. Kelkaj el la grandaj mondaj kampanjoj sur tiu kampo ja estas supraĵe menciitaj, sed la nomo de la iniciatinto kaj organizinto estas plian fojon ellasita. La aliaj multnombraj agadoj – inkluzive amason da artikoloj kaj prelegoj, reprezentiĝon en konferencoj, eĉ tutan libron – estas prisilentitaj. Tiuj ellasoj ne povas esti hazardaj, ĉar sur la antaŭa paĝo de la kompilaĵo la roloj de E. Privat kaj H. Hodler en la periodo post la Unua Mondmilito estas prave akcentitaj.

En la Bibliografio ne estas indikitaj la ĉapitroj de *Esperanto en Perspektivo*, sur kiuj baziĝas la kompilaĵo, evidente kun la celo prisilenti plian fojon la nomon de la verkinto. La indiko en la noto, ke la kompilaĵo rilatas al 13.5 de *EeP* ("UEA Kandidato por la Nobel-Pacpremio") estas malĝusta: tiu "dokumento" iel rilatas al 13.4 de *EeP*, nome al subĉapitro "Por Homaj Rajtoj kaj Internacia Kunlaboro".

Esperanto tra la Etero de Humphrey Tonkin (n-ro 3 de la "nova serio") baziĝas preskaŭ komplete sur ĉap. 12.3 ("Radio") de *EeP*, verkita de la subskribinto. En la kompilaĵo troviĝas ne nur resumoj el tiu ĉapitro, sed eĉ laŭvortaj transskriboj. Ekzemple, la statistika tabelo sur p. 6 de la "dokumento" estas laŭvorta transskribo de la tabelo sur p. 352 de *EeP*, al kiu estas aldonitaj informoj pri la elsendoj en 1974 kaj 1975, ellaboritaj de G. Larglantier, multjara kunlaborinto de CED. Specimene jen alia ekzemplo de transskribado:

I. L. en EeP, p. 350

"Ankaŭ Radio Parizo havis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto ekde 1948 ĝis aprilo 1950. Kvankam miloj da leteroj el ĉiuj partoj de la mondo, speciale el la landoj de Orienta Eŭropo, evidente montris la grandan

interesiĝon por la elsendoj de Radio Parizo en Esperanto, tamen, pro manko de financaj rimedoj kaj verŝajne ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, la direkcio ĉesigis tiujn ĉiutagajn elsendojn, samtempe kun la ĉesigo de la elsendoj en kelkaj aliaj lingvoj..." ktp.

H. Tonkin en la dok., p. 2-3

"Ĉiutagaj elsendoj en Esperanto estis regula programero de Radio Parizo de 1948 ĝis aprilo 1950. Kvankam miloj da leteroj el ĉiuj partoj de la mondo, precipe el la landoj de orienta Eŭropo, atestis pri la multa intereso, kiun uzantoj de Esperanto montris al tiuj ĉiutagaj elsendoj, oni ĉesigis ilin pro financaj, kaj probable aliaj, motivoj, samtempe kiel tiujn en pluraj aliaj lingvoj..." ktp. laŭvorte el *EeP*.

Se oni esceptas la ioman malbonigon de la stilo de la originalo en la versio de H. Tonkin, tiuj du tekstoj estas identaj. Kaj tio tutsimple nomiĝas plagiato. Simile en aliaj partoj de la "dokumentoj". Estas sufiĉe bedaŭrinde konstati al kia nivelo malaltiĝis iam promesoplenaj intelektuloj.

5.1.3 Konklude. – Eĉ se oni malatentas la juran aspekton kaj se oni forgesas la etikan – kaj bedaŭrinde, en la nuna UEA tro multaj malatentas la juran kaj inklinas forgesi, ke sen etika bazo la Esperanto-Movado perdas sian sencon, eĉ la ekzistorajton – la "dokumentoj" estas grandega fuŝaĵo. Laŭ sia enhavo ili ne nur ne estas "suplemento de tiu grava manlibro" (bone, ke *EeP* de 844 p-oj ne estas nomita "poŝlibro"), kiel promesite en la antaŭanonco, sed, tute male, deformas kaj falsas multajn faktojn entenatajn en tiu verko. Tiuj partoj de la "dokumentoj", kiuj enhavas ĝustajn informojn, estas plagiatoj, eĉ laŭvortaj transskriboj, do kontraŭaj al la promesoj en la reklamoj kaj, krome, tute superfluj, ĉar la koncernaj faktoj estas multe pli komplete prezentitaj kaj analizitaj en la respektivaj ĉapitroj de *EeP*.

Tial la "dokumentoj" estas forte malaprobindaj. Oni povas nur insiste rekomendi al ĉiuj agantoj en la Esperanto-Movado ne aboni tiujn malfidiindajn tekstojn, ankoraŭ malpli utiligadi ilin por informado kaj dokumentado. Seriozaj aktivuloj povas en ĉiu momento facile havigi permeson de la subskribinto por utiligi tiucele la partojn de *EeP*, pri kiuj li respondecas kaj konservas la aŭtorajn rajtojn.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

5.2 Kontraŭstatuta nomigo de ĉefdelegito de UEA en USSR

La *Oficiala Informilo* n-ro 497 de la CO de UEA (*Esperanto*, n-ro 4/1976, p. 79) informas, ke s-ro Boris Kolker fariĝis ĉefdelegito de UEA por Soveta Unio. Oni sciiĝas, ke "la nomigo – konforme al art. 15 de la Ĝenerala Regularo de UEA – sekvis post konsultoj/konsultiĝoj/kun la Esperanto-Komisiono en Moskvo kaj kun Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM)".

Ĉu tiu nomigo estas fakte konforma al la Statuto kaj Ĝenerala Regularo?

El art. 21 de la Statuto sekvas, ke ĉefdelegito aŭ peranto reprezentas la Asocion en la koncerna lando. Laŭ art. 23 de la Statuto, la kondiĉoj por la nomigo estas fiksitaj en la Ĝenerala Regularo. Art. 14 kaj 15 de tiu Regularo antaŭvidas nur du eblajn situaciojn: (i) en lando, kies asocio aliĝis al UEA, la ĉefdelegito estas nomata de la landa asocio interkonsente kun la ĝenerala sekretario de UEA (art. 14); (ii) en lando, kies landa asocio ne aliĝis al UEA, la direktoro de la CO rajtas nomi ĉefdelegiton aŭ peranton (art. 15). Neniu artikolo antaŭvidas intervenon en kiu ajn formo de organizaĵoj aŭ instancoj ekster UEA. La komunikado de la CO facile kredigas la neinformitan legantaron, ke la "Esperanto-Komisiono en Moskvo" estas ia sendependa Esperanto-instanco ligita iel al UEA. Fakte, temas pri la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, siavice sekcio de Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj, do de partia-ŝtata instanco, troviĝanta sub plena kontrolo de la sovetaj partiaj aŭtoritatoj. Aliflanke, SEJM kiel ia organizita asocio tute ne ekzistas. Eĉ laŭ la Estrara Raporto de UEA por 1974/75, p-oj 20-21, tiu "movado" estas "en stato de organiziĝo" kaj troviĝas "ekster la kadro de TEJO", do ankaŭ de UEA.

Tio signifas, ke la nomigo de la ĉefdelegito de UEA por Soveta Unio okazis ne konforme al art. 15 de la Ĝenerala Regularo, sed kontraŭ la regulo de tiu artikolo, kaj kontraŭ la spirito de la Statuto de UEA. En la tuta historio de UEA ĝis Hamburgo (1974) neniam okazis, ke UEA "konsultus" (se entute la vorto "konsultiĝo" ne estas eŭfemismo por ordinara submetiĝo) kian ajn partipolitikan aŭ ŝtatan instancon en kiu ajn lando por nomi sian ĉefdelegiton. Temas pri plia ago, nete kontraŭa al la Statuto, sed tute konforma al la unudirekta politikigo de UEA sub la nuna gvidantaro. Aldone al la plia malobservo de la Statuto, la paŝo estas ankaŭ sence superflua, "ĉar el Soveta Unio ne estas eble transpagi kotizojn al UEA", kiel eksplicite rekonite en la menciita *Oficiala Informilo* mem.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.2.6 de *EeP* kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

6 Konfidenca dokumento pri la agado en Montevideo

6.1 Enkonduka rimarko

Pasis precize 22 jaroj ekde la 10-a de decembro 1954, kiam la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis la konatan Rezolucion favore al Esperanto. La tuta februara n-ro de *Esperanto*, 1955, estis dediĉita al la Rezolucio kaj al la signifo de la decidoj de Unesko. En ĝi troviĝas ankaŭ artikolo pri la Unua Elmonro de la Universala Esperanto-Ekspozicio en Montevideo, kvin esence gravaj aldonoj lige kun la Konferenco, listo de dokumentoj de Unesko rilatantaj al Esperanto, kiel ankaŭ publika dankesprimado al ĉiuj multnombraj kunlaborintoj en 68 landoj kaj aliaj personoj, kiuj kontribuis al la sukceso. La samo estas prezentita kaj analizita, iom pli koncize kaj sen la aldonaj dokumentoj, en 22.3 de *Esperanto en Perspektivo* (en la plua teksto *EeP*). Ĉiu iom serioza interesiĝanto pri la historio de la Esperanto-Movado en la postmilita periodo ĝis Hamburgo (1974) kaj pri la aplikotaj metodoj por atingi pozitivajn rezultojn, devus atente studi tiujn dokumentajn materialojn.

Kvankam la agadoj de UEA ĉe UN kaj Unesko estis nur konsista parto de multflanka kaj ĉiudirekta aktivado de la Asocio surbaze de unueca konceptaro (v. Ĉap. 18, precipc 18.2 de *EeP*), tamen por multaj Montevideo fariĝis preskaŭ simbolo de tiu tuta spirito, kiu inspiris ĉiujn laborojn de la ĝishamburga UEA. Aludante al la nuna situacio en UEA, Giorgio Silber skribis antaŭ nelonge en *Literatura Foiro*, ke *"se Montevideo efikis al la esperantistaro kaj literature kaj organize (krome Montevideo ne povis veni per si mem; ĝi ja signis la maturiĝon de plurjara fermento) – hodiaŭ ia Hamburgo signifas nenion por la E-literaturistoj, nek iliaflanke oni stimulis per kulturaj proponoj al novaj perspektivoj"*; plue: *"...la senalternativa velko de la Montevidea spirito estas timo pli maligra ol la ĉiukaze respektinda demando 'kiamaniere plane financi la movadon?'* (n-ro de junio/aŭgusto 1976, p-oj 8-9".

Nun, post plenaj 22 jaroj, venis la tempo por publikigi plian dokumenton, kiu ĵetas aldonan lumon sur la agadon en Montevideo mem. Temas pri leteroj, kiujn la subskribinto sendadis el Montevideo al la tiama prezidanto de UEA, s-ro E. Malmgren, por regule informadi lin pri la evoluo de la afero. Kopiojn ricevas ankaŭ f-ino Marianne Vermaas, en tiu tempo sekretariino de CED por Nederlando, kiu provizore ekloĝis en Londono (je propraj kostoj, kompreneble) por prizorgadi CED dum la foresto de la subskribinto en Montevideo. Laŭ mia peto, f-ino Vermaas faris eltiraĵojn el la menciitaj leteroj "pri la evoluo, streĉaj turniĝoj kaj pli

ol drameca fina venko", multobligis tiun historian materialon kaj sendis ĝin kiel absolute konfidencan jam en decembro 1954 al la plej sindonaj kaj fidindaj kunlaborantoj. En sia akompana noto ŝi skribis:

"Ĉie mi lasis la aŭtentikajn vortojn de D-ro Lapenna. Mi eligis el la leteroj nur tiujn frazojn aŭ alineojn, kiuj ne rekte koncernas la temon mem de la Peticio, por ke ne perdiĝu la fadeno de la okazintaĵoj. Tial ne troviĝas ĉi tie la partoj pri la Konsulta Pozicio, la entuziasmaj ĉapitroj pri la Ekspozicio, la elkoraj vortoj pri la Montevideaj esperantistoj. Ilin oni certe legos aliloke."

La tuta materialo ampleksis 24 dense tajpitajn paĝojn. Ĉi tie nun aperas la ĉefaj partoj. Kompreneble, ĉie mi konservis la aŭtentikajn vortojn kaj stilon. Oni konsideru, ke ĉiam la leteroj estis skribataj nokte post tre lacigaj tagoj, sub la plej freŝmemoraj impresoj. La subtitolojn, kiujn mi same konservas en la aŭtentika formo, siatempe aldonis f-ino Vermaas dum la kompilado. La sola nuna aldono estas la piednotoj kun koncizaj klarigoj pri personoj aŭ faktoj.

6.2 La dokumento

Jen, do la ĉefaj partoj de tiuj leteroj laŭ la kompilaĵo de f-ino Vermaas.

6.2.1 La unuaj kontaktoj (el la let. de 06.11.1954). – Mi aŭdis, ke hodiaŭ posttagmeze kaj morgaŭ devas alveturi la germana kaj franca delegacioj, kiuj ambaŭ loĝos en ĉi tiu sama hotelo. Mi esperas tuj kontakti la francan ministron pri edukado kaj la ĉefon de la Germana Delegacio. Mi ricevis informojn, ke voĉdonos por la rezolucio, krom la ŝtatoj, kiuj respondis favore al Unesko¹, ankaŭ Nederlando, Argentino, Brazilo. Mi, kompreneble, ne fidis ĝis mi vidos la finan rezulton, sed tamen tiuj informoj estas iom kuraĝigaj.

Hodiaŭ matene mi vizitis la episkopon de Montevideo. Li nomiĝas Barbieri kaj tio estas la nomo de familio, kun kiu mia familio estis en tre amikaj rilatoj en Dalmatio. Per tiu temo ni komencis la konversacion en la itala lingvo kaj montriĝis, ke li estas en tre malproksima familia rilato kun la dalmata familio. La konversacio daŭris du horojn kaj li montriĝis ege interesita pri nia afero kaj promesis ĉian helpon. Mi plue konservas kontakton kun la episkopo. Tiu aŭdienco estis utiliga.

1. Temas pri la respondoj de la Ŝtatoj-Membroj al cirk. let. de la Ĝenerala Direktoro de Unesko CL/720 de 09.02.1953, rezulte de la Rezolucio de la Pariza Sesio de la Ĝenerala Konferenco;

6.2.2 Delegacio post delegacio rifuzas proponi rezolucion (el letero de 16.11.1954 – Mi parolis kun trideko da delegacioj. La rezulto estas, ke mi ankoraŭ ne havas delegacion, kiu proponos rezolucion². La sepa tago finiĝos la 19-an. Mi, do, havas je dispono ankoraŭ tri tagojn³. Hodiaŭ mi parolos kun Sommerfeld⁴, se mi iel povos kapti lin. Eble la Norvegoj faros la proponon. Se iu faros ĝin, mi estas preskaŭ certa, ke la plimulto ĝin akceptos. Se eĉ la Norvegoj ne volos proponi, mi turnos min al la Angloj. Rifuzis proponi: Hindio, Indonezio, Filipinoj, Siamo, Laoso, Jordanio, Koreo, Libano, Italio (ankoraŭ diskutata la afero), Nederlando, Urugvajo (ankoraŭ diskutata), Aŭstralio (diskutata), por citi nur kelkajn. Ripetiĝas absolute la sama afero kiel en Parizo⁵.

6.2.3 Neeble trovi la delegacion (el let. de 23.11.1954). – Nia situacio estas malbonega. Ni havas multe da insistaj malamikoj, sed eĉ ne unu veran amikon. La sepa tago de la Konferenco forpasis kaj mi ne sukcesis trovi delegacion por proponi almenaŭ iom favoran rezolucion. Ne estas nun la momento por analizi la staton, sed mi povas diri, ke la aziaj delegacioj ĝenerale malfavoras nin, ĉar "ili devas lerni la anglan". Same la afrikaj. La grandaj potencoj estas kontraŭ pro la situacio de iliaj resp. lingvoj. La solaj ŝtatoj, kiuj povus nin helpi, estas la nordaj. Sed ili tute simple ne volas. Sommerfeld estas nia plej granda malamiko kaj faras ĉion por malhelpi miajn klopodojn. Same Ungaretti de la itala delegacio. La situacio estas multege pli malbona ol en Parizo, ĉar tie la delegacioj ne havis instrukciojn de siaj registaroj, dum ĉi tie aŭ ili fakte havas aŭ elturniĝas dirante, ke ili havas negativajn instrukciojn. Mi antaŭvidis ĉiujn ĉi malfacilaĵojn. Se niaj landaj asocioj kaj kunlaborantoj ne sukcesis en pli ol ses monatoj konvinki siajn proprajn registarojn proponi konkretan favoran rezolucion, kiamaniere mi sola ĉi tie, en tiu konfuzo kaj ĥaoso, kun ĉiuj tiuj komisionoj, subkomisionoj, komitatoj ktp., kun ĉiuj bankedoj, akceptoj k. s. povus sukcesi konvinki 72 delegaciojn, en nuraj kelkaj tagoj, voĉdoni por ni? Tasko, vere superanta niajn povojn. Kaj tamen, eĉ en la nuna momento, se mi nur povus atingi, ke unusola delegacio proponu la rezolucion, mi vetus, ke mi sukcesus devigi la plimulton akcepti ĝin. Mi jam havas promeson (mi ne garantias, ke

2. Tio estis esence grava, ĉar nur surbaze de konkreta propono fare de iu delegacio (eventuale de la Sekretariato), la Ĝenerala Konferenco povas fari decidon;

3. Tio estis la lasta limdato por prezenti rezoluciproponon;

4. Prof. Sommerfeld estis la plej influa membro de la Norvega Delegacio;

5. Dum la Pariza Sesio (1952), same tiel, estis maleble trovi delegacion, kiu prezentus proponon pri rezolucio (v. 22.3.2. de *EeP*);

tiu promeso realiĝos) de trideko da delegacioj, inkluzive de la franca, brita, nederlanda, norvega, filipina, indonezia..., ke ili voĉdonos por, se iu ŝtato iom grava faros la proponon. Mi do plue, kvankam la limdato pasis⁶, klopodegas trovi tian delegacion. Se mi malsukcesos, mi provos la saman taktikon kiel en Parizo, nome proponi (sugesti) rezolucion⁷. Ĝis la definitiva perdo mi deziras konservi almenaŭ flameton da espero, sed, ĝi estas pli rezulto de mia optimisma naturo ol de la realaj eblecoj.

(...)

Eble, morgaŭ aŭ postmorgaŭ la situacio ŝanĝiĝos, sed mi ne kredas je mirakloj, eĉ ne je tiuj, je kiuj mi mem kontribuas, ke ili okazu. Aliflanke, tamen, mi spertis en mia vivo jam plurfoje, ke eĉ tute senespera situacio en la lasta momento ŝanĝiĝas. Ankaŭ en Parizo antaŭ du jaroj! La bona sorto faru, ke same okazu ankaŭ ĉifoje.

6.2.4 Daŭre pli malbona situacio (el let. de 05.12.1954). – Trista kaj naŭza fariĝas la historio. Rakonti pri miaj interparoloj kun la plej diversaj delegitoj de plej diversaj delegacioj estas absolute neeble en unu letero, nek en unu 30-paĝa raporto. Pri tio oni devus skribi libron, grandan libron, kiel dokumenton pri la stulteco de la homoj, pri iliaj antaŭjuĝoj, impertinentecoj, intrigoj, malĝentilecoj ktp. En Parizo mi laboregis. En Parizo mi ĉe la fino malsaniĝis. Mi povas diri nur unu aferon: ĉi tie la situacio estas milfoje pli malfacila, postulas multe pli da pacienco, argumentado, englutado de tre amaraj piloloj, kelkfoje tolerado de rektaj ofendoj. Mi klopodis paroli kun la delegitoj antaŭ la komenciĝo de la kunsidoj, post tiuj kunsidoj, antaŭ la manĝoj, post la manĝoj, en la bufedo, sur la ŝtuparo, en ĉiuj eblaj kaj neblaj cirkonstancoj. Mi provis havigi aŭdiencojn ĉe ministroj kaj kelkfoje fine sukcesis (urugvajaj), sed plej ofte ne sukcesis (franca, hinda), ĉar en la kelkaj tagoj, dum kiuj ili ĉeestis la Konferencon, ili estis tiel okupitaj (kaj tio estas objekte vera), ke estis absolute neeble havigi renkontiĝon. Oni devas ĉe ĉio-ĉi montriĝi ege ĝentila, nealtrudiĝema... En tiaj kondiĉoj mi sukcesis paroli kun eble 300 delegitoj de kvindeko da delegacioj. Praktike kun ĉiuj, krom kun tiuj de Orienta Eŭropo kaj de Usono.

Pri propono de rezolucio neniu volis eĉ aŭdi. Eĉ ne tiuj, kiuj donis la plej favorajn respondojn al Unesko. Ekzemple, la aŭstria delegito Max Lowenthal-Chlumecky diris, ke li scias, ke la aŭstria registaro favoras nian aferon, sed ke li ricevis absolute nenian (pozitivajn) instrukciojn

6. V. noton 3;

7. Dum la Pariza Sesio la subskribinto mem, fine, "sugestis" rezoluciproponon, kiun poste la Svisa Delegacio prezentis kiel sian al la Konferenco;

pri ĝi. Male, li ricevis instrukciojn absolute nenion proponi aŭ iniciati. Sommerfeld diris, ke la favora raporto estis de la Ministerio pri Edukado, sed ke li havas tute aliajn instrukciojn de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj. Kubo, Gvatemalo Honduraso... ĉio-ĉi estas aro da ignorantoj ne nur pri nia afero, sed eĉ pri Unesko mem. Kvankam tiuj landoj donis favorajn respondojn, la delegitoj tiurilate aŭ sciis nenion, aŭ tute simple diris, ke ili havas aliajn instrukciojn. Ĉu tio estas vera, neniu povos iam kontroli.

Ke mi faris ĉion eblan por doni objektivajn informojn, ne necesas diri. Ni sendis al ĉiuj delegitoj la belegan Dok. CED/4⁸. Al la hispanlingvaj delegacioj ni post kelkaj tagoj sendis belan prospekton pri la ekspozicio⁹. Ĉiuj delegitoj ricevis la inviton al la ekspozicia inaŭguro, sed tre malmultaj venis¹⁰. Ankaŭ poste tre malmultaj delegitoj vizitis la ekspozicion. Entute, se mi ne eraras (la koncerna listo troviĝas en la ekspoziciejo), 15-16... Mallonge, mi troviĝis en situacio, ke mi devis paroli al homoj, kiuj estas surdaj, eĉ pli, kiuj intence ŝtopis la orelojn kaj fermis la okulojn. Kaj plej surdaj estas tiuj, kiuj volas nek vidi nek aŭdi. Mi ofte havis la impreson, ke mi parolas al muro. Eĉ pli malbone, ĉar parolante al muro je difinita distanco oni povas aŭdi almenaŭ sian eĥon. Ĉi tie eĉ la eĥo ne aŭdiĝis.

(...)

6.2.5 Fine, trovita: Meksikio (el la sama let. de 05.12.1954). – En tiaj kondiĉoj mi sukcesis jaŭdon matene (02.12) interesigi sinjorinon Vallarta, membrinon de la Meksikia Delegacio, pri nia afero. Mi iris kun ŝi al la ekspozicio kaj ŝi estis tre frapita. Ŝi prezentis min al la edzo, kiu estas ĉefo de la Meksikia Delegacio. Post multaj klarigoj, mi sukcesis konvinki lin, ke Meksikio faru la proponon de rezolucio. Tio okazis je la 14-a horo. Je la 15-a horo mi sukcesis atingi, ke la sekretariato multobligu la rezolucion. Je la 17-a horo ĝi estis multobligita, sed pro ies interveno ne disdonita al la delegacioj. Intertempe jam kunsidis la Programkomisiono¹¹ kaj nia punkto alproksimiĝis (ĝi estis transmetita

8. Temas pri la dokumento de CED "La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Celoj de Unesko", publikigita en la angla, franca kaj hispana;

9. La prospekto rilatis al Universala Ekspozicio de Esperanto, la plej granda en la tuta historio de la Esperanto-Movado, samtempe la plej impona dokumentego pri la esperantlingva kulturo (poste okazis elmontroj en kelkaj aliaj urboj; la nuna gvidantaro de UEA decidis vendi tiun valoregan materialon, eble ĝi jam estas vendita);

10. Male, la publiko amase vizitadis la ekspozicion;

11. Temas pri la Komisiono pri la Programo kaj Buĝeto, unu el la du grandaj komisionoj, en kiu estas reprezentitaj ĉiuj Ŝtatoj-Membroj;

al la lasta punkto de la tagordo). Je la 18-a, 30, forkurinte por momento el la Programkomisiono, mi sukcesis, fine, paroli kun la Urugvaja Ministro pri Edukado, kiu estas samtempe prezidanto de la Urugvaja Delegacio kaj prezidanto de la Konferenco. Li promesis, ke Urugvajo subtenos la Meksikian proponon. Mi rekuris al la konferencejo kaj konstatis, ke nia afero ankoraŭ ne venis. Tiam la prezidanto (Bourgeois)¹² interrompis la kunsidon kaj kunvokis novan por la 9,30 vespere. En tiuj kelkaj horoj, de la 7-a ĝis la 9-a, mi sukcesis paroli kun deko da delegacioj, kiuj promesis apogi Meksikion. Je la 9,30 mi, kompreneble, estis denove en la salono, kvankam, krom du sandviĉoj, mi nenion manĝis ekde la mateno. Okazis grandega diskuto pri la verkoj de Mickiewicz. Pola Delegacio proponis, ke, oni eldonu libron pri la pola poeto okaze de lia centjara datreveno. La Sekretariato kontraŭstaris pro manko de financaj rimedoj. La afero longiĝis terure (temis pri 6.500 dolaroj; laŭ mia kalkulo la diskuto kostis al Unesko, kune kun la elspezoj de la delegitoj por tiu tempo, ĉ. 13.000 dolarojn!). Pluraj delegitoj komencis lasi la salonon. Alproksimiĝis la 1-a horo matene kaj mi estis tre feliĉa, ĉar neniu el la maljunuloj (Ungaretti, Sommerfeld kaj aliaj malamikoj) estis en la salono. Mi pensis, ke se je tiu horo la prezidanto voĉdonigus la Meksikian rezolucion, ĝi certe estus akceptita. Kaj mi estas certa, ke tiel estus okazinta, ĉar ĉiuj, kiuj estis promesintaj subteni, estis en la salono. Nur Prof. Sassen (Nederlando), kiu promesis voĉdoni por kaj eĉ agis ĉe kelkaj delegitoj en tiu senco, forestis. Sed ne okazis tiel. Je la 1-a matene oni interrompis la kunsidon kaj nia afero denove estis prokrastita.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3.4 de *EeP*.

6.2.6 La Meksikia Rezolucio en la Programkomisiono (el la let. de 05.12.1954). – Dum la tuta vendredo kaj sabaton matene oni diskutis en la Programkomisiono aliajn fakojn. La kulturaj aktivadoj estis reprenitaj sabaton posttagmeze (04.12). Mi utiligis tiun tempon por prilabori amason da delegacioj. Mi parolis tute speciale kun la prezidanto de la franca (mi skribis leteron al la ministro, kiu estis la prezidanto, sed li forveturis kaj tiel la letero venis en la manojn de la nova prezidanto), kaj li firme certigis min, ke Francio apogos la meksikian delegacion kaj ke li donos instrukciojn al delegito François voĉdoni por. Subtenon promesis: Brazilo (Prof. Carneiro), Nederlando (Prof. Sassen), Italio (Prof. Veronese), Luksemburgo, Hispanio, Norvegio (krom la p-to 4), Liberio, Vjetnamio, Indonezio, Filipinoj, Ĉinio, Panamo, Nikaragvo, Kubo, Aŭstrio, Kostariko, Honduraso... Entute, kune kun tiuj, kiuj

12. Li estis ĉefo de la Svisa Delegacio kaj prezidanto de la Programkomisiono.

respondis favore al la Sekretariato kaj pri kiuj mi kalkulis, ke ili voĉdonos favore¹³, mi havis proksimume 25 delegaciojn, kiuj promesis subteni. Mi komencis esperi, ke la miraklo tamen okazos...

Posttagmeze oni longe diskutis pri la Mondhistorio¹⁴. Poste, fine, venis nia punkto. La sekretario terure mallonge, en 20 sekundoj, diris, ke nun oni diskutos pri la Peticio kaj aldonis, ke temas pri la Dok. 8C/PRG/3 (kiu enhavas la Raporton de la Sekretariato pri la respondoj de la ŝtatoj). Estis normale, ke post tio mi ricevu la parolon, ĉar, ja, mi reprezentas la subskribintojn kaj, krome, antaŭ pluraj tagoj mi anoncis min. Sed subite petis la parolon, samtempe kun mi, Prof. Blinkenberg. La Prezidanto (Bourgeois) donis al li la parolon kaj mi estas pli ol certa, ke tio estis antaŭe interkonsentita. Prof. Blinkenberg diris, ke li parolas kiel lingvisto kaj en tiu kvalito li asertis, (I) ke Esperanto tute ne estas internacia, ĉar ĝi konsistas nur el eŭropaj elementoj; ke ekzistas aliaj lingvoj internaciaj, ekzemple Basic English, Interlingua kaj aliaj, kiuj estas multe pli bonaj ol Esperanto, sed ke li entute estas kontraŭ tiuj "artefaritaĵoj", en kiuj oni eble povas esprimi la urugvajan menuon (granda rido), sed ne la literaturajn valorojn; (II) ke Esperanton "inventis" amatoro, kiu nenian ideon havis pri lingvoj kaj ke tial Esperanto havas mizeran aspekton, povran vortaron, primitivan sintakson, en kiu oni nenion povas diri kaj ankoraŭ malpli esprimi la grandajn sentojn de amo – "kvankam mi tion esperas", li diris (novaj ridoj); (III) ke Esperanto estas la neo mem de kulturo kaj tute ne povas servi al kulturaj celoj. "Kvankam ekzistas grupeto da personoj, eĉ tre aktivaj, kiel vi povis konstati – li daŭrigis en ironia tono (novaj ridoj) – tamen tio estas sensignifa grupeto." Li finis en absolute neserioza atmosfero dirante, ke estus ofendo por Unesko, se ĝi donus ian ajn apogon al Esperanto. Lia celo estis ridindigi la tutan aferon. Li sukcesis. Li sukcesis tial, ĉar li estis terure akra kaj neniu el la ĉeestantoj – krom la esperantistoj – povis kontroli la neobjektivecon, nesciencecon de liaj stultaj, klaŭnaj diroj.

En tia atmosfero la prezidanto donis la vorton al mi. Mi devas diri ĉi tie, ke antaŭ kelkaj tagoj oni decidis en la Komisiono – por rapidigi la laboron – ke la tempodaŭro estos limigita al 3 minutoj. Kion mi povis diri en tiuj 3 mizeraj minutoj? Mi estis preparinta paroladeton precize de 3 minutoj, en kiu mi volis akcenti la gravecon de la Peticio, la noblan kontribuon de la esperantismo al interkompreniĝo de la popoloj, la

13. V. piednoton 1;

14. Dum tiu sesio de la Ĝenerala Konferenco oni multe diskutis pri publikigo de mondhistorio fare de Unesko;

15. Esperanto-traduko de tiu paroladeto troviĝas en la libro *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*, p. 33;

kulturajn valorojn kreitajn en Esperanto kaj fini per la citaĵo de Romain Rolland. Mi sentis min devigata rebati almenaŭ parte tiun insultan paroladon. /.../. La tutan paroladeton mi faris per glacie malvarma vizaĝo, tiel ke post 30 sekundoj revenis la seriozeco. Post mi parolis bonege la Urugvaja delegito, kiu protestis, ke pri tiel serioza afero oni parolis tiel nedigne kaj neserioze. Li deklaris, ke li apogos la meksikian rezolucion. Post tio mi denove petis la parolon, sed la prezidanto ne donis ĝin al mi. Prof. Sommerfelt diris, ke Esperanto el ĉiuj "lingvoj artefaritaj" estas la plej disvastiĝinta, sed ke li voĉdonos kontraŭ la rezolucio.

6.2.7 Voĉdono (el la sama let. de 05.12.1954). – En tiu momento la prezidanto voĉdonigis la tekston. Mi aldonu ankoraŭ, ke la meksikia delegito silentis kiel fiŝo kaj tute ne komprenis kio okazas (malfeliĉe ne estis tiu, kun kiu mi parolis en la lastaj tagoj); ke Prof. Sassen ne ĉeestis, sed alia nederlanda delegito, ke Prof. Carneiro ne ĉeestis, sed alia brazila delegito; ke la aŭstria delegitoj tute ne ĉeestis...

La rezulto de la voĉdono estis malbonega: 3 por (Meksikio, Ĉinio, Urugvajo), 23 kontraŭ, 19 sindetenoj. La meksikia rezolucio, do, estis rifuzita. Mi estas certa, ke voĉdonis kontraŭ: Svedio, Norvegio, Francio, Danlando, Nederlando, Svislando. Mi estas certa, ke sin detenis: Sovetunio, Pollando, Bjelorusio, Ukrainio, Hungario, Ĉeĥoslovakio... Mi ne povas diri kiel voĉdonis Britio, Usono, Jugoslavio kaj aliaj landoj, sed verŝajne Usono voĉdonis kontraŭ kaj verŝajne Britio sin detenis. Estis malfacilege kontroli, ĉar oni voĉdonas per levado de la manoj kaj tio daŭras nur kelkajn sekundojn.

Mia opinio estas, ke tiu malsukceso ŝuldiĝas al la atmosfero de neseriozeco kaj ridindeco, en kiu prezentiĝis Esperanto kaŭze de la interveno de Blinkenberg, interveno tute certe organizita de la kliko de malamikoj. En tiu terura atmosfero eĉ tiuj, kiuj firme estis promesintaj subteni, ŝanceliĝis kaj sekvis la fluon.

En kiu animstato mi troviĝis dum tiuj teruraj momentoj, mi neniam povos preskribi al kiu ajn. Mi tamen konservis absolute malvarman sangon kaj en iu rilato sentis min kaj nian aferon alte supercaj al tiu amaso da senideco kaj sencerbeco (Prof. Blinkenberg traduku tion en sian perfektan lingvon, se li povas!), en tiu marĉo de intelektula mizero kaj senkuraĝeco. Nu, mi restis en la salono kaj pensis kiel, tamen, ion atingi. Mi sendis noteton al la sekretario dirante, ke ŝajnas al mi ke la Komisiono devus akcepti aŭ malakcepti la Raporton, nome la konkludojn de la Sekretariato en la Dok. 8C/PRG/3. Mi volis atingi favoran decidon almenaŭ je tio, ĉar en tiuj konkludoj oni nete akcentas, ke la fakto, ke Unesko ne okupiĝos en la sekvantaj 2 jaroj pri Esperanto, neniel implicas

iel ajn malfavoran juĝon pri la lingvo... La sekretario respondis skribe, ke ne necesas voĉdoni. Kiam la prezidanto volis fini la kunvenon, mi denove petis la vorton kaj, post iom da lukto, li donis ĝin al mi. Mi diris ke, post la malakcepto de la meksikia rezolucio, laŭ mia opinio la Komisiono devus deklari ĉu ĝi akceptas la Raporton de la Sekretariato. La prezidanto diris, ke tio ne estas necesa, sed la novzelanda delegito apogis min. En tiu momento intervenis Prof. Nielsen (Blinkenberg foriris post kiam li faris sian "laboron") kontraŭstarante la proponon. Tamen, mi sukcesis, kaj la komisiono akceptis la Raporton de la Sekretariato. Tiamaniere neniu iam ajn povos diri, ke la decido de la Komisiono entenis juĝon pri la valoro de la lingvo. Kompreneble, mi taksas la opinion de la Komisiono pri tiu afero proksimume same kiel opinion de azeno pri la gusto de fiŝo, sed iaj homoj povus utiligi tiun decidon, misprezentante ĝin, se ne ekzistus tiu alia decido.

Post tio mi ankoraŭfoje petis la vorton kaj deklaris, ke en la Peticio estis klara kaj konkreta propono al Unesko kuraĝigi la disvastigon de Esperanto. Al tiu propono ni deziras havi same tiel netan kaj klaran respondon: jes aŭ ne, ĉar ankaŭ la nea respondo estas por ni multtrilate grava. La malakcepto de la meksikia rezolucio signifas nur malakcepton de unu ebleco de pozitiva respondo, sed ĝi neniel inkluzivas ian ajn negativan respondon. Sekve, mi diris, mi petas la prezidanton diri al mi kio estas, laŭ lia opinio, la respondo de Unesko. Li estis tre konfuzita kaj ne sciis kion respondi, ĉar la komplotintoj ne antaŭvidis tian demandon. Do, post iom da hezitado, li diris: "La respondo estas, ke en la sekvantaj 2 jaroj Unesko ne antaŭvidas iajn specialajn aktivecojn rilate Esperanton surbaze de la Peticio". Tiam, kvankam li ne plu volis doni al mi la vorton, mi deklaris: "En tiu okazo mi deklaras en la nomo de UEA, ke la afero restas malfermita kaj mi rezervas la rajton de UEA reveni al ĝi, kiam ĝi mem opinios tion oportuna".

Tiel, do, finiĝis mia vere superhoma lukto en Montevideo dum 34 tagoj kaj noktoj.

6.2.8 Kio farebla ankoraŭ? (el la sama let. de 05.12.1954). – Post la kunveno /de la Programkomisiono/ mi tuj kunvenis kun la esperantistoj kaj mi kunmetis bonegan leteron por ĉiuj ĉitieaj gazetoj en la nomo de la Urugvaja Esperanto-Societo¹⁶. En la letero ĝi protestas en la nomo

16. Urugvaja Esperanto-Societo kaj ĉiuj ĝiaj funkciuloj, precipe Prof. Fernández-Menéndez kaj Prof. L. Cao, donis grandegan helpon en la tuta afero. Post la eventoj de Hamburgo (1974) Urugvaja Esperanto-Societo kaj la meritplena Prof. L. Cao ekŝiĝis el UEA;

de kulturo, scienco kaj edukado kontraŭ la nekultura ago de la dana delegito. Tiu letero – oni ĵus telefonis al mi – estas jam transdonita al ĉiuj gazetoj kaj mi esperas, ke ĝi morgaŭ aperos. Tio estos bombo, kiu altiros al la ekspozicio¹⁷ certe novajn amasojn. Plue, ni kunmetis mallongan, sed tre trafan leteron por la dana ĝenerala konsulo, en kiu la Urugvaja Societo deklaras, ke pro la ofendoj, kiujn faris Prof. Blinkenberg al la subskribintoj de la Peticio, al la kultura valoro de la Internacia Lingvo kaj al la lando, kiu gastigas la Konferencon, la Urugvaja Societo resendadas la filmon pri Danlando kaj ne plu deziras ĝin prezenti en la ekspoziciejo. En la letero estas plue deklarite, ke la sinteno kaj vortoj de Blinkenberg estas ofendaj ankaŭ por la dana registaro, kiu produktis kulturan filmon en Esperanto. Havu tiu sinjoro iom da malagrabraĵoj. Kompreneble, pro mia pozicio en la Konferenco, mi provizore nenion entreprenas publike, sed mi planas leteron al la prezidanto de la Konferenco, en kiu mi protestos kontraŭ la ago de Blinkenberg bazante la proteston sur la Konstitucio de Unesko, kiu proklamas la plenan egalecon de lingvoj kaj sur la Deklaracio kontraŭ la lingva diskriminacio.

Ĉu mi aldonu, ke en la pasinta nokto mi eĉ ne fermis la okulojn, sed turniĝis en la lito senhelpe?

6.2.9 Venko! (el let. de 10.12.1954). – Kun tremantaj manoj kaj malsekaj okuloj mi skribas al vi tiun ĉi leteron. Antaŭ duono de horo mi sendis telegramon pri la belega novaĵo atingita en la lasta duonhoru de la Konferenco. Estas por mi absolute maleble priskribi kion mi faris en la lastaj 5 tagoj, nome de lundo ĝis la nuna momento. Mi nur diru, ke dum tiuj 5 tagoj mi – jam lacega de pli frue – ne dormis entute pli ol 18-20 horojn, trinkis centon da kafoj kaj fumis ĉ. 1000 cigaredojn. Mi estas plene, sed vere plene elĉerpita kaj verki kion ajn en la nuna stato estas absolute maleble. Tial mi donas nur la rezulton: je la 17.30 la Pleno de la Konferenco, en ĉeesto de ĉiuj delegacioj kaj kun plenŝtopitaj galerioj, akceptis per 30 voĉoj por, 5 kontraŭ kaj 17 sindetenoj (la aliaj ne voĉdonis) jenan *Rezolucion* "...¹⁸.

Tiu Rezolucio signifas la plej fortan rekonon en la tuta historio de nia Movado pri la kultura valoro de Esperanto kiel ekzistanta kaj plene funkcia lingvo. Per ĝi la Ĝenerala Konferenco agnoskas, ke Esperanto atingis *tiajn rezultojn*, ke ili devas esti konsiderataj kiel kontribuoj al la celoj de Unesko, nome al la scienco, edukado, kulturo, proksimigo de la

17. Temas pri la Universala Ekspozicio de Esperanto (v. ankaŭ piednoton 9);

18. La teksto de la Rezolucio troviĝas en la verko *Esperanto en Perspektivo*, p. 773 kaj, interalie, en ĉiu Jarlibro de UEA ekde 1955;

popoloj, interŝanĝo de ideoj kaj personoj, faciligo de internaciaj rilatoj ktp. laŭ la Konstitucio kaj Baza Programo de Unesko.

La konsultaj aranĝoj estis unuanime aprobitaj antaŭ 4 tagoj ankaŭ en la Pleno. Sekve, ni nun havas firman bazon en Unesko per la konsultaj aranĝoj¹⁹ kaj fortegan batalilon de propagando per la Rezolucio. La Rezolucio, krome, signifas nuligon de la fama decido de la Komisiono por Intelekta Kooperado de la Ligo de Nacioj kaj plenan nuligon de la hontinda decido de la Programkomisiono de la 4-a de decembro, tute speciale de tiu aĉa makulo, kiun ĵetis en tiu kunsido sur nian lingvon kaj Movadon Prof. Blinkenberg ridindigante publike ĝin kaj ĝiajn atingaĵojn. Se mi aldonas, ke post la voĉdono ekestis aplaŭdoj en la tuta salono kaj sur la galerioj (la afero estis treege diskutata en la lastaj tagoj en la koridoroj de Unesko kaj en la gazetaro), vi povos eble iom kompreni la grandan kontentigon, kiun ricevis nia Movado kaj la sentojn de fiero kaj kortuŝo, kiuj ekregis min. Homoj leviĝadis de siaj seĝoj por gratuli. Ĝi estas la plej granda kaj la plej mirinda venko de mia vivo. Ĝi estas la plej bela donaco, kiun homo, dediĉinta la plej belajn jarojn de sia vivo al tiu nobla celo, povas doni al la Esperanto-Movado por la Nova Jaro.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3.4 de *EeP*.

6.2.10 Ŝajne, perdita afero (el la let. de 13.12.1954). – Ni, do, malsukcesis en la Programkomisiono, en ĝia hontinda kunsido de la 4-a de decembro, kiam nia afero estis ridindigita de Prof. Blinkenberg, kiam ĉ. 100 delegitoj de sepdeko da delegacioj bone amuziĝis pri ni, kiam mi tute sola devis senti la doloron, la doloregon de la tuta Movado pro tiuj aĉaj kaj nedignaj atakoj. Dum tiu kunsido ĉeestis en la galerioj nur Prof. Cao, sekretario de Urugvaja Esperanto-Societo²⁰, kaj lia fratino. Ili estis same konsternitaj kaj dolorigitaj kiel mi. Post la kunsido ni tuj iris al la ekspoziciejo kaj raportis al la aliaj pri la okazintaĵoj. Vi facile povas imagi la furiozon, la senpovan furiozon de ĉiuj. En tiu komentado kaj diskutado ni venis al ideo, ke oni devus almenaŭ protesti en la gazetoj. Tuj mi diktis al Cao tekston de Deklaro. Post iom da cizelado li per taksio iris hejmen, tradukis ĝin en la hispanan, tajpis en 10 ekzempleroj. Je la 23-a h. nokte li mem portis ĝin al kelkaj gazetoj. La morgaŭan matenon li portis ĝin al aliaj. Al unu gazeto alportis la tekston Urugvaja ministro

19. Poste la "konsultaj aranĝoj" ricevis la nomon "konsultaj rilatoj" kaj UEA, pro sia efika kunlaborado kun Unesko kaj plia fortikiĝo, atingis la prestiĝan kategorion B (v. pri tio en 22.3.5.1 de *Esperanto en Perspektivo*).

20. Kiel menciite en piednoto 16, post la eventoj de Hamburgo Prof. L. Cao kaj Urugvaja Esperanto-Societo ekŝiĝis el UEA;

persone – tiel li estis indignita pro tiu nekultura ago (v. por la teksto de tiu Deklaro aldonon A de tiu ĉi raporto)²¹.

Lundon matene ni reportis la filmon pri Danlando al la dana ĝenerala konsulo (v. por la teksto de la akompana letero aldonon B). Tiun saman matenon aperis en la granda gazeto *La Mañana* tute mallonga informo, ke la Urugvaja Societo protestas kontraŭ la voĉdono, sed tiu gazeto ne aperigis la tekston de la Deklaro.

Tiun lundon matene mi iris nur por momento al la konferenceto por flari la agordon. Mi sentis min kiel batita hundo, sed mi metis grandan Esperanto-insignon en la butontruon kaj forigis tiun de Unesko²². Neniu volis min rimarki, eĉ ne kelkaj oficistoj, kiuj pli frue estis ĝentilaj. Nur antaŭ unu persono mi sentis min kulpa: la meksikia delegitino, sinjorino Vallarta, al kiu mi estis dirinta, ke ĉ. 25 delegacioj subtenos nin kaj kiu tiel klopodis, ke Meksikio prezentu rezolucion...

Post tio mi iris al la ekspoziciejo, kie troviĝas la valizoj por la dokumentoj alportitaj el Londono, kaj mi enpakis ĉiujn dokumentojn. La afero, ja, estis finita kaj nenion plu oni povis fari. Konsolis min la penso, ke mi kaj miaj kunlaborantoj en tiu ĉi afero, faris eĉ ne unu erareton, ke ni vere sindone agis laŭ ĉiuj eblaj vojoj kaj aplikante la plej bonajn metodojn.

Reveninte en la hotelon, mi prenis bankostumon kaj iris al la belega plaĝo de Pocitos, je 50 paŝoj. La unuan fojon, post 35-taga restado en Montevideo, mi volis iom ĝui la sunon, aeron kaj ĉielon. Sed tio ne estis ebla. La pensoj turmentis min kaj eĉ la akvoj de La Plata ne povis malvarmigi mian brulantan kapon. Vespere mi denove estis kun la esperantistoj kaj tiu estado kun fervoraj geamikoj estis por mi grava helpo.

Nokte mi denove cerbumis kion fari. Mi volis ion entrepreni; mi sentis, ke mi ne rajtas lasi la aferon, sed ne trovis ian ajn kontentigan solvon.

6.2.11 La publika opinio ekmoviĝas (el la sama let. de 13.12.1954).

– Mardon, la 7-an, mi kun granda ĝojo konstatis, ke la grava matena gazeto *El Pais* alportis preskaŭ la kompletan tekston de la Deklaracio de la Urugvaja Societo. Ĝi forstrekis la plej akrajn vortojn, sed lasis

21. Tiu kaj ĉiuj aliaj aldonoj menciitaj en tiu ĉi letero estis publikigitaj en la revuo *Esperanto*, februara 1955, p-oj 54-61, sed oni atentu, ke la literaj indikoj por la unuopaj dokumentoj ne identas kun la indikoj en tiu ĉi letero;

22. Ĉiuj delegitoj kaj observantoj ricevis komence de la Ĝenerala Konferenco specialan insignon, kiu sekvis ankaŭ kiel legitimilo por eniri la konferencojn;

komplete, ekzemple, la lastan frazon²³. Mardon, la tutan tagon mi estis terure ekscitita, iris al Unesko por vidi la efikon, sed rimarkis nenion specialan: mi plu estis ignorata. Ŝajnas, ke la artikolo de *El Pais* ankoraŭ ne atingis la delegitojn, nek la Sekretariaton.

La saman tagon posttagmeze la granda gazeto *El Debate* alportis la kompletan tekston de la Deklaracio, sed ne en formo de Deklaracio de la Urugvaja Societo. Ĝi tion faris en la *propra nomo*, do sen la subskriboj de Fernandez kaj Cao. *Tio estis bonega*. La publika opinio komencis esti por ni en tiu ĉi afero (mi menciis, ke lundon ĉiuj gazetoj alportis la informon pri la malvenko kaj Unesko donis la informon al ĉiuj presagentejoj). La ekscitiĝo en niaj vicoj estis grandega. Se ni ne sukcesis ĉe Unesko, do almenaŭ ni faros bruon kaj tiros el tio kapitalon por nia afero. Tiun saman tagon mi faris radioprelegon de kvaronhoro en Esperanto kun hispanlingva traduko. En ĝi mi sciigis pri la konsulta aranĝo²⁴ kaj kritikis la kunsidon de 04.12 sufiĉe akre²⁵.

6.2.12 La vojo trovita (el la sama letero de 13.12.1954). – Malfrue en la nokto mi venis en mian ĉambron, legis kaj relegis la artikolojn, cerbumis kaj, kiel leono en kaĝo, senpove promenis laŭlonge kaj laŭlarĝe. Ĉ. la 3-a matene la ideo maturiĝis: mi skribos protestan leteron al la Prezidanto de la Konferenco kun kopioj al la Ĝenerala Direktoro kaj al la Prezidanto de la Plenumkomitato. Mi ekdormis kaj vekigis je la 6-a. Tuj mi komencis verki la leteron kaj tiu laboro daŭris ĝis la 11-a (v. por la teksto de tiu letero aldonon C). Prof. Cao tradukis la leteron en la hispanan kaj je la 5-a h. ptm., la 8-an de decembro, ni kune iris al la 3 oficejoj de Unesko por transdoni la leterojn. Mi postulis de la sekretariinoj, ke ili skribe konfirmu la ricevon kaj indiku la horon.

Tiam Cao kaj mi eksidis en la restoracio de la konferencejo por vidi la nunan situacion (tiu restoracio-bufedo estis mia strategia loko dum multaj tagoj, ĉar tien venis aŭ trapasis ĝin multaj delegitoj). Vi devus esti tie por vidi mem la ŝanĝiĝintan situacion. Homoj, kiuj antaŭ unu tago ne volis min vidi, por kiuj mi ne ekzistis plu, subite fariĝis afablaj, salutadis la unuajn, ridetis ĝentile. Pluraj, ekzemple la italo Prof. Veronese²⁶, venis

23. La lasta frazo tekstis: "En la Ĝenerala Konferenco de Unesko oni multe parolis pri la neceso disvastigi la ideojn de Unesko en la amasojn. Estus bone, ke Unesko iom pli serioze ankaŭ aŭskultu la dezirojn de la amasoj";

24. V. piednoton 19;

25. La tekston v. en *Elektitaj Paroladoj*, p. 36;

26. Prof. Veronese estis ĉefo de la delegacio de Italio; poste li fariĝis Ĝenerala Direktoro de Unesko kaj UEA konsiderinde fortikigis siajn rilatojn kun Unesko dum lia oficado;

al mi kaj diris, ke fakte la kunsido de sabato estis nedigna de Unesko, sed ke la itala delegacio ne estas kulpa; ke ili faris ĉion eblan por min helpi ktp., je kio mi per malvarmegaj vortoj diris nur "jes, jes, sed vi ne observis vian promeson, ke vi subtenos la meksikian rezolucion; vi ne protestis kontraŭ tiu nedigna parolado de Blinkenberg".

6.2.13 Efiko (el la sama let. de 13.12.1954). – La afero fariĝis bombo. Ni montris la dentojn. Ni montris, ke oni ne povas nur tiel trakti nian Movadon... Intertempe, diskoniĝis pri mia letero al la Prezidanto de la Konferenco. Ĝi estis tuj tradukita en la anglan kaj francan de Unesko mem, kaj mi scias pozitive, ke jam je la 7-a horo ĝi estis legita de s-ro Evans, la Ĝenerala Direktoro. Post unu plia preskaŭ sendorma nokto, dum kiu mi planis mian sintenon en diversaj eblaj situacioj, venis la jaŭdo, la 9-a de decembro. La artikoloj en la gazetoj, la enhavo de la letero al la Prezidanto de la Konferenco estis jam legitaj de ĉiuj delegacioj /.../. Delegitoj, unu post la alia, venadis al mi por konsenti, ke la sabata kunveno ne estis serioza kaj por esprimi sian bedaŭron. Estis nun mi, kiu malvarmege respondadis kaj havis kontentecon, ke almenaŭ ni povis iom montri nian forton. En ĉiuj konversacioj, kiujn mi nun havis kaj kiujn, fine, mi ne plu estis devigata peti, sed mem estis petata, mi kvazaŭ pretere diradis, ke la afero riskas fariĝi monda kultura skandalo.

Mi restis tie ĝis la 3-a /posttagmeze/. Tiam subite mi decidiĝis – por fari pli da premo – postuli la parolon en la Pleno de la Konferenco vendredon matene. Ĉar la parolon en la Pleno povas konsenti nur la Prezidantaro de la Konferenco (prezidanto kaj 10 vicprezidantoj), mi kunmetis kaj tuj transdonis al la sekretario leteron tre mallongan kaj tre energian (v. por la teksto aldonon D)²⁷.

Vespere, post interkonsiliĝo kun la geamikoj, ni decidis, ke estas necese multobligi la tekston de la protesta letero al la Prezidanto kaj sendi ĝin al ĉiuj prezidantoj de la delegacioj. Tion ni faris por esti tute certaj, ke ĉiuj ĝin legos. S-ro Garcia prizorgis tion kaj la morgaŭan tagon Cao kaj Barbieri²⁸ persone portis la leteron al la sekretariinoj de ĉiuj delegacioj.

6.2.14 Unesko klopodas korekti la eraron (el la sama let. de 13.12.1954). – Vendredon, la 10-an de decembro, mi estis en Unesko jam

27. La postulo estis bazita sur art. 68 de la Interna Regularo;

28. Ili estis funkciuloj de Urugvaja Esperanto-Societo kaj, same kiel multaj aliaj urugvajaj geamikoj, donis grandan helpon;

je la 9-a matene kaj sidis en la bufedo. Ĉ. la 9.30 venis tien Bourgeois²⁹ – la homo, kiu dum la tuta Konferenco ne volis kun mi paroli krom en la momento, kiam mi petis de li la parolon en la Programkomisiono – petis permeson sidiĝi al mia tablo (kiel ĝentila li fariĝis!) kaj "konfidence" informis min, ke la prezidantaro konsentas, same kiel la Plenumkomitato, ke la sabata kunsido ne estis digna, sed ke oni ne povas doni al mi la parolon en la Pleno, por ne krei precedencon. Tamen, oni decidis, ke unu el la Vicprezidantoj de la Konferenco, la Ĝenerala Direktoro kaj li mem (Bourgeois) akceptos min oficiale por aŭdi miajn plendojn kaj por doni al mi kontentigon. Mi diris, ke nia afero estis publike ofendita kaj ke nur publika parolado en la Pleno povus signifi kontentigon realan. Nu, mi ne longigu. Je la 10-a s-ro Montagnier, la sekretario, diris, ke li informos min je la 1-a horo pri la momento de tiu kunveno kun la tri sinjoroj.

Tiun matenon la Pleno ĉiuvoĉe akceptis la Raporton de la Programkomisiono, raporton, en kiu la raportisto diris eĉ ne unu vorton pri la voĉdono koncerne la meksikian rezolucion, sed nur menciis, ke la Programkomisiono akceptis la Raporton de la Sekretariato koncerne la Internacian Peticion favore al Esperanto³⁰. Mi pensis, ke intence oni prokrastis mian kunvenon kun la tri, por ke unue, dum la mateno, la Raporto de la Programkomisiono estu akceptita en la Pleno (parenteze mi diru, ke la akcepto de la raportoj en la Pleno estas pura formalajo kaj ke neniam okazis, ke iu decido de kiu ajn el la grandaj komisionoj – nome en kiuj estas reprezentitaj ĉiuj ŝtatoj – estis ŝanĝita de la Pleno). Je la 1-a horo mi estis informita, ke la kunveno kun la tri okazos je la 4-a h. ptn., duonan horon antaŭ la lasta kunsido de la Pleno.

Inter la 1-a kaj 4-a h. mi denove estis ĉe Cao, kie mi faris miajn skribajn korektojn de la protokolo de la sabata kunsido, ĉar en tiu protokolo miaj diroj estis nete misprezentitaj. (Oni rajtas korekti la protokolojn koncerne siajn dirojn en la limtempo de 48 horoj ekde la momento, kiam estis eldonita la provizora protokolo).

6.2.15 Postulo pri revoĉdonigo akceptita (el la sama letero). – En tiu fama kunveno kun la tri sinjoroj mi unue esprimis bedaŭron pro la fakto, ke oni ne donis al mi la parolon en la Pleno. Poste mi protestis en ĝentila formo pro la okazaĵoj de la pasinta sabato kaj ĵetis la tutan kulpon je Blinkenberg. Mi parolis proksimume dum kvaronhoro kaj diris proksimume tion, kion mi intencis diri en la Pleno. Ĉiuj aŭskultis treege atente. Kiam mi finis, la Ĝenerala Direktoro demandis kion, laŭ

29. Pri li v. piednoton 12;

30. Temas pri la dokumento de Unesko 8C/PRG/3, v. supre en 6.2.7.

mia opinio, oni povus nun fari, kiam la tuta afero estas finita. Tiam – male al miaj antaŭaj intencoj koncerne la postulojn miafare en tiu ĉi afero – mi diris tute trankvile: "Laŭ mia opinio, la sola kontentiga solvo – kaj el vidpunkto de mia Asocio kaj el vidpunkto de Unesko – estus revoĉdonigi la Rezolucion en la Pleno. Estas ankoraŭ tempo tion fari. La decido de la Pariza Konferenco (Rez. 4.14), ke tiu ĉi Sesio decidus kian sekvon doni al la Peticio, ne estas plenumita ĝis la nuna momento³¹. Estas, do, ankoraŭ ebleco, ke oni pri tio informu la Plenon kaj revoĉdonu pri la Rezolucio. Ĉar la Meksika Rezolucio estis rifuzita de la Komisiono, la jura ebleco estas voĉdonigi ĝin sen la p-to 4, per kio ĝi fariĝas nova, nerifuzita projekto". (Kiam mi planis la postulojn, mi estis notinta en mian notlibron: "postuli: (i) ke mia letero de 08.12. estu aldonita al la aktaro de la Konferenco; (ii) ke oni skribe informu kial oni rifuzis al mi la rajton paroli en la Pleno; (iii) ev. skriban senkulpigon pro la okazaĵoj de sabato".) Anstataŭ tiuj planitaj postuloj, mi faris neblan postulon pri revoĉdonigo, kiu, mi estis konvinkita, estos malakceptita de la tri. Kia estis mia konsterniĝo, kiam Evans diris, ke li opinias min prava, kaj kiel batis mia koro en tiu momento, mi ne povas diri al vi. La aliaj du konsentis. Estis jam la 4.35. Post 5 minutoj komenciĝos la lasta kunsido. Evans proponis al Bourgeois, ke li starigu la aferon en la nomo de Svislando. B. akceptis. Mia koro volis krevi. Mi eliris el la ĉambro.

6.2.16 En la Pleno (el la sama let. de 13.12.1954). – La konferencejo estis plenŝtopita. Mi trakuris la salonon kaj en tiuj kvin-ses minutoj alparolis dekon da delegacioj... Mi povis diri al ĉiu nur du vortojn: "Oni revoĉdonos pri la Meksikia Rezolucio; nun plenumu vian promeson". Mi tiel rapidege kontaktis la delegaciojn de Brazilo, Francio, Italio, Nederlando, Urugvajo, Luksemburgo... Fine mi reiris al la loko de la svisoj kaj petis Bourgeois iom energie kaj iom longe fari la proponon. Tiam li diras, ke li jam parolis kun Vallarta (Meksikio) kaj ke Vallarta reprenos la aferon, dum li, Bourgeois, subtenos en la nomo de Svislando. Bonege. La kunsido komenciĝis kaj mi rapidis al mia loko en la lasta vico, kie estis skribite sur jam malpureta tabulo "Observanto de Universala Esperanto-Asocio".

En tiu kunveno la Pleno unue konfirmis la elekton de la membroj de diversaj komitatoj. Poste estis solena omaĝo al Urugvaja poetino Ibarourou. En ŝia ĉeesto parolis pluraj delegitoj. Ŝi dankis kaj forlasis la salonegon, kaj ĉiuj leviĝis honore al ŝi. La Prezidanto Zavala Muniz

31. Pri la decido de la Pariza Sesio v. ĉap. 22.3.2 de *Esperanto en Perspektivo*;

anoncis: "Ni transiras al la sekvanta punkto de la tagordo: la Internacia Peticio favore al Esperanto. La parolon havas la delegito de Meksikio".

Sinjoro Vallarta³² aliris la tribunon kaj komencis paroli. En la salonego estis bruego... Multaj delegitoj tute ne havis la aŭskultilojn, sen kiuj estas maleble ion ajn aŭdi... En tia agordo la meksikia delegito parolis proksimume dum tri minutoj. Bone, sed ne aŭskultata. Mi leviĝis kaj signis per la mano, ke li ĉesu. Mi timegis, ke jen, denove, pro ekstera incidento la afero malsukcesos. En tiu momento la prezidanto sonorigis ĉiujn sonorilojn. La parolanto feliĉe ĉesis paroli. La silento estis restarigita. La delegitoj metis la aŭskultilojn. Zavala Muniz flustris al Vallarta (kion oni bone povis aŭdi en tiuj perfidaj aŭskultiloj) "Rekomencu", kaj li fakte rekomencis: "Señor Presidente...". Post li, sinjoro Bourgeois diris, ke fakte la voĉdono okazinta la pasintan sabaton okazis en tia atmosfero, ke li opinias necesa la revoĉdonon en la Pleno. Li aldonis, ke Svislando subtenos la projekton de Meksikio (kia ŝanĝo, sinjoro Bourgeois!), kaj ke li proponas, ke oni pri ĝi voĉdonu sendiskute, ĉar ĉiuj delegacioj havas klaran bildon pri la afero surbaze de la dokumentoj.

Tiam anoncis sin la brita delegito. Li komencis proksimume jene: "Mi estas principe kontraŭ tio, ke oni restarigu en la Pleno aferojn, plenrajte deciditajn en komisiono (finite, mi pensis). Mi estas tute speciale kontraŭ tio, ke oni voĉdonu en kiu ajn okazo sen antaŭa diskuto (evidente kontraŭos, mi pensis). Tial mi deziras diskuti... Mi konsentas kun la projekto, sed mi dezirus forigi la lastajn vortojn, post 'kampo'... Se la meksikia kaj svislanda delegitoj konsentos, mia delegacio voĉdonos por la Rezolucio" (bonege, mi pensis, tiuj vortoj estas fakte tute sensignifaj kaj la subteno de Britio donos certe dekduon da pliaj voĉoj). Neniu plu postulis la parolon. La Prezidanto voĉdonigis la Rezolucion kun tiu eta amendo brita, kiun Meksikio kaj Svislando akceptis. "Kiu estas por?" – demandis la Prezidanto. Tridek manoj leviĝis. Mi nombris ilin, sed ne povis noti ĉiujn landojn de la por-voĉdonintoj. Kontraŭ estis kvin: Danlando, Egiptio, Kubo (strangege) kaj ankoraŭ du, kiujn mi ne notis. Sin detenis 17 landoj, inter kiuj la tuta soveta bloko. Certe voĉdonis por: Meksikio, Urugvajo, Svedio, Norvegio, Svislando, Ĉinio, Nederlando, Luksemburgo, Francio, Britio, Brazilo, Jugoslavio, Grekio. La Prezidanto proklamis la rezulton: "tridek por, kvin kontraŭ, dek sep sindetenoj".

Mi sentis la gambojn paralizitaj. Mia korpo algluiĝis al la seĝo. En la salonego la decido estis salutita per forta aplaŭdo, apogata precipe de la galerioj. Homoj leviĝadis de sur siaj seĝoj kaj venadis al mi por gratuli...

32. Prof. Vallarta estis la ĉefo de la meksikia delegacio;

Estis la 17.30 h., vendredon, la 10-an de decembro, kiam okazis tiu historia momento ne nur por nia Movado, sed ankaŭ por la kulturo de la mondo. Unesko oficiale rekonis la valoron de Esperanto por la scienco, edukado kaj kulturo. La sama konferenco, kiu nur antaŭ 6 tagoj moke priridis la lingvon kaj neis ĝian kulturalan valoron, nun en la plej solena kunsido, en maniero la plej digna nuligis sian propran antaŭan decidon. Piedpremita kaj ĵetita en koton kun la verda standardo en la manoj, mi ankoraŭfoje leviĝis, flirtigis la standardon kaj devigis la malamikon en lia propra tendaro rekonii nin venkintoj! Mi memoris la vortojn de la Episkopo de Montevideo, kiu jam plurajn tagojn antaŭ la fama 4-a de decembro estis dirinta al mi: "Unesko estas murego de kontraŭstaro al Esperanto, sen unusola trueto favora". Mi trovis la trueton kaj detruis la muregon!

6.2.17 "Triunfo del Esperanto" (el la sama letero). – Mi tuj telegrafis kaj poste skribis la leteron de la 10-a. Poste, kvankam lacega, mi vestis la plej solenan vestaĵon, iris al la solena akcepto donita de la Prezidanto de la Konferenco en El Prado kaj restis ĝis la 3-a matene. Superflue diri, ke centoj da personoj gratulis tie. Eĉ personoj, kiujn mi neniam vidis antaŭe. Sinjoro Evans diris al mi la plej flatajn vortojn kaj invitis min viziti lin en Parizo, kiam mi venos tien. Elvin, Thomas, Montagnier³³ kaj multaj aliaj altaj oficistoj estis same koraj, sed tiuj ĉi en ĉiu okazo sincere koraj.

Sabaton matene ĉiuj gazetoj alportis la novaĵon. La gazeto *La Tribuna Popular* de la 11-a de decembro alportis ĝin sub la titolo "*Triunfo del Esperanto*". Estis, fakte, vera triumfo.

London mi estis enpakinta ĉiujn dokumentojn, ĉar mi devis konsideri la aferon definitive perdita. Mardon mi malpakis ilin kaj reportis en la hotelon. Nun mia hotela ĉambro estas plenplena de ili. Sed morgaŭ mi definitive enpakos ilin. En la ekspoziciejo ni hieraŭ malhisis la standardon, kiu ricevis la novan honorigon.

6.3 Postnoto

Aldone al la Enkonduka Rimarko en 6.1, utilas ĉi tie mencii, ke pri la agadoj dum la Sepa Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta en Parizo en novembro kaj decembro 1952, aperis detala raporto en la

33. L. Evans estis Ĝenerala Direktoro de Unesko; Prof. J. Thomas estis Direktoro de la Departemento pri Kulturaj Agadoj; S-ro L. Elvin estis Direktoro de la Departemento pri Edukado; S-ro Montagnier funkciis kiel Sekretario de la Konferenco.

revuo *Esperanto* de januaro 1953 sur p-oj 2-11, parte ankaŭ en *Esperanto* de februaro 1953 sur p-oj 52-53.

La Rezolucio havis grandegan signifon por la plua progresigo de la Internacia Lingvo. Ĝi atestis la kulturen valoron de Esperanto, konsiderinde altigis ĝian prestiĝon kaj, kune kun la akiritaj konsultaj rilatoj, fortikigis en la mondo la pozicion de UEA kiel prava reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado en tiu tempo kaj poste ĝis Hamburgo (1974). La Rezolucio ankaŭ malfermis multajn pordojn, ĝis tiam ŝlositaj, sur la landa, loka kaj faka niveloj. Estas alia afero, ke, bedaŭrinde, ne ĉiuj Esperanto-organizaĵoj sciis eniri tra tiuj malfermitaj pordoj. Konciza analizo pri la decidoj de Montevideo kaj iliaj sekvoj troviĝas en ĉap. 22.3.5 de *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo (EeP)*.

La agadoj en ligo kun la Peticio, precipe la spertoj en Montevideo, estis utilegaj ankaŭ el alia vidpunkto. Ili ne nur montris kiel oni devas organizi mondiskalajn agadojn por havi ŝancon sukcesigi ilin kaj por atingi difinitajn celojn, sed ankaŭ klare evidentigis la neceson firmigi la organizan strukturon, aktivadi surbaze de realecaj planoj, kvante intensigi kaj kvalite plibonigi la tutan laboron, unuavice sur la kampo de informado. Blinkenberg povis sukcesi la 4-an de decembro en la Programkomisiono, ĉar la medio, en kiu li intervenis, estis saturita de antaŭjuĝoj, ignoradoj kaj konsciaj kontraŭstaroj. Siavice, tio grandparte ŝuldiĝis al sekteco, blufoj, primitiveco de la informado pri Esperanto fare de tre multaj Esperanto-organizaĵoj kaj "tro fervoraj" unuopuloj dum tro longa tempo, kio ne povis ne kaŭzi ege maljustan kompromitiĝon de la lingvo kaj malpli maljustan kompromitiĝon de la Esperanto-Movado. Sed la blinkenbergoj povis ankaŭ esti venkitaj post nuraj ses tagoj de intensa kontraŭofensivo per objektivaj faktoj, sciencaj argumentoj kaj juraj konsideroj. Tiu aspekto de la montevideaj spertoj eĉ pli firmigis la jam fortan konvinkon pri la neceso rapidigi pliajn radikalajn ŝanĝojn en la tuta laboro por Esperanto laŭ la bazaj konceptoj formulitaj tuj post la Dua Mondmilito (v. ĉap. 18.2 de *EeP*). El tio, inter alie, rezultis la nova Statute de UEA en 1955, la perspektiva Unua Baza Laborprogramo de 1955, la Principaro de Frostavallen pri Informado (1956), nombro da okazaj laborplanoj kaj tuta aro da aliaj gravaj decidoj, kies *realigo* (ne blufaj promesoj) donis al UEA kaj pere de ĝi al la tuta neŭtrala Esperanto-Movado karakteron de respektata kaj atentinda kultura-socia faktoro en internaciaj rilatoj, kaj al Esperanto mem la merititan rekonon de plenvalora kultura lingvo. Tion en 1974 rekonis en longa artikolo ankaŭ la prestiĝa germanlingva *Die Welt*. Interne de la Movado tio estis

"la montevidea spirito", per kiu G. Silfer karakterizis la ĝishamburgan realaĵon, spirito kiu "senalternative velkis".

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3.4 de *EeP*.

7 Du pliaj malneŭtralaj landaj instancoj en UEA

7.1 Decido de la Komitato de UEA en Ateno

Laŭ la oficiala raporto, publikigita en *Esperanto*, n-ro 9/1976, p. 146, "post iom frosta rekomendo de la Estraro, la Komitato kun /per/ granda plimulto favore decidis pri la aliĝo de la landa asocio en Germana Demokratia Respubliko". La raportinto komentis: "Tiel la Centra Laborrondo Esperanto fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA, kio signas finon al kelkajara klopodo politikumi pri la demando kaj sendube estas plia paŝo al la universaleco de UEA". Laŭ la sama raporto, la Komitato akceptis aliĝojn ankaŭ de la Asocio de Esperantistoj en Slovakio kaj Korea Esperanto-Asocio.

7.2 Konciza komento

Tio, kion la raportinto nomis "fino al kelkajara klopodo politikumi pri la demando" fakte estas fina bato al la klopodo haltigi plian politikigon de UEA, kontraŭan al la pli ol klara preskribo de art. 4 kaj 13 de la Statuto de UEA. La *programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR* estas detale analizita en 3.1.2 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 3/1976. Sekvas, ke tiu instanco – neniel "laŭorde organizita" landa asocio en la senco de art. 13 de la Statuto – estas evidente politike malneŭtrala. Same malneŭtrala estas la Asocio de Esperantistoj en Slovakio, frata organizaĵo (se entute temas pri organizaĵo en la senco de la Statuto de UEA) de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies kontraŭneŭtralecaj Programo kaj agadoj estas analizitaj en 3.1.3 de tiu ĉi rubriko en la sama numero de *Horizonto*. S-ro R. Graetz fariĝis komitatano A por la Centra Laborrondo, dum s-ro P. Rosa eniris la Komitaton kiel reprezentanto de AES. Tiu s-ro Rosa estas unu el la subskribintoj de la jam misfama "strikte konfidenca" cirkulero de aprilo 1974 kaj unu el la ĉefaj komplotintoj kontraŭ la neŭtralecon de UEA (detaloj en *Hamburgo en Retrospektivo*, p. 62).

Ne estas klare ĉu Korea Esperanto-Asocio apartenas al Norda Koreo aŭ al Suda Koreo.

Necesas atentigi, ke la supraj decidoj krude malobservas la "malnovan" Statuton de UEA, ĉar la nova Statuto, kiun la nuna gvidantaro de UEA

tiom da fojoj pompe antaŭanoncis, ankoraŭ ne estas akceptita. Eĉ pli, la Komisiono pri la Statuto, kiun gvidis s-ro U. J. Moritz, en Ateno ĉesis ekzisti (laŭ *Esperanto*, n-ro 9/1976, p. 156).

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP* kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

7.3 Rekono de plia kontraŭstatuta decido

En 3.1.2 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-ro 3/1976) estis analizita la partipolitika programo de *Centra Laborrondo Esperanto de GDR (CLE)*, nete kontraŭa al la principo de neŭtraleco de UEA. Kiel ni informis kaj komentis en p-to 7 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-ro 6/1976), la Komitato de UEA en Ateno akceptis ankaŭ tiun instancon kiel aliĝintan asocion, kvankam ĝi eĉ ne estas "laŭorde organizita" en la senco de art. 13 de la Statuto. Krome, la Komitato akceptis ankaŭ la aliĝon de *Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR)* kiel plian malneŭtralan instancon el Ĉeĥoslovakio.

Verŝajne pro la maltrankvilo, kiun kaŭzis inter la membroj tiuj pliaj krudaj malobservoj de la Statuto (tiurilatajn leterojn la nuna gvidantaro de UEA rifuzis publikigi), la "estrarano pri landa agado", d-ro W. Bormann, nun aperigis 2-paĝan artikolon, en kiu li klopodas pravigi per pseŭdoargumentoj la akcepton de tiuj du instancoj (*Esperanto*, n-ro 12/1976, p-oj 197-98). Interalie, li skribis por naivuloj: "La Komitato pretis akcepti la aliĝpetojn de AESSR, nur kiam reprezentanto de ĈEA deklaris kiel volon de la 2 asocioj iam prezenti nur unu membrecon en UEA". Por rapidigi la alvenon de tiu "iam" ŝajnas, ke necesis "konvinki" la Komitaton senprokraste akcepti tiun instancon en Slovakio, ĉar, jen, tuj plia "argumento": "Tio tamen eblas nur se la du nunaj asocioj povos intertrakti pri tio sur egala nivelo, kaj tio necesigas la aliĝon de AESSR". Do, por havi "iam unu membrecon", necesis *nun* havi "duoblan membrecon" kun *unu plia* komitatano A el tiu lando! La "estrarano pri landa agado" neniel klarigis, kial por intertrakti "sur egala nivelo" necesis akcepti plian malneŭtralan instancon en UEA, nek li diris unusolan vorton pri tio, ke la ŝtataj-partiaj instancoj – ne la esperantistoj – en ĈSR decidas, ĉu estos unu aŭ du "asocioj" kaj, sekve, unu aŭ du "reprezentiĝoj" kaj, rezulte, unu aŭ du komitatanoj A el tiu lando en la Komitato de UEA. Kompreneble, ili preferis havi du kaj tiamaniere fortikigi la partipolitikan blokon en UEA. Fakte, se la Komitato de UEA agus konforme al la Statuto de la Asocio, ĝi devus ne nur malakcepti la aliĝpeton de AESSR, sed ankaŭ postuli la ekziĝon de ĈEA – aŭ ekzigi tiun instancon – pro ĝiaj klare kontraŭneŭtralecaj Programo kaj agadoj,

kiel abunde dokumentite en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj plurfoje en tiu ĉi rubriko.

Tio kondukas al plia misprezento de la Statuto en la menciita artikolo. D-ro Bormann asertas: "Tial la Statuto de UEA, en la artikolo pri la neŭtraleco de siaj landaj asocioj, postulas tute prave neŭtralecon en iliaj statutoj kaj ne pesas ĉiun eron en la agadoj de la landaj asocioj...". Kompreneble, la Estraro de UEA "ne pesas ĉiun eron en la agadoj de la landaj asocioj". Pri tio neniam temis. Sed, kaj la Estraro kaj la Komitato ja devus rigore "pesi" tiujn agadojn, kiuj estas evidente kontraŭaj al la Statuto de UEA, en tiu ĉi kazo al la fundamenta principo de neŭtraleco. Kaj ĝuste pri tio temas. Koscie malatenti tion – kaj la menciita artikolo pli ol klare montras la lucidan koscion pri la afero – signifas koscie malobservi esencan regulon de la Statuto kaj publike rekoni tion.

Eĉ pli klara rekono rilatas al la kontraŭstatuta akcepto de la *Centra Laborrondo Esperanto (CLR) en GDR*. En sia rekomendo al la Komitato en Ateno, la Estraro de UEA eksplicite notis, ke "per tiu aliĝpeto prezentiĝas peto de organizaĵo *ne antaŭvidita en la Statuto de UEA*", sed ĝi tamen "ĝenerale opinias, ke estas eble al la Asocio akcepti CLE kiel aliĝintan landan asocion". Plia hipokrita misprezento de la Statuto, nur "ne antaŭvidas tian specon de organizaĵo" por aliĝo, sed ĝi eksplicite preskribas, ke sole *politike neŭtrala* kaj *laŭorde organizita landa asocio* povas aliĝi al UEA: CLR estas nek politike neŭtrala, nek laŭorde organizita landa asocio, sed unu el la ses sekcioj de la ŝtata-partia Kulturligo de GDR.

7.4 Plia komento

Der Esperantist, kies oficiala subtitolo estas "Informbulteno de Esperanto-Amikoj en la Kulturligo de GDR" (do, eĉ ne de esperantistoj) kaj estas eldonata de tiu ŝtata-partia institucio, informis pri la "aliĝo" per dikaj literoj sub la titolo "Centra Laborrondo – kolektiva membro de UEA". Do, eĉ ĝi ne kuraĝis trompe skribi "aliĝinta landa asocio", la sole ebla kategorio por "laŭorde organizita landa asocio", sed uzis la esprimon "kolektiva membro", kiu tute ne ekzistas en la Statuto de UEA. Oni povas legi en tiu informo, ke pri "la aliĝo de GDR en UEA kaj pri kongreso raportis la tutrespublika gazetararo, i.a. *Neues Deutschland* per 30-linia informo la 7./8. aŭgusto 1976" /de la 7-a kaj 8-a de aŭgusto 1976, *mia rimarko*/. Evidente, la "tutrespublika gazetararo", inkluzive la ĉeforganon de la partio, rigardis la "kolektivitan membrecon en la mondorganizaĵo" kiel gravan politikan venkon. Necesas memori ĝi la

ignorantojn aŭ tiujn, kiuj inklinas forgesi, ke temas pri la sama GDR, en kiu ĝis la mezo de 1974 ĉiuj publikaĵoj de la ĝishamburga UEA, partipolitike strikte neŭtrala, eĉ ĝia *Jarlibro*, estis sisteme konfiskataj. Ĉu la nuna "granda amo" de GDR al UEA, eĉ se ne ekzistus unusola el la multnombraj dokumentoj pri la tuta partipolitika konspiro, vere ne pensigas eĉ la mensajn blindulojn, ke partipolitikaj fortoj ekregis la gvidadon de la Asocio? Ĉu, fine, la membraro de UEA ankoraŭ fidela al la principo de neŭtraleco, precipe la dumvivaj membroj, kaj almenaŭ tiuj 4 komitatanoj, kiuj voĉdonis kontraŭ la akcepton de CLR, aŭdigos sian voĉon kaj almenaŭ postulos la publikigon de la tuta dokumentaro pri tiu nova politika afero en UEA? Ĉu la nuna gvidantaro de UEA kuraĝas aŭ ne kuraĝas publikigi almenaŭ tiun "novan statuton" de CLE, kiu, kvazaŭe, "ne plu entenas devigon por la membro sekvi iun gvidlinion"? Kaj ĉu la Estraro pretas publikigi ian eksplicitan deklaron de la Kulturligo en GDR, ke fakte la Laborrondo kiel unu el la fakoj de la Kulturligo ne plu estas devigita sekvi la gvidlinion de tiu Kulturligo, se la aserto pri la "nedevido sekvi iun gvidlinion" entenas ereton da vero? La esperantistaro – ĉu ankoraŭ en UEA, ĉu ekster ĝi – kaj ankaŭ la vasta publiko en la demokrata mondo rajtas sciigi pri la vero.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP* kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

8 BEA reŝanĝis sian Statuton

En ĉap. 3 de *Hamburgo en Retrospektivo* (*HeR*) estas detale analizita la partipolitika, nete kontraŭneŭtraleca Programo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA). En 3.1 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 3/76, p. 65) estis menciita la ŝanĝita Statuto de BEA, laŭ kiu unu el la celoj de tiu organizaĵo estas "eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj proleta internaciismo, de alligiteco al tendaro de l'socialismo". El ĵus ricevita nova ekzemplero de tiu Statuto vidiĝas, ke la ero pri "*proleta internaciismo*" kaj "*alligiteco al tendaro de l' socialismo*" estas ellasita en la versio amendita la 12-an de julio 1976, do ĵus antaŭ la UK en Ateno, dum kiu du pliaj instancoj kun partipolitikaj celoj estis akceptitaj kiel "kolektivaj membroj" de UEA (v. en 7.1-7.4 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 6/76, p. 127, kaj n-ro 1/77, p-oj 10-11).

Ne povas esti dubo, ke tiu formala ellaso ŝuldiĝas al la ŝokiĝo, kiun ĉe multaj esperantistoj kaŭzis la nekontestablaj faktoj malkovritaj en *HeR* kaj la pliaj faktoj prezentitaj en *Horizonto*. Pri tiu malgranda venketo – malgranda, ĉar nur formala – *Horizonto* certe povas esti kontenta, eĉ iom fiera, ĉar ne estas facile devigi gvidantaron de tiaspeca organizaĵo,

plene dependa de partipolitikaj fortoj, ellasi el la Statuto "la edukadon de la membraro en la spirito de proleta internaciismo, alligiteco al la tendaro de l'socialismo". Aliflanke, nenio ĝis nun indikas, ke BEA kaj aliaj partipolitikaj organizaĵoj fakte ĉesigis sian partipolitikan agadon en la sino de UEA. Krome, en paragrafo 2 de la amendita Statuto estas aldonita punkto (h), laŭ kiu "BEA estas kolektiva membro de UEA kaj *apogas Mondpacan Esperanto-Movadon*, do nete partipolitikan movadon, kiel pruvite en ĉap. 3.3 de *HeR* kaj plurloke en tiu ĉi rubriko. Tio, cetere, plu restas konforma al la Programo kaj al la partipolitikaj aktivadoj de tiu organizaĵo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 3 kaj 5.4 de *HeR*, kaj ĉap. 18.2.1.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

9 Soveta jura periodaĵo pri la rolo de NRO-j

En n-ro 10/76 de la ĉefa soveta jura periodaĵo *Sovetskoje Gosudarstvo i Pravo* (Soveta Ŝtato kaj Juro), eldonata de la Instituto pri Ŝtato kaj Juro de la Akademio de Sciencoj de USSR, aperis dekpaĝa artikolo sub la titolo "Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) en Kondiĉoj de Malstreĉiĝo", verkita de V. N. Orel. Kvankam nuntempe ekzistas ĉ. 3000 NRO-j, tamen en la artikolo estas pritraktita la rolo nur de la plej gravaj, nome de la organizaĵoj havantaj konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj/aŭ kun Unesko, kiel UEA. En la komenco estas emfazita ilia "kreskanta influo je la monda politiko en la kondiĉoj de malstreĉiĝo" (p. 94). Apartajn laŭdojn ricevis la "amasaj demokrataj NRO-j", inter kiuj elstaras la "tutmonda Packonsilantaro" kaj la "Internacia Konsilantaro por Daŭrigo de la Agadoj kaj Ligoj de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj", okazinta en Moskvo en oktobro 1973 (p-oj 95-97). Oni notos, ke la intensigo de la politika komploto en UEA ekde la fino de 1973 plene koincidas kun la "daŭrigo de la agadoj", formulitaj en Moskvo en oktobro 1973. Inter la "demokrataj" kaj "aŭtoritataj" organizaĵoj sur p. 100 estas menciitaj ankaŭ la Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ), kun kiu TEJO, la junulara sekcio de UEA, faris kontrakton pri kunlaboro (v. 4.3 kaj 4.4 de *HeR*). Aliaj "demokrataj" organizaĵoj menciitaj sur la sama loko estas la Internacia Demokrata Federacio de Virinoj, Internacia Asocio de Juristoj-Demokratoj k.s., ĉiam kun la vorto "demokrata" en la titolo kaj ĉiuj plene vivtenataj kaj direktataj de Moskvo.

La kvintesenso de la artikolo estas formulita sur p. 97:

Dum pli frue, en la tempo de "malvarma milito", "multaj NRO-j estis puŝataj en antikomunisman, antisovetan politikon kaj fakte montriĝis en la servo de NATO" /sic!/, nun, dank' al agado de la "amasaj

demokrataj organizaĵoj" (menciitaj supre), "pro la malstreĉiĝo /en ligo kun la Konferenco de Helsinki, *rim. de la red.*/ kaj malfortiĝo en la gvidantaroj de multaj NRO-j de la pozicioj de la ĝisostaj predikantoj de antikomunismo /plia *sic!*/, tiuj organizaĵoj komencas konduki pli liberan politikon rilate al internacia kunlaborado, precipe per establo de kontaktoj kun la universalaj NRO-j", t.e. kun la "amasaj demokrataj organizaĵoj" /ekzemple TEJO kun MFDJ kaj IUS/.

Ĉiu, kiu ne estas politika analfabeto, bone scias, ke, tradukite el la soveta rusa en kiun ajn lingvon, inkluzive la nesovetan rusan, la cititaj vortoj signifas: dum pli frue la gvidantaroj en la plimulto de vere demokrate organizitaj NRO-j malebligis, ke tiuj organizaĵoj estu misuzataj por kies ajn partipolitikaj celoj, inkluzive la sovetajn ("anti-komunismo!"), nun, dank' al lerta ekkapero de la gvidaj pozicioj en tiuj organizaĵoj, ili estas malfermitaj al senbrida partipolitika propagando kaj estas utiligitaj por apogadi la sovetan eksterlandan politikon, bazitan sur la *soveta* (eĉ ne "komunista") koncepto de "kunekzistado" kombinita kun tiu de "proleta internaciismo".

Neniu el la ekkaperitaj NRO-j estas eksplicite menciita en la artikolo, sed ĝia enhavo pli ol klare rilatas ankaŭ al UEA kiel unu el NRO-j en konsultaj rilatoj kun Unesko kaj UN. La artikolo ankoraŭfoje – en tiu ĉi kazo per teksto publikigita en la plej grava soveta jura periodaĵo, do "sur la plej alta nivelo" – konfirmas la koncizan analizon de la vera celo de la partipolitika komploto en UEA, kaj de la metodoj aplikitaj por atingi tiun celon, entenatan en ĉap. 5, precipe en 5.1 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

Aliflanke, en la Antaŭparolo al la verko de Prof. R. Szawlowski *The System of the International Organisation of the Communist Countries* (La Sistemo de Internaciaj Organizaĵoj de la Komunistaj Landoj), publikigita en 1976 en Kanado, estas dirite:

"Tiu ĉi libro rilatas sole al Internaciaj *Registaroj* Organizaĵoj de la komunistaj landoj, kaj ne pritraktas ĉiujn aliajn organizaĵojn kun esence politika naturo, *kiuj ne havas oficialan registaran karakteron, kvankam ili estas inspiritaj kaj direktataj de Soveta Unio kaj kvankam ili estas tre gravaj por la propagando kaj disvastigo de la komunista ideologio sur monda nivelo* (ekzemple, la Monda Packonsilantaro, la Monda Federacio de Sindikatoj kaj la Internacia Studenta Unio)." (*Kursivigita de la red.*)

Por kompletigi la tutan bedaŭrindan bildon, estas bone memori la forgesemulojn, ke en la julia/aŭgusta numero de *Esperanto*, 1975, do antaŭ la apero de *HeR*, ĝia redaktoro skribis kalumnio, ke "... la kritikantoj de la nuna gvidantaro sub la etikedo de 'neŭtraleco' propagandas la fakte obskuran makartismon kaj revivigas la fantomojn de 'malvarma milito' ...". (Parenteze: oni komparu tiun lingvaĵon de la oficiala organo

de UEA kun la supre cititaj vortoj en la ĉefa soveta jura periodaĵo por konstati la esencan identecon). En la sama artikolo li ankaŭ diris: "Estas jam delonge tempo, ke oni ĉesu blufi kaj misgvidi la honestajn neinformitajn homojn". Kaj denove: "Oni ankoraŭ blufas pri ekzisto de 'fidindaj dokumentoj', pri onidira 'komploto' " Kaj li provoke aldonis: "Sur la tablon la atutojn, se oni havas ilin" (ĉio sur p. 183).

Nu, post la publikigo de *HeR*, la multnombraj faktoj publikigitaj en *Horizonto* kaj la supra rekonfirmo de la tuta sovete inspirita ofensivo por kapti la prestiĝajn neregistarajn organizaĵojn, "la atutoj ja estas sur la tablo", kiel kartlode esprimus sin la redaktoro de la organo de UEA, kaj fakte ĉiuj "honestaj neinformitaj personoj" povas juĝi. Mi mem povas nur fidi je la saĝo entenata en malnova diro: oni povas trompi la tutan mondon kelkan tempon, oni povas trompi kelkajn la tutan tempon, sed oni ne povas trompi la tutan mondon la tutan tempon.

Ankoraŭ io: oni ne riproĉu, ke tiu ĉi tuta bedaŭrinda afero en UEA estas traktata politike. Prefere oni komprenu, ke estas maleble prezenti kaj analizi politikan konspiron – nepolitike. Necesas ankoraŭfoje forte emfazi, ke, kompreneble, ĉiu rajtas havi siajn proprajn politikajn konvinkojn, uzi Esperanton ankaŭ por politikaj celoj, eĉ formi partipolitikajn Esperanto-organizaĵojn. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas misuzi partipolitike neŭtralan organizaĵon por partipolitikaj celoj, detru tiamaniere ĝian neŭtralecon kaj, sekve, universalecon. Nur pri tio temas.

Tiu. ĉi ero kompletigas ĉap. 3 kaj 5.4 de *HeR*, kaj ĉap. 18.2.1.2 kaj 22.3.5.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

10 Plia malkresko de la membraro de UEA

Estis nia intenco publikigi en tiu ĉi numero koncizan bilancon pri la ĉefaj rezultoj de la nuna reĝimo en UEA en la trijara periodo ekde julio 1974. Montriĝis, ke tio estas malebla, ĉar la Estrara Raporto, kiu antaŭ Hamburgo ĉiam estis publikigata aparte kaj ĝustatempe, sub la nuna gvidantaro aperos nur en la julia/aŭgusta numero de *Esperanto*, kio, interalie, senigas la MA de unu tuta numero de tiu periodaĵo. Krome, ĝis la fino de majo eĉ la *Jarlibro*, nun publikigata sen la *Dua Parto*, ankoraŭ ne aperis. Tamen, en *Esperanto* n-ro 3/77, p. 58, estas publikigita almenaŭ la statistika trarigardo pri la membraro de UEA en 1976. Tio ebligas precizan komparon kun la jaro 1973, la lasta antaŭ la eventoj en Hamburgo.

En 1973 UEA havis entute 33.716 membrojn, en 1976 la nombro estis 31.668; *neta perdo: 2.048 membroj*, malgraŭ la akcepto de 2 pliaj kontraŭneŭtralecaj "kolektivaj membroj" kaj 1 LA.

En 1973 la Asocio havis 7.302 individuajn membrojn, en 1976 la nombro estis 6.018, *Neta perdo: 1.284 individuaj membroj*, do ĉ. unu kvinono. Tiurilate UEA retroiris je plenaj 22 jaroj: ĝi estas la plej malalta nombro de IM ekde 1954, kiam, *dum sia suprenirado*, UEA estis atinginta 6.103 IM, do 85 pli ol en 1976.

En 1973 la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne vicdelegitoj kaj fakdelegitoj) estis 1.294 (*Esperanto* de februaro 1974, p. 39), kio ebligis la elekton de 6 komitatanoj B; en 1976 la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj estis 1.194, kaj la nombro de elekteblaj komitatanoj B estis 5; *neta perdo: precize 100 ĉefdelegitoj kaj delegitoj kaj 1 komitatano B malpli*. Interalie tio signifas, ke nun UEA estas reprezentita per delegitoj en ĉ. 100 lokoj malpli ol en 1973 (ĉirkaŭ, ĉar la nombro de ĉefdelegitoj restis proksimume la sama, tiel ke la malkresko fakte rilatas al la delegitoj). Ne estas surprize, ke la nuna gvidantaro decidis nuligi la rubrikon "Ne plu validas" en la Oficiala Informilo, kiel informas *Esperanto* n-ro 2/77 sur p. 38. Efektive, la listigo de lokoj, en kiuj ne plu estas delegitoj, sendube "okupus tro da spaco". La malaltiĝo de la nombroj de delegitoj ankaŭ signifas, ke en la Komitato de UEA la individua membraro (tra la ĉefdelegitoj kaj delegitoj) estos malpli reprezentita ol antaŭe, kvankam estis necese ebligi pli fortan reprezentiĝon per amendo de la koncernaj reguloj okaze de la revizio de la Statuto. Pri tio mi atentigis longe antaŭ Hamburgo, interalie en la *Aprila Artikolo* de 1974, dum la nuna gvidantaro eksplicite promesis ebligi ĝin per la pompe anoncitaj ŝanĝoj de la Statuto. Fakte, post rifuzo de 4 statutŝanĝaj projektoj de la koncerna komisiono, oni fine prezentis por aprobo la ekzistantan Statuton sen ŝanĝoj.

Oni komparu tiujn ciferojn kaj faktojn kun la superece-blufa aserto en *Esperanto*, n-ro 11/74, p. 183, ke "la hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 ekziĝojn" kaj ke "la samaj eventoj rezultigis ankaŭ almenaŭ 5 realiĝojn".

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 de *Esperanto en Perspektivo*.

11 Iom pri la Estrara raporto de UEA por 1976-77

11.1 Ĝenerale

Kiel en la pasintaj jaroj ekde Hamburgo, la Raporto estas pli grava pro tio, kion ĝi prisilentas aŭ misprezentas, ol pro la informoj pri la agado de UEA en 1976-77. Kvankam pri tio oni povus skribi analizan

artikolon multe pli ampleksan ol estas la Raporto, tamen ni limigos nin nur al kelkaj ĝiaj aspektoj.

La Raporto estas denove publikigita en la revuo *Esperanto* (n-ro 6/77, p-oj 105-118) anstataŭ kaj aparte kaj en la *Dua Parto de la Jarlibro*, kiel antaŭ Hamburgo. Tio, kompreneble, "ŝparas al la Asocio plurajn milojn da guldenoj" (p. 105), sed tia "ŝparado" fakte okazas je la kostoj de la MA, senigitaj tiel de preskaŭ tuta numero de la revuo. Estas komplete malĝusta la aserto jam en la unuaj linioj, ke "tio certigas la maksimuman disvastiĝon de la teksto", ĉar antaŭ Hamburgo la Raporto estis publikigata en la *Dua Parto de la Jarlibro*, kiun ricevadis ĉiuj individuaj membroj; krome, ĝin ricevadis ankaŭ ĉiuj kongresanoj kiuj ne estis IM de UEA.

Ne plu estas publikigata la *Dua Parto de la Jarlibro*, kiu siatempe enhavis kaj la Estraran Raporton – fakte ampleksan laŭ la nombro de paĝoj pro la amplekso de la multflankaj agadoj kaj atingoj de la Asocio, sed koncizegan en la prezento de faktoj – kaj multajn aliajn informojn, tre utilajn por ĉiu membro kaj esence gravajn por la aktivuloj. La du partoj de la *Jarlibro*, ekzemple por 1973, havis entute 720 paĝojn, tio estas ĉ. duoblon de la *Jarlibro* por 1976 kun 384 p. (nur 352 p. en 1977). Tio "ŝparas" pliajn "milojn da guldenoj" (minimume 15.000) je la kostoj de ĉiuj IM kaj, eĉ pli grave, kontraŭ la interesoj de Esperanto. Tiaspecaj "ŝparoj", aldone al la ĉesigo de tuta aro da agadoj, kiujn UEA devus plenumi por realigadi la celojn laŭ sia Statuto, kaj kiujn ĝi fakte plenumadis ĝis Hamburgo, estas la vera kaŭzo de la pozitiva saldo en la financa raporto. Se pro malkapablo aŭ pro kiu ajn alia kaŭzo oni faras absolute nenion por realigi almenaŭ tiujn erojn de la Tria Baza Laborprogramo, kiuj estas realigeblaj, aŭ la planon por la Kontraŭrasisma Jardeko – tiuj dokumentoj eĉ ne estas menciitaj en la Raporto – tiam, evidente, oni ne povas ne "ŝpari", sed kun tiaspecaj "ŝparadoj" la Asocio povus tute bone ankaŭ ne ekzisti.

En la Enkonduko oni asertas, ke la Raporto estas verkita "en konciza, interesa kaj legebla formo" por "lasi lokon ne nur por ilustraĵoj (*sic!*), sed ankaŭ por 7 'normalaj' revupaĝoj". Fakte, ĝi estas ege "konciza" rilate aferojn, pri kiuj la Estraro devus doni malagrablajn eksplikojn, sed ĝi estas tre malkonciza kaj malpreciza, plena de jam diritaj kaj senlace ripetataj promesoj "por la estonteco", komisionoj kaj komisiitoj, bombastaj laŭdoj ktp., kun treege malmulte da rezultoj.

11.2 Tro ampleksa

Tipa ekzemplo estas la ĉapitro pri informado. Ĝi okupas pli ol unu tutan paĝon de la revuo, sed enhavas *praktike nenion pri la agado de UEA*

sur tiu gravega kampo. Oni tie povas legi pri la "efika laboro de la Pola Radio"; pri s-ro L. Pickel kaj Pilo-Press; pri artikolo publikigita en la ĉeĥoslovaka *Rude Pravo*; pri la tre utila verko en la germana de R. Schulz *Mein Geliebtes Esperanto* (dediĉita, cetere, al la red. de tiu ĉi rubriko, kio, verŝajne pro koncizeco (!), estas ellasita el la Raporto); pri kelkaj intervjuoj en televido kaj radio; pri la fakto, ke du (fakte multe pli ol du) revuoj de LA "aperigas parton de sia enhavo en la nacia lingvo, kio ludas gravan informan rolon" (fakte nenian, ĉar ilin legas la membroj, kiujn, espereble, oni ne devas konvinkadi, ke Esperanto funkcias – aŭ, eble, tamen necesas tio!); pri intervjuo kun D-ro Isaev, publikigita en la periodaĵo *Soveta Unio* (bombaste: "unu el la plej bonaj informaj paŝoj faritaj en la ĝisnuna historio de la E-Movado"!), ktp. pri la laboro ne de UEA (art. 30 de la Statuto), sed de aliaj, eĉ de tute privataj personoj.

Kelkajn vortojn meritas la detala informo (koncizeco!) pri la felietono de Spomenka Štimec "Internacia Lingvo kial kaj kiel?", publikigita en 5 sinsekvaj numeroj de *Vjesnik*, "la ĉefjurnalo de Kroatio, Jugoslavio", kio, laŭ la Raporto, "estas unu el la plej sukcesaj priesperantaj informaj paŝoj faritaj en Jugoslavio". Fakte, la felietono estas preskaŭ plene bazita sur *Esperanto en Perspektivo (EeP)* kaj pluraj aliaj miaj verkoj. Eĉ pli, tutaj partoj, komencante per la unua frazo, estas laŭvortaj tradukoj – sufiĉe adekvataj – el tiuj verkoj. Tamen, laŭ la nuna kutimo en la sino de UEA plagiati aŭ prisilentadi (v. pri tio en *Horizonto* n-ro 5/76, p-oj 113-115), bedaŭrinde ankaŭ S. Štimec nek petis de mi permeson, nek indikis la fontojn, nek menciis mian nomon en kazo de laŭvortaj tradukoj. En la partoj, kiujn ŝi ne plagiatis, sed kunmetis blinde fidante al iuj "dokumentoj de UEA", ŝi tuj faris preskaŭ nekredoblajn erarojn. Ekzemple, ŝi skribis en *Vjesnik* de 04.02.77: "El la dokumentaro de UEA sekvas, ke grupo da ekspertoj ĉe la Sekretariato de UN blokis la peticion kaj tiele ĝi neniel atingis UN" (*tradukita el la kroata, substrekita de IL*) kaj ŝi apogas sian aserton per ia naiva rakonteto pri kvazaŭaj diroj de U Thant en iu privata konversacio, kvankam tuj en la antaŭa alineo ŝi korekte prezentis kaj la sencon de la Propono kaj ĝian oficialan transdonon al la Sekretariato de UN, ĉio laŭ ĉap. 22.4.2 de *EeP*, precipe p-oj 780-783. Superflue diri, ke eĉ en tiu kunteksto mia nomo tute ne estas menciita, kvankam ĝi estas nedisigeble ligita al la mondskalaj agadoj ĉe Unesko kaj UN (v. ĉap. 22.3 kaj 22.4 de *EeP*). Kun la escepto de tiu kaj kelkaj aliaj eraroj, la artikoloj en *Vjesnik* ja estas "unu el la plej sukcesaj informaj paŝoj faritaj en Jugoslavio" (en la lasta tempo, kompreneble), sed tio certe ne estas merito de la informa fako de UEA.

El tiu tuta ĉapitro sekvas, ke la sola konkreta rezulto de unujara "laboro" en tiu agadbranĉo estis la eldono en 4.000 ekz. de "la plej konata

CED-dokumento *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo* de Prof. I. Lapenna" en nederlanda traduko, tiel ke "entute ĝi aperis ĝis nun en 17 eldonoj en 13 lingvoj". Mirakle, ĉi-foje la nomo de la aŭtoro estas menciita, sed ne estas dirite, ke temas pri la ĝishamburga CED, kiu, escepte de la nomo, havas nenion komunan kun la nuna CED.

Evidente, nek la ĝenerala sekretario, laŭstatute ŝarĝita pri informado, nek kiu ajn el la 8 membroj de la Komisiono pri Informado, nek kiu ajn estrarano verkis kian ajn dokumenton aŭ artikolon en la sfero de informado. Same tiel, kontraŭe al la preskribo de art. 30 de la Statuto, komplete forestas kia ajn plano de laboro.

Simile en aliaj partoj de tiu raporto pri malkonstruado, en kiu abundas senenhavaj vortoj, malĝustaĵoj kaj blufoj. Nur unu plia ekzemplo. En la longa ĉapitro pri la junulara sekcio, plene politikiginta jam antaŭ Hamburgo (ankaŭ en 1976 ĝi estis reprezentita en konferencoj kun nete partipolitikaj propagandaj programoj), troviĝas fantaziaj informoj pri la membronombro de TEJO en 1976. Tie estas dirite, ke TEJO havas 28 landajn sekciojn, sed ĝi donas informojn pri la membrostato nur en 14 landoj. La raportita nombro de "membroj" estas evidente arbitra, tute laŭ la bontrovo de la "raportinto", certe ne surbaze de vera membreco kun pagitaj kotizoj, interalie: Bulgario 2.200 (900). Hungario 1.040 (60), Italio 300 (20), Jugoslavio 3.000 (1 500) Pollando 1.300 (700)... Oni notas la belajn rondajn ciferojn ekster krampoj kaj en krampoj, kiuj lastaj "indikas la membrojn pli ol 25-jarajn", kvankam laŭ la Statuto de TEJO (se hazarde ĝi ankoraŭ havas ian ajn valoron) nur funkciuloj de TEJO kaj de ĝiaj sekcioj povas esti pli ol 25-jaraj (art. 10/2). Kvankam ne vidiĝas klare el tiu brila Estrara Raporto, kiu "respegulas /korekte: spegulas/ la agadon de la Asocio" (p. 105), ĉu la nombro en krampoj devas esti aldonita al la nombro sen krampoj, aŭ ĝi estas parto de la senkrampa nombro de membroj, tamen la publikigitaj ciferoj indikas, se ili estus ĝustaj, ke TEJO kaj ĝiaj sekcioj havas pli ol 2.300 funkciulojn aldone al miloj da membroj (en rondaj ciferoj!), ne kalkulante la 14 landajn sekciojn (!), el kiuj ne venis raportoj! Malgraŭ tiuj "miloj" da membroj, *Kontakto* aperas kun grandegaj prokrastoj (ankoraŭ eĉ ne unu numero por 1977), kaj la nombro de individuaj membroj de TEJO en UEA estas precize 274 (la sola realeca informo), t.e. pli ol unu kvaronon malpli (precize 26,35 % malpli) ol en 1973, la lasta jaro antaŭ Hamburgo. Evidente, la politikigo de TEJO, la konata rolo de ĝiaj tiamaj gvidantoj en la hamburgaj eventoj (vi ĉap. 4 de *Hamburgo en Retrospektivo*) kaj ĝia nuna "ligiĝo al politika realaĵo" neniel helpis al la t.n. junulara sekcio de UEA, same kiel ĝi ne helpis al UEA mem.

11.3 Tro koncize aŭ nenio

Aliflanke, la Raporto estas aŭ tro konciza aŭ diras nenion koncerne tutan aron da aferoj, pri kiuj la membroj devus esti informitaj. Jen kelkaj ekzemploj:

La Raporto informas, ke la Komitato malŝarĝis la Komisionon pri la Statuto kaj komisiis la Estraron ellabori novan projekton, sed diras absolute nenion pri la kaŭzoj de tiu malŝarĝo, nek klarigas kial en tri plenaj jaroj la Komisiono ne sukcesis prezenti projekton akcepteblan almenaŭ kiel bazon por diskuto. La Raporto ankaŭ ne informas, ĉu antaŭ la 26-a de aprilo 1976, konforme al art. 1 de la Statuto, la Estraro petis reaprobon de la neamendita Statuto kaj, se jes, ĉu la nederlandaj aŭtoritatoj reaprobis ĝin; alivorte, ĉu UEA plu estas rekonita kiel jura persono laŭ la nederlanda juro, kio estas gravega en kazo de heredaĵoj, donacoj, apero kiel partio en kortumoj kaj el prestiĝa vidpunkto entute. La Raporto informas pri la nombro de geoficistoj, sed diras nenion pri la bombaste anoncita ŝanĝo de la direktoro – plia "nova etapo en la evoluo de UEA" kun grandaj fotoj de la du direktoroj (*Esperanto* n-ro 2/77, p-oj 22-23) – sed klarigas eĉ ne per 2-3 vortoj kial tiu "nova etapo" ne komenciĝis. Ĝi informas pri la nombro de individuaj membroj (6 018), sed prisilentas la fakton, ke en 1973 la nombro estis 7 302, nome ke en tri jaroj UEA perdis precize 1 284 individuajn membrojn aŭ preskaŭ kvinonon de sia tuta individua membraro. Ĝi raportas pri la nombro de ĉiuj membroj (31 747 aŭ, laŭ *Esperanto* n-ro 2/77, 31 668) kaj pri la nombro de ĉiuj ĉefdelegitoj kaj delegitoj (1 194), sed prisilentas la fakton, ke en 1973 la nombro de membroj estis 33 716 (perdo de ĉ. 2 000) kaj tiu de ĉefdelegitoj 1 294 (perdo precize 100). Tial, kompreneble, la Estraro eĉ ne provis ekspliki la kaŭzojn de tiuj grandaj perdoj. La Raporto informas, ke f-ino M. Vermaas anoncis sian definitivitan retiriĝon el la funkcio de administranto de Instituto Hodler '68, sed ne sciigas kion ajn pri la kialoj, nek per unu sola vorto dankas al ŝi kiel iniciatinto de la Instituto kaj ĝia multjara administranto. Espereble f-ino Vermaas mem iam klarigos tion. La Raporto informas pri la UK en Ateno, sed prisilentas la gravajn politikajn incidentojn kontraŭ la gastigantan landon, kiujn provokis komitatano U. Moritz, unu el la ĉefaj komplotintoj en Hamburgo. La Raporto asertas, ke "ne ekzistas kaŭzoj por plendoj kontraŭ iu ajn el la Statutoj" /de LA/, sed prisilentas la fakton, ke almenaŭ du el la statutoj kaj programoj estis politike malneŭtralaj, sed ke ili estis formale ŝarĝitaj sub la premo de malkovroj en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en *Horizonto*, kio neniel signifas, ke la koncernaj "kolektivaj membroj" ĉesigis siajn

partipolitikajn aktivadojn. La Raporto diras absolute nenion pri la streĉitecoj inter la Estraro de UEA kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiujn kaŭzis la longjaraj obstinaj misprezentoj de la estrarano pri financo rilate la kontojn de la UK en Beograd, kaj la vere gravaj kalumnioj kontraŭ Prof. B. Popović kaj Prof. M. Šaponjić. La financa raporto estas tiel manka, ke oni povos adekvate analizi ĝin nur post eventuala havigo de la necesaj detaloj pri pluraj decidaj eroj.

Oni nur povas demandi sin kiom longe la membraro toleros tiaspecajn raportojn pri mallaboro kaj laŭgrada malkonstruado de la antaŭhamburga UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5 de *Esperanto en Perspektivo*.

12 Prof. B. Popović eksigis el komitaneco de UEA

Sub la titolo "HAZARDE" RIPETITA EVENTO NE PLU ESTAS HAZARDO Prof. D-ro B. Popović publikigis en n-ro 46 de *Bulteno ISAE* de 20.06.1977 artikolon, en kiu li prezentas la kaŭzojn, kiuj fine devigis lin eksigi el la komitaneco de UEA kaj ĉesigi kian ajn aktivadon en tiu Asocio. Prof. Popović estis dumviva membro de UEA ekde 1955, komitatano de UEA ekde 1957, kaj plu estas prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (ekde 1968) kaj prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ekde 1971), samtempe eldonanto de *Scienca Revuo* (ekde 1962). Dum kelka tempo antaŭ Hamburgo li estis ankaŭ vicprezidanto de UEA.

En tiu longa dokumento de 4 dense presitaj paĝoj Prof. Popović detale prezentas la tutan aferon, kiu komenciĝis jam fine de 1973 kaj kiun mi povis plej atente sekvi ĝis mia propra eksigo el ĉiuj funkcioj en UEA en julio 1974, poste ankaŭ el membreco de la Asocio. Konante bone la faktojn, mi povas publike aserti, ke Prof. Popović prezentas ilin objektive. Mi nur iom bedaŭras, ke li ne menciis mian plej firman defendon de liaj integreco kaj honesteco en la periodo sub mia prezidanteco, tute speciale dum la kunsido de la Estraro en printempo de 1974 kaj dum la kunsidoj de la Komitato en Hamburgo. En la fino de la dokumento Prof. Popović esprimis la esperon, ke la revuo *Esperanto* publikigos tiun lian "adiaŭan deklaron", sed, kompreneble, en la nunaj kondiĉoj de absoluta cenzurado de la vero tiu lia espero ne realiĝis, nek havas ŝancon realiĝi. Ni povas nur rekomendi al ĉiu sincera esperantisto havigi de Prof. Popović la koncernan dokumenton por sciigi pri tiu plia skandalo en la sino de UEA, pri ĉiuj humiligoj kaj kalumnioj, kiujn li

devis suferi kaj pro kiuj eĉ "unu jaron kaj duonon post Hamburgo" li devis "enkorpiĝi korstimulilojn por reakiri la viv- kaj laborkapablon".

Pro la longeco de la dokumento, estas eble represi ĉi tie nur jenan parteton:

"Per prisilento kaŝi la veron, ŝajnigi unuecon, ĉion pro 'superaj celoj' – estis neniam bona politiko. Kun tia gvidantaro de UEA mi deziras havi nenion komunan. Pro tio mi, kiel la unua paŝo, ne plu estas kandidato de ISAE por la Komitato de UEA. Paŝon post paŝo mi liberiĝos ankaŭ de aliaj postenoj ligitaj kun rekonno de tia Estraro de UEA. Se mi ne povas pruvi ke mi estas honesta homo, se iu povas senpune en sino de UEA makuli alies honestecon, se krome la UEA-parto de la Movado fariĝis tiel malsana, ke oni toleras tiajn priklaĉojn, mia loko ne estas tie. Mi klopodos almenaŭ reakiri mian kvietecon, forĵeti la superfluan ŝarĝon kaj porti nur la ŝarĝon neniel ligitan kun UEA. Mi lasos al la hundoj ke ili boju, sed en sia (ne mia) korto."

Ankoraŭfoje oni povas demandi sin kiom longe la esperantistaro en UEA toleros tiajn aferojn.

13 La rilatoj UEA-UNESKO aŭ plia falsado de historiaj faktoj

13.1 Unesko en Reykjavik

La revuo *Esperanto* kaj aliaj Esperanto-periodaĵoj abunde informis, ke s-ro Amadau-Mahtar M'Bow, la nuna Ĝenerala Direktoro de Unesko, ĉeestis la Inaŭguron de la Universala Kongreso en Reykjavik kaj faris tie paroladon en la franca lingvo. La tuta parolado aperis en Esperanto-traduko sur p-oj 144-147 de la organo de UEA (septembro 1977). Necesas atentigi, ke s-ro Amadau-Mahtar M'Bow ne veturis al Reykjavik speciale por partopreni la Kongreson, sed, kiel li mem diris enkonduke, utiligis la okazon de sia oficiala vizito al Islando por alparoli la kongresanojn. Tio per si mem malgravigas la "historian" signifon, kiun la organo de UEA klopodas doni al la parolado per pli ol bombastaj vortoj kaj per komentoj falsantaj historiajn faktojn. La tuta troblovita afero eĉ pli malgraviĝas, se oni konsideras la nunan karakteron de Unesko, tre malproksiman de la originalaj celoj kaj de la iama prestiĝo, kaj la enhavon de la parolado mem, multrilate ege kontestindan kaj el vidpunkto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj el tiu de la Esperanto-Movado, pri kio eble alian fojon. La ĉeesto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko en universala kongreso de Esperanto ja estus grava okazaĵo, kvankam certe

ne ia "epokfara evento", se Unesko plu estus tio kio ĝi devus esti laŭ sia Konstitucio kaj kio ĝi grandparte fakte estis ĝis la fino de la sesdekaj jaroj, kiam komenciĝis ĝia degenerado.

13.2 Dekadenco de Unesko

Por ke ne okazu kia ajn miskompreno aŭ nova misprezento, utilas memori, ke jam en la decembra numero de *Esperanto* 1970, do precize antaŭ 7 jaroj kaj longe antaŭ la hamburgaj eventoj, mi publikigis artikolon sub la titolo "Kien Iras Unesko?", en kiu estis kritike analizitaj la burokratiĝo, neefikeco, neplenumado de la originala tasko kaj aliaj mankoj en la laboro de Unesko (p. 183). En tiu tempo UEA, kune kun pluraj aliaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) en konsultaj rilatoj kun Unesko, ne kliniĝis servile antaŭ la negativaĵoj en la agadoj de tiu organizaĵo, sed prepostulis ĝian revenon al la originalaj celoj en la sferoj de edukado, scienco kaj kulturo. La artikolo finiĝis per jenaj vortoj:

"Unu afero estas certa: Unesko ne estas tio, kio ĝi devus esti, nek ĝi ludas tiun rolon sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo, kiun ĝiaj iniciatintoj volis doni al ĝi. Nur radikala reformo ne tiom en la strukturo, kiom en la metodoj de laboro, povas reestabli la prestiĝon, kiun ĝi ĝuis en la unuaj jaroj post la fondiĝo."

Tio estis skribita fine de 1970. Malgraŭ la korekta starpunkto de la demokrataj NRO-j kaj la premoj fare de la demokrata publika opinio ĝenerale, Unesko plu politikigadis kaj dekadencis. Tio serioze maltrankviligis plurajn reprezentantojn de NRO-j, kiuj pripensis eĉ la ĉesigon de la konsultaj rilatoj, se la politikiga-dekadenca procezo de Unesko ne estos haltigita. Mi mem, en tiu tempo ŝarĝita pri la eksteraj rilatoj de UEA, kaj s-ro Jean Thierry, tiutempe reprezentanto de UEA ĉe la Sekretariato de Unesko en Parizo (multe helpata ankaŭ de s-ro André Bourdeaux), opiniis, ke necesas atendi ankoraŭ kelkan tempon, precipe la 18-an sesion de la Ĝenerala Konferenco fine de 1974, antaŭ ol fari konkretajn proponojn al la Komitato de UEA pri pliaj premoj por konsciigi Unesko-n pri ĝiaj veraj celoj, aŭ eĉ pri la ĉesigo de la rilatoj, se tiuj klopodoj restus senrezultaj.

La grava 18-a sesio de la Ĝenerala Konferenco okazis en Parizo fine de 1974, do post la julia hamburga puĉo. UEA sub la nova gvidantaro tute ne estis reprezentita, nek intervenis en kiu ajn senco. S-ro Amadau-Mahtar M'Bow fariĝis la nova Ĝenerala Direktoro. Kun la evidenta celo provi reakiri la perditajn simpatiojn kaj la iaman apogon de multaj NRO-j al Unesko, jam la 30-an de decembra 1974, do tuj post sia enoficiĝo, li dissendis al ĉiuj NRO-j en konsultaj rilatoj flatan cirkuleran leteron, en

kiu, interalie, li informis pri *"la granda graveco, kiun li donas al la konservo kaj plifortigo de iliaj rilatoj kun Unesko"* (Ref. de Unesko DG/7/12/A.311 de la 30-a de decembro 1974). La samon li ripetis en mesaĝoj al internaciaj renkontiĝoj de unuopaj NRO-j, interalie al la Universala Kongreso de Esperanto en Ateno. La organo de UEA misprezentis tiun rutinan mesaĝon kiel ian unikan okazaĵon, kvankam ekde 1954, kiam establiĝis la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko, la Sekretariato regule sendadis siajn mesaĝojn al la UK, kaj en 1953 ĝi eĉ estis reprezentita de oficiala observanto dum la tuta UK en Zagreb (ĉap. 22.3.3 de *Esperanto en Perspektivo*). *Esperanto* de septembro 1976 publikigis la tutan mesaĝon ruĝe enkadrigitan sub diklitera titolo (p. 138), kaj en la oktobra numero de 1977 ĝi skribis: "Tiu mesaĝo enhavis gravan frazon ĝuste pri la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj UEA: *'Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plue plifortiĝos en la venontaj jaroj'*". Kiel oni vidas, tiu "grava frazo", kvazaŭe "ĝuste pri la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko", estas nenio alia ol rutina frazo transkribita preskaŭ laŭvorte el la menciita cirkulero DG/7/12/A.311 adresita al ĉiuj NRO-j. Doni al tia ordinara mesaĝo karakteron de ia senprecedence grava, sensacia evento signifus profundan humiligon ne nur de UEA, sed de la tuta Esperanto-Movado, eĉ se Unesko ne estus perdinta sian iaman reputacion.

Dum la oficado de la nuna Ĝenerala Direktoro, Unesko faris tutan aron da novaj mispaŝoj, kiuj eĉ pli kompromitis ĝin. En 1974 la plimulto en la Ĝenerala Konferenco voĉdonis kontraŭ la partopreno de Israelo en la Eŭropa Grupo de Unesko, al kiu, cetere, apartenas ankaŭ Usono kaj Kanado. Tio, kiel ankaŭ pluraj aliaj nete politikaj rezolucioj de Unesko, interalie ankaŭ kontraŭ Israelo (ekzemple pri la arkeologiaj elfosaĵoj en Jerusalemo, rilatigo de cionismo al rasismo, k.a.), tute kontraŭaj al la nepolitikaj celoj de Unesko, kaŭzis grandajn tensiojn en Unesko mem kaj profundan ŝokiĝon en la kulturaj medioj de la mondo. Unu el la rezultoj estis, ke Usono tuj haltigis sian financan kontribuon, kiu estas konsiderinde pli alta, ol tiu de kiu ajn alia Ŝtato-Membro (fakte ĉ. kvarono de la tuta buĝeto de Unesko), kaj sen kiu Unesko tutsimple ne povas funkcii. Nur dum la 19-a sesio de la Ĝenerala Konferenco en Nairobi (fine de 1976), kie minacis kompleta kolapso de Unesko ne sole pro ĝia morala kompromitiĝo, sed eble eĉ pli pro la mankantaj 33 milionoj da dolaroj, kiujn Usono ankoraŭ ŝuldis por 1975-76 pro la haltigo de siaj kontribuoj, la t.n. Tria Mondo turnis sian dorson al la soveta bloko kaj Israelo estis allasita en la Eŭropan Grupon. Tiu renversa decido, motivita ĉefe de ekonomiaj bezonoj, estis nur reago je la antaŭaj politikaj decidoj, kio aldonis plian ĉeneron al la longa kaj sufoka ĉeno de politikaj rezolucioj kaj agadoj.

Alia skandalo, rekte tuŝanta ankaŭ la Esperanto-Movadon, rilatis al rezolucio, proponita de la soveta bloko, pri la rimedoj de amasa komunikado. Inter aliaj reakciaj eroj, ĝi enhavis ankaŭ la nun jam misfaman paragrafon 12, laŭ kiu "la ŝtatoj estas respondecaj pri la aktivadoj en internacia sfero de ĉiuj rimedoj de amasa komunikado sub ilia jurisdikcio". La rezolucio celis atingi la aprobon de Unesko al ŝtata kontrolado kaj direktado de la gazetaro kaj de aliaj rimedoj de amasa komunikado, alivorte la plenan transformon de Unesko el laŭkonstitucia monda ĉampiono de homaj rajtoj en mondan subpremanton de la preslibereco kaj de aliaj fundamentaj liberecoj laŭ la Universala Deklaracio. Dum la pariza sesio de la Ĝenerala Konferenco (fine de 1974) 41 ŝtatoj apartenantaj al la soveta bloko kaj al la Tria Mondo sukcesis enmeti la proponitan rezolucion en la tagordon de la 19-a sesio en Nairobi (fine de 1976), kio – senprecedence en la historio de Unesko – devigis la reprezentantojn de la okcidentaj demokratioj forlasi la konferencejon, kaj kio estis plia motivo por Usono haltigi siajn kontribuojn. En Nairobi la diskuto reekflamis. La projekto estis forte kritikata dum pluraj tagoj. La usona delegito nomis la presliberecon "gardisto kontraŭ tiranecon", dum la aŭstria delegacio deklaris, ke ĝi kontraŭstaras ĉiujn provojn "direktitajn kontraŭ la liberecon peti, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn de kiu ajn speco senkonsidere al la landlimoj". Sub tiuj premoj kaj, eble eĉ pli, por rehavigi la esencan usonan financon kontribuon kaj por eviti la verŝajnan disfalon de Unesko, la Ĝenerala Konferenco fine decidis per granda plimulto de 78 voĉoj kontraŭ 15 resendi la projekton al speciala komitato por plua traktado kaj revizio. Nur la landoj de la soveta bloko kaj kelkaj disidentaj ŝtatoj en Afriko voĉdonis kontraŭ la plua traktado, sed ĉi-foje malsukcesis.

Tiel, do, prezentiĝas la nuntempa Unesko: disŝirata de internaj politikaj luktoj, neglektanta siajn verajn celojn kaj tial daŭre sur la rando de abismo.

Estas menciinde, ke en sia parolado en Reykjavik la Ĝenerala Direktoro interalie diris:

"Unesko nek havas, nek povas havi specifan politikon pri komunikado, kiun ĝi trudus al la Ŝtatoj-Membroj je nacia nivelo. Tiuj elektas la vojon, kiu ŝajnas plej konforma al la propraj aspirioj" (*Esperanto*, n-ro 9/77, p. 145).

Oni facile rimarkos, ke tiu aserto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko troviĝas sur la linio de la malakceptebla kaj forĵetita paragrafo 12 de la menciita rezolucio, sed efektive ĝi estas nete kontraŭa al art. 19 de la Universala Deklaracio, al la koncernaj preskriboj de la du internaciaj paktoj pri la homaj rajtoj kaj al nombro da internaciaj konvencioj sur

tiu kampo, tial ankaŭ al la originalaj celoj kaj idealoj difinitaj en la Konstitucio kaj Baza Programo de Unesko, inter kiuj elstaran lokon okupas la respekto kaj respektigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, inkluzive "la rajton peti, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo senkonsidere al la landlimoj" (Art. 19 de la Universala Deklaracio).

La supraj linioj devus esti skribitaj ne de la redaktoro de tiu ĉi rubriko, sed de la estrarano pri la eksteraj rilatoj aŭ de iu alia en la nuna gvidantaro de UEA; kaj tiu teksto devus esti publikigita en *Esperanto*, ne en *Horizonto*. Sed kiom da personoj en la nuna gvidantaro de UEA fakte scias kio estas Unesko hodiaŭ? Kaj se iu hazarde scias kaj volus objektivite prezenti la situacion, kiu hodiaŭ permesus al li aŭ ŝi fari tion en la organo de UEA?!

13.3 Falsado de historiaj faktoj

Sub la titolo "De Konsultado al Kunlaboro" la oktobra *Esperanto* bombaste (kiel kutime) asertas, ke la rilatoj inter UEA kaj Unesko "spertas ne nur simplan revigliĝon, sed veran renaskiĝon"; ke "tiu konata formulo – '(en konsultaj rilatoj kun Unesko)' – komencas liberiĝi de siaj krampoj kaj transiri el la leterkapoj en la agadprogramojn, ĉi-foje ne sole de UEA, sed ankaŭ en tiujn de Unesko"; ke "efektive ne plu temas nur pri konsultaj rilatoj"; ke, fine, "tiuj rilatoj ne plu estas nur konsultaj, ili jam fariĝis kunlaboraj" (p-oj 161-162).

Eĉ senkonsidere al la nuna karaktero de la politikiginta Unesko – do, supozante por momento, ke ĝi plu agas strikte laŭ siaj originalaj celoj – tiuj asertoj estas malveraj kaj grave misgvidaj. Jam la titolo implicas, ke kvazaŭe UEA nun transiris de iu kvazaŭe pala, parenteza "konsulta rilato" al iu kvazaŭe nova, dinamisma kategorio de kunlaboro. Kaj kio pravigas tiujn jubile anoncitajn kvazaŭajn "ŝanĝojn"? (kiom da kvazaŭoj jam?): publikigo de broŝuro de Unesko, por kies esperantlingva eldono ĝi kontribuos 2000 guldenojn, kaj eventuale publikigo de Esperanta versio de informilo pri Unesko. Tio estas ĉio, se oni esceptas la distribuon de la parolado de la Ĝenerala Direktoro en la franca, kion la Sekretariato rutine faras kun ĉiuj paroladoj de la Ĝeneralaj Direktoroj en la lastaj jaroj.

La titolo de la artikolo estas per si mem granda sensencaĵo, ĉar ĝuste la konsultaj rilatoj, havigitaj jam en 1954 kaj poste transformitaj en la prestiĝan kategorion B – ĉio sen kia ajn merito de kiu ajn en la posthamburga gvidantaro de UEA – signifas *kunlaboradon* konforme al la koncernaj Direktivoj. Diference de la aliaj NRO-j, en la kazo de UEA tiujn rilatojn eĉ pli fortikigis la konata Rezolucio de 1954, kiu, inter

la aliaj principe gravaj rekonaj rilatoj la Internacian Lingvon, en p-to IV.1.4.4224 eksplicite "komisiis la Ĝeneralan Direktoron... kunlabori kun *Universala Esperanto-Asocio* en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn" (v. kiun ajn *Jarlibron* de UEA ekde 1955 kaj, pli detale, en ĉap. 22.3.4 kaj 22.3.5 de *EeP*).

La artikolo en *Esperanto* implicas, ke ekde 1954 ĝis la nuna "epokfara" eldono de broŝuro kaj promesita eldono de informilo – absolute nenio okazis en la kadro de la konsultaj rilatoj. La vero, bone konata al ĉiuj, kiuj aktivis aŭ nur sekvis la laboron de UEA inter 1950 kaj 1974, estas facile konstatebla ankaŭ por aliaj el multnombraj artikoloj kaj Estraraj Raportoj por tiu periodo, el tiutempaj dokumentoj de la ĝishamburga CED kaj, tre koncize, el ĉap. 18.5.3 kaj 22 de *Esperanto en Perspektivo* (v. ankaŭ la indekson sub "Unesko"). Ĉi tie estu nur supraĵe menciitaj la ampleksaj oficialaj dokumentoj de Unesko pri Esperanto kaj UEA okaze de la pariza kaj montevidea sesioj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko (1952 kaj 1954), kaj la tre multaj malpli ampleksaj dokumentoj lige kun Esperanto en la daŭro de 20 jaroj; la partopreno de la oficiala observanto de Unesko en la UK de Zagreb (1953) kaj lia raporto al la Sekretariato; Esperanto en la protokoloj de la Ĝenerala Konferenco, de ĝiaj komisionoj kaj de la Plenuma Komitato de Unesko; la Rezolucio de 10.12.54, la konsultaj rilatoj kun Unesko (ekde 1954), la pozicio de "konsultiĝoj" kun UN (ekde 1955); la publika debato en Parizo kun reprezentantoj de Unesko (1952); la Universala Ekspozicio de Esperanto en Montevideo (1954) kaj poste en aliaj lokoj (ĉu la nuna gvidantaro jam sukcesis vendi tiujn valoregajn materialojn, kiel ĝi publike proponis?); la dokumentoj de Unesko pri la projekto "Asociĝintaj Lernejoj" kun rekomendo de Esperanto, senditaj al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj kaj iliaj Unesko Komisionoj (1955 kaj poste); Esperanto-literaturo en *Index Translationum* de Unesko; afiŝoj de UN kaj, aparte, de Unesko en Esperanto je la kostoj de tiuj organizaĵoj (1957); vere grava artikolo pri Zamenhof en *Unesko Courier* (1959); Zamenhof deklarita "granda personeco de la homaro" fare de Unesko (1959) kaj impona Zamenhof-jaro (v. la verkon de CED *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro*, 1960); publikigo en Esperantlingva traduko de la verko *Oriento kaj Okcidento al Reciproka Kompreno?* de G. Fradier kun la financa helpo de Unesko (1962); Jaro de Internacia Kunlaboro (1965); Propono al UN kun multmiliono apogo (1966); Jaro de la Homaj Rajtoj (1968); akcepto de amendo al la Procedura Regularo de NRO-j konforme al la klopodoj de UEA (1971); Internacia Jaro de la Libro (1972); elstare valora literatura Serio *Oriento-Okcidento* en la kadro de la Ĉefprojekto de Unesko pri la Reciproka Apezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj (inter 1961 kaj 1974 aperis 12 volumoj, inter kiuj *La Dia Komedio* de Dante

kaj *La Nobla Korano*; ŝajnas, ke ankaŭ tiu serio estas ĉesigita); vastaj mondskalaj kampanjoj per ĉiuj rimedoj de amaskomunikado lige kun la agadoj de UEA ĉe Unesko, UN kaj aliaj organizaĵoj, aŭ rezulte de la Rezolucio de 1954 kaj la konsultaj rilatoj; projekto de Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko (1974), akceptita de la Komitato en Hamburgo, sed ne realigata de la posthamburga gvidantaro.

La intenca prisilentado de la multnombraj objektivaj atingoj por la Internacia Lingvo en la kadro de la eksteraj rilatoj de UEA dum tiu tuta historia epoko, egalas al falsado de nekontesteblaj faktoj kun la evidenta plurobla celo: (i) senvalorigi la antaŭan grandegan laboron kaj ĝiajn pozitivajn rezultojn; (ii) tiele senkreditigi la antaŭajn respondeculon kaj la aliajn aktivulojn en la sfero de la eksteraj rilatoj de UEA; (iii) tiamaniere doni al la afero ian "epokfaran", sensacian signifon ekster kia ajn proporcio kun la fakta valoro de la broŝuro kaj promesita alia broŝuro; (iv) samtempe maski aŭ forgesigi la ĉiufankajn malsukcesojn kaj retropaŝojn de la posthamburga gvidantaro, kiuj, inter alia, klare speguliĝas en la perdo de preskaŭ unu kvinono de la individua membraro de UEA en nuraj tri jaroj.

Verŝajne per tiaj falsadoj oni provizore atingas la celon ĉe neinformitaj kaj tre naivaj legantoj, sed samtempe oni plu fremdigas de la nuna UEA ĉiujn seriozajn esperantistojn, kiuj ankoraŭ fidas je elementa intelekta honesteco. En ĉiu okazo falsado estas humiliga por UEA kaj tre malutila por la pene atingitaj digno kaj prestiĝo de la Esperanto-Movado.

Oni povas starigi plurajn demandojn, ekzemple: kial la nuna estrarano pri eksteraj rilatoj ne raportas pri tiaj aferoj kaj kial en plenaj tri jaroj kaj duono li neniam publikigis unusolan artikolon pri sia koncepto de la eksteraj rilatoj de UEA; ĉu li aŭ kolektive la tuta Estraro aprobas tiaspecan skribadon de la redakcio, kiu en ĉiu okazo estas respondeca al la Estraro; ĉu en la tuta Komitato de UEA ne troviĝas unusola membro, kiu kuraĝas protesti pro tiaj kaj similaj falsaĵoj, regule publikigitaj en la organo de UEA?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3 de *EeP*.

14 Tradukoj el Esperanto

14.1 Retoriko en la japana

La konata verko de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kies unua eldono estis publikigita en 1950, la dua en 1958 kaj la tria en 1971 (entute 6.500 ekz.), ĵus aperis ankaŭ en la japana, tradukita de s-ro Teruhisa Kojima. La japana eldono konsistas el konciza biografio de la aŭtoro, antaŭparolo

de Prof. G. Waringhien kaj du volumoj. Sub la titolo "Elokventeco de la Morgaŭo" la Unua Volumo enhavas ne nur la tradukon de la Unua Parto de *Retoriko* ("Lingvo"), sed ankaŭ ekstraktojn el ĉ. 22.4 de *Esperanto en Perspektivo* ("Propono al Unuiĝintaj Nacioj") kaj el aliaj ĉapitroj de tiu verko. La Dua Volumo – titolita "Retoriko" – konsistas komplete el la traduko de la Dua Parto de la originalo. La du volumoj estas bele presitaj kaj fortike binditaj. Samtempe estas eldonita japanlingva reklamafiŝo sur glacea papero kun reprodukto de la foto pri la transdono de la Propono al Unuiĝintaj Nacioj la 6-an de oktobro 1966.

En la lastaj informoj, s-ro Teruhisa Kojima nun traktas kun la granda kompanio *Book Sale Co.* pri la distribuo de la verko. Se la traktado sukcesos, la japana eldono estos vendata en ĉiuj iom gravaj japanaj librovendejoj.

14.2 Parto de *EeP* en la japana

S-ro Koiĉi Joŝimiĉi tradukis ĉap. 4.6.1 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 83-93) en la japanan kaj publikigis la tradukon en la marta numero (1977) de la *Bulteno de Kanazava Nisui Altlernejo*. Pro la bedaŭrinda stato de ĉiaspecaj plagiatoj kaj intelektaj ŝteloj en la nuntempa Esperanto-Movado (v., ekzemple, en *Horizonto* 5/76 p-oj 113-115; en 11.1 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* 6/77, estas plezuro rimarkigi, ke s-ro Koiĉi Joŝimiĉi ne nur petis kaj ricevis permeson por la traduko, sed ankaŭ korekte menciis la originalan fonton.

D-ro T. Carlevaro povos taŭge kompletigi sian ĉap. 7.4.1 de *EeP* per tiu ĉi ero.

15 Persekutoj

15.1 Jurij Belov

Horizonto informis en n-ro 5/77 (p-oj 100 kaj 102), ke la Tria Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado intervenis favore al liberigo de esperantisto Jurij Belov, unue kontraŭkonstitucie arestita kaj kondamnita kiel mense sana persono pro "kontraŭsoveta" kritiko, kaj poste kontraŭleĝe tenata en mensa hospitalo. La Konferenco sendis leteron al la Internacia Centro de Amnestio Internacia en Londono kun firma apogo al ĝia agado por la liberigo de Belov, kaj telegramon al la Prezidento de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, s-ro L. K. Breĵnev, informante lin pri la apogo de la Konferenco al Amnestio Internacia en tiu ĉi afero. La Konferenco sendis detalajn telegramojn ankaŭ al UEA kaj

SAT proponante al ili entrepreni similajn paŝojn. Poste Prof. I. Lapenna, kiu ankaŭ ekster la kazo de J. Belov helpis kaj plu helpas al Amnestio Internacia per juraj konsiloj, intervenis ĉe ĝia Internacia Centro en Londono. Unuopaj partoprenintoj de la Konferenco kaj aliaj apogantoj de la humaneca esperantismo siavice intervenis en Vieno, Kopenhago, kaj en aliaj lokoj ĉe la regionaj oficejoj de Amnestio Internacia.

En la organo de UEA aperis nenio pri tiu tuta afero, nek estas konate ĉu tiu organizaĵo entreprenis kiun ajn paŝon. Male, laŭ *Sennaciulo* de novembro 1977 (frontpaĝo), SAT ekagis kaj, same tiel, pluraj ĝiaj membroj. En aŭtuno 1977 D-ro Tazio Carlevaro sendis cirkuleran leteron al esperantistoj kaj Esperanto-amikoj en Svislando instigante ilin sendi leterojn al Ministro pri Sano de USSR favore al liberigo de Belov. Bazante sin sur informo de la pariza *Le Monde* de 22.12.77, *Sennaciulo* de februaro 1978 publikigis sufiĉe longan artikolon sub la titolo "Juri Belov liberigita" kaj trafan komenton sub la titolo "For la persekutojn!" en la rubriko *Ĉies opinioj*. Nek *Sennaciulo* en la du menciitaj numeroj, nek D-ro Carlevaro diris unusolan vorton, ke la tuta agado favore al liberigo de J. Belov estis iniciatita kaj forte apogita de la Tria Konferenco de NEM kaj de ĝiaj unuopaj partoprenintoj. Tia prisilento, precipe en tia humaneca afero, estas profunde bedaŭrinda.

La redaktoro de tiu ĉi rubriko posedas kompletan, ampleksan dosieron pri la kazo de J. Belov. En la sekvanta numero de *Internacia Jura Revuo* aperos jura analizo de tiu kazo, bazita sur sendube establitaj faktoj. El tiu dokumentaro sekvas, ke Belov certe estis esperantisto kaj estis en kontakto kun alilandaj esperantistoj. Tamen, ne estas tute certe ĉu J. Belov fakte estas liberigita. Laŭ la ĵus ricevita sciigo de la Internacia Centro (fine de februaro), Amnestio Internacia ankoraŭ atendas firman konfirmon pri tiu novaĵo.

Superflue diri, ke la Manifesto 77 de la Esperanto-Movado – Por Paco en Libereco, Por Libereco en Paco – estas principa apogo al la humaneca laboro de Amnestio Internacia, inkluzive ĝiajn klopodojn liberigi J. Belov el mensa hospitalo.

15.2 Konfiskoj

SAT-Amikaro de oktobro 1977 informis, ke *Sennaciulo* "ne povas eniri en kelkajn 'socialistajn' landojn" kaj nomas tion "skandale hipokrita malpermeso". La nederlanda *Komuna Esperanto-Gazeto* reprenis tiun artikolon en la decembra numero kaj eble tial ankaŭ la koncerna numero, same kiel kelkaj aliaj Esperanto-periodaĵoj, "ne povos eniri" en tiujn kelkajn landojn, alivorte ili estos konfiskitaj.

Tiu ĉi ero rilatas al ĉap. 21.4 de *EeP*.

16 Kiel KEJA nombras siajn membrojn?

Tiu ĉi rubriko jam plurfoje atentigis pri la absurde fantaziaj ciferoj, per kiuj TEJO kaj ĝiaj sekcioj blufas rilate la nombron de siaj membroj. Iom pli detale tio estis farita en *Horizonto* n-ro 12/77, p. 136. El la TEJO-paĝo de la revuo *Esperanto* por januaro 1978 oni fine povas ekscii kiamaniere Kroatia Esperantista Junulara Asocio (KEJA), siavice "nur parto de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio", siavice nur parto de TEJO, siavice junulara sekcio de UEA, kalkulas siajn membrojn. Laŭ la Estrara Raporto de UEA por 1976-77, la jugoslavia sekcio de TEJO havis precize 3000 (1500) membrojn, do en bela ronda cifero ekster krampoj kaj en krampoj, kiuj lastaj devus "indiki la membrojn pli ol 25-jarajn". Ne estas klare el la Estrara Raporto ĉu la enkrampaj 1500 estas inkluzivitaj en la senkrampaj 3000, aŭ ili devus esti aldonitaj al la senkrampaj 3000, tiel ke la tuta membraro de la jugoslavia sekcio de TEJO estus nek pli, nek malpli, sed precize 4500, dum en tuta Jugoslavio UEA en 1976 havis 590 AM kaj 160 IM, sume 750 membrojn! (*Esperanto*, marto 1977, p. 58). Do, oni nun ekscias, ke el tiuj 3000 aŭ 4500 "membroj" KEJA havis precize 2500 (denove bela ronda cifero). Mi citas laŭvorte: "51,2% de ili estas lernantoj en la elementaj lernejoj, 31,9 % estas mezlernejoj, 8,4 % studentoj, 3,6 % laboristoj, 0,31 % kamparanoj, ktp.; 10,5 % estas vilaĝanoj, dum 89,5 % vivas en la urboj". La raportinto – sm (ĉu ankaŭ li "pli ol 25-jara" membro de KEJA?) – ĉerpis tiujn informojn el la *Bulteno* n-ro 7/77 de la Respublika Konferenco de Socialista Unuiĝo de la Junularo de Kroatio (SUJK). Li komentis: "Se ni en la Movado ne sukcesas eĉ registri la nombron de niaj adeptoj, tio ja – feliĉe – ne signifas, ke ili ne ekzistas?". Kaj ni komentas, ke, unue, en la pasinteco ni ja sukcesis, se ne registri (kio fakte estas malebla), do almenaŭ sufiĉe realece taksu la nombron de Esperanto-parolantoj (neĝelernantoj), kaj, due, ke en la ĝishamburga UEA oni neniam miksis "adeptojn" kun "membroj". Tiu raporto de SUJK, liverita al ĝi de KEJA, ne parolas pri "adeptoj", sed pri *membroj*, nome pri personoj organizitaj kaj pagantaj kotizojn. Estas pli ol ridinde kaj en ĉiu okazo misgvide paroli pri komencantoj-infanoj en elementaj lernejoj kiel pri "membroj" de KEJA, eĉ se la pocente donitaj "informoj" entute estas ĝustaj, kio siavice estas pli ol dubinda. Se tiamaniere oni nombrus la "membrojn", tiam la ĝenerala, neŭtrala Esperanto-Movado havus centmilojn da "membroj", eble eĉ milionojn kalkulante la forpasintajn ekinteresiĝintojn, kiuj neniam ellernis la lingvon.

El la artikolo en *Esperanto* vidiĝas, ke KEJA fakte estas parto de SUJK, de kiu ĝi ricevas kaj financajn rimedojn kaj, kompreneble, direktivojn konformajn al la politika linio de SUJK. La artikolverkinto rekonas, ke

KEJA, do, "intime kunlaboras kun socipolitika organizaĵo", kaj li asertas, ke "la orientiĝo de KEJA estas pli ol ĝusta". Alivorte, laŭ la organo de UEA, fakte ne "intima kunlaboro", sed submetiĝo al socipolitika organizaĵo estas "pli ol ĝusta", kvankam ĝi estas nete kontraŭa al la Statuto de UEA. La artikolo finiĝas per jenaj vortoj:

"Socia izoliteco neniam estis signo de memstareco, sed nur de falsaj imagoj pri propraj ekzisto kaj graveco. KEJA fariĝas parto de la socio en kiu ĝi vivas. Tio estas premiso por agi favore al Esperanto en tiu socio."

La Esperanto-Movado neniam estis, nek estas socie izolita, sed agis kaj plu agas en la socio, sukcesis socie enradikigi la lingvon, disvastigi ĝin tra la mondo kaj firmigi ĝiajn poziciojn. Al tio kontribuis ankaŭ la ĝishamburga UEA. La Esperanto-Movado nek havis, nek, espereble, havas iajn "falsajn imagojn", sed almenaŭ la Esperanto-Movado ekster la redakcio de *Esperanto* kaj de tiuj, kiuj permesas tian rekte ofendan skribadon, havas tre realecan konscion pri la propraj ekzisto kaj socia graveco. Fine, la skribinto de tiu artikolo devus kompreni, ke "socio" ne estas identa kun "socipolitika organizaĵo", sed estas multege pli vasta. Socio inkluzivas ĉiujn homojn, kiuj vivas en iu komunaĵo, inkluzive eĉ la malliberulojn. La antaŭmilita Jugoslavia Esperanto-Movado nek ligiĝis, nek submetiĝis al kiu ajn partipolitika organizaĵo, sed ja agis en la socio kaj atingis enviindajn rezultojn spitante la malfavorajn kondiĉojn de la tiama diktatoreca reĝimo.

Tiu ĉi ero rilatas al ĉap. 17.3 de *EeP*.

17 "Iniciato de UEA favore al Interlingua"?

La bulteno *Revista de Interlingua* de decembro 1977 publikigis artikolon, kiu, laŭ tiu bulteno, aperis en *Construire*, "unu el la plej grandaj ĵurnaloj de Svislando, la 9-an de novembro 1977". La artikolo komenciĝas per jenaj vortoj: "Post la iniciato de UEA favore al Interlingua estas urĝe prezenti al ĉiuj interesitoj la rimedojn, la eblecojn akiri rapide la scion de la nova lingvo..." Sekvas tre vulgara propagando por tiu lingvoprojekto – unu el la centoj neniam transformiĝintaj en vivantan lingvon de vivanta lingvokomunaĵo – kun la jam konataj falsadoj de Esperanto. La enhavo de tiu artikolo ne meritis kian ajn atenton, se ĝi ne komenciĝus per la supre cititaj vortoj. *Horizonto* jam plurfoje atentigis pri la seriozaj danĝeroj, al kiuj kondukas la manio de "planlingvismo" kaj "interlingvistikismo", nun jubilantaj tra la Esperanto-Movado ligita al UEA kaj komferte sidantaj eĉ en ĝia CED, kiu havas nenion komunan kun la ĝishamburga CED. Ne estas surprize, ke la bulteno *Revista* komprenis tion kiel "iniciaton de UEA favore al Interlingua". Aŭ, eble, ekzistis eĉ iu

alia, pli eksplicita "iniciato", ankoraŭ nekonata? En la nunaj kondiĉoj ĉio estas ebla. Ankaŭ ne estas konate, ĉu UEA iel reagis, kvankam ĝi estis informita pri la afero per letero de s-ro Lic. K. G. Eliopulos de 19.01.1978.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2.2 de *EeP*.

18 La politiko de sekretaj kunvenoj daŭrigata

Laŭ informo ricevita el orienteŭropa lando, en marto 1978 okazis plia konfidenca Esperanto-kunveno, ĉi-foje en Poprad-Slovakio en la montaro Altaj Tatroj. El GDR ĉeestis D-ro Detlev Blanke, profesia partia funkciulo kaj unu el la tri estraranoj de la nuna CED; el ĈSSR partoprenis la prezidanto Vítek, la vicprezidanto Kočvara, la ĉefdelegito de UEA Ryznar "kaj iu junulino el Prago, kiu reprezentis la progreseman junularon, sed ne parolas Esperanton". El aliaj t.n. "popoldemokrataj landoj" ĉeestis "same politike fidindaj homoj". Eĉ el Soveta Unio "aperis iu eminentulo, kio ne okazas ofte, ĉar tiu lando ne donas facile permeson vojaĝi kaj viziti ian kunvenon".

La sendinto de la informo aldonis:

"Do, estas tre verŝajne, ke temis pri gravaj aferoj, sed neniuj informis pri la konkludoj de la kunveno... La situacio ŝajnas al mi simila al la situacio antaŭ la hamburga kongreso. Ankaŭ tiam okazis sekretaj kunvenoj kaj ankaŭ tiam neniuj sciis pri kio temas. Dum la UK en Varna povas okazi ia surprizo. Eble ili volas formi ian novan asocion nur por la popoldemokrataj landoj, aŭ tute ekregi UEA-n. Nu, ni vidos."

Ni komentas:

Ne estas tute ĝusta la aserto, ke "neniuj sciis pri kio temas", ĉar la redaktoro de tiu ĉi rubriko, dank' al sciigoj ricevitaj de sinceraj esperantistoj en diversaj orienteŭropaj landoj fine de 1973 kaj komence de 1974, prezentis la ĉefajn trajtojn de la politika konspiro en la artikolo "UEA en Danĝero de Malintegriĝo", publikigita en la aprila numero de *Esperanto*, 1974, kaj represita en la libro *Hamburgo en Retrospektivo*, dua eldono, sur p-oj 90-98.

La supozo, ke dum tiu ĉi lasta sekreta kunveno oni eble planis la fondon de nova asocio "nur por la popoldemokrataj landoj" aŭ "tute ekregi UEA-n" povas esti ĝusta, sed tio ne estas verŝajna. Por la partipolitikaj faktoroj ekster UEA kun siaj peonoj en UEA mem pleje konvenas ĝuste la nuna stato: libera partipolitika agado en la kadro de kvazaŭe partipolitike neŭtrala internacia asocio sen timo de kia ajn rezisto, aŭ eĉ nur milda reago, fare de la komitato kaj estraro de tiu asocio, aŭ de la organizaĵoj apartenantaj al ĝi. Eĉ pli aperta ekregado de UEA (aŭ de kiu ajn alia jam ekregita neregistara internacia organizaĵo) – ekzemple

transporto de la sidejo de UEA el Rotterdam en Sofion, Varsovion aŭ alian urbon en la bloko de la Varsovia Pakto – signifus eraron el vidpunkto de la partipolitikaj interesoj de la decidaj partipolitikaj faktoroj en la bloko, klare formulitaj en la nuna oficiala partipolitika linio. Tiu linio postulas partipolitikan agadon unuavice en organizaĵoj konservantaj la fasadon de politika neŭtraleco kaj sendependeco, kun sidejoj en demokrataj landoj, tial ankoraŭ kredindaj, aldone al agitado kaj propagando pere de organizaĵoj kun sidejoj en la bloko, rekte financataj kaj aperte dependaj de la ŝtataj-partiaj instancoj, tial komplete kompromititaj ekster la bloko. Tiu linio estas dokumente prezentita en tiu ĉi rubriko de *Horizonto* n-ro 4/77, p-oj 79-80.

Plej verŝajne la menciita sekreta kunveno ricevis instrukciojn pritrakti la taktikon aplikotan por partipolitika propagando dum la UK en Varna, ĉefe pere de la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kiel ankaŭ la intensigon de la kampanjo kontraŭ la neŭtralan Esperanto-Movadon, ĝian laŭparolilon *Horizonto* kaj, aparte, la redaktoron de tiu ĉi rubriko per novaj kalumnioj kaj elpenaĵoj. La baldaŭa estonteco montras la ĝustecon aŭ neĝustecon de tiu ĉi antaŭvido.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 5.3 kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

19 Persekutoj: J. Belov liberigita

Horizonto jam informis pri la kazo de esperantisto J. Belov, kontraŭkonstitucio arestita kaj kondamnita, poste kontraŭleĝe tenata en mensa hospitalo (v. eron 15.1 de la rubriko ED en n-ro 2/78, p. 42). En tiu tempo Amnestio Internacia ne povis konfirmi la ĝustecon de la informo publikigita en la pariza *Le Monde*, ke J. Belov estis liberigita.

Nun venas la konfirmo. Laŭ artikolo publikigita en la londona *The Observer* de la 28-a de majo 1978, D-ro G. A. Low-Beer, brita psikiatro, vizitis Moskvon en aprilo kaj ekzamenis plurajn sovetajn civitanojn, kiuj timas, ke ili povus esti perforte senditaj en mensajn hospitalojn pro politikaj kaŭzoj. D-ro Low-Beer ĵus faris raporton al la jara kunveno de la *Royal College of Psychiatrists* (Reĝa Kolegio de Psikiatroj), el kiu sekvas ke "ne povas esti dubo, ke la misuzo de psikiatrio por politika subpremo estas vasta". Li konsentis, ke ne ĉiuj disidentoj estas komplete mense sanaj, sed el la 9 ekzamenitoj, laŭ la plej striktaj kriterioj de psikiatrio 5 estas komplete normalaj. Inter la "esence normalaj" troviĝas J. Belov, eksplacite menciita en la raporto. El tio sekvas, ke J. Belov fakte estas liberigita.

Tiu-ĉi ero kompletigas 15.1 de tiu ĉi rubriko.

20 Prof. B. Popović eksigis ankaŭ el siaj funkcioj el ISAE

En 12 de tiu-ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 6/77) estas koncize prezentitaj la kaŭzoj, pro kiuj Prof. D-ro B. Popović eksigis el siaj funkcioj en UEA. La ĵus publikigita bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), n-ro 47, publikigis tre mallongan protokolon pri la kongresa kunsido 1977 kune kun la rimarkoj de Prof. Popović pri la protokolo. Montriĝas, ke nun Prof. Popović eksigis ankaŭ el la prezidanteco de ISAE kaj el redaktoreco de *Scienca Revuo* kaj *Bulteno de ISAE*. Montriĝas ankaŭ, ke *Scienca Revuo* estos plu eldonata – en Ĉeĥoslovakio. El la protokolo sekvas, ke ISAE havas multegajn malfacilaĵojn trovi taŭgajn funkciojn, fakte troviĝas en sufiĉe senespera situacio. Jen plia sekvo de Hamburgo. Unu sindona aktivulo post alia sentas sin devigita forlasi siajn funkciojn, dum taŭgaj anstataŭantoj ne estas troveblaj. Kaj poste la naivuloj demandas sin kial nia afero ne nur ne progresas, sed rapide regresas.

Tiu-ĉi ero kompletigas eron 12 de ED.

21 Diskuti sen mistifikoj

Verŝajne en aŭgusto 1978 s-ro Zdenko Křimský sendis al la redakcio de *Horizonto* longan malfermitan leteron sen dato, en kiu li skribis en la fino: "Ĉar mi dubas, ke vi publikigos mian leteron komplete, tiun ĉi leteron mi sendas kopie al pluraj redakcioj por publikigo".

Ĉar tiu preskaŭ kvarpaĝa letero de s-ro Křimský, la sekretario de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (aliĝinta al UEA), enhavis ĉefe atakojn kontraŭ la redaktoron de tiu ĉi rubriko, la redakcio de *Horizonto* plusendis ĝin al li. La 6-an de septembro 1978 mi skribis al s-ro Křimský, ke mi estas preta publikigi lian leteron en la rubriko redaktata de mi, se li limigas la leteron al maksimume unu paĝo. Mi aldonis, ke mi pretas fari tion sub la kondiĉo, ke la saman mallongigitan tekston, al kiu mi aldonos same longan, nome unupaĝan, komenton, li publikigu, kune kun la komento, samtempe en la ĉeĥa *Starto*. Estis akcentite, ke "nur tiamaniere kaj la legantoj de *Horizonto* kaj tiuj de *Starto* povos ricevi objektivan bildon pri la afero". Mi petis tuj informi pri la konsento.

Pli lojale kaj objekte ne eblas agi, sed, post la spertoj sub la signo de Hamburgo, oni ne povis atendi eĉ la plej elementan reciprokecon. Efektive, s-ro Křimský tute ne respondis al la menciita letero, sed publikigis sian tutan "malfermitan leteron" sub la titolo "Disputi sen

Mistifikoj" en sia *Starto*, n-ro 4/1978. Pretere dirite, ŝajnas ke la nomitaj gvidantoj de la Esperanto-instancoj en la blokaj landoj tute ne scias diskuti, ĉu kun mistifikoj, ĉu sen mistifikoj, sed nur disputi, ĉar ankaŭ la orientgermana *der esperantist* uzas la saman terminon.

Do, tiu "disputo sen mistifikoj" estas plena de mistifikoj kaj rektaj mensogoj kun plia partipolitika propagando por la sovetisma koncepto de paco kaj atakoj kontraŭ ĉiujn, inkluzive la neŭtralan Esperanto-Movadon, kiuj estas por vera paco en libereco.

Ni ne polemikos kun s-ro Křimský sed donos al la legantoj de *Horizonto* nur unu ekzemplon de mistifikoj, pli precize ordinaraj mensogoj, kiuj svarmas en lia letero. Skribante pri la informo publikigita kiel ero 14 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 3/78, s-ro Křimský skribas:

"Profesoro Lapenna denove citas 'informojn' el orienteŭropaj landoj kiel en 'Hamburgo en Retrospektivo' kaj informas intence antaŭ la UK en Varna (p. 58) pri sekretaj kunvenoj en Poprad, kies celo (!) estas eventuale kreo de Internacia asocio sole de la socialismaj landoj aŭ eĉ 'tute ekregi UEA-n'. Mi supozas, ke Profesoro Lapenna ne estas naivulo, sed ke li nur intence provokas homojn."

Same kiel en *Hamburgo en Retrospektivo*, tiel same en tiu ĉi rubriko la prezentitaj faktoj baziĝas sur absolute fidindaj informoj. Eĉ s-ro Křimský ne havas la kuraĝon nei, ke la sekreta kunveno fakte okazis antaŭ la UK en Varna, same kiel li ne povas nei, ke sekreta kunveno de la orienteŭropaj komplotintoj okazis en Orienta Berlino senpere antaŭ la UK en Hamburgo en 1974. Alia afero estas la analizo de la faktoj. Tiurilate estu cititaj miaj vortoj:

"La supozo, ke dum tiu ĉi lasta sekreta kunveno oni eble planis la fondon de nova asocio 'nur por la popoldemokrataj landoj' aŭ 'tute ekregi UEA-n' povas esti ĝusta, sed tio ne estas verŝajna. Por la partipolitikaj faktoroj ekster UEA kun siaj peonoj en UEA mem pleje konvenas ĝuste la nuna stato: libera partipolitika agado en la kadro de kvazaŭe partipolitike neŭtrala internacia asocio sen timo de kia ajn rezisto, aŭ eĉ nur milda reago, fare de la komitato kaj estraro de tiu asocio, aŭ de la organizaĵoj apartenantaj al ĝi. Eĉ pli aperta ekrego de UEA (aŭ de kiu ajn alia jam ekreginta neregistara internacia organizaĵo) – ekzemple transporto de la sidejo de UEA el Rotterdam en Sofion, Varsovion aŭ alian urbon en la bloko de la Varsovia Pakto – signifus eraron el vidpunkto de la partipolitikaj interesoj de la decidaj partipolitikaj faktoroj en la bloko, klare formulitaj en la nuna oficiala partipolitika linio. Tiu linio postulas partipolitikan agadon unuavice en organizaĵoj konservantaj la fasadon de politika neŭtraleco kaj sendependeco, kun sidejoj en demokrataj landoj, tial ankoraŭ kredindaj, aldone al agitado kaj propagando pere de

organizaĵoj kun sidejoj en la bloko, rekte financataj kaj aperte dependaj de la ŝtataj-partiaj instancoj, tial komplete kompromititaj ekster la bloko. Tiu linio estas dokumente prezentita en tiu ĉi rubriko de *Horizonto* n-ro 4/77, p-oj 79-80."

Ĉiu leganto bv. kompari la kursivlitere presitan tekston de s-ro Křimský kun la diklitere presita teskto de mi mem por konstati ĝis kiu grado tiu sinjoro mistifikas "en disputo sen mistifikoj".

En la sama informo estis skribite en la fino:

"Plej verŝajne la menciita sekreta kunveno ricevis instrukciojn pritrakti la taktikon aplikotan por partipolitika propagando dum la UK en Varna, ĉefe pere de la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kiel ankaŭ la intensigon de la kampanjo kontraŭ la neŭtralan Esperanto-Movadon, ĝian laŭtparolilon *Horizonto* kaj, aparte, la redaktoron de tiu ĉi rubriko per novaj kalumnioj kaj elpensajoj. La baldaŭa estonteco montros la ĝustecon aŭ neĝustecon de tiu ĉi antaŭvido." (P. 58.)

Efektive, la partipolitika agado inter la kongresanoj en Varna, la letero mem de s-ro Křimský, la skribado de *der esperantist* post la sekreta kunveno kaj aliaj faktoj konfirmas la ĝustecon de la antaŭvido.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 5.3 kaj 5.4 de *Hamburgo en Rerospektivo*.

22 Pliaj persekutoj de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio

El Ĉeĥoslovakio atingis nin pluraj informoj pri pliaj persekutoj de esperantistoj. La informoj venis de absolute fidindaj personoj, kies sciigoj estis apogitaj eĉ de filmoj de oficialaj dokumentoj. Temas pri s-roj M. Šváček kaj V. Srna, kontraŭ kiujn komenciĝis kriminaljura persekuto la 16-an de aŭgusto 1978. S-ro M. Šváček apelaciis kontraŭ la decidon pri persekuto kaj akuzo al la regiona prokuroro en Hradec Králové, sed la prokuroro D-ro Alois Bráblík, per sia decido I Kv 58/78 de la 24-a de aŭgusto 1978, forĵetis la apelacion. Sekve, pastro V. Srna, nuntempe degradita al pozicio de hejtisto en pulmkuracejo en Babice nad Svitavou, kaj M. Šváček troviĝas sub akuzo konforme al art. 160/1 kaj 163/1 de la punleĝo. Srna estas akuzita pro la "krimago de malhelpado de kontrolado de la eklezioj kaj religiaj societoj", dum M. Šváček estas akuzita pro "helpado al krimago de malhelpado de kontrolado de la eklezioj kaj religiaj societoj".

En kio konsistas la "krimagoj" de la du esperantistoj? Pri la tuta afero estas verkita ampleksa dokumento kun ĉiuj detaloj pri faktoj kaj analizo de la juraj aspektoj. La dokumento estas sendita al IKUE, Radio

Vatikana, KELI, Sekretario de IEAJ, la CO de UEA por la Estraro de tiu Asocio kun la instigo interveni cele al ĉesigo de la persekuto de Šváček kaj Srna. Ankaŭ Amnestio Internacia estas informita pri tiu kontraŭleĝa malrespekto de unu el la gravaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĉi tie estu prezentitaj nur la plej esencaj faktoj.

De la 9-a ĝis la 23-a de julio 1977 okazis en la vilaĝo Herbortice, Bohemio, ĈSSR, "Libertempa Esperanto-Tendaro" (LET). La estro estis s-ro Miloslav Šváček, kiu jam dum la antaŭaj 9 jaroj organizadis similajn tendarojn. La ĉefa celo estis diversgradaj kursoj de Esperanto, kiuj okazadis ĉiutage en la matenaj kaj antaŭtagmezaj horoj. La libera tempo estis utiligata por sporto, amuzprogramoj kaj rakontado de travivaĵoj dum eksterlandaj vojaĝoj faritaj pere de Esperanto. Partoprenis entute 130 personoj de diversaj aĝoj, inter kiuj ankaŭ kelkaj esperantistoj en Pollando, 3 ĉeĥaj katolikaj pastroj kaj pastro J. Zielonka el Tarnow. En la tendaro regis perfekta ordo bazita je libervola respektado de la tendata regularo.

La 21-an de julio 1977 je la 8-a horo matene la tendaron vizitis civile vestitaj policistoj kaj la administranto de ekleziaj aferoj de la distrikto. Okazis traserĉoj kaj esplorkzamenadoj. La tendumado estis tuj ĉesigita, sed la partoprenintoj estis dum monatoj kaj plu estas esplorkzamenataj kaj diversmaniere ĉikanataj de la politika polico.

El la 4 pastroj, 2 helpis kiel kursgvadantoj, dum la 2 aliaj estis lernantoj. Pastro J. Zielonka ricevis de la tendarestro la permeson celebri la meson en la loka "hangaro" sub la kondiĉo, ke tio okazu antaŭ la oficiala horo por vekiĝo de la tendaranoj. Tio estas la unua kriminaljura kulpigo kontraŭ M. Šváček.

La dua "krimo" estis la preĝado kaj kantado de kantoj kun religia enhavo, kiel ankaŭ respondoj je demandoj rilate religion kaj vivproblemojn, precipe de la junularo. La tria kulpigo estas la fakto, ke en la proksimeco de la tendaro troviĝis sur arbotrunko alnajlita kruco, farita el betulaj branĉetoj, unu metron longa. Post la foriro de la tendaranoj la kruco, troviĝinta sur la sama loko jam 9 jarojn, estis forigita de nekonataj personoj.

Tio estas la "krimoj", kiujn la ŝtata prokuroro imputas al Šváček kaj Srna. La agoj imputitaj al la akuzitoj laŭ la kriminala leĝo estas fakte permesitaj laŭ la Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, kiun Ĉeĥoslovakio ratifikis kaj tiu tiel fariĝis la Leĝo 120/76 de tiu lando. Konforme al art. 18 de la Pakto, ĉiu havas la rajton kaj liberecon manifesti, ĉu sola, ĉu kune kun aliaj, ĉu publike, ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado. Tial la persekuto de la du esperantistoj estas ne nur kontraŭa al la rekonitaj rajtoj kaj liberecoj laŭ internacia juro, sed ankaŭ laŭ la juro de Ĉeĥoslovakio.

Hontinda ago okazis la 17-an de majo 1978, do antaŭ la oficiala ŝtata akuzo kontraŭ Šváček kaj Srna. Dum tiu tago estis aranĝita en la distrikta oficejo de la politika polico de Ustí nad Orlicí t.n. "ekstertribunala juĝado" aŭ "traktado". Ĉeestis la distrikta prokuroro, distrikta poliestro, ŝtata administranto de ekleziaj aferoj, distrikta prezidanto de la Asocio de Socialisma Junularo, reprezentanto de la labordonanto de M. Šváček, vilaĝestro de Cotkytle-Herbortice, reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio – la sekretario Zdenko Křimský kaj la prezidanto de la politika komisiono de ĈEA, Pisk – kelkaj policistoj kaj, fine, la akuzito M. Šváček. Tie oni denove imputis al Šváček la samajn "krimojn", dum la reprezentantoj de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aliĝinta asocio de UEA, s-roj Křimský kaj Pisk, esprimis la saman fanatike kontraŭreligian maltoleremon, kiel la menciitaj reprezentantoj de la ŝtataj aŭtoritatoj. Siavice, la prezidanto de ĈEA kaj komitatano de UEA, s-ro J. Vítek, aprobis tiun tutan hontindan aferon kaj komunikis en la organo de ĈEA *Staro* (Informace č. 49/78) informon pri la eksigo de Šváček el ĈEA.

Tiamaniere reprezentantoj de landa instanco, kiu formas parton de UEA, eĉ komitatano de UEA, partoprenis, kune kun la ŝtata prokuroro kaj reprezentantoj de la politika polico, en persekutado de esperantistoj, kies sola "krimo" estas plenumo en ege modesta kaj diskreta formo de unu el la fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj. Ĉu, eble, s-ro Z. Křimský publikigos nun novan "nefermitan leteron", en kiu li neos ankaŭ la suprajn faktojn?

Tiu ĉi ero povas esti aldonita al ĉap. 21.4 de *Esperanto en Perspektivo*.

23 *Espero Katolika* konfiskata en Ĉeĥoslovakio

N-ro 9/78 de *Espero Katolika* informas, ke ekzempleroj de tiu periodaĵo, senditaj per ordinara poŝto kiel presaĵoj al adresoj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, neniam atingis sian celon. La ekzempleroj senditaj registrite estis resenditaj al la redakcio kun la indiko "enhavo kontraŭa al la doganaj preskriboj" (p. 171).

D-ro Antonio De Salvo, la direktoro de *Espero Katolika*, sendis al la ĉeĥoslovaka ambasadorejo en Romo leteron, en kiu li petis klarigon pri la formalajoj, kiujn li devas plenumi por sendi al Ĉeĥoslovakio donacajn publikaĵojn, en tiu ĉi kazo revuon laŭ karaktero ekskluzive kulture-religian, kiu kaŭzas "nenian damaĝon al la sekureco kaj al la publika ordo, al la saneco, al la bonaj moroj aŭ al la fundamentaj rajtoj kaj liberoj de aliaj". Ne estas konate ĉu D-ro De Salvo ricevis ian ajn respondon.

24 Sovetaj esperantistoj ricevas instrukciojn

Amiko de *Horizonto* en Soveta Unio skribis interalie:

La "21-an de julio oni nin akceptis en Domo de Amikeco por / kun/ Eksterlando. Tie mi aŭskultis kune kun la forveturontoj al Varna Kongreso (105 homoj!) instrukcion, vidis ĉiujn ĉefajn gvidantojn (oficialajn) de Esperanto-aferoj en Soveta Unio. La rilato al Esperanto ĉe ni pliboniĝis kaj laŭ promeso de ĉefuloj dum oktobro-novembro estos oficiale fondita ASE /Asocio de Sovetaj Esperantistoj?/ Principe eĉ temis pri la aliĝo de ASE al UEA. Certe ne tuj, sed post unu-du jaroj, ĉar la 'reakciuloj' (I. Lapenna kaj aliaj) ne plu gvidas UEA."

Sen komento. Ni lasas al la legantoj juĝi kiu kaj kiuj estas la veraj reakciuloj en la nuntempa Esperanto-Movado: ĉu tiuj, kiuj vivtenas la tradician partipolitike neŭtralan esperantismon kaj plu agas konforme al la Statuto de UEA eĉ ekster UEA, aŭ tiuj, kiuj agas partipolitike, helpas la subpremado de la fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj? En ĉiu okazo, la fakto, ke esperantistoj el la blokaj landoj ricevas instrukciojn, estas ankoraŭfoje konfirmita.

25 Koresponda Servo Mondskala

Sur p. 76 de *Esperanto en Perspektivo* estas dirite, ke la Koresponda Servo Mondskala estis fondita de UEA en 1957 kaj gvidata jam de multaj jaroj de f-ino C. Hueter el Francio. Efektive, tiun Servon fondis s-ro Daniel Luez en 1955 kaj, laŭ lia propono kaj peto, en 1957 ĝi fariĝis oficiala servo de UEA. Ekde 1957 f-ino C. Hueter transprenis la prizorgadon de KSM en la kadro de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 4.3.4 de *Esperanto en Perspektivo*.

26 Delegitoj de UEA registrataj ĉe politika polico

Anonima esperantisto el Ĉeĥoslovakio sendis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko parton de cirkulero, kiun en oktobro pasintjara Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj s-ro L. Rýznar, ĉefdelegito de UEA, poŝtkesto 21 - 568 11 Svitavy, sendis al ĉiuj membroj de UEA en tiu lando. El la cirkulero vidiĝas, ke ĉiuj delegitoj, fakdelegitoj, vicdelegitoj kaj junularaj delegitoj de UEA en Ĉeĥoslovakio devas esti registritaj ĉe politika polico, kio konfirmas la analizon pri la stato de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio, donitan en ĉap. 2.2 de *Hamburgo en Retrospektivo*. Jen la teksto de la koncerna parto de la menciita cirkulero:

"*La delegita reto*: Dum la lasta tempo ekstagnis la kompletigo de la delegita reto. Tion kaŭzis la fakto, ke ĉiu eksterlanda funkciulo devas esti registrita laŭ la preskriboj de nia ŝtato. Tio validas por ĉiuj societoj kaj organizaĵoj, do ankaŭ por la funkciuloj (D, FD, VD, JD), membroj de UEA. Kvankam temas pri afero principe formala, tamen estas necesa plenumo de unu plua demandilo, kiu restos konservita enlande kaj ĉiu interesulo pri la funkcio bezonas rekomendon de la loka grupo kaj definitivajn aprobon de la Esperanto-Asocio Ĉeĥa aŭ Slovaka. Ni alvokas niajn membrojn en la kat. MA fariĝi speciale delegitaj por sia loko, kaj ĉiu interesulo postulu de /la/ ĉefdelegito kompletigan demandilon, se via /lia, ŝia/ intereso pri la funkcio restas. Post tiu klarigo via sinpropono por fariĝi delegito estos rapide pritraktota (pritraktita), /tiel/ ke via envicigo okazu dum la jaro 1979. La vintra estrarkunsido de ĈEA okazos komence de la /sen la/ decembro 1978". Subskribitaj L. Rýznar, ĉefdelegito de UEA, kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio. (En rektaj krampoj estas faritaj korektoj de kelkaj el la lingvaj eraroj.)

En la akompana letero, kiun la anonima sendinto adresis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko, estas interalie skribite:

"Ĉu fakte niaj du Asocioj (Ĉeĥa kaj Slovaka) estas tute neŭtralaj. Bonvolu, kamarado Křimský, respondi, ĉu ĉiu ano de tiuj du niaj Asocioj povas havi iun funkcion en nia E-Movado? Laŭ miaj informoj ĉiu funkciulo de nia E-Movado (1) devas esti ano de KP Ĉeĥoslovaka; (2) devas esti aprobita de la anoj de la regiona komitato de la Komunista Partio Ĉeĥoslovaka, nome de la regiono en kiu tiu ĉi samideano loĝas. Vi skribas, ke temas pri afero principe formala... Ne, tute ne estas formala tiu afero! Ĉiu funkciulo de UEA (1) devas esti aprobita de la KP; (2) estos 'sub lupeo' de la sekreta polico."

"Pri fundamentaj homaj rajtoj: tiuj viaj vortoj, belegaj, pri la laboro, pri sekureco ktp. en Ĉeĥoslovakio (ĉi tie la sendinto aludas al la artikolo de Z. Křimský 'Diskuti sen Mistifikoj', koncize pritraktita en ero 21 sur p. 141 de *Horizonto*, rim. de la red.). Ni ĉeĥoslovakianoj tre bone konas ilin: tiuj estas tute demagogiaj vortoj de nia 'glora' KPĈ same tiel, kiel demagogiaj estas la vortoj pri PACO: tiuj, kiuj tiel multe kaj ofte uzadas tiun vere belan vorton PACO, maksimume produktadas armilojn, maksimume preparas mondmiliton! En tia ŝtato ni vivas kaj ni ĉion vidas! Estas tute demagogiaj viaj vortoj, k-do Křimský, ke 'ni povas viziti fremdajn landojn, ankaŭ okcidentajn'. Estas fakto, ke ni povas, sed nur post multaj oferoj, petoj, post sennombraj aproboj de ŝtataj, policaj, laboronantaj organoj, ktp.! Ĉu ankaŭ nun vi povas babiladi pri HOMAJ RAJTOJ en nia lando Ĉeĥoslovakio? Ekde la 1-a de januaro 1979 ni, Ĉeĥoslovakianoj, ne povos libere vojaĝadi eĉ en nian najbaran,

socialisman landon, en Hungarujon. Ĉu ankaŭ tiu fakto, k-do Křimský, estas tiel bona por vi, ke vi povas frazadi pri la tiel nomataj homaj rajtoj en Ĉeĥoslovakio?

Mi finas mian leteron, kara kaj por mi nekonata, sed estimata sinjoro Prof. Lapenna. Eble iam mi povos vin persone vidi kaj mi esperas, ke vi bonvenigos nian renkontiĝon. Sed tio por mi estas nur utopia revo!

Mi tute ne komprenas la politikon de la Estraro de UEA, sed ŝajnas al mi ke ili fine malgajnos, se temas pri la politiko rilate al la tiel nomataj socialismaj landoj. Plej sincere via» (subskribo nelegebla).

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 2.2 kaj aliajn partojn de *Hamburgo en Retrospektivo*, kiu siavice kompletigas la verkon *Esperanto en Perspektivo*.

27 Brita Esperanto-Asocio (BEA) celebris la centjaran datrevenon de Esperanto

En Britio okazis preskaŭ nekredebla fuŝaĵo. Komence de decembro 1978 subite aperis en diversaj londonaj taggazetoj, eble ankaŭ en aliaj, artikoloj kaj informoj, laŭ kiuj la 5-an de decembro 1978 estis la 100-jara datreveno de Esperanto. Ankaŭ la brita radio kaj televido (BBC) menciis tiun "datrevenon". Laŭ poŝtkarto de s-ro Stuart Campbell de la 14-a de decembro 1978, "la eraro devenis de gazetinformato, kiun eldonis la Brita Esperanto-Asocio". Li aldonis: "Mi tute ne komprenas ĝian malsaĝecon".

Kvankam en la televido estis sufiĉe kontentiga programero pri tiu neekzistanta "datreveno", tamen en la gazetoj aperis multaj misinformoj kaj primokoj. En la mondfama *The Observer* estis preskaŭ tiom da eraroj pri faktoj, eĉ insultoj, kiom da asertoj. La redaktoro de tiu ĉi rubriko reagis per letero, el kiu vidiĝas la karaktero de la eraroj sur kelkaj ekzemploj. Jen la Esperanto-traduko de la menciita letero de la 11-a de decembro 1978:

"En la artikolo de Patrick O'Donovan '100 Jaroj da Honorinda Malsukceso' troviĝas preskaŭ tiom da eraroj kaj malprecizaĵoj, kiom da asertoj."

"Li skribis ke 'Esperanto fariĝis 100 jarojn aĝa en la pasinta semajno', kio ne estas ĝusta, sed jam en la sekvanta alineo li korekte informis, ke la unua gramatiko de tiu ĉi lingvo estis publikigita en 1887. Ĉu li ne interŝanĝis 1978 kaj 1887, aŭ estis tro malfacile por li aldoni 100 al 1887? Li skribis pri 'la trankvila datreveno de Esperanto' kaj moke aldonis, ke ĝia 'centjaro pasis preskaŭ same nerimarkita, kiel paŭpera (malriĉula) rekviemo'. Kompreneble, tiu ĉi neekzistanta 'centjaro' pasis nerimarkite, ĉar nenie en la mondo, kun la escepto de tiu ĉi lando, kiu ajn venis al la

ideo celebri centjaran datrevenon naŭ jarojn anticipe. La lingvo ne estis 'inventita de iu D-ro L. L. Zamenhof, sed iniciatita de D-ro L. L. Zamenhof, kiu en 1959 estis deklarita de Unesko 'unu el la grandaj personecoj de la homaro'. Tiu ĉi lingvo ne estis 'nomata Dotter E', sed 'Internacia Lingvo'. La libreto enhavanta ĝian fundamentan gramatikon kaj bazan radikaron estis publikigita sub la pseŭdonimo de la aŭtoro 'Doktoro Esperanto'. Nur poste la 'Internacia Lingvo' de Zamenhof fariĝis konata ankaŭ kiel 'Esperanto', neniam 'Dotter E', kiel vi povas facile kontroli en kiu ajn enciklopedio. La sidejo de Universala Esperanto-Asocio – ne de Esperanto, kompreneble, – estas en Rotterdam, Nederlando, kaj ne en 140, Holland Park Avenue, Londono..."

"Simile preskaŭ en ĉiu frazo de tiu nekredeble misinforma kaj eĉ insulta artikolo ('manio', 'etikedo de frenezeto', k.s.), kiu montras ne 'la malsukceson de Esperanto' (ĝi estas disvastigita kaj sukcese uzata en la mondo), sed ignoron kaj antaŭjuĝojn de O'Donovan."

La supra letero ne estis publikigita en *The Observer*, sed la redakcio tamen publikigis mallongan, trafan korekton de Stuart Cambell en la n-ro de 17.12.78. Aliflanke, *The Guardian* de 13.12.78 kaj *Daily Telegraph* de 15.12.78 publikigis koncizajn korektojn senditajn de la redaktoro de tiu ĉi rubriko.

Estas pli ol bedaŭrinde, ke BEA per sia komuniko kaŭzis tiun kulturan skandalon. Ŝajnas, ke ĝi tute arbitre decidis preni la 5-an de decembro 1978 kiel la tagon de "naskiĝo de Esperanto". Kiel konate, tio estis la tago, kiam la juna Ludoviko havis festeton en la hejmo de siaj gepatroj por anonci la praprojekton de la posta Internacia Lingvo, publikigita en 1887. Sed BEA eraris eĉ rilate tiun daton, ĉar la 5-an de decembro okazis la festeto laŭ la malnova rusa kalendaro, do ne la 5-an, sed la 12-an de decembro laŭ nia, nun ankaŭ rusa kalendaro. Espereble ĝis 1987 UEA retrovos sin mem kaj tiam en la tuta mondo oni povos digne kaj adekvate celebri la 100-jaran datrevenon de Esperanto kiel unu el la plej gravaj eventoj en la kultura historio de la homaro.

28 Persekuto de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio

28.1 Kriminaljura proceso

En ero 22 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-ro 6/78) ni koncize informis pri pliaj persekutoj de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio, en kiuj, bedaŭrinde, partoprenis ankaŭ funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, "aliĝinta asocio" de UEA. Ampleksa dokumento kun multe pli da detaloj pri faktoj kaj juraj analizoj estis senditaj al IKUE, KELI, Radio Vatikana, sekretario de

IEAJ, la CO de UEA por la Estraro de tiu asocio kun la instigo interveni cele al ĉesigo de la persekutoj kontraŭ M. Šváček kaj pastro V. Srna, la du ĉefaj viktimoj. Ankaŭ Amnestio Internacia, objektive informita per anglalingva traduko de la dokumento pri tiu kontraŭleĝa malrespekto de unu el la gravaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, decidis agi. En sia letero de la 17-a de novembro 1978 ĝia Internacia Sekretariato dankis pro la dokumento kaj daŭrigis:

"Via jura analizo havas apartan intereson por ni. Post nia telefona konversacio mi sendis la informon al ĉiuj Kunordigaj Grupoj pri Orienta Eŭropo kaj petis ilin havigi ĝin al la gazetaro kaj aliaj komunikiloj, kiel ankaŭ al la eklezioj. Mi informis ankaŭ D-ron Perko pri tiu ĉi agado."

Efektive, dank' al agado de Amnestio Internacia kaj de kelkaj aktivuloj en la parti-politike neŭtrala Esperanto-Movado, pluraj informoj pri la afero aperis en la gazetaro de diversaj landoj, interalie en la tre gravaj *Frankfurter Allgemeine Zeitung* (FRG), *Politiken* (Danlando), *La Nazione*, *L'Avvenire* (ambaŭ Italio) kaj *La Vanguardia* (Hispanio).

Tiuj agadoj, inspiritaj de humanecaj motivoj kaj tute konformaj al la klaŭzo pri la respekto de la homaj rajtoj laŭ art. 4 de la Statuto de UEA, vaste diskoniĝis inter la esperantistaro de Ĉeĥoslovakio kaj ricevis fortan aprobon. Kompreneble, pri ili sciiĝis ankaŭ la tieaj aŭtoritatoj. Per letero de la 8-a de februaro 1979 M. Šváček esprimis "koregan dankon pro ĉio farita" kaj informis, ke la kriminaljura proceso kontraŭ li mem kaj Srna okazos la 22-an de februaro. Samtempe li sukcesis sendi la kompletan tekston de la akuzo de la Distrikta Prokuroro en Usti nad Orlicí de 15.01.1979, n-ro Pv 8/79 IT 29/7. La akuzo estas esence identa al la jam prezentita en la ero 22, menciita enkonduke. M. Šváček aldonis: "Mi informos vin pri la rezulto de la proceso, aŭ tion faros iu alia, se mi ne povos".

28.2 Rezolucio de la Estraro de UEA

Bedaŭrinde, la Estraro de UEA decidis ne entrepreni ion ajn por helpi la du esperantistojn, kontraŭjure persekutatajn. Laŭ la letero de la prezidanto de UEA de 20.02.1979 al la redaktoro de tiu ĉi rubriko, la Estraro de la Asocio pritraktis la aferon la 13-an de januaro kaj unuanime akceptis Rezolucion, en kiu ĝi "notis la problemojn, kiuj ekestis kunlige kun la Libertempa Esperanto-Tendaro, Herbotice, Ĉeĥoslovakio, en julio 1977". Espereble, la revuo *Esperanto* publikigos almenaŭ tiun sensignifan, fakte ege signifan nur pro sia sensignifeco, pure abstraktan Rezolucion de sia propra Estraro, en kiu troviĝas eĉ ne aludo pri la persekutado de la esperantistoj Šváček kaj Srna, ankoraŭ malpli pri la kontraŭleĝeco de

tiu persekutado, en kiu aktive partoprenis la funkciuloj de ĈEA, "aliĝinta asocio" de UEA, eĉ komitatano de UEA, kaj pri la hontinda eksigo de Šváček el ĈEA, do ankaŭ el UEA. En la Rezolucio la Estraro de UEA fuĝas de sia laŭstatuta tasko, kiam ĝi asertas, ke "juraj paŝoj kontraŭ esperantistoj *pro aliaj kaŭzoj* (t.e. ne tial, ĉar ili parolas Esperanton, *nia rim.*), eĉ se tiuj paŝoj okazas en la kunteksto de Esperanto-aranĝo, estas ekster la mandato de la Asocio". Kompreneble, fakte estus "ekster la mandato de la Asocio", se iu Esperanto-parolanto estus persekutata pro ŝtelo, murdo aŭ kiu ajn alia krimo. Sed en la kazo Šváček-Srna tute ne temas pri krimo, sed pri realigo, lige kun elstara Esperanto-agado, de unu el la fundamentaj homaj rajtoj, rekonita ne nur en internacia juro, sed ankaŭ laŭ la juro de Ĉeĥoslovakio, ĉar ĝi ratifikis ambaŭ paktojn pri la homaj rajtoj, kiuj tiamaniere fariĝis integra parto de la interna juro de tiu lando. Sekve, se art. 4 de la Statuto de UEA ankoraŭ havas ian sencon, UEA devis energie interveni, des pli ke Šváček (eble ankaŭ Srna) estis AM de UEA ĝis la momento, kiam li estis kontraŭjure kaj kontraŭstatute eksigita el ĈEA, do ankaŭ el UEA, pro nenio alia ol pro realigo, en ege diskreta formo, de sia rekonita homa rajto.

En ligo kun tiu historia Rezolucio – kaj la vorto "historia" tute ne estas uzita en ironia senco – oni povus starigi al la Estraro de UEA tutan aron da demandoj, ekzemple ĉu la pogromoj kontraŭ judoj, pri kio kun indigno parolis D-ro Zamenhof; aŭ la murdo de la familio Zamenhof inter milionoj da aliaj fare de la nazioj; aŭ la murdoj kaj persekutoj de "socie fremdaj elementoj" dum la purigoj de Stalin, ktp., estus same tiel "ekster la mandato de la Asocio". Sed ni rezignas pri tio, almenaŭ en la nuna momento.

28.3 Kion nun opinias D-ro U. Lins?

Tamen, estus interese scii ĉu almenaŭ D-ro U. Lins, kiu siatempe dum pluraj jaroj efike kunlaboris kun la redaktoro de tiu ĉi rubriko, precipe je la verko *Esperanto en Perspektivo (EeP)*, juĝas la nunan gvidantaron de UEA laŭ la samaj korektaj kriterioj, kiujn li aplikis en ĉap. 14.3.4 rilate la antaŭmilitan "krizon kaj degeneron de UEA" pro ĝia kliniĝo antaŭ hitlerismo, aŭ en ĉap. 21.3.1 rilate la "moralan descendon" de la Germana Esperanto-Asocio pro ĝia sensukcesa provo submetiĝi al nacisocialismo. Kompreneble, estas ĉiam pli facile kritike analizadi kaj kondamnadi pasintajn erarajn sintenojn al subpremantoj, precipe post la malapero de tiuj subpremantoj, ol bone orientiĝi kaj preni korektan pozicion rilate la aktualajn eventojn. Tamen, oni povas atendi, ke talenta persono, kiel U. Lins, kapablas fari sukcesajn paralelojn inter la sinteno de la nuna

gvidantaro de UEA kaj la situacio en la periodo de la "nevenkebla hitlerismo", kiun li tiel trafe analizis en *Esperanto en Perspektivo* (v. precipe p-ojn 435-444 kaj 702-706). Tiu ĉi rubriko estas malfermita por lia eventuala reago je tiu ĉi interesa demando. Tiu ĉi ero rilatas al ĉap. 21 de *EeP*.

29 Esperanto en bibliotekoj

En 1978 aperis stencilite broŝuro de Marinko Givoje sub la titolo "Manlibro pri Esperanto en Bibliotekoj". Kiel la aŭtoro mem informas en enkondukita noto, temas nur pri bazo de manuskripto, aperonta poste en presita formo. La aŭtoro intencas vastigi kaj kompletigi tiun ĉi gravan verketon de 33 grandformataj paĝoj. Eĉ en tia nekompleta formo la broŝuro prezentas tre valoran materialon pri Esperanto en publikaj kaj en grandaj privataj bibliotekoj. Por ĉiuj informoj kaj eventualaj mendoj oni bv. sin turni al la adreso de la aŭtoro: M. Givoje, Pp. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 3.2.5 kaj aliajn erojn rilatantajn al bibliotekoj en *EeP*. Vidu ankaŭ la artikolon pri la Hispana Esperanto-Muzeo en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*.

30 Redakcia noto

Pro la foresto de la redaktoro de ED dum preskaŭ tri monatoj en Aŭstralio, kie li prelegis kiel gastprofesoro en la Jura Fakultato de la Universitato de Sydney kaj, parte, en tiu de Canberra, ne estis eble prizorgi la redaktadon de tiu ĉi rubriko. Nun ĝi reaperas.

Dum sia restado en Aŭstralio la redaktoro prelegis pri "La Perspektivoj de Esperanto en la Nuntempa Mondo" en plenŝtopita salono de la Esperanto-Societo de Sydney, kaj pri "Bazaj Principoj de Parolarto" en la Esperanto-Grupo de Manly, unu el la distriktoj de Sydney. En Canberra okazis amika renkontiĝo en la gastama hejmo de Ambasadoro Ralph Harry, nun Direktoro de la Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj kaj vicprezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

31 Partipolitika programo de A.S.E.

La ĉefartikolo en n-ro 4/79 de *Horizonto* koncize prezentis la rolon de la t.n. "sociaj organizaĵoj", inkluzive, kompreneble, la ĵus fonditan Asocion de Sovetaj Esperantistoj (ASE), konforme al la Soveta Konstitucio, precipe ĝia art. 6. En la artikolo estis dirite: "Apenaŭ necesas

kia ajn komento: pli ol evidente, ASE kaj ĝiaj filioj devas agi laŭ art. 6 de la Konstitucio, nome strikte observi la oficialan partipolitikan linion kaj la konkretajn direktivojn de la Komunista Partio, la 'nukleo' de ĉiuj 'sociaj organizaĵoj' ".

Kompreneble, tiu antaŭvido, same kiel ĉiuj aliaj antaŭvidoj lige kun la hamburgaj eventoj, plene realiĝis. Laŭ *SAT-Amikaro* de julio, 1979, ASE anoncis la fondiĝon jene:

"... La partoprenintoj de la konferenco unuanime decidis konsideri la ĉefajn taskojn de la Asocio kaj de la enirantaj ĝin organizaĵoj; la partoprenon, uzante Esperanton, en la firmigo de la paco, sekureco kaj kunlaborado; helpadon al esperantistoj en lernado de Esperanto kaj profundigo de ĝia scio; edukon de la Sovetiaj Esperantistoj en la spirito de patriotismo kaj internaciismo, malkompromisemo koncerne la reaktan ideologion, faŝismon, koloniismon, rasan diskriminadon kaj socian maljuston..."

Laŭ la sama gazeto, Prof. D-ro Mohamed Isaev, prezidanto de ASE, skribis interalie:

"Ankoraŭ kaj refoje indas emfazi, ke la lingvo Esperanto, same kiel ajna alia lingvo, estas ilo, ilo por komunikado. Per si mem ĝi portas nenian idean (el socia signifo de la vorto) ŝarĝon. Oni povas uzi ĝin tiel por bono, kiel por malbono. La plej multo de Sovetiaj Esperantistoj kaj interlingvistoj antaŭe kaj nun baziĝis sur tiu fundamenta marksisma-leninisma difino de la lingvo. Kaj en sia agado estonta la Esperantistoj devas konstante memori pri tio por ne allasi domaĝajn erarojn..."

R. Grandière komentis en la menciita numero de *SAT-Amikaro* la koncernajn partojn de la prezidanta deklaro jene:

"Tiu ĉi deklaro de la Prezidanto de A.S.E. en gazeto '*Moskvojaj Novaĵoj*' estos favore akceptata de parto de la esperantistaro. Alia parto ĝin refutas, kaj ne bonvole pretos kunlabori kun tiu specife neneŭtrala, naciema, nova asocio. Verŝajne, ni ne atendos longtempe la konsekvencojn de tiu reapero de Sovetiaj Esperantistoj sur la tutmonda scenejo. Scivoleme la esperantistaro observos, ĉu la prognozoj aperintaj en '*Hamburgo en Retrospektivo*' realiĝos, aŭ ne."

En la nuna momento (fine de aŭgusto) ankoraŭ ne estas konate, ĉu la Komitato de UEA en Lucerno lasis en la nova statutprojekto la kontraŭneŭtralecajn klaŭzojn, precipe la regulon, kiu ebligas, ke eĉ *evidente malneŭtrala, politika instanco rajtas* aliĝi al UEA kiel "aliĝinta landa asocio" (art. 13 de la projekto), kio jure fakte senigas la Komitaton de la ebleco rifuzi la aliĝpeton. Ankaŭ ne estas konate, ĉu ASE (aŭ eĉ ĝiaj unuopaj sekcioj en la 15 respublikoj?) jam petis aliĝon, kvankam plej kredeble tio baldaŭ okazos, se ĝi ne estas jam farita, ĉar ĝuste tio estas la

senco de la fondiĝo. Same kredeble, pro la nuna konsisto de la Komitato de UEA, tiu evidente partipolitika instanco (aŭ eĉ ĝiaj sekcioj en la 15 respublikoj aparte?) estos akceptitaj, kio signifos kompletan ekregon de la Asocio fare de *ekstermovadaj politikaj fortoj*. Tial provizore, ĝis klariĝos tiuj demandoj, ni prefere ne analizos la sencon de la esprimoj "paco", "sekureco kaj kunlaborado", "patriotismo kaj internaciismo", "reakcia ideologio, faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio kaj socia maljusto" en la *soveta*, ne *rusa*, Internacia aŭ kiu ajn nesoveta lingvo. Ni prokrastas, ĉar en la kadro de la neŭtrala Esperanto-Movado nin ne interesas la partipolitika programo de ASE, se ĝi restas ekster UEA. Tio estas afero de la esperantistaro en Soveta Unio. Se la Internacia Lingvo fakte komencos disvastiĝi en tiu granda lando, ni fidus ke unuopaj Esperanto-parolantoj trovos la eblecon komunikadi kaj interŝanĝadi ideojn kun ordinaraj esperantistoj en aliaj landoj ankaŭ ekster la oficiala linio. Principe, nin interesas nur la sorto de la iam partipolitike neŭtrala UEA kaj entute la sorto de la neŭtrale homa Internacia Lingvo, inspirita de neŭtrale homa humaneca internaciismo.

Ni tamen atentigas pri ĉap 3.2 de *Hamburgo en Retrospektivo*, en kiu estas prezentita la vera senco de la soveta "proleta internaciismo", diference de la normala, humaneca senco de la esprimo "internaciismo" kaj eĉ de la originala marksisma koncepto de "proleta internaciismo", kiel komprenata de Marx kaj Engels kaj kiel klare formulita en la *Komunista Manifesto*.

Aliflanke ni ne povos ne dediĉi apartan artikolon en la sekvanta numero de *Horizonto* al la profunde erara, science nedefendebla "fundamenta marksisma-leninisma (pli frue: "marksisma-leninisma-stalinisma", *mia rim.*) difino de la lingvo", laŭ kiu "ĝi (la lingvo) portas nenian idean (en socia signifo de la vorto) ŝarĝon".

Ĝuste tiu "idea ŝarĝo", nome idea aspekto, estas la kvintesenco de la lingva problemo en la mondo kaj tial esence grava por la kompreno de la signifo kaj rolo de la Internacia Lingvo.

Estus ankaŭ tre utile, se almenaŭ la sinceraj esperantistoj en la Komitato de UEA (tiaj ekzistas) legus aŭ relegus ĉap. 3.1 de *Hamburgo en Retrospektivo* rilate al SAT kaj la siatempa *Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)*. Ĉi tie ni memorigas nur pri p-to 6 de la Gvidrezolucio de IPE, akceptita en 1932, kiu tekstas laŭvorte:

"6. La laboristaj esperantistoj plene subtenas la devizojn de la proleta internaciismo, batalas kontraŭ imperialismo kaj faŝismo, subtenas la liberigan batalon de la supremataj nacioj kaj koloniaj popoloj, kontraŭ la supremantaj kaj sialandaj burĝaroj..."

Oni komparu tiun punkton 6 de la jaro 1932 kun la nuna programo de la ĵus fondita ASE kaj kun la deklaro de ĝia prezidanto, kaj oni mem konkludu. La likvido de IPE kaj la tragika sorto de ĝia gvidantaro malgraŭ la p-to 6 estas bone konataj.

32 Franca rotaria revuo pri Esperanto

Plenaj dudek grandformataj paĝoj de la luksa franca periodaĵo *Le Rotarien* (Franca Rotaria Revuo) estas dediĉitaj al Esperanto en la maja numero. La artikolaron enkondukas Claude Chappat, membro de la Centra Konsilio de Rotario Internacia. En la kajero troviĝas tekstoj de konataj rotarianoj, inter kiuj R. Levin, D-ro P. Rizzo, K. Söderberg, K. T. Knol kaj N. Williams. Traduko de parteto de *Esperanto en Perspektivo* prezentas la lingvan problemon en Unuiĝintaj Nacioj. Aparte gravaj estas la kontribuajtoj de Claude Piron kaj Jean Thierry. La tuto estas riĉe ilustrita per portreto de D-ro Zamenhof kaj diversaj fotoreproduktaĵoj, inkluzive kovrilpaĝojn de diversaj Esperanto-periodaĵoj. Oni povas esperi, ke tiu unika numero de *Le Rotarien* kontribuos al disvastiĝo de Esperanto en rotariaj medioj.

33 Kontraŭstatuta elekto de la Estraro de la Akademio

33.1 Enkonduka rimarko

La ĵus okazinta elekto de la Estraro de la Akademio de Esperanto estis tiel aranĝita, ke ĝi pli similas al nomigo fare de la prezidanto ol al normala laŭstatuta elekto. Ĉar la situacio en la Akademio ne koncernas nur ĝiajn membrojn, sed estas afero, kiu interesas, aŭ devas interesi, la tutan esperantistaron, la redaktoro de tiu ĉi rubriko, samtempe unu el la plej malnovaj membroj de la Akademio, decidiĝis publikigi la plej esencajn faktojn.

Oni povis esperi, ke almenaŭ la Akademio estos ŝparita de tiaspecaj agoj, kiuj devus ne okazi en kiu ajn institucio bazita sur demokrataj principoj eĉ se la prezidanto havis la plej bonajn intencojn, kiel li asertas kaj mi plu deziras kredi. Per prudento kaj iom da bona volo la krizo, provokita tute superflue, povas esti kontentige solvita eĉ en tiu ĉi malfrua stadio. Tio estas en la intereso de la Akademio, de ĝiaj digno kaj prestiĝo, sen kiuj ĝia rolo de "nedependa Lingva Institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon" (art. 1 de la Statuto), ne estas imagebla.

33.2 Anonco de la elekto kaj unuaj reagoj

Prof. G. Waringhien, la prezidanto de la Akademio, anoncis la elekton per sia Cirk. n-ro 126 de la 20-a de junio 1979. En ĝi li deklaris, ke pro sia aĝo kaj pro la neceso rejunigi la kadrojn de la Akademio, li decidis forlasi la postenon de prezidanto, kiun li okupas jam de 16 jaroj. La sekretario-kasisto, s-ro R. Bernard, decidis sekvi lian ekzemplon kaj forlasi sian postenon. La anonco tekstas:

"Post kelka insisto mi decidigis mian amikon William Auld akcepti la kandidatecon al Prezidanteco, kaj li nun prezentas jenan liston por la Estraro: prezidanto William Auld; vicprezidantoj Paul Neergaard, Stojan Ĝuĝev; sekretario Albert Goodheir. Komprenoble, aliaj kandidatoj por la prezidanteco estas akcepteblaj: se iuj havas la intencon prezenti alian liston por la Estraro, mi petas ilin bonvoli informi min pri tio antaŭ la 1-a de julio."

Per sia letero de la 12-a de julio 1979 Akademiano Mag. R. Rossetti formale informis la prezidanton, ke li "konsterne legis la proponon pri Auld kiel sekvonta nia prezidanto". Samtempe li kontraŭproponis Akademianon Kawasaki, "kies elstarajn meritojn mi ne bezonas substreki".

Tuj post la reveno el Aŭstralio, la 18-an de aŭgusto 1979 mi skribis al la prezidanto apoge al la letero de Akademiano Rossetti. En tiu letero mi skribis interalie: "Aldone al Kawasaki, kiun proponas Rossetti, mi nur mencias la nomojn de Minnaja, Neergaard, Régulo Pérez, Pennachietti, Piron kaj Wells". En la fino mi skribis:

"En ĉiu okazo mi ege bedaŭras, ke vi ne ebligis al la membroj de la Akademio interkonsiliĝi pri eventualaj kandidatoj, tiel ke ni povu elekti Estraron, kiu el ĉiuj vidpunktoj estu kiel eble plej taŭga kaj reprezenta. Mi insiste petas vin tuj ebligi tion per deklaro al la Akademio, ke la kandidatigo de s-ro William Auld estas via persona propono kaj ke la membroj de la Akademio rajtas prezenti aliajn proponojn plej malfrue ĝis la 31-a de decembro de tiu ĉi jaro."

33.3 Unusola listo kaj plia oficiala propono

Per sia longa persona letero de la 27-a de aŭgusto la prezidanto informis min, ke li ĵus, t.e. la 27-an, ricevis mian oficialan leteron de la 18-a de aŭgusto, do tro malfrue, ĉar lia Cirk. n-ro 127 de la 27-a de aŭgusto estis verkita de li jam la 20-an forsendita de la sekretario la 25-an de tiu monato. Mi ne deziras dubi pri la ĝusteco de tiuj informoj, sed en ĉiu okazo, eĉ se la Cirk. 127 estis jam ekspedita, nenio malhelpis sendi plian cirkuleron kun mia propono, esence grava por okazigo de elekto en bona ordo. Mi mem ricevis lian leteron de la 27-a jam la 29-an, do 2

tagojn post la ekspedo, kaj la saman tagon denove petis prokraston de la elekto ĝis la fino de la jaro por ebligi aliajn kandidatigojn. Samtempe mi proponis akademianon Mag. Reto Rossetti kiel plian taŭgan kandidaton por la prezidanteco, se li konsentas.

Nur post tio kaj post mia forveturo al la 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Ateno, estis liverita la menciita Cirk. 127 de la 27-a de aŭgusto, kiun mi trovis hejme post la reveno la 30-an de septembro. En tiu cirkulero la prezidanto informis pri la sinkandidatigo de s-ro R. Hauptenthal al la posteno de Sekretario-Kasisto de la Akademio. Per la sama cirkulero la prezidanto voĉdonigis la Akademion pri la sola listo, proponita de li mem kaj de la prezidanto-kandidato, kun aldono de s-ro Hauptenthal kiel plia kandidato al la posteno de sekretario-kasisto. Li ankaŭ informis, ke la voĉdoniloj devas atingi la adreson de la sekretario antaŭ la 1-a de oktobro.

Konstatinte tion, la 6-an de oktobro 1979 mi proponis en oficiala letero al la prezidanto, ke la elekto de la Estraro estu nuligita pro tri gravaj principaj kaj formalaj kaŭzoj. La teksto de la propono, pri kiu mi petis voĉdonigon de la tuta Akademio estis:

"La elekto de la Estraro de la Akademio de Esperanto, aranĝita per la cirkulero n-ro 127 de la 27-a de aŭgusto 1979 estu nuligita kaj nova elekto estu aranĝita komence de 1980 por ebligi al la membroj de la Akademio interkonsiliĝi kaj eventuale prezenti pliajn kandidatojn ĝis la 31-a de decembro 1979."

La kvintesenco de la propono estas entenata en mia letero de la 29-a de oktobro, kiu komplete aperas sube kaj tial ne necesas resumi la argumentojn ĉi tie. Necesas tamen atentigi, ke mi eksplicite petis la prezidanton ne nur voĉdonigi la Akademion, pri la menciita propono, sed ankaŭ sendi al ĉiuj membroj la kompletan tekston de la letero de la 6-a de oktobro.

33.4 Apogoj al la propono pri nuligo de la elekto

La proponon de la 6-a de oktobro mi sendis fotokopie 2-3 tagojn poste nur al kelkaj membroj de la Akademio. Kvar akademianoj apogis la proponon per leteroj al la prezidanto kun kopioj al mi.

Akademiano R. Rossetti skribis en sia letero de la 10-a de oktobro: *"Ĉiupunkte mi aprobas viajn leteron kaj proponon al Waringhien, kaj tion mi hodiaŭ indikos al li... Via protesto al Waringhien estas modelo de ĝentileco kaj metodo, kaj mi ĝojas, ke vi elpaŝis. Mi esperas, ke ankaŭ iuj aliaj ekmurmuris pri la arbitra procedo de nia prezidanto."*

Akademiano Pastro W. J. Downes skribis interalie en sia letero de la 16-a de oktobro al la prezidanto, ke li donas sian tutan konsenton al

la propono kaj plenforte subtenas mian peton, ke la prezidanto sendu al ĉiuj membroj ankaŭ kopion de mia letero de la 6-a de oktobro. Li daŭrigis:

"Mi estas danka al D-ro Lapenna pro tio, ke li tiel klare kaj precize esprimis tion, kion li, kaj plejeble multaj aliaj akademianoj, sentis pri la proceduro. Ĝi estis tiel multe diferenca de tiu, kiun oni uzis je antaŭaj voĉdonigoj. Ĝi estis des pli bedaŭrinda pro tio, ke la voĉdonado koncernis la du plej gravajn oficojn de la Akademio. Al mi ĝi havis la aspekton de afero, kiun oni faris en la kulisoj, ne sur la scenejo. Io nekonata al la Akademianoj estis okazinta antaŭ la voĉdonigo, kaj tio estigis demandojn, eĉ suspektojn, kio kaj kial? Plejeble estis bonaj motivoj, sed ni ne sciis ilin..."

Akademiano D-ro Andre Albault skribis, interalie, en sia letero de la 16-a de oktobro al la prezidanto:

"Fakte la argumentoj estas validaj kaj solidaj... Elektro de nova Estraro kaj ĉefe de nova Prezidanto estas fakte unu el la plej gravaj agoj de nia Institucio. Akademia periodo valoras laŭ ĝia prezidanto kaj laŭ la kunigiteco de la membroj ĉirkaŭ sia Prezidanto. Kaj efektive manko de antaŭa diskutado povas kuntreni pasivecon kaj lasi al la membroj la impreson, ke ne okazis elektoj. Mia persona opinio estas, ke en tia grava elekto eĉ se nur unu petas prokraston, tio ne povas esti rifuzita... Pro tio mi apogas la peton de Prof. Lapenna voĉdonigi la Akademion."

Akademiano Prof. J. Régulo Pérez skribis en sia letero de la 19-a de oktobro al la sekretario-kasisto por la prezidanto:

"Post konscienca pripensado, mi opinias, ke la juraj konsideroj de Kolego Lapenna estas fundamente atentindaj, kaj sekve mi apogas, ke la Akademio voĉdonigu la membrojn pri la propono de Prof. Lapenna rilate nuligon de la ĵusa voĉdono por elekto de la nova Estraro. Kaj, se plimulto tion decidus, ke la Akademio rearanĝu novan voĉdonon."

33.5 Rifuzo voĉdonigi la Akademion kaj lasta reago

Okazis plia korespondado inter kelkaj Akademianoj kaj interŝanĝo de leteroj inter la prezidanto kaj mi. Per sia letero de la 24-a de oktobro al mi ankaŭ akademiano D. B. Gregor esprimis "plenan konsenton" kun la propono de la 6-a de oktobro, sed estis tro malfrue por skribi al la prezidanto, ĉar intertempe alvenis lia Cirk. n-ro 128 de la 22-a de oktobro, per kiu li informis pri la rezulto de la voĉdonado. Do, tiu tuta korespondado estis vana. La prezidanto rifuzis voĉdonigi la Akademion pri propono de 5 ĝiaj membroj rilate gravegan proceduran demandon. La membroj de la Akademio, kiujn ĉefe koncernas la maniero, laŭ kiu estis aranĝita tiu "elekto" – laŭ mia scio unika en la historio de la

Akademio – jam ricevis tiun cirkuleron kaj tial mi ne ripetos ĝian enhavon. La aliaj legantoj facile komprenos pri kio temas el mia reago publikigita sube. Ĉi tie estu nur aldonite, ke laŭ la menciita Cirk. 128 estas elektitaj s-roj W. Auld kiel prezidanto, D-ro Neergaard kaj Prof. Ĝuĝev kiel vicprezidantoj, kaj A. Goodheir kiel sekretario-kasisto.

Jen la kompleta teksto de mia lasta reago:

Prof. D-ro Ivo Lapenna
77, Grasmere Avenue,
Wembley, Middx. HA9 8TF.

Londono la 29-an de oktobro 1979

Kopie al kolegoj D-ro Albault,
Pastro Downes, Prof. Regulo,
Mag. Rossetti kaj s-ro D. B. Gregor

Al Prof. G. Waringhien,
Prezidanto de la Akademio de Esperanto,
Tour Tokyo 1251 - 20 Av. D'Ivry,
F 75645 Paris Cedex 13.

Estimata Prezidanto,

La enhavo de via cirkulero n-ro 128 de la 22-a de oktobro 1979 devigas min esprimi al vi mian plej fortan proteston pro jenaj kaŭzoj:

1. Jam la 18-an de aŭgusto, do antaŭ ol vi forsendis la cirkuleron de la 27-a de aŭgusto, mi oficiale petis vin prokrasti la elekton ĝis la fino de la jaro por ebligi ev. aliajn kandidatigojn. La samon mi ripetis la 29-an de aŭgusto. Estis via devo kiel prezidanto observi oficialan peton de membro, faritan ekskluzive en la intereso de la Akademio. Konsterne por mi, vi malatentis ĝin kaj anstataŭe tuj voĉdonigis la Akademion pri la sola kandidato, kiun vi mem elektis kaj rekomendis. Tio devigis min fari la proponon de la 6-a de oktobro *al la Akademio* pere de vi kiel ĝia prezidanto pri la nuligo de la nun aranĝita elekto kaj laŭorda okazigo de nova elekto komence de 1980. Diference de tio, kion vi asertas en via cirkulero 128, mian proponon apogis ne nur kolegoj Rossetti kaj Albault, sed ankaŭ Downes kaj Régulo, do preskaŭ ĉiuj, al kiuj mi sendis fotokopion de la propono. Estis kaj plu estas via devo voĉdonigi la Akademion pri propono de 5 membroj (v. ankaŭ art. 13 de la Statuto, certe aplikebla ankaŭ en tiu ĉi kazo) kaj ne prejudece aserti, ke "la propono pri nuligo havas tro malmulte da ŝancoj esti akceptita", kiel vi faris. Eble vi pravas, eble ne, sed en ĉiu okazo ne estas tasko de la prezidanto donadi tiajn arbitrajn juĝojn kaj sub tia kaj similaj pretekstoj rifuzi voĉdonigon.

2. En mia propono de la 6-a de oktobro mi eksplicite petis, ke vi sendu al ĉiuj membroj *la kompletan tekston de tiu letero*. En sia letero de la 16-a de oktobro Pastro Downes same eksplicite petis vin, ke vi sendu al ĉiuj membroj *kopion de mia letero de la 6-a de oktobro*. Anstataŭ agi tiel, kiel vi estus devinta agi eĉ sen tiuj eksplicitaj postuloj, vi laŭplaĉe resumis ĝian enhavon, sen kia ajn mia scio, por povi tiel "kontraŭargumenti" ne miajn argumentojn, sed deformitajn argumentojn laŭ via propra resumo. Tion mi rigardas ege malkorekta principe kaj mallojala persone.

3. Vi mem rekonas, ke vi dum tre longa tempo "per korespondado kaj kongresaj konversacioj" serĉis taŭgan kandidaton kaj fine faris vian proponon. Tio estas via rajto kaj devo. Sed kun kiu rajto vi senigis la aliajn membrojn de la Akademio de la samaj rajto kaj devo? Dum vi "esploris" la aferon plurajn monatojn, eble eĉ jarojn, vi postulis en la Cirk. 126 de la *20-a de junio*, ke oni eventuale prezentu al vi alian liston *antaŭ la 1-a de julio*, kio evidente malebligis kian ajn alian kandidatigon. Multaj membroj eĉ ne povis ricevi vian cirkuleron antaŭ la 1-a de julio por ne paroli pri prezento de bone pripensita alternativa listo. Tamen la sorto kaj estonteco de la Akademio ne estas nur via zorgo, sed zorgo de ĉiuj ĝiaj membroj.

4. Vi asertas, ke oni estus povinta per "simpla telegramo" konigi sian intencon kaj ke vi estus lasinta al la iniciatinto "la tutan necesan tempon por trovi siajn samlistanojn". Unue, kial, do, fiksi la 1-an de julio kiel limdaton, kion ĉiu serioza leganto *devas kompreni kiel limdaton*, se vi tamen anticipe intencis doni al la iniciatinto "la tutan necesan tempon"? Due, kial postuli de la aliaj eĉ sendon de telegramo, dum vi mem prenis por vi amason da tempo por trovi vian kandidaton? Trie, mi mem, tuj post tralego de via Cirk. 126, jam la 18-an de aŭgusto petis prokraston kaj samtempe menciis nombron da aliaj kandidatoj, *sed vi ne donis al mi la necesan tempon por prezenti alternativan liston*. Vi eĉ ne donis tempon por interŝanĝi pensojn pri la meritoj de la kandidatoj proponitaj de vi resp. de la kandidato al la prezidanteco.

5. Same nekredeble mallongan tempon vi donis por la voĉdonado mem, *nome eksplicite antaŭ la 1-a de oktobro*. Nun montriĝas, ke vi arbitre, ne informinte anticipe la membrojn, ŝanĝis la limdaton al la 15-a de oktobro. Reveninte hejmen la 30-an de septembro mi tuj telefonis el Londono al la sekretario, s-ro R. Bernard, por protesti ankaŭ pro tiu mallongega tempolimo. Tamen, 2-3 tagojn poste, mi sendis mian voĉdonilon, nur por vidi ĉu ĝi estos prenita en konsideron. Nun mi vidas, ke vi akceptis ĝin kiel validan. Fakte, tiu mia voĉdonilo, same kiel ĉiuj aliaj ricevitaĵoj post la 30-a de septembro, devis ne esti prenitaj en konsideron, ĉar la limdato pasis. Se vi jam faris la eraron fiksi tiel mallongan tempolimon, vi devis

ne fari alian eraron, nome kalkuli kiel validajn la voĉdonojn ricevatajn post tiu limdato. Kaj kial, cetere, ĝuste la 15-a de oktobro? Kial, se kolego De Diego ne almetis la mencion "elektoj", lia letero ne estis malfermita kaj, pro tiu eraro li ne povis ricevi novan balotilon? Kaj kial balotiloj ricevataj inter la 1-a kaj 15-a de oktobro estis validaj, dum li estis senigita de la rajto voĉdoni pro tiu plua eraro en tiu ĉi elekto tiom antaŭaranĝita?

6. Ne temas pri trovo de proceduro, kiu kontentigus la plimulton, kiel vi asertas, sed pri apliko de laŭorda proceduro, konforma al la spirito de la Statuto kaj al ĉiuj precedencoj, do proceduro, *kiu kontentigas ĉiujn*.

7. Fine, la fakto, ke tiel multaj kolegoj voĉdonis por la sola listo neniel signifas, ke ili ne estus voĉdonintaj alimaniere, se ekzistus alia listo, aŭ almenaŭ pluraj kandidatoj por la diversaj postenoj, aŭ eĉ se nur la membroj estus havintaj la eblecon interŝanĝi la pensojn pri la meritoj de la unuopaj kandidatoj. Kiel konate, ekzistas en la mondo elektosistemoj, en kiuj la sola listo de kandidatoj ĉiam ricevas eĉ pli ol 99% de la esprimataj voĉoj. Mi ne opinias, ke tia elektosistemo estas taŭga por la elektoj en la Akademio. Mi eĉ kuraĝas fidi, ke la "elektitoj" mem ne estas tre kontentaj, ke ili estis "elektitaj" en tiel evidente manipulita elekto. Mi mem certe malakceptus la rezultojn de tia "elekto".

Pro ĉio supre dirita mi bedaŭrinde ne povas konsenti, ke la elekto estis farita laŭ "demokrata maniero" kaj tial ankaŭ ne povas rigardi la rezulton kiel reflektantan la opinion de la Akademio en tiu ĉi gravega afero. Tute aparte mi bedaŭras, ke post tiom da jaroj da kunlaborado en la Akademio kaj ekster ĝi, ĉiam por la bono de nia afero, viaj lastaj agoj kiel prezidanto devigis min al tiu ĉi paŝo.

Kun estimo,

sincere via

D-ro Ivo Lapenna

33.6 Konkluda rimarko

La publikigon de la supraj informoj pri faktoj mi rigardas kiel plenumon de devo al la Akademio kaj, pli vaste, al la Esperanto-Movado. Aparte mi akcentas, ke, laŭ mia kompreno de demokrata proceduro, neniu, eĉ ne la plimulto, povas senigi membrojn de ilia rajto kaj devo proponi kandidatojn kaj diskuti pri iliaj meritoj. Surbaze de la prezentataj faktoj ĉiu leganto povos facile formi sian propran opinion pri la valideco de tiaspeca elekto. Mi mem formis la mian.

Superflue diri, ke tiu ĉi malkonsento pri grava procedura punkto neniel ŝanĝas mian altan respekton por la grandega verko de Prof. G. Waringhien. Mi fidus, ke li celis nur bonon, sed mi mem kaj la aliaj

apogantoj de mia propono, certe ne malpli ol la prezidanto, same tiel celas nur la bonon.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 20 de *Esperanto en Perspektivo*.

34 Plia kontraŭneŭtraleca falsajŝo: faŝismo kulpas pro la persekutoj de esperantistoj en USSR

En la ĉefartikolo de *Horizonto* n-ro 4/79, p. 69, kaj en la rubriko ED publikigita en n-ro 5/79 estas analizita la partipolitika karaktero de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). En la oktobra numero de *Esperanto*, organo de UEA, aperis artikolo de Boris G. Kolker, ĉefdelegito de UEA por Soveta Unio, sub la titolo "Landa Movado sur Nova Nivelo" okaze de la fondiĝo de ASE. En tiu artikolo, kiel oni povis atendi, troviĝas pluraj misprezentoj, el kiuj la plej ŝoka estas jena historia falsajŝo:

"En la fino de la 30aj jaroj okazis malaktivigo de la movado /en Soveta Unio, mia rim./ . Tion kaŭzis unuavice la katastrofa malboniĝo de internaciaj rilatoj, kiu manifestiĝis en faŝismiĝo de Eŭropo, la dua mondmilito, kiun sekvis deko da jaroj de 'malvarma' milito ktp."

Do, laŭ tiu aserto de ĉefdelegito de UEA, publikigita en la oficiala organo de UEA, ne temis pri senprecedencaj persekutoj kaj mortigoj de esperantistoj, sed pri "malaktivigo" de la Esperanto-Movado en tiu lando. Kaj pri tiuj krimoj, maskitaj per la vorto "malaktivigo", ne respondecas la stalinisma soveta reĝimo, sed kulpas la "faŝismiĝo de Eŭropo", la dua mondmilito kaj la "malvarma" milito!

Kompreneble, la konantojn de la historio de la Esperanto-Movado ne trompos tiaj falsajŝoj, sed multajn aliajn ili povus facile trompi, des pli ke la prezidanto de UEA sur p. 165 de la sama numero flate asertas, ke la esperantistoj *"estas pretaj submetiĝi al la komuna volo kaj la komuna idealo, se ĝi estas prezentita senvuale kaj maksimume honeste"*.

Nu, vere senvuale kaj maksimume honeste D-ro U. Lins prezentis la persekutojn de Esperanto-parolantoj en diversaj landoj, inkluzive Sovetan Union, unue en sia libro *La Danĝera Lingvo* (1973) kaj tuj poste en Ĉap. 21.4.1 de *Esperanto en Perspektivo* (EeP). Interalie li skribis pri la persekutoj en Soveta Unio:

"Drezen estis mortpafita en 1937, same kelkdeko da gvidantoj. En Ĥarkov pereis en la sama jaro du bone konataj esperantistoj, V. Kolĉinskij ("Elsudo") kaj V. Kuzmiĉ... Ordinaraĵoj de SEU suferis dum deko aŭ pli da jaroj pezan punlaboron en siberiaj koncentrejoj, dividante tiun sorton kun multegaj aliaj viktimoj de la stalina teroro; el ili nur tre malmultaj revenis, el la pli konataj nur G. Demidjuk kaj P. Ŝumilov. Inter la funkciuloj de la postmilita renaskiĝinta

Movado en Soveta Unio troviĝis nur tri iamaj ĉefaktivuloj de SEU: S. N. Podkaminer, Gurgen Sevak kaj E. A. Bokarev... Rilate la nombron de la viktimoj tre diverĝas la taksoj: laŭ Rytjkov, 30.000 estis arestitaj, el kiuj la plej multaj pereis; esperantistoj en GDR foje parolis pri 2.000 mortintoj" (P-oj 722-723).

Tio estas la senvuala kaj maksimume honesta vero, objekte prezentita de D-ro Lins, nuntempe unu el la trimembra Estraro de la nova CED de UEA. Oni devus atendi, ke tia objektiva historiisto publike protestos pro tiu falsaĵo publikigita en la organo de UEA.

Necesas aldoni, ke la 19-an de marto 1973, do antaŭ la hamburgaj eventoj de 1974, la "reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, kiuj kunvenis en Budapeŝto la 19-an de marto 1973" adresis pere de s-ro N. Aleksiev, tiama prezidanto de la bulgara BEA, fortan proteston al la CO kaj al mi kiel tiama honorofica direktoro de CED pro la intenco publikigi Ĉap. 21.4.1 de *EeP*. La "protestintoj" iamaniere estis eksciintaj pri tiu parto de la verko pli ol unu jaron antaŭ la publikigo. En la protesto estis ankaŭ dirite:

"Ni ne vidas socian bezonon de nova aktualigo de tiu temo /persekutoj kontraŭ Esperanto en Soveta Unio kaj 'socialismaj landoj' en la tempo de stalinismo, mia rim./: ja plej aŭtoritataj gvidorganoj en la koncerna landoj delonge likvidis tiun praktikon kaj agas tute male... Prave tiuj rondoj kaj la esperantistaro en niaj landoj /ĉu fakte la esperantistaro?, mia rim./ pritaksos ĉion ĉi kiel antisocialisman manovron. Tio povas nur malutili al nia estonta agado... Ĉiuokaze ni postulas /substrekiti en la originalo/, ke en la eldono de UEA aperu nur informoj, kiuj estas aprobitaj de la esperantistoj /legu: altruditaj de la partifunkciuloj en la koncerna lando, mia rim./ Ni protestas kontraŭ la memcela aperigo de la ĉapitro 'Persekutoj kontraŭ Esperanto', ĉar ĝi povas alporti nur domaĝon por la afero de la Internacia Lingvo."

En mia verko *Hamburgo en Retrospektivo*, p-oj 52-53, estas iom pli detale prezentita tiu "postulo", kiun la tiama Estraro de UEA laŭ mia propono nete rifuzis kaj, kiel konate, la koncerna ĉapitro aperis en *EeP*. En la menciita libro mi komentis: Se fakte la "gvidorganoj" jam likvidis tiun praktikon kaj agas male, do la prezento de persekutoj sub stalinismo devus kontribui al "likvidado de tiu praktiko" kaj fortikigi la "malan agadon". Kaj se la prezento de la persekutoj estas "pritaksata" kiel "antisocialisma manovro", ĉu, do, la persekutoj estis "socialisma manovro"? Mi ankaŭ skribis laŭvorte:

"Estus interese vidi kiel reagus la nuna Estraro, plene dependa de la bloko kaj ĝiaj okcidentaj aliancanoj, je tiaspeca protesto."

Klaran respondon donas la falsaĵo publikigita en *Esperanto*. Tio estas nur unu el la multaj kazoj, kiuj montras la esencan diferencon inter ĉiuj ĝishamburgaj estraraj de UEA, firme sendependaj kaj observantaj nur

la Statuton de la Asocio, kaj la posthamburgaj gvidantaroj troviĝantaj sub forta influo kaj daŭre kreskanta premo de partipolitikaj instancoj en UEA mem.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 21.4 de *EeP*.

35 Esperantistoj Šváček kaj Srna kondamnitaj kondiĉe

En la eroj 22 kaj 28 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-roj 6/78 kaj 2/79) troviĝas detalaj informoj pri la kriminaljuraj persekutoj kontraŭ la esperantistoj M. Šváček kaj V. Srna pro agoj (celebrado de meso kaj helpado al celebrado de meso), kiuj apartenas al la fundamentaj homaj rajtoj laŭ la Universala Deklaracio kaj laŭ la du Internaciaj Paktoj, kiujn ratifikis ankaŭ Ĉeĥoslovakio kaj kiuj tial fariĝis parto de la interna juro de tiu lando. En la persekutoj aktive partoprenis funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), samtempe funkciuloj de UEA.

Ni ĵus ricevis la juĝon de la Distrikta Tribunalo en Ústí nad Orlicí, n-ro IT 29/79 de la 18-a de majo 1979, laŭ kiu M. Šváček estas kondamnita je la puno de malliberigo en la daŭro de dek kvin monatoj, kaj V. Srna je la puno de malliberigo en la daŭro de unu jaro kaj je la puno de malpermeso praktikadi la profesion de pastro dum tri jaroj. En ambaŭ kazoj la plenumo de la puno de malliberigo estas kondiĉa dum periodo de tri jaroj, kio signifas ke la du kondamnitaj ne estos malliberigitaj, kondiĉe ke dum tri jaroj ekde la dato de la juĝo ili ne perpetru (faru) alian "krimon".

Kvankam la akuzo, proceso kaj juĝo estas evidente kontraŭleĝaj, tamen la puno certagrade prezentiĝas kiel kompromiso inter la premoj de humanecaj, homrajtaj fortoj ekster Ĉeĥoslovakio (artikoloj en kelkaj Esperanto-periodaĵoj kaj en multaj nacilingvaj gazetoj, Amnestio Internacia, individuaj leteroj al ambasadoj de Ĉeĥoslovakio) kaj la kontraŭleĝaj postuloj de la partio: severa "ekzempla" puno pro la partiaj postuloj, sed puno "kondiĉita" pro la humanecaj premoj. Estas notinde, ke jam antaŭ la juĝo Šváček estis eksigita el ĈEA kaj sekve el UEA (Srna verŝajne ne estis membro).

En la organoj de UEA neniam aperis kio ajn pri la juĝo kaj pri tiu tuta hontinda persekuto de du lojalaj kaj sinceraj esperantistoj, nek oni povas sciiĝi ĉu almenaŭ la Komitato de UEA estis informita pri ĝi. Tial oni ankaŭ ne povas ekscii ĉu eĉ tiajn agojn la Komitato rigardas konformaj al neŭtraleco laŭ art. 4 kaj 13 de la Statuto, formale ankoraŭ valida, aŭ ĉu la Komitato "restas kontenta" (verŝajne malbona traduko

de la angla "satisfied"), ke ĈEA estas "vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro... religia sinteno", laŭ art. 13 de la plej lasta statutprojekto. Tamen, D-ro Tonkin kategorie asertas, ke la nuna gvidantaro agas "senvuale kaj maksimume honeste" (*Esperanto*, n-ro 10/79, p. 165). Ni lasas al la legantoj juĝi, ĉu estas tiel, aŭ la nuna gvidantaro kaŝas le veron sub la netravidebla vualo de ŝtala cenzuro por ne malplaĉi al partipolitikaj fortoj en UEA, agantaj laŭ la instrukcioj de la identaj partipolitikaj fortoj ekster UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo*.

36 Neŭtraleco forigita el art. 13 de la statutprojekto

Sub la premo de nekontestebaj faktoj pri la politikiĝo de UEA sub la posthamburga gvidantaro, la Komitato de UEA sentis sin devigita formale deklari en Rezolucio de 1975, ke "la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en artikoloj 4 kaj 13 de ĝia Statuto ĉiam estis, kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigos la neŝanceleblan bazon de ĝia ekzistado" (*Esperanto*, n-ro 9/75, p. 142, *nia substreko*).

Ĉiu, kiu legis la dokumentan materialon en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj poste en tiu ĉi rubriko de *Horizonto*, scias, ke tiu deklaro estis malvera en la momento, kiam ĝi estis farita, kaj restis tia. Tamen, almenaŭ formale la Komitato eksplicite promesis, ke art. 13 de la Statuto, kiu klare preskribas, ke nur Esperanto-Asocio "neŭtrala laŭ la senco de art. 4" povas aliĝi al UEA, restos valida. Efektive, kiel analizite en *Horizonto* 1/79 (p-oj 3-4), sen tiu esenca klaŭzo de art. 13, la principo de neŭtraleco formulita en art. 4 de la Statuto perdas ĉian sencon. Nun la plej lasta statutprojekto ankaŭ formale forigis el art. 13 la kondiĉon pri neŭtraleco de la aliĝintaj asocioj. Tio estas kruda malobservo de propra promeso, sed, kiel dirite supre, laŭ D-ro Tonkin la nuna gvidantaro agas "senvuale kaj maksimume honeste".

Tiu ĉi ero kompletigas Ĉap. 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo*.

37 Delegitoj de UEA denove registrataj ĉe politika polico

El cirkulero de s-ro Linhart Rýznar, ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥoslovakio, de novembro 1979, plian fojon klare montriĝas, ke la "delegitoj de UEA" en tiu lando estas fakte nomataj de politikaj instancoj, registrataj ĉe la politika polico kiel "eksterlandaj funkciuloj" kaj tial ne

plu povas esti rigardataj kiel delegitoj de UEA, sed kiel delegitoj de tiuj instancoj en UEA (v. ankaŭ eron 26 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto*, n-ro 1/79).

Al la cirkulero, en kiu troviĝas pluraj gramatikaj eraroj, estas aldonita "Respondilo de la Delegito". Punkto C de la Respondilo enhavas "proklamon" / deklaron/, kiun la "sinproponinto" devas subskribi. Ĝi tekstas: *"En kontakto kun eksterlando mi respektos la programon de la Landa Esperanto-Asocio kaj de la ŝtato. Mi rifuzos servojn, kiuj povus malutili al la Esperanto-Movado kaj al enlanda evoluo"*.

Apenaŭ necesas diri, ke la programoj de la Esperanto-instancoj en Ĉeĥoslovakio, ambaŭ aliĝintaj asocioj de UEA, estas identaj al la ŝtata-partia politika programo. En sia cirkulero la ĉefdelegito de UEA klarigas, ke komenciĝis "nova registardo" de la delegitoj laŭ la "novaj preskriboj" (ŝtataj, kompreneble) kaj ke necesas denove plenigi la Respondilon, eĉ se la koncerna persono "jam dum pluraj jaroj plenumis la delegitan funkcion". Li daŭrigas: "Per plenumo de la Respondilo vi ankaŭ plenumas la kondiĉon, laŭ kiu vi estos registrita kiel eksterlanda funkciulo. Tiun taskon prizorgos la Ĉeĥa Esperanto-Asocio post la ricevo de ĉiuj Respondiloj de UEA-delegitoj". La sinproponon devas apogi per siaj subskriboj "du funkciuloj" de la loka Esperanto-grupo, aŭ "du membroj de ĈEA kun multjara membreco", evidente politike fidindaj, kiuj *"funkcias kiel viaj garantiintoj"* (ne tre agraba "funkcio", se la "delegito de UEA" tamen iel devojiĝas de la "programo"). Eĉ post la plenumo de ĉiuj-ĉi kondiĉoj la "sinproponinto" ankoraŭ ne rajtas fariĝi delegito, ĉar la finan decidon faras "la estrarkunsido de la Landa Esperanto-Asocio" (legu: la partiaj funkciuloj en la du estraroj), kiu, se la delegiteco estas aprobita, informos pri tio la "sinproponinton" kaj la CO de UEA. Krome, kiel dirite, ĝi sendos la tutan liston kun detaloj pri ĉiuj "delegitoj" kaj garantiintoj – en tiaj kondiĉoj feliĉe ne tre longan – al la politika polico.

Ke tiuj reguloj estas komplete kontraŭaj al la antaŭa Statuto de UEA, ne povas esti dubo. Sed oni povas demandi sin, ĉu la kondiĉoj pri politika fideindeco respondas eĉ al art. 13 de la nova Statuto, laŭ kiu nur "landa asocio... vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno..." povas aliĝi al UEA. Eble tamen troviĝos almenaŭ kelkaj komitatoj de UEA, kiuj ne "restos kontentaj pri la plenumo de la kondiĉoj" de art. 13 "por daŭra aliĝinteco" almenaŭ en tiu ĉi kazo.

Antaŭ multaj jaroj N. Hohlov verkis komedieton *La Morto de la Delegito de UEA*. Temis pri ŝajna fizika morto. Eble iu sprita nuntempa verkisto povus skribi tragikomedieton ne pri ŝajna, sed pri fakta morala morto sub la sama titolo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 12.2 kaj ĉap. 18.4.2.6 de *Esperanto en Perspektivo*.

38 Nun ankaŭ Ĉinio atakata

Laŭ *der esperantist* n-ro 95, la reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj en Bulgario, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando (ĉiuj aliĝintaj asocioj de UEA, do konsista parto de tiu organizaĵo), Soveta Unio kaj Vjetnamio (ŝajne ankoraŭ nealiĝintaj) dum sia 12-a Interkonsiliĝo en Viŝegrad (Hungario) akceptis rezolucion, per kiu ili "esprimas sian fortan indignon pri la malica agreso de Ĉinio kontraŭ la pacama Socialisma Respubliko Vjetnamio, pri la barbaraj krimoj de la ĉinaj trupoj kontraŭ la civila vjetnamia loĝantaro" (p. 10).

Do, al la "imperialismaj agresoj" de Usono, Israelo kaj aliaj "imperialismaj" landoj nun aldoniĝas "malica agreso" kaj "barbaraj krimoj" de Ĉinio, laŭ nia scio iam rigardata kiel socialisma lando fare de la ŝtatoj en la soveta bloko. Ĉio ĉi okazas en la kadro de UEA, tute konforme al la nova Statuto de tiu Asocio.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP*.

39 Pliaj akademianoj malprobos la kontraŭstatutan elekton

En ero 31 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 6/79, p. 113) estas prezentita la kontraŭstatuta kaj tial nevalida elekto de la Estraro de la Akademio. Poste, almenaŭ du pliaj membroj de la Akademio – Dro K. Söderberg kaj R. Eichholz – esprimis la opinion ke pro la malregulaĵoj necesas nuligi la elekton kaj okazigi novan. Eble estis ankaŭ aliaj, kiuj ne sendis al mi kopiojn de siaj leteroj, sed pri tio ne eblas informiĝi, ĉar Mag. W. Auld, la neelektita prezidanto, prisilentis tion en siaj du ĝisnunaj cirkuleroj, tiel ke eĉ la membroj de la Akademio ne povas scii kio fakte okazas en nia ĉefa lingva institucio.

Sekve, almenaŭ 8 malnovaj kaj bone konataj membroj de la Akademio konstatis la neregulecon de la elekto kaj postulis okazigon de nova, demokrata, laŭstatuta. Ili estas Mag. R. Rossetti, Pastro J. Downes, D-ro A. Albault, Prof. J. Régulo Pérez, S-ro D. B. Gregor, D-ro K. Söderberg, S-ro R. Eichholz kaj la redaktoro de tiu ĉi rubriko.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20 de *EeP*.

40 La Estrara raporto de UEA

Ĝis Hamburgo (1974) la *Jarlibro* de UEA estis publikigata en du volumoj de ĉ. 700 paĝoj, ekz. en 1973 kun entute 720 paĝoj, en 1974 kun 671 paĝoj. Post Hamburgo regule aperas nur unu volumo. Tiu de 1979 – la *Jarlibro* por 1980 verŝajne ankoraŭ ne estas publikigita – havis nur 378 paĝojn, t.e. iom pli ol duonon de la duvoluma *Jarlibro* antaŭ Hamburgo: unu el la multaj retroiroj, kiu per si mem okulfrape spegulas la realaĵon, eĉ se oni pro tempomanko aŭ apatio ne emas trastudi la bedaŭrindajn faktojn.

Ĝis Hamburgo la Estrara Raporto aperadis en la Dua Parto de la *Jarlibro* kaj estis plenŝtopita de koncizaj informoj kaj precizaj statistikoj pri la farita laboro, atingoj en la realigado de la laborprogramoj (nun ne plu ekzistantaj) kaj konkretaj agadplanoj por la estonteco surbaze de realecaj analizoj de la faritaj progresoj. Post Hamburgo la Estrara Raporto aperas en la revuo *Esperanto*, kio, interalie, senigas la membrojn-abonantojn de preskaŭ unu tuta numero de tiu periodaĵo.

La Estrara Raporto por 1979-80 estas publikigita en n-ro 5/80 de *Esperanto*. Se oni esceptas la rutinajn informojn pri administrado kaj financoj, restas kiel objekte pozitivaj eroj nur la ĝisdatigita publikigado de la revuo, la *Jarlibro*, la okazigo de la Universala Kongreso en Lucerno kaj la bona funkciado de la libroservo. Nepardoneble kaj verŝajne neripareble negativa estis la akcepto de la nova, kontraŭneŭtraleca Statuto de la Asocio. Pluraj aktivadoj sur la kampo de kulturo kaj edukado aŭ sur landa kaj regiona niveloj, menciitaj en la Raporto, fakte ŝuldiĝas ne al la gvidaj organoj de UEA, sed al aliaj instancoj, kelkaj tute ekster UEA. Ĉio cetera estas grandparte senenhava elturniĝado kaj promesoj por la estonteco, kiuj jam tede ĉiujare ripetiga ekde Hamburgo, sed neniam realiĝas.

La tuta agado de la gvidaj organoj de UEA en la 6-jara periodo 1974-1980 estos iom detale analizita en unu el la sekvantaj numeroj de *Horizonto*. Ĉi tie estu nur menciite, ke en 1979 la sumo de ĉiuj membroj estis 30.871 kompare kun 31.947 en 1978 kaj kun 33.716 en 1973 (la lasta antaŭ Hamburgo); la nombro de individuaj membroj en 1979 estis 6.278 kompare kun 6.222 en 1978 kaj kun 7.302 en 1973. Do, perdo de 2.647 membroj entute malgraŭ la akcepto de kontraŭneŭtralecaj instancoj kiel aliĝintaj asocioj kaj, eĉ pli grave, neta perdo de 1.024 individuaj membroj, kiuj formas la kernan parton de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.7 de *EeP*.

41 Deklaro pri neŭtraleco de kandidato al komitataneco B

En UEA nun okazas la elekto de Komitatoj B. Entute estas 9 kandidatoj kaj povas esti elektitaj nur 7: ne tre granda "vastigo de la rajtoj" de la individuaj membroj kompare kun la rajtoj, kiujn ili devis ricevi, kaj kompare kun la bombastaj promesoj de la nuna gvidantaro. Nur unu el la kandidatoj, agregaciulo F. Simonnet, deklaris sin fidela al la partipolitika neŭtraleco de UEA. Jen parto de lia deklaro sendita al la voĉdonantoj kune kun la deklaroj de la aliaj kandidatoj:

"Komitatano B de 1977, mi levadis la voĉon unuavice defende al la neŭtraleco de UEA (en ties tuto, kiom eblas, ne nur en la centraj organoj), nepre kondiĉo por ĝiaj sendependeco kaj universaleco; por ankaŭ aliflanka respekto al la Statuto, kaj seriozeco de la komitata laborado. Mi konstatis oftan malatenton de tiuj esencaj principoj ĉe multaj komitatoj, kaj ĉe la Estraro almenaŭ ŝanceliĝemon. Ne voĉdonu por mi, se vi kredas, ke ĉio estis en ordo tiurilate dum la lastaj jaroj. Ne voĉdonu por mi, se vi pretas fari el UEA, aŭ konsenti, ke aliaj faru el ĝi, ilon je la servo de iu ajn politika movado (aŭ batalilon kontraŭ iun ajn)."

S-ro F. Simonnet estas 40-jara parizano, agregaciulo pri gramatiko kaj instruis diverslande, plej longe kiel profesoro en la Sajgona/Hoĉiminurba Universitato (1971-1976), nun ĉe la Moskva Universitato. Li estas denaska esperantisto, internacie aktiva ekde 1962, precipe en TEJO kaj STELO, dumviva membro kaj fakdelegito de UEA.

Estos interese vidi, ĉu tia sincera esperantisto, kiu ekde 1977 luktas en la Komitato de UEA por la neŭtraleco de la Asocio, bedaŭrinde sen rimarkebla sukceso, estos reelektita kaj, se jes, per kiom da voĉoj. En ĉiu okazo, ĉu elektita aŭ ne, liaj kuraĝo kaj sindono meritas dankon de ĉiuj sinceraj esperantistoj, por kiuj la sorto de UEA ne estas indifera.

42 Plia atako kontraŭ Usono kaj NATO-ŝtatojn

En *der esperantist*, organo de la Centra Laborrondo-Esperanto en GDR, siavice "aliĝinta asocio de UEA", aperis en n-ro 2/80 sur la unua paĝo plia atako kontraŭ Usonon kaj aliajn NATO-Ŝtatojn. Temas pri Rezolucio de la 10-a de februaro 1980, akceptita de la 10-a Kunsido de CLE. En ĝi la partoprenintoj riproĉas "la sabotadon de la SALT-II-Traktato, la bojkotcelan agitadon kontraŭ la Olimpikaj Ludoj kaj la diversajn lastatempajn paŝojn de la Carter Administracio kaj de aliaj NATO-Ŝtatoj". La partoprenintoj vidas en tio "danĝeran provon torpetadi la

politikon de la paca kunekzistado, de malarmado kaj malstreĉiĝo". Tial ili deklaris sian "firman volon" per ĉiuj siaj fortoj kaj per la "*specifaj eblecoj de la Internacia Lingvo-Esperanto subteni la pacpolitikon de Sovetunio kaj konsekvence de ĝi realigatan...*". Eĉ ne unu vorto pri la "pacpolitika" agreso de Soveta Unio en Afganio, agreso, kiu provokis la nunan bedaŭrindan streĉitecon en la internaciaj rilatoj kaj la demokratian decidon de multaj naciaj olimpikaj komitatoj kaj de individuaj sportistoj ne partopreni la Olimpikojn en Moskvo.

Tiu ĉi rubriko tute ne tuŝus la supran demandon, se organo de "aliĝinta landa asocio" ne faradus tian vulgaran partipolitikan propagandon.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP*.

43 Daŭrigo de *ED*

N-ro 20 de *ED* aperis sur p-oj 64-65 de *Horizonto* n-ro 4/80. Pro diversaj kaŭzoj – ĉefe pro subita malsaniĝo komence de septembro kaj pro la postaj escepte ampleksaj kaj urĝaj sciencaj kaj profesiaj laboroj – nur nun povas aperi n-ro 21. Ekde tiu ĉi n-ro *ED* denove regule aperados en *Horizonto*. Kiel antaŭe, ankaŭ en la estonteco *ED* objektivite prezentos gravajn eventojn, atingojn kaj malsukcesojn lige kun la Internacia Lingvo kaj tiele daŭre kompletigados la verkon *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*.

En tiu ĉi n-ro aperas kelkaj mallongaj kompletigaj tekstoj. En la sekvantaj n-roj aperos pli ampleksaj analizoj pri diversaj pozitivaj kaj negativaj aspektoj de la nuntempa Esperanto-Movado, interalie pri la kaŭzoj de la konstanta malfortiĝado de UEA (eĉ senkonsidere al la bone konataj rektaj negativaj sekvoj de la puĉo) en la 6-jara periodo 1974-1980, unuflanke, kaj pluraj kuraĝigaj progresoj renkonte al la 100-jara datreveno de Esperanto en 1987, aliflanke.

Personoj dezirantaj helpi, ke tiu ĉi rubriko almenaŭ plej koncize prezentu la plej gravajn faktojn kaj mallonge analizu la ĉefajn eventojn, bv sendi nepre fidindajn dokumentojn kaj aliajn informojn *al la adreso de la red. de la rubriko: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio*.

44 Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-Movado

En la organo de S.A.T., *Sennaciulo*, n-ro 11 de novembro 1980, aperis longa, objektiva teksto de la tuta Plenumkomitato de tiu Asocio reage al la falsaĵoj pri la laborista Esperanto-Movado entenataj en la libro *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, redaktita de Detlev

Blanke kaj eldonita de Hungara Esperanto-Asocio. La reago de S.A.T. komenciĝas per jena alineo:

"Atentigitaj de longa, spertula recenzo de Ivo Lapenna en '*Horizonto*', ni aĉetis kaj legis la libron '*Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*', redaktita de Detlev Blanke kaj eldonita de Hungara Esperanto-Asocio en 1978. Ĉar ni ne ricevis ekzempleron por recenza celo kaj ĉar la laboro jam ŝajnas tre serioze farita en du sinsekvaj numeroj (marto-aprilo kaj majo-junio 1980) de la revuo de N.E.M., ni ne intencas refari ĉi tie kompletan recenzon. Ni nur ekzamenos aspektojn de la verko, kiuj plej grave kaj maljuste malutilas al la reputacio de SAT, ĉar ili falsas la historion de la *laborista Esperanto-Movado* kaj aperte malfavore misprezantas la rolon kaj celojn de nia Asocio".

Sekvas ampleksa, brila rebato de la multnombraj eraroj, misprezentoj kaj kalumnioj pri la laborista Esperanto-Movado ĝenerale kaj pri S.A.T. aparte en la menciita partipolitika libro, verkita de komitatano de UEA kaj membro de la Estraro de tio, kio ankoraŭ nomiĝas CED de UEA, eldonita de landa asocio aliĝinta al UEA, krome libro laŭdata kaj reklamata en diversaj publikaĵoj de la nuna UEA. Tio estas tute komprenebla, se oni konsideras la nekontesteblan fakton, ke la sorto de UEA troviĝas en la manoj de ekstermovadaj politikaj faktoroj, kiel pruvide jam delonge kaj kiel montrite per ege multnombraj ekzemploj, parte tute apertaj, parte maskitaj kaj tial nerimarkeblaj por tre multaj, se ili ne estas senmaskigitaj, kiel en tiu ĉi kazo.

La detala analizo de la libro *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado* en *Horizonto* n-roj 2/80 kaj 3/80, kaj la nuna reago de la Plenumkomitato de S.A.T. en *Sennaciulo* n-ro 11/80 kompletigas ĉap. 2.3.3 kaj ĉap. 19 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)*.

45 Batalanto por la neŭtraleco de UEA ne elektita Kom. B

En ero 39 de ED (p.64 de *Horizonto* n-ro 4/80) troviĝis la deklaro de agregaciulo F. Simonnet pri lia firma kaj senkompromisa defendo de la neŭtraleco de UEA "en ties tuto, kiom eblas, ne nur en la centraj organoj". Sian deklaron li faris kiel kandidato al komitataneco B, t.e. komitatanoj, kiujn laŭ la nova Statuto elektas la individuaj membroj. Malgraŭ la fanfaronado pri "vastigo de la rajtoj" de la individuaj membroj – tiujn rajtojn oni fakte devis konsiderinde vastigi, kiel la red. de tiu ĉi rubriko atentigis longe antaŭ Hamburgo – estis nur 9 kandidatoj, el kiuj nur 7 povis esti elektitaj. Ne tre granda "vastigo" de la

rajtoj de individuaj membroj, sed pri tio alian fojon lige kun la ĝenerala nuna situacio en UEA. En ero 39 de ED ni skribis: "Estos interese vidi, ĉu tia sincera esperantisto, kiu ekde 1977 luktas en la Komitato de UEA por la neŭtraleco de la Asocio, bedaŭrinde sen rimarkebla sukceso, estos reelektita kaj, se jes, per kiom da voĉoj".

Entute estis 1375 voĉdoniloj, el kiuj 19 estis nevalidaj, do 1356 validaj. Ĉar la nombro de individuaj membroj estis 6278 (en 1973 la nombro estis 7302), la partopreno en la voĉdono estis nur 21,6%. Ŝajnas, ke la individua membraro ne tre alte aprezas la "konsiderinde vastigitajn rajtojn"! Kiel oni povis atendi, S-ro Simonnet, eminenta esperantisto kun tre bona pozicio ankaŭ ekster la Esperanto-Movado, ricevis 717 voĉojn kaj ne estis elektita. Tiele la sola kuraĝa voĉo de sindona kaj sincera esperantisto malaperis el la Komitato de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.2.1 de *EeP*.

46 Nova Estraro de UEA

Dum la UK de Esperanto en Stokholmo estis elektita la nova Estraro de UEA. La listo de la membroj aperas sur la interna kovrilpaĝo de ĉiu n-ro de *Esperanto* kaj tial ne necesas represi ĝin ĉi tie. Pli bone estas atendi iom da tempo por vidi kiel funkcios la Estraro; ĉu ĝiaj membroj fakte plenumos siajn individuajn taskojn, aŭ la taskoj nur ornamos iliajn nomojn sur la kovrilpaĝo, kiel grandparte okazis ekde Hamburgo; ĉu la nova Estraro klopodos ripari la multajn negativajojn ekde Hamburgo aŭ nur iujn el ili, ekzemple honeste solvi la demandojn pri la aŭtoraj rajtoj de la ĉefredaktoro de *Esperanto en Perspektivo*.

Oni ĝenerale atendis, ke D-ro W. Bormann, kiu dum multaj jaroj estis membro de la Estraro kaj kelkan tempon ĝenerala sekretario aŭ unu el la vicprezidantoj, fariĝos la nova prezidanto. Ne enirante en la demandojn pri la meritoj aŭ malmeritoj ĉu de D-ro Bormann, ĉu de S-ro G. Maertens, ni tamen deziras noti, ke longe antaŭ la UK en Stokholmo ni ricevis fidindajn informojn, ke D-ro W. Bormann – ŝajnas ĉefe pro sia germana nacieco kaj ŝtataneco de FR Germanio – ne estas akceptebla por la sovetisma bloko en la Komitato de UEA. Ĉar sen la subteno de la bloko kaj de la kunvojaĝantoj li neniel povus esti elektita, li eĉ ne kandidatiĝis. La sola kandidato – verŝajne kompromisa solvo – estis S-ro G. Maertens kaj, kompreneble, laŭ anticipa aranĝo li estis "elektita". Por la aliaj 7 postenoj estis precize 7 kandidatoj kaj, same kompreneble, ili ĉiuj estis elektitaj. Kiel dirite, oni tamen atendu kelkan tempon por vidi kio okazos.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.2.2 de *EeP*.

47 UEA reprezentita en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO

Oni povas sciigi el la novembra n-ro de *Esperanto*, 1980, ke dum la 21-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO UEA estis reprezentita de Mag. Tibor Sekelj kiel ĝia observanto. Kiel konate, jam en 1954 la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Montevideo, ne nur akceptis la Rezolucion de la 10-a de decembro favore al Esperanto, sed du tagojn pli frue ankaŭ decidis oficiale eniri en konsultajn rilatojn kun UEA. Ekde tiam UEA, interalie, rajtis esti reprezentita de observanto en la Ĝenerala Konferenco kaj en aliaj konferencoj kaj agadoj de UNESKO.

El la raporto de Mag. T. Sekelj en la menciita n-ro de *Esperanto* vidiĝas, ke – plej verŝajne sen kia ajn komisio fare de la Estraro kaj tutcerte sen kiaj ajn antaŭpreparoj – li ellaboris projekton de rezolucio, kiu rekomendus al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO "renovigi sian interesigon pri la atingoj de Esperanto laŭ la Rezolucio de 1954" ktp. (v.p.184 de la novembra *Esperanto*). Laŭ lia aserto, li eĉ trovis delegacion – tiun de Honduraso – kiu deklaris sin preta prezenti la rezolucion sub sia nomo al la Konferenco. Tamen, feliĉe, "post nova pripenso de la afero, kun malvarma kapo" – plian fojon verŝajne sen kia ajn instrukcio fare de la Estraro de UEA – li retiris la rezolucion. Tiu retiro sendube estas la plej saĝa rezulto de la reprezentiĝo de UEA en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Beograd. Fari kian ajn proponon al kiu ajn internacia instanco sen longaj kaj plej konsciencaj antaŭpreparoj signifas anticipe kondamni la proponon al malsukceso. En la kazo de Esperanto – tute speciale pro la nunaj cirkonstancoj en UEA – tia propono estus tutcerte rifuzita, kio samtempe komplete detruus la atingojn de 1954 kaj de la postaj jaroj. Tial Mag.T. Sekelj havis bonegan ideon "proponi al UEA uzi la proksimajn tri jarojn por vasta kaj intensa preparlaboro, por dum la venonta Ĝenerala Konferenco de UNESKO elpaŝi kun grava propono". La "nova elpaŝo kun grava propono" troviĝas ankaŭ en la dika titolo de tiu raporto kaj oni povas kun scivolemo atendi kion faros la nuna gvidantaro de UEA por realigi la "gravan proponon" kaj por bone antaŭprepari ĝin en la sekvantaj tri jaroj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3 de *EeP*.

48 Informado: nun kaj iam

En n-ro 11/80 de *Esperanto* aperis artikolo de ĝia redaktoro *sm* sub la titolo "Informado: Felietono kaj Polemiko". Kiel kutime en la nuntempa

organo de UEA, en ĝi svarmas malĝustaĵoj, prisilentoj, rektaj malveroj kaj blufoj. La tuta teksto celas kaŝi la bedaŭrindan realaĵon per klopodo kredigi la neinformitajn aŭ tro forgesemajn legantojn, ke kvazaŭe nur "antaŭ deko da jaroj" la tiama CED kaj la Biblioteko Hodler "kolektis aŭ klopodis kolekti ĉiujn menciojn kaj artikolojn pri Esperanto, kiuj aperis en la nacilingva gazetararo", sed ke nun "la nombro de la artikoloj kaj mencioj tiel multe kreskis, ke apenaŭ plu eblas kaj apenaŭ plu necesas kolektadi ĉiujn etaĵojn, kies sola merito estas, ke ili mencias la Internacian Lingvon" (p. 184).

Ne estas klare kial tiajn artikolojn ne skribas, aŭ almenaŭ ne subskribas (simile al reĝoj, prezidentoj kaj aliaj politikaj figuroj, kiuj ja havas siajn profesiajn skribistojn de paroladoj kaj publikigotaj tekstoj) la estraranino pri informado, se fakte ŝi iom okupiĝas pri tiu fako, sed ni lasu tion kaj akceptu, ke almenaŭ post la publikigo ŝi, eble la prezidanto, aŭ eĉ la tuta Estraro de UEA aprobis la enhavon. Do, laŭ la oficiala organo de UEA, antaŭ deko da jaroj, t.e. antaŭ la hamburga partipolitika puĉo, nia informado estis tiel malvasta, ke estis facilege kolekti la "malmultajn" nacilingvajn artikolojn kaj "menciojn", sed, jen, nun la interesiĝo fariĝis tiel grandega sen kia ajn organizita interveno fare de la Informa Fako (IF) de UEA, ke ne plu eblas kolekti ilin! Kia kontentiga stato de la informado pri la Internacia Lingvo kaj kiel esperige por la estonteco de Esperanto! "Rezulte" - asertas la organo de UEA - "io grava, io esenca okazas kun la informado pri Esperanto", ĉar ĝi ŝanĝiĝas kvante kaj kvalite dum la lastaj jaroj". Tiu lasta aserto estas ĝusta: certe ne en pozitiva senco, kiel blufas la artikolo, sed, malfeliĉe, en tre negativa, kiel vidiĝos el sube prezentitaj nekontestablaj faktoj, kiujn ĉiu povas facile kontroli.

48.1. Iamaj roloj de CED kaj IF

Jam la unua frazo en la analizata teksto estas malĝusta. Dum sia tuta 23-jara funkciado (1952-1975) la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) nek kolektis, nek okupiĝis pri kolektado de nacilingvaj artikoloj pri Esperanto, kvankam kelkfoje, tute escepte, okaze de la siatempaj grandaj mondaj kampanjoj (ekzemple okaze de la agadoj, kiuj rezultigis la konsultajn rilatojn kun Unesko kaj la konatan Rezolucion de 1954), apogele ĝi prizorgis ankaŭ tion. CED okupiĝis pri sciencaj esploroj, dokumentado (precize 4408 katalogitaj dokumentoj ĝis la fino de 1974), publikigado de dokumentoj en Esperanto kaj en diversaj naciaj lingvoj (entute 391 ĝis la fino de 1974), kaj plenumis amason da aliaj laboroj, kiel koncize prezentite en ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)* sur p-oj 669-678. Pretere dirite, CED estis tiel konata ankaŭ en la ekstera mondo, ke eĉ nun, do pli ol ses jarojn post la fakta likvido de la ĝishamburga

CED, plu venadas presaĵoj kaj korespondaĵoj ankoraŭ sendataj al ĝia iama adreso, nome la adreso de mi mem kiel ĝia honorofica direktoro de 1952-1975. La redakcio de la oficiala organo de UEA – kaj, kompreneble, la nunaj estraroj de UEA kaj de CED – devus scii tion.

Ankaŭ la tiama Informa Fako (IF) de UEA, fondita unue kiel Propaganda Fako en 1949, fakte ne okupiĝis pri "kolektado de artikoloj kaj mencioj", kaj ankaŭ tion la redakcio kaj almenaŭ la estraranino pri informado devus scii. Tute alia afero estas, ke en la kadro de siaj vastaj kaj multdirektaj agadoj la IF de UEA utiligadis la esplorlaborojn de CED kaj daŭre sekvis pere de la landaj IF-oj kaj de siaj rektaj kunlaborantoj en diversaj landoj la kvanton kaj karakteron de informado pri la Internacia Lingvo. Ĝuste tio ebligadis plibonigadon de la informado, inkluzive kompetentajn reagojn je diversaj misprezentaj malĝustaĵoj pri Esperanto. En la kadro de tiu dinamisma aktivado estis farataj ankaŭ statistikoj, kies rezultoj sporade aperadis en *Esperanto* kaj ĉiam en la ĉap. pri informado de la Estrara Raporto. Nur kiel eta ekzemplo de la tiama celtrafa laboro sur la kampo de informado menciindas la *Tabela Trarigardo pri la Informa Laboro en 1962* sur p. 128 en *Esperanto*, n-ro 692-3 (7-8), julio-aŭg. 1963. El ĝi vidiĝas, ke nur en tiu jaro en 33 landoj entute aperis minimume 16.092 nacilingvaj artikoloj kaj informoj (ne "mencioj") pri Esperanto, el kiuj nur 0,7% estis malfavoraj; okazis 1753 prelegoj kun entute 94.348 ĉeestantoj, aldone al 949 radio-prelegoj pri nia lingvo; estis aranĝitaj 355 ekspozicioj, kiujn vizitis 392.404 personoj; kaj estis distribuitaj 468.663 flugfolioj kaj similaj propagandiloj. Alia ekzemplo: en 1973 – la jaro antaŭ la hamburgaj eventoj – aldone al la bone funkciantaj landaj IF-oj, la IF de UEA havis 92 individuajn kunlaborantojn en diversaj landoj (ĉap. pri informado en la Estrara Raporto por 1973/74). Ĉio-ĉi, kaj multo alia eĉ ne mencienda ĉi tie, estis ne nebulaĵoj, inventaĵoj, blufoj kaj promesoj por la estonteco, sed absolute ĝustaj faktoj raportitaj surbaze de nepre fidindaj sciigoj. Ĉiu povas konstati tion el la Estraraj Raportoj por la periodo 1950-1974.

La informado, konscie kaj laŭplane evoluigita al bone organizita informa aparato de UEA, unuflanke, kaj la scienca-dokumenta laboro de CED, aliflanke, estis la du ĉefaj faktoroj, kiuj, kune kun la aliaj agadoj laŭ la Bazaj Laborprogramoj, kaŭzis grandegan altiĝon de la respekto por Esperanto en la mondo, konsiderindan disvastiĝon de la lingvo kaj internan fortikigon de UEA kaj de la tuta Esperanto-Movado.

Tiel estis "antaŭ deko da jaroj" kaj entute antaŭ Hamburgo. Sed kio pri la posthamburga informa laboro de UEA? Fakte nenio. Ankaŭ tiun tutan agadbranĉon la posthamburgaj gvidantaroj de UEA sukcesis rapide detruui. Jam en la Estrara Raporto por 1974/75 la ĉap. "Informado"

konsistas el jena unusola frazo: "Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin". Poste, dum plenaj kvin pliaj jaroj nenio notinda okazis, se oni esceptas la daŭre, tede, ĉiujare ripetatajn kaj neniam plenumatajn promesojn, kiel plian fojon ĉiu povas mem konstati legante la kelkajn komplete senenhavajn erojn sur p. 88 de *Esperanto* (diference de la antaŭhamburga periodo, kiam la *Jarlibro* aperadis en du dikaj volumoj kaj en la Dua Volumo troviĝis ampleksa Estrara Raporto pri ĉio konkrete farita en ĉiuj agadbranĉoj, nun aperas nur unu volumo kaj la Estrara Raporto estas publikigata en *Esperanto* – unu el multaj regresoj). Plian fojon pretere dirite, ekde la puĉo de 1974 neniam kiu ajn el la sinsekvaj estraranoj pri informado verkis unusolan principan artikolon pri tiu agadbranĉo, nek prezentis unusolan ideon en kiu ajn formo pri kiu ajn aspekto de efika informado pri la Internacia Lingvo. Ne estas surprize, ke sur tiu kampo regas plena anarkio kaj ke eĉ la plej grandajn fuŝaĵojn la organo de UEA laŭdas kiel unikajn sukcesojn aŭ kiel "raraĵojn ne ekzistantan aŭ maleblan antaŭ deko da jaroj". Ni ekzameni iomete tiujn verajn raraĵojn.

48.2. *The Guardian* kaj aliaj renomaj mondaj gazetoj

La redaktoro de *Esperanto* skribas: "Nun estas preskaŭ tute ordinara afero vidi artikolon pri *Esperanto* en, ekzemple, *Le Monde*, *The Guardian*, *Asahi Ŝimbun* kaj aliaj mondrenomaj nacilingvaj gazetoj". Bedaŭrinde mi ne kapablas legi *Asahi Ŝimbun*, sed mi tre ofte legas *Le Monde* kaj plurajn aliajn mondrenomajn gazetojn, dum *The Guardian* mi legas ĉiutage. En *Le Monde* mi jam de tre longe nenion legis pri *Esperanto*. En *The Guardian* kaj en aliaj britaj gazetoj aperis nombro da artikoloj en decembro 1978 okaze de la "100-jara datreveno de *Esperanto*" – hontinda fuŝaĵo, pri kiu respondecas Brita *Esperanto*-Asocio, kiu, absolute nekredeble, informis la gazetaron, ke la 5-a de decembro 1978 estas la tago de la "naskiĝo" de *Esperanto*. La artikoloj estis tre malfavoraj, en pluraj oni abunde misprezentis ĉion en ligo kun *Esperanto* kaj primokis la lingvon. Necesis tuj reagi por almenaŭ parte ripari la teruran malbonon. La redaktoro de tiu ĉi rubriko sendis reagajn korektojn al *The Observer*, *The Guardian* kaj *The Daily Telegraph*. Aliaj seriozaj esperantistoj agis same. Rezulte aperis aro da ĝustigaj leteroj en la menciitaj gazetoj. Tiu tuta pli ol bedaŭrinda afero estis detale prezentita en la ero 27 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 1/79. Tio, do, estas unu el la "raraĵoj", fakte maleblaj "antaŭ deko da jaroj".

La alia "raraĵo" estis artikolo de Polly Toynbee, verkita surbaze de intervjuo kun S-ro H. Platt, sekretario de Brita *Esperanto*-Asocio. Ĝi

aperis en *The Guardian* de la 10-a de decembro 1979, precize unu jaron post la "100-jara datreveno de Esperanto"! En la artikolo, kiu pro teknikaj kaŭzoj ne povis esti reproduktita en *Horizonto*, jam en la titolo, dike presita, troviĝas okulfrapaj misinformoj, ke Esperanto "ne estas natura", "ne havas vivon", "ne estas bona por poezio", kiun "en ĉiu okazo S-ro Platt ne ŝatas". En la teksto mem troviĝas amaso da aliaj misprezentoj: lingvo sen sociaj resonoj, sen asociiĝoj, sen kulturo, sen literaturo, sen popolo, sen vivo, ktp., ktp. laŭ sufiĉe konata melodio, al kiu abunde kontribuas parto de la esperantistaro mem, se oni ne kontraŭbatalas tiajn stultaĵojn unuavice interne de la Esperanto-Movado, kio ja okazadis antaŭ Hamburgo. Eĉ rekte ofendaj esprimoj ne forestis: "Estis iom malfacile por ni eltrovi, ĉu D-ro Zamenhof estis okulisto aŭ okultisto". Plian fojon necesis reagi kaj, feliĉe, publikigo de mallongaj ĝustigoj almenaŭ iomete riparas la malbonon, kvankam, kompreneble, la negativa impresio, kiun ricevis la legintoj de la artikolo, certe ne povis esti forviŝita.

Tiom pri la "tute ordinara afero vidi" (espereble ankaŭ legi) artikolojn en *The Guardian* kaj aliaj mondrenomaj britaj gazetoj.

48.3. Nun pri Jugoslavio

La aserto de *sm*, ke "antaŭ deko da jaroj (la aŭtoro, evidente, neniel povas liberiĝi de tiu "antaŭ deko da jaroj") nur lertuloj de la tipo de Tibor Sekelj sukcesis fojfoje enŝovi ion pri Esperanto en la nacilingvan gazetaron" estas komplete malvera. Jam longe antaŭ la Dua Mondmilito la informado pri Esperanto en Jugoslavio estis kaj kvante kaj kvalite sur relative tre alta nivelo. Pri tio certe rememoras ĉiu jugoslavia antaŭmilita esperantisto, sed ni lasu tion. Sendube estas ĝojige konstati, ke, paralele kun la interna politika evoluo de tiu lando kaj kun ĝia pozicio de nealianciĝinta ŝtato en internaciaj rilatoj, malfermiĝis novaj eblecoj informadi pri la Internacia Lingvo kaj, ĝenerale, agadi por Esperanto. Alia afero estas ĝis kiu grado kaj en kiu formo tiuj eblecoj estas efike ekspluataj. Estus interese foje legi en *Horizonto* objektivan artikolon pri tio, verkitan de kompetenta esperantisto vivanta en Jugoslavio. En ĉiu okazo la artikoloj de M. Gjivoje en la zagreba taggazeto *Vjesnik*, menciitaj en *Esperanto*, estas pozitiva kontribuo al pli bona kompreno de la lingva problemo kaj de la rolo de Esperanto. Ankaŭ la felietono de Spomenka Ŝtimec, publikigita komence de 1977 en la sama *Vjesnik*, prezentas objektivite la faktojn kaj donas bonajn analizojn kun la escepto de 2-3 eroj. Kiel mi tiutempe skribis en alia kunteksto, ŝia felietono estas plene – kun la sola escepto de la 2-3 malĝustaĵoj – bazita sur miaj verkoj, kvankam tio ne estas eĉ menciita en la felietono. Tamen, ne multe gravas, ĉar la

felietono havis bonan eĥon. Sed estus normale indiki la fontojn. Mi tion menciis nur por doni plian ekzemplon de plagiatoj, kiuj abundas en la nuntempa UEA. Tio kondukas al plia punkto en la artikolo de *sm*.

En ĝi estas dirite, ke antaŭ kelkaj monatoj sufiĉe konata eldonejo en Jugoslavio publikigis 300-paĝan libron *Živi jezik* (La Vivanta Lingvo) de iu Radoslav Gajić, nekonata aŭtoro. En la magazino *NIN*, fakte tre prestiĝa jugoslavia periodaĵo, aperis en la n-ro de la 21-a de septembro 1980 akra kritiko de Nikola Rasić, en kiu, laŭ *sm*, la aŭtoro asertas, ke "la libro de Gajić estas plagiata transpreno ĉefe el la verkoj de Waringhien, Wells, Szerdahelyi, k.a." Mi ricevis el Beograd la koncernen n-ron de *NIN* kaj konstatas, ke tiu "k.a." en la artikolo de *sm* estas neniu alia, ol mi mem, kies nomo troviĝas sur la unua loko en *NIN*. La koncerna parteto en *NIN* tekstas "...Gajić pruntas de tiaj nomoj, kiaj estas Lapenna, Szerdahelyi, Wells aŭ Waringhien. La unua estis dum preskaŭ tridek jaroj ĉefrunte de la monda Esperanto-Movado..." ktp. pri la aliaj. Eĉ el Kanado iu sendis al mi kroatlingvan gazeton *Danica*, kiu sur p. 3 de n-ro 40 de la 3-a de oktobro 1980 pritraktas la saman aferon kiel kulturen skandalon kaj mencias mian rolon en la Esperanto-Movado. La ellaso de mia nomo en *Esperanto* ne estas hazardo, kompreneble. En la nuna strikte cenzurata *Esperanto* mia nomo devas esti ellasita eĉ se temas pri plagiatoj el miaj verkoj, ĉar, interalie, la tezo pri "antaŭ deko da jaroj" perdis sian valoron! Cetere, plagiatoj tute ne estas ia "raraĵo" en la nuna UEA. En unu el la Esperanto-Dokumentoj de UEA eĉ D-ro H. Tonkin, la antaŭa prezidanto de UEA, plagiatis el mia verko, kiel montrite en la rubriko ED, ero 5.1 en *Horizonto* n-ro 5/76.

Plagiato, kiu ĉie en la civilizita mondo estas rigardata kiel kultura skandalo, en la organo de UEA estas laŭdata kiel granda atingo. En ĉiu okazo unu afero estas certa: "antaŭ deko da jaroj" tiaj skandaloj ne nur ne estis "raraĵo", sed ili tutsimple ne okazadis. Kaj se hazarde tiaj aferoj entute estus povintaj okazi, sendube ili estus ne laŭdataj, sed plej firme kritikataj kaj kontraŭbatalataj. Ĉiu el ni – tutcerte mi mem – kiuj dediĉis multe da tempo por la disvastigo de Esperanto, ĉiam volonte donus la permeson aperigi niajn verkojn traduke aŭ ĉerpi el ili por nacilingvaj artikoloj aŭ eĉ libroj. Tio estas unu afero. Tute alia afero, forte kondamninda, estas kaŝe plagiati kaj prisilentadi la aŭtorecon.

48.4 Konklude

Ne estas dubo, ke la informado pri la Internacia Lingvo ne ĉesis malgraŭ la kompleta pasiveco de UEA en tiu afero. Feliĉe, plu troveblas kaj kelkaj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj inteligente kaj efike

aktivis observante la konsilojn entenatajn en la *Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo* (Frostavallen, 1956), rekomendita almenaŭ formale eĉ de la nuna gvidantaro de UEA. Same tiel ne estas dubo, ke la plej bonaj posthamburgaj artikoloj kaj informoj – tute egale ĉu plagiatoj kaj intelektaj ŝteloj, aŭ honeste indikantaj la fontojn kaj rekonantaj la aŭtorecon – baziĝas ĉefe sur libroj, studoj, artikoloj kaj CED-dokumentoj verkitaj antaŭ 1975, multaj el ili, inkluzive la *Principaron de Frostavallen*, eĉ longe antaŭ la jam fama "deko da jaroj". Aliflanke, kreskanta nombro da fuŝaĵoj bedaŭrinde ĉiam pli malutilas al la lingvo kaj ege kompromitas ankaŭ tiurilate la Esperanto-Movadon. Konklude: por ĉiu, kiu eĉ nur iom konas la faktojn, plian fojon ne povas esti dubo, ke grandega estas la diferenco inter la iama organizita sistemo de vasta kaj altnivela monda informado pri Esperanto, gvidata kaj helpata de la tiama Informa Fako de UEA, kaj la nuna anarkia stato, kaŭzita de plena neglekto de tiu grava agadbranĉo fare de la respondecaj instancoj de UEA. Anstataŭ blufadi kaj klopodadi transformi fuŝaĵojn en sukcesojn, la Estraro de UEA agus saĝe, se ĝi sincere konstatus la realaĵon kaj trovus eliron el la nuna negativa situacio, des pli ke la vera 100-jara datreveno de Esperanto rapide alproksimiĝas.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 de *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo (EeP)*.

49 Du pliaj nacilingvaj tradukoj el Esperanto

49.1 Faka studo en la japana

La artikolo de Prof. D-ro I. Lapenna "Kelkaj Juraj Aspektoj de Multligveco en EEK", originale verkita en la Internacia Lingvo kaj unue publikigita en *Internacia Jura Revuo*, n-ro 2/77, estis poste represita en *Paderborner Arbeitspapiere* de La Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn. De tie ĝi estis represita en *Eŭropa Dokumentaro*, n-ro 22/79. En franca traduko ĝi aperis ankaŭ en *Documents pour l'Enseignement*, n-ro 29/79. Nun Japana Esperanto-Instituto eldonis ĝin en la japana traduko de Yoshimi Umeda. Pro la nuntempaj plagiatoj kaj intelektaj ŝteloj (v. en *Horizonto* n-ro 32(2), p.39) estas utile diri, ke ĉiuj menciitaj represoj kaj tradukoj estis faritaj kun la aprobo de la aŭtoro.

49.2 Du ĉapitroj el *EeP* en la nederlanda

En 1980 aperis broŝuro *Het Talenproblem in Internationale Relaties en De Internationale Taal (Esperanto) / La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj*

kaj la Internacia Lingvo (Esperanto) / en traduko de Marc Vanden Bempt, eldonita de Esperanto 2000, Leuven. Temas pri nederlanda traduko de la unuaj du ĉapitroj en la libro *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*, verkitaj de la redaktoro de tiu ĉi rubriko kaj plene bazitaj sur ĉap. 3-4 kaj 6 de lia *Retoriko*.

El teknika vidpunkto la 50-paĝa broŝuro prezentigaŝ tre bone. Bedaŭrinde plian fojon la traduko estas farita kaj publikigita sen mia konsento aŭ kia ajn antaŭa scio. Pro tiu nova malobservo de miaj aŭtoraj rajtoj mi sentis min devigita sendi protestan leteron al la C.O. de UEA kun kopio al la prezidanto, s-ro G. Maertens, kaj al Prof. D-ro Carlo Minnaja, komitatano de UEA jam bone informita pri la antaŭaj malobservoj de miaj aŭtoraj rajtoj fare de la nuna UEA. Malgraŭ la interveno de Prof. Minnaja, kiel kutime en la posthamburga UEA la protesto restis seneŝa. Nur tiom, principe, el morala kaj jura vidpunktoj. Alia afero estas, ke tre verŝajne mi estus doninta mian konsenton por tiu traduko, kiel mi ĉiam faris en la pasinteco, sed kompreneble sub la kondiĉo, ke la traduko estu lingve senriproĉa kaj ke la aŭtoreco estu korekte indikita. Kvankam mi ne scias la nederlandan lingvon, tamen mi povis konstati almenaŭ jenajn gravajn erarojn:

(i) *Esperanto en Perspektief* sur la titolpaĝo de la broŝuro ne estas kompleta, ĉar estas ellasita *Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*, esenca parto de la originala titolo de la verko.

(ii) Estas misprezento indiki sur la titolpaĝo, ke la traduke publikigita parto estas verkita de mi mem, U.Lins kaj T.Carlevaro, ĉar la du kunaŭtoroj de *EeP* skribis eĉ ne unu vorton por tiu parto, kiel klare indikite sur p. iv de *EeP*.

(iii) Nenie estas indikite, ke mi estas la ĉefredaktoro de *EeP*.

(iv) Sur p. 7 estas dirite, ke mi estas profesoro de kompara rusa kaj orienteŭropa juro, dum mi fakte estas profesoro de soveta kaj orienteŭropa kompara juro, kiel klare indikite en la originalo. Inter rusa kaj soveta juro estas grandega diferenco.

Se oni povas rimarki tiom da eraroj sen scio de la nederlanda, oni necese suspektas, ke multaj aliaj troviĝas en la teksto mem, sed oni ankaŭ povas esperi, ke ne estas tiel. Kaj se vere ne estas tiel, la nederlanda traduko estas fakte plia pozitiva kontribuo de aŭtoro de multe pli ol nur "antaŭ deko da jaroj" (v. en *Horizonto* n-ro 32(2), p.35-37), kiu plu laboras laŭ la samaj principoj kaj sciencaj metodoj en la kadro de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 7.4.1 de *EeP*.

50 Profesia periodaĵo kun unika Esperanto-paĝo

La monata grandformata periodaĵo *ZET*, organo de la Zagreba Elektra Tramo (Jugoslavio) jam dum tre multaj jaroj regule publikigas tutan paĝon kun kroatingvaj novaĵoj el eksterlando kaj internacilingvaj informoj pri la zagreba tramo. Tiun paĝon iniciatis kaj plu redaktas la malnova jugoslavia aktivulo Zvonko Rehorić. Pluraj kunlaborantoj el deko aŭ pli da landoj tradukas interesaĵojn pri tramo kaj entute pri la urba trafiko el siaj naciaj periodaĵoj kaj taggazetoj en Esperanton, sendas la tradukojn kun taŭgaj fotoj al la redaktoro, kiu retradukas en la kroatan kaj publikigas en *ZET*. La esperantlingva parto konsistas el ĉiaspecaj informoj pri la Zagreba Elektra Tramo: de teknikaj plibonigoj, vastigo de la tramreto, novaj veturiloj, k.s. ĝis salajroj kaj loĝproblemoj. Tiu paĝo tute ne estas "propagando" en la vulgara senco de la vorto, sed ĝi taŭge utiligas la Internacian Lingvon por profesiaj celoj kaj tiel, aldone kaj sen altrudo, kontribuas al disvastigo de Esperanto.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 12.8 kaj 7.4.1 de *EeP*.

51 Rekorda membronombro de UEA: plia rekorda bluf

Sur p. 59 de la marta n-ro de *Esperanto* (1981) aperis la kutima statistiko pri la membraro de UEA en 1980. Per dikaj literoj sur la sama paĝo la redakcio skribas pri "rekorda membronombro", kaj la samon ĝi emfaze ripetas en la redakcia noto sur la interna kovrilpaĝo.

Ĉu vere rekorda membronombro aŭ plia rekorda bluf? Pri kio, fakte, temas?

Laŭ la publikigita statistiko, UEA havis 6629 individuajn membrojn (IM) en 1980. Tio estas iom pli ol en la antaŭa jaro (1979) kaj nur 86 pli ol en 1974, kiam pro la hamburgaj eventoj la nombro de individuaj membroj tuj terure falis de 7231 en 1973 al nuraj 6543. Signifas, ke en 1980 UEA plu havis 602 IM malpli ol en 1973, la lasta antaŭhamburga jaro. Ĉu rekordo?

Plue, laŭ la menciita statistiko, UEA havis 20490 asociajn membrojn (AM) en 1980. En 1973 ĝi havis 22379 AM kaj 25390 en 1972. Do, kompare kun 1973 perdo de 1889 AM, kaj kompare kun 1972 perdo de 4900 AM. Evidente, pliaj "rekordoj".

Kiel, do, la redakcio de *Esperanto* tamen elmanipulis sian "rekordon"? Tutsimple tiel, ke ĝi aldonis 7064 t.n. junajn asociajn membrojn al la 20490 AM, do entute 27554, kio, kune kun la 6629 IM de UEA, donas la "rekordan" ciferon de 34183. La vero estas, ke antaŭ 1974 la

membronombro de la junulara sekcio – arbitra kaj nekontrolebla pro la konataj kaŭzoj – neniam estis aldonata al la nombro de asociaj membroj de UEA. Ekzemple, laŭ la Raporto de TEJO por 1973, ĝi havis en tiu jaro 9243 membrojn. Se la tiama Estraro de UEA estus aldoninta tiujn arbitrajn ciferojn al la nombro de AM de UEA, la tuta membronombro en 1973 estus 38853, en 1971 eĉ 44311, kio abunde superus la nunan "rekordon" de 34183.

Ĉiuj supraj informoj estas facile kontroleblaj el la marta n-ro de *Esperanto* (1981) kaj el la Estraraj Raportoj por 1973 kaj 1972. En la Raporto por 1973 mi mem kiel tiama prezidanto de UEA eksplicite distancigis min de la nefidindaj informoj en la Raporto de TEJO, "ekzemple de la informoj rilate la membronombro" (Jarlibro de UEA, 1974, Dua Parto, p. 66). Ĉu la nuna prezidanto de UEA agos same, aŭ li, kune kun la tuta Estraro, solidariĝos kun tiuj blufaj "rekordoj" kaj rekordaj blufoj de sia senrespondeca redakcio? Kaj kiom longe la membraro de UEA ankoraŭ toleros tian misinformadon? Eble, tamen, troviĝos almenaŭ kelkaj, kiuj postulos de la prezidanto honestan prezenton de la fakta stato. Ne nur tiurilate.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 kaj 18.7 de *EeP*.

52 Fragmento de granda plagiato

En ero 45.3 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto*, n-roj 2 kaj 3/81, p-oj 38 kaj 57) estas koncize prezentita unu el la multaj plagiatoj, kiuj abundas en la sino de la nuna UEA. Amiko el Jugoslavio sendis al ni la libron *Živi jezik* de R.Gajić. Montriĝas, ke la plagiato estas eĉ pli granda, ol supozite.

Por la sciantoj de la serba, kroata kaj parencaj lingvoj sur la apuda paĝo aperas, kiel ekzemplo, la unua alineo de *Retoriko* kaj la unua alineo de *Živi Jezik*, "originala" verko de R. Gajić! Temas pri preskaŭ laŭvorta traduko, cetere ne tre bona.

Kiel plurfoje dirite, mi ĉiam volonte permesis kaj plu permesos nacilingvajn tradukojn aŭ alispecan utiligon de miaj verkoj, sen kia ajn kompenso, en intereso de Esperanto. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas fari tion kaŝe, sen permeso, eĉ sen indiko de la aŭtoreco. Tio, tutsimple, estas intelekta ŝtelo, forte kondamninda.

RETORIKO – Ĉapitro I

ENKONDUKO

La lingvo estas la ĉefa instrumento de komunikado kaj pensado. Ĝi akompanas la homon de la lulilo ĝis la tombo. Patrinoj karesoj, bubetaj

petolaĵoj, junecaj ardoj, plenaĝulaj laboroj, vivfinaj rezignacioj – ĉio ĉi manifestiĝas, esprimiĝas aŭ ehas senĉese en la lingvo kaj pere de ĝi. Grava armilo en la subigado de la naturo, en la formiĝo de la homo kaj en la konstruado de la mondo; akra batalilo en la vivolukto, peranto de kunlaboro, rimedo de persvado kaj konvinkado, la lingvo – tiu filo kaj samtempa patro de la homo – montriĝas en la ĉiutaga vivo jen kiel laborilo nepre necesa, jen kiel ponardo vunda aŭ eĉ mortiga, jen kiel semanto de konkordo, trankvilo, paco kaj amo. Kreita de la homo, ĝi kreis lin mem. Evoluigata de la homo, ĝi evoluigas lin mem.

ĴIVI JEZIK

Jezik je glavno sredstvo sporazumevanja i izražavanja misli. On prati čoveka od rođenja pa do smrti. Majčina tepanja, deĉiji nestaŝluci, rad odraslih i filozofska mudrost starosti – sve se ovo manifestuje, izražava i neprestano odzvanja na jeziku ili pomoću njega. Važno pomagalo u osvajanju prirode, u formiranju čoveka i u građenju sveta; oštro oruđe u životnoj borbi, posrednik u saradnji, sredstvo za nagovaranje i ubeđivanje; jezik, taj nerazdvojni čovekov pratilac, pokazuje se u svakodnevnom životu, čas kao britka sablja koja ubija ili uništava, čas kao sejač sloge, saradnje i ljubavi. Kao sredstvo stvoreno od čoveka, ono utiče na izgradnju njega samog. Negovan i razvijan od strane ljudske vrste, on joj pomaže da se i ona sama što više razvije.

53 Interne de la Babela Turo

Sub tiu titolo *EFL-Gazette* de marto, 1981, publikigis longan artikolon de Ian Butcher (EEK, Bruselo) pri la katastrofa lingva situacio en la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo (EEK). Montriĝas, ke pli ol 60% de la oficistaro de nur tri organoj – Konsilio de Ministroj, Ekonomia kaj Socia Komitato kaj Eŭropa Kortumo – okupiĝas pri tradukado. Ĉiu plia lingvo postulas enoficigon de pliaj 200-250 tradukistoj por la tuta Komunaĵo. La larĝigo de EEK al 13 membroj postulos 50%-an nombran kreskon de la tradukistaro. En 1978 la tradukaj servoj entute kostis inter 1½ kaj 2 miliardoj da belgaj frankoj, t.e. inter 25 milionoj kaj 30 milionoj da anglaj pundoj laŭ la kurzo de 1978. Tiu grandega sumo plu kreskas.

La aŭtoro rekonas, ke Esperanto prezentiĝas kiel "ideala solvo", sed tuj aldonas, ke preskaŭ ĉiuj koncernatoj kontraŭas tiun ideon, ĉar Esperanto "eble"(!) funkcias kiel "interna lingvo" (verŝajne interne de la Esperanto-parolantoj, kvazaŭ la aliaj lingvoj funkcias "ekster" la koncernaj lingvo-komunaĵoj), sed ne taŭgas por la leĝoj de la Komunaĵo, kiuj devas esti aplikataj al la Ŝtatoj-Membroj.

Kvankam la asertoj pri la uzeblo de Esperanto por juraj tekstoj estas malĝustaj (v. ankaŭ eron 51, sube), tamen la artikolo klare reliefigas gravajn problemojn, interalie ekonomiajn, kiujn ĉiam pli forte spertas EEK pro la sep egalrajtaj oficialaj lingvoj, kies nombro altiĝos paralele kun la aliĝo de pliaj alilingvaj ŝtatoj al la Komunaĵo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 1.2 kaj 1.3 de *EeP*.

54 Esperanto por juraj celoj

En la plej granda belga ĵurnalo *La Dernière Heure* de la 12-a de majo, 1981, aperis la unua parto de intervjuo, kiun Prof. Lapenna donis al S-ro G. Pirlot pri la uzo de Esperanto en internaciaj juraj medioj. La intervjuito prezentis la ĝisnunan uzon de la Internacia Lingvo por juraj celoj, la evoluon de jura terminologio kaj la avantaĝojn de unusola lingvo en la sferoj de internacia kaj kompara juro. En kazoj de supernacia juro, ekzemple en tiu de la juro kreata de EEK, Esperanto prezentigas kiel ideala solvo ĝuste tial, ĉar la internaciaj juraj terminoj ne estas ligitaj al specife naciaj juraj konceptoj, sed estas difineblaj laŭ la koncerna internacijura aŭ supernacijura senco. La fakto, ke oni ankoraŭ ne trovas originalan internacian aŭ supernacian leĝaron en la Internacia Lingvo neniel signifas, ke tiu lingvo ne posedas la kvalitojn por krei ĝin. Problemoj, kompreneble, ekzistus, sed ili en ĉiu okazo estus multe malpli grandaj, ol estas la nunaj, kiujn kaŭzas la senca malsameco de samaj juraj terminoj en la hejmaj juraj sistemoj de diversaj ŝtatoj.

Kiam la tutcerta plua komplikiĝo de la problemoj fine devigos la politikajn kaj aliajn respondeculojn serĉi senprejudican radikalan solvon, la Internacia Lingvo sendube montriĝos la plej sukcesa kandidato. Tamen, ankaŭ la elekto de Esperanto neniel povus okazi subite, de unu tago al alia. Estus necesa plurjara terminologia laboro kun paralela ekregado de la lingvo fare de tre granda nombro da kompetentaj juristoj. Tio certe kostus multe malpli ol kostas la nuntempaj tradukaj servoj en EEK, UN, UNESKO kaj en aliaj interŝtataj organizaĵoj.

Intertempe Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj daŭrigas sian utilan laboron ankaŭ sur tiu terminologia kampo en la limoj de siaj modestaj financaj eblecoj, preskaŭ komplete prisilentata en la nuntempa Esperanto-Movado.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 2.4 de *EeP*.

ATENTIGO: Pro manko de spaco en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*, la Estrara Raporto de UEA estos koncize pritraktita en la sekvanta n-ro de tiu ĉi rubriko. Rilate la blufojn pri la membro-nombro oni bv. informiĝi pri la

fakta stato en ero 48 sur p. 62 de *Horizonto*, n-ro 3/81. En la sekvanta n-ro estos analizita ankaŭ grava dokumento de sendependa svisa institucio, havanta nenion komunan kun la Esperanto-Movado, pri la politikiĝo de UEA.

55 Raporto de la Estraro de UEA por 1980

55.1 Enkonduka Rimarko

Denove ĝi aperis en *Esperanto* anstataŭ en la *Jarlibro*, ĉifoje kun la "maja saluto" (unua-maja?) de la redaktoro sur la kovrilpaĝo. La Raporto okupas 14 paĝojn. Tio signifas ŝparon je la kostoj de la Membroj-Abonantoj, kiuj tiel estas senigitaj de preskaŭ unu tuta n-ro de la revuo. Antaŭ Hamburgo (1974) la Raporto estis ĉiam presata ne nur en la *Dua Parto de la Jarlibro* (ĝi ne plu aperas), kiun ricevas ĉiuj individuaj membroj, sed ankaŭ kiel aparta broŝuro. La nuna Raporto – same kiel la antaŭaj en la posthamburga periodo – montras, ke ankaŭ la nova gvidantaro, elektita en 1980, komplete neglektas tiujn multnombrajn esencajn agadojn, kiuj bonege funkciis ĝis la eventoj de 1974, kaj ke ĝi ne sukcesis iniciati kaj realigi unusolan novan. Tuta n-ro de *Horizonto* sufiĉus por analizi tiun Raporton pri neagadoj kompare kun la iamaj vastaj kaj ĉiudirektaj aktivadoj konforme al la tiama demokrata Statuto, la tri bazaj kaj pluraj okazaj laborprogramoj. Tio estus malŝparo de nia tempo kaj de valora spaco en *Horizonto*. Tial ni limigos nin al kelkaj komentoj pri la plej gravaj aspektoj, ofte lasante la parolon al la Raporto mem, kiu, pretere dirite, estas verkita de nekonata funkciulo (verŝajne oficisto de la CO) kaj eĉ ne estas subskribita de la prezidanto kaj ĝenerala sekretario.

55.2 Iom pri ĝeneralaĵoj kaj administrado

El tiuj ĉapitroj oni ekscias, ke la nombro de aliĝintaj landaj asocioj kreskis al 43. Aliflanke, la nombro de la Asociaj Membroj (AM) malkreskis, ĉar en 1980 UEA fakte havis nur 20.490 AM kompare kun 22.379 en 1973, kiel montrite en *Horizonto* n-ro 3/81, p.62. Multe pli grave estas, ke la nombro de Individuaj Membroj (IM), nun 6.629, plu troviĝas malproksime de la 7.231 IM en 1973. Oni ankaŭ sciiĝas, ke en la CO laboris 9,4 geoficistoj, ke la tegmento de la domo estas riparita (dum "la cetero estas prokrastita"), ke la *Jarlibro* "aperis nur en julio, kaj ne kiel celate en aprilo" (la ĉijara ankoraŭ ne aperis); ke la Komitato, same kiel en la pasintaj jaroj, elektis plurajn novajn Honorajn Membrojn, tiel ke ilia

nombro nun fakte estas rekorda – la sola vera rekordo. Inter la honorigitoj oni trovas la nomon de S-ro N. Aleksiev (Bulgario), kies sola elstara "merito" por UEA, laŭ nia scio, estas la organizo de la antaŭhamburga partipolitika komploto kaj la hamburga puĉo kun la konataj negativaj sekvoj, kiujn reflektas ankaŭ la pritraktata Raporto. Pro tiu "sukceso" kaj pro siaj aktivadoj en la sovetisma t.n. Mondpaca Esperanto-Movado li jam pli frue ricevis altajn partiajn/ŝtatajn honorigojn en Bulgario. Oni povas preskaŭ kun certeco antaŭvidi, ke la nombro de HM progresie kreskos ankaŭ en la sekvantaj jaroj, kaj ke baldaŭ oni komencos aldonadi al ili ankaŭ novajn honorajn prezidantojn. Tiurilate la posthamburgaj komitatoj estas tre malavaraĵaj.

Por verki kaj akceptigi la novan kontraŭneŭtralecan Statuton – krome fuŝaĵon ankaŭ el aliaj vidpunktoj – la posthamburgaj gvidantaroj bezonis pli ol 5 jarojn! Nun oni sciiĝas, ke post pliaj 18 monatoj "la Ĝenerala Regularo ankoraŭ atendas revizion", kio verŝajne signifas, ke UEA laboras laŭ la nova Statuto, sed samtempe plu aplikas la malnovan Ĝeneralan Regularon. Sed ĝi plu "laboras" senplane, ĉar "la Estraro transprenis la komision pretigi strukturon de la 4-a Baza Laborplano, laŭ kiu plulaboru la Komisiono pri Planado"! Do, pli ol 6 jarojn post Hamburgo la Estraro eĉ ne pretigis la "strukturon" de la nova Laborplano por ne paroli pri la "plulaborado" de la Komisiono pri Planado laŭ tiu ankoraŭ ne ekzistanta "strukturo" por fine, eble post pliaj 3-4 jaroj, prezenti projekton de propono, pri kiu oni siavice "diskutos" dum kelkaj pliaj monatoj aŭ jaroj, ktp. Vere, se ne estus tragike, estus tre komike. En tiaj kondiĉoj alproksimiĝas la 100-jara datreveno de Esperanto en 1987...

55.3 Pri informado kaj CED

Jam dum jaroj nenio estas farata sur la kampo de informado, iam bonege organizita, harmoniigita kaj efike funkcianta sur la internacia, landa, loka kaj faka niveloj. La kompletan neglekton de tiu ĉi esence grava agadbranĉo ilustras jenaj laŭvortaj eltiraĵoj el la Raporto mem:

"Ĝuste sur ĉi tiu kampo estas aparte malfacile difini kiu devas plenumi kiun informan taskon"(!) – "Estis diskutitaj ankaŭ ideoj pri eldono de internacie uzeblaj informiloj, ekz. afiŝoj, kiuj preskaŭ plene mankas en la merkato" – "La iam bone konata kaj nun preskaŭ forgesita seslingva flugfolio de UEA ankoraŭ atendas sian reeldonon" . "Internacia Gazetara Servo (IGS) produktis nur kelkajn novaĵbultenojn en 1980" (kiom?) – "La eldono de Esperanto-Dokumentoj stagnis" – "En Stokholmo ne funkciis la Esperanta branĉo de la Kongresa Gazetara Servo, kion oni en pluraj flankoj forte kritikis" – "Ankoraŭ mankas internacia kunordiganto de ĉi tiu agadformo" (t.e. prelegvojaĝoj)

– "Neniu statistikis internacie la radio-elsendojn pri Esperanto. Same pri la televido" (kaj kion ajn alian) – "Necesas rezigni pri teoriumado kaj simple produkti kelkajn bazajn helpilojn, kiel ekzemple tiun seslingvan faldfolion kaj internacie uzeblan afiŝon" (la sola saĝa diro en la Raporto).

Tio, do, estas la rezultoj, vere ŝokaj, malgraŭ la diversaj komisionoj pri informado, planado ktp., dum jaroj elektataj kaj reelektataj, diskutantaj kaj rediskutantaj senespere en seneliraj sakostratoj. Oni komparu la nunan staton kun la antaŭhamburgaj aktivadoj ankaŭ sur tiu ĉi kampo per relego de la tiutempaj statistikoj kaj precizaj informoj pri la plenumitaj laboroj (ne pri "ideoj", "projektoj de proponoj", "diskutoj" k.s.) en kiu ajn el la Estraraj Raportoj por la periodo 1950-1974 aŭ en la respektivaj partoj de *Esperanto en Perspektivo*.

La *Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED)*, kiu dum sia funkciado ekde la fondiĝo en 1952 ĝis la fino de 1974 kolektis milojn da dokumentoj, publikigis plurajn centojn da dokumentoj en Esperanto kaj en naciaj lingvoj, eldonis kelkajn verkojn, interalie la monumentan *Esperanto en Perspektivo*, fakte ne plu ekzistas. En la parteto dediĉita al CED oni povas legi la subitan novaĵon, ke la Estraro de CED estis "provizora", kaj la daŭre ripetatan "novaĵon", ke "dum pluraj jaroj" ĝi "laboris", sed neniu povas vidi kiajn rezultojn donis tiu "laboro". Nun, laŭ la Raporto, CED havas "pli multnombrajn kaj pli laborkapablan estraran teamon, sub la respondeco de la estrarano pri esploro kaj dokumentado, D-ro Tonkin". Tamen, la Raporto nenion diras pri la aliaj "teamoj", nek pri la ĝisnuna laboro ĉu de la nova "laborkapabla" estraro, ĉu sole de la respondeca estrarano, nek pri ia laborplano de CED, nek pri kio ajn alia rilate al CED. Kun escepto de la nomo, vere mallojale plu ekspluatata, tiu surpapera CED havas absolute nenion komunan kun la organiza strukturo, celoj, laborplanoj kaj realigoj de la ĝishamburga CED, kiu, tre bedaŭrinde por Esperanto, forpasis la 31-an de decembro 1974.

55.4 Aliaj eroj

Estas menciinde, ke UEA plu konservas la konsultajn rilatojn kun Unesko, establitajn en 1954, kaj ke ĝi estis reprezentita en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Beogrado (pri la karaktero de tiu reprezentiĝo v. punkton 44 en *Horizonto* 1/81, p. 22). Okaze de la akcepto de la reprezentantoj de UEA fare de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, la delegacio transdonis al li la librojn aperintajn en la Serio Oriento-Okcidento, sed en la koncerna raporto oni "forĝesis" menci, ke ankaŭ tiu Serio estis iniciatita kaj realigita antaŭ 1974. La Fakoj de UN pri Publika Informado eldonis la Esperanto-tradukon de la Ĉarto de UN

kaj la Statuto de la Internacia Kortumo. Temas pri iom reviziita eldono de la samaj internacijuraj dokumentoj, kiujn siatempe eldonis UEA, sed la Raporto denove forgesas aldoni, ke la unuan tradukon faris R. Harry, E. Svane kaj la red. de tiu ĉi rubriko, kaj ke la publikigon prizorgis Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, sub kies aŭspicio la broŝuro aperis. Ĉie en la Raporto troviĝas mencioj pri diversaj pozitivaj atingoj, pri kiuj UEA havas nenian meriton. Tipa ekzemplo estas la informo pri la uzo de Esperanto kiel oficiala lingvo en la 9-a Internacia Kongreso de Kibernetiko. Tiaj kaj similaj atingoj, kiuj havas nenion komunan kun UEA, povus kaj devus esti menciitaj fine de la Raporto en iu ĝenerala trarigardo pri la stato de la Esperanto-Movado, kun klara indiko, ke ne temas pri agadoj de UEA. Aliflanke, se oni mencias alies agadojn kaj atingojn, kiel abunde faras la Raporto pro foresto de propraj, oni devis ne ellasi la tre utilan laboron de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, la regulan publikigadon de *Internacia Jura Revuo*, enhave kaj lingve la plej bona nuntempa faka Esperanto-periodaĵo, aŭ la fondon de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, aŭ la tre sukcesajn konferencojn de la sendependa N.E.M., aŭ la revuon *Horizonto*, kaj ĉion alian ligitan al la partipolitike neŭtrala kaj sendependa esperantismo.

Se oni esceptas la atingojn de aliaj kaj la raportitajn kutimajn administratajn rutinaĵojn, restas nur la eldonado de *Esperanto* (ofte kun prokrastoj), la publikigo de la *Jarlibro* (416-paĝa kompare kun la 720 paĝoj de ambaŭ partoj de la *Jarlibro* por 1973), la organizo de la UK kaj la bone funkcia Libroservo kiel la solaj pozitivaj aktivadoj kun konkretaj rezultoj, ĉefe komercaj-profitaj.

55.5 Financoj

La antaŭhamburgaj financaj raportoj konsistis el jenaj partoj: Spezoj, Bilanco, Detaligo de la Fondaĵoj kaj Kapitalaj Kontoj (interalie Propaganda Konto), Buĝeto, Konto de la UK, Konto de CED, Buĝeto de CED, Konto kaj Buĝeto de la prestiĝa *La Monda Lingvo-Problemo* (tiutempe eldonata de CED kaj plene sub ĝia kontrolo), Kontoj de TEJO kaj Bilanco de la Instituto Hodler, kiel ankaŭ, aldone, Konto de la Akademio de Esperanto. Ĉiu Financa Raporto estis kontrolita kaj subskribita de ŝtata revizoro kaj de la revizoroj elektitaj de la Komitato. Tia Financa Raporto donadis klaran kaj realecan bildon pri ĉiuj enspezoj kaj elspezoj, pri la rimedoj uzitaj por diversaj celoj, pri la tuta financa situacio. La nuna Financa Raporto konsistas nur el Spezokonto, Bilanco kaj Buĝeto, dum la Kongresa Spezokonto de Stokholmo estas promesita por Brazilio. La Financa Raporto estas subskribita nek de ŝtata revizoro, nek de la du

revizoroj elektitaj de la Komitato. Tia grave manka Raporto estas ne komprenebla. Ĝi neniel povas doni eĉ ideon pri la reala situacio, tute speciale ne pri tio, ĉu la diversaj elspezoj estis vere necesaj aŭ almenaŭ utilaj el vidpunkto de la celoj de UEA kaj la interesoj de Esperanto. Ekzemple, la tuto de la vojaĝaj kaj restadaj elspezoj de la Estraro, oficistoj kaj komisiitoj estis 52.692 guldenoj (kompare kun 14.764 gld. en 1973), kaj oni prave povas demandi sin kial ili vojaĝis tiel multe, kiajn rezultojn donis tiuj vojaĝoj kaj entute ĉu tiel altega sumo estas pravigebla, se oni ne trovis eĉ iom da mono almenaŭ por eldoni seslingvan faldfolion aŭ por iu alia fakte utila celo (v. supre sub 52.3).

Pro la menciitaj gravaj mankoj kaj prisilentoj ne estas eble komenti la Financan Raporton iom pli detale. Tamen, nur du ĝeneralaj rimarkoj:

(i) La Spezokonto montras pozitivan saldon de 649 gld. Kompreneble, se oni "ŝparas" (je la kosto de la MA) unu n-ron de *Esperanto*, ne publikigas la *Duan Parton de la Jarlibro*, ĉesigas kian ajn agadon en la sfero de informado, praktike nuligas IGS kaj la aliajn informbultenojn, ne prizorgas la artikolan servon, malatentas statistikadon, "liberiĝas" de la iam elstara LMLP, likvidas CED, kies ampleksajn taskojn neniu transprenas, ne organizas kiun ajn mondan kampanjon preterlasante tiel unikajn okazojn, ktp., alivorte: se oni detruas preskaŭ ĉiujn antaŭhamburgajn agadojn, kiuj donadis konstantajn impulsojn al Esperanto kaj daŭre altigadis la reputacion de UEA (parte ankoraŭ ekspluatatan), sed centriĝas al 2-3 profitdonaj entreprenoj, tiam oni devus gajni eĉ multe pli ol 649 guldenojn, kio sub tiaj kondiĉoj en ĉiu okazo signifas malgajnon por Esperanto. Tiurilate UEA reduktiĝis al malgranda komerca entrepreno. Ĉu tio, aldone al perditaj neŭtraleco kaj idea sendependeco, estas ĝia celo laŭ la nova Statuto?

(ii) Laŭ la Raporto, fine de 1980 la asocia kapitalo estis 529.694 gld. Pro la supre menciitaj kaŭzoj ĝi povus kaj devus esti pli granda. La Raporto kun fiero akcentas, ke tio estas "rekordo" kaj, inkluzivante la fondaĵojn, per bele desegnita, sed falsa diagramo grafike prezentas la "rekordon". Fine de 1973 (la lasta jaro antaŭ Hamburgo) la asocia kapitalo (sen la fondaĵoj, kompreneble) estis 265.682 guldenoj. Ni ne konas la precizan procenton de la inflacio en Nederlando, sed verŝajne ĝi estis meze minimume 10% jare. Se tiel, la fakta valoro de la asocia kapitalo fine de 1980 estis malpli granda, ol la fakta valoro de la asocia kapitalo fine de 1973. La financaj "specialistoj" de UEA devus scii tion. Serioza Financa Raporto devus ne blufi per blovitaj, inflaciaj "rekordoj", sed objekte prezenti la situacion. Espereble la prezidanto, kiu ja estas specialisto pri financoj, korektos tiun plian blufan rekordon (aŭ rekordan blufon) kaj,

antaŭ ol fine subskribi la Raporton, reduktos ĝin almenaŭ tiurilate al realeca dimensio.

Eble troviĝos almenaŭ kelkaj komitatanoj, kiuj maltrankviliĝos pro la tuta situacio de UEA ankaŭ tiurilate. En tiu Raporto pri neagadoj ili ja povas trovi eĉ pli ol "sufiĉe da ekscitaj alineoj", sed certe ne en la senco, en kiu uzis la vortojn inter citosignoj la redaktoro de *Esperanto* sur la interna kovrilpaĝo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18 de *EeP*.

56 Oficejo de UEA en Budapeŝto

Laŭ la ĉefartikolo en la maja n-ro de *Esperanto*, UEA malfermis en Budapeŝto "scienteknikan oficejon". Per tio, laŭ la verkinto de la artikolo, "la Estraro de UEA nun montras, ke ĝi ne restis surda antaŭ la helpokrioj el Irano, kie la novaj lernantoj unuavice serĉas ĝuste tian literaturon" (sciencan). Pretere dirite: jam dum jaroj la organo de UEA informas pri miloj da gestudentoj, kiuj lernas Esperanton en Irano, sed ni estus tre feliĉaj renkonti nur dekon da lernintoj aŭ almenaŭ legi kiun ajn ilian artikoleon en bona Esperanto en kiu ajn periodaĵo. Tiu preteksto por malfermi oficejon en Budapeŝto estas ridinda. La vera motivo devas troviĝi aliloke. La oficejo estas malfermita surbaze de iu kontrakto, kiu, tamen, ne estas publikigita. La subskriban ceremonion en Budapeŝto ĉeestis la prezidanto kaj la ĝenerala direktoro de UEA. Apenaŭ necesas diri, ke ne nur HEA, sed nun ankaŭ la oficejo de UEA en Budapeŝto troviĝos sub rekta kontrolo de la politika polico, ĉar en unupartiaj totalecaj ŝtatoj ne povas esti alimaniere. Espereble tion scias almenaŭ parto de la nuna membraro de UEA. Kial necesis tiu plia partipolitika kompromitiĝo de la iam neŭtrala kaj sendependa UEA? Se iam aperos unusola vere scienca verko de la Budapeŝta Oficejo, ni certe bonvenigos ĝin.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 5 de *Hamburgo en Retrospektivo* (HeR).

57 Kontraŭ nukleaj armiloj – en Okcidenta Eŭropo

La 14-a "Konsultiĝo de Esperanto-Organizoj de Socialismaj Landoj", fakte organizaĵo de Esperanto-asocioj kaj instancoj sub la gvido de Sovetio en la sino de UEA, akceptis Rezolucion de la 22-a de aprilo 1981, en kiu la subskribintaj organizaĵoj/instancoj (kun la escepto de du, ĉiuj "aliĝintaj asocioj" de UEA) plian fojon atakas la "plej agresemajn imperiismajn rondojn" (kompreneble okcidentajn) laŭ la konata sovetisma politika

kaj internacijura doktrino. Interalie, la subskribintoj "senrezerve subtenas ĉiujn sociajn fortojn, organizaĵojn kaj movadojn, kiuj energie kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj, *destinitaj por lokigo sur la teritorio de okcidenta Eŭropo* (nia substreko). Kial ne ankaŭ en Soveta Unio kaj en la blokaj landoj? En la okcidentaj demokratioj jam troviĝas multaj movadoj, kiuj "kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj" kaj ilian lokigon sur siajn respektivajn teritoriojn, sed en Sovetio kaj ĝiaj Satelitoj estas strikte malpermesitaj, sub minaco de la plej severaj kriminaljuraj punoj, ne sole movadoj, sed eĉ nuraj unuopaj protestoj kontraŭ la fabrikadon de nukleaj kaj aliaj plej teruraj armiloj en Soveta Unio kaj en la aliaj landoj de la Varsovia Pakto. Tamen, nur paralelaj premmovadoj en la landoj de ambaŭ flankoj rilate siajn proprajn grandpotencojn povus pozitive efiki kaj savi la homaron de la plago ne nur de nuklea, sed de kia ajn milito.

La Rezolucion publikigis la organoj de la blokaj Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj, inter la aliaj ankaŭ *Budapeŝta Informilo* de junio 1981. Ne estas konate ĉu almenaŭ la Budapeŝta Oficejo de UEA protestis pro tiu partieca partipolitika propagando.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 5 de *HeR*.

58 Plia sendependa instituto pri la politikigo de UEA

El n-ro 5/80 de *Starto*, organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (aliĝinta asocio de UEA), mi sciiĝis, ke *Swiss Press Review and News Report* en Berno "presis artikolon de sia eldonisto Peter Saver '*Soviets Infiltrate Esperanto Movement*' " en n-ro 17 de la 13-a de aŭgusto 1980. *L'esperanto*, organo de Itala Esperanto-Federacio, verŝajne observante la rekomendon de S-ro Renato Corsetti (vicprezidanto de UEA), republikigis la atakartikolon de *Starto*, kaj tiel la duan fojon oni povas legi la saman informon pri la svisa raporto.

Scivolema pri kio efektive temas, mi skribis al la redakcio en Berno. Je mia granda surprizo mi ricevis respondon ne de la menciita svisa periodaĵo, sed de *Schweizerisches Ost-Institut* (Svisa Oriento-Instituto) kun aldonita fotokopio de la originala raporto de la Instituto pri la trafiltrigo de sovetistoj en la Esperanto-Movadon. La titolo ne estas tute ĝusta, ĉar ne temas pri politikigo de la tuta Esperanto-Movado, sed nur de UEA. Kun tiu escepto kaj kelkaj eraroj, interalie pri la karaktero de Esperanto ("artefarita", "inventita", k.s.), la raporto de la Instituto estas esence korekta kaj entenas ankaŭ kelkajn pliajn, ĝis nun nekonatajn

faktojn, ekzemple pri la Ligo de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Kontaktoj kun Aliaj Landoj, al kiu apartenas ankaŭ Asocio de Sovetaj Esperantistoj (pri la stato de la Esperanto-Movado en USSR v. la artikolon publikigitan en *Horizonto* n-ro 2/81). Jen la Esperanto-traduko de kelkaj partoj de la raporto, kiuj rilatas al UEA:

"En la sepdekaj disfamiĝis informoj, ke la orienteŭropaj Esperanto-parolantoj (fakte nur la altruditaj politikaj gvidantoj, nia rim.) forte klopodas havigi al si gvidan rolon en UEA, speciale en la junularaj organizaĵoj de la Movado".

"La nova Soveta Societo de Esperanto-parolantoj intime kunlaboras kun alia internacia Esperanto-organizaĵo – konata kiel komunista frontorganizaĵo – Mondpaca Esperantista Movado aŭ MEM... MEM estis fondita en 1952-53, verŝajne je la iniciato de la Monda Packonsilantaro, la bone konata komunista frontorganizaĵo kun sidejo en Helsinko. La prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev el Bulgario (nun Honora Membro de UEA, nia rim.), estas ankaŭ membro de la Monda Packonsilantaro, kaj la du organizaĵoj havas intimajn ligojn. Ili estis firmigitaj per subskribo de interkonsento pri reciproka subteno kaj kunlaborado en oktobro 1973" (tuj post la subskribo la sama N. Aleksiev intensigis sian komplotan agadon, kio kondukis al la hamburga puĉo, nia rim.).

"La oficiala organo de MEM, Paco, publikigas ĉiumonate deklaraĵojn kaj deklarojn, komunikatajn de la Monda Packonsilantaro. Tiu ĉi periodaĵo propagandas ekskluzive la linion de la Moskva Komunista Partio. MEM kaj la Monda Packonsilantaro estas komplete kontraŭ-Okcidentaj, kaj ili prezentas ĉiujn problemojn de paco, detanto kaj malarmado ekskluzive el soveta vidpunkto – samtempe prisilentante la sovetan sinarmadon."

"Unuarangan ekzemplon de la sovetaj propagandaj fortostreĉoj donis la renkontiĝo, okazinta antaŭ nelonge, de la Esperanto-parolantoj (fakte de la altruditaj parti-politikaj gvidantoj, nia rim.) el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Orienta Germanio, Pollando, Soveta Unio, Hungario kaj, por la unua fojo, Vjetnamio en malgranda urbo en Hungario la lastan aprilon (1980, nia rim.): la okazo estis uzita sole por kondamni la militan intervenon de Ĉinio en Vjetnamio... Ĉio ĉi montras la realan interesigon de Soveta Unio pri Esperanto".

Laŭ nia scio, tio estas la dua scienca-esplora sendependa instituto, kiu raportis pri la politikigo de UEA laŭ la sovetisma linio, sed eble estas ankaŭ aliaj. Tamen, verŝajne troviĝos esperantistoj-naivuloj, kiuj plu kredos, ke tiajn gravajn eventojn – kaj unudirekta politikigo de iam sendependaj kaj prestiĝaj internaciaj organizaĵoj, kia UEA, ja estas grava – oni povas "kaŝi" antaŭ la demokrata monda publiko. Cetere, kial kaŝi? En kies intereso? Anstataŭ "kaŝadi", ĉu ne estus pli saĝe – kaj en ĉiu okazo honeste – ŝanĝi tion, kion senespere oni volas kaŝi? La antaŭhamburga UEA havis nenion por kaŝi, kaj tial ĝi ĝuis respekton ĉie en la mondo,

eĉ en la landoj, kies totalecaj reĝimoj ne ŝatis ĝian sendependecon, firme ligitan al la partipolitika kaj religia neŭtraleco.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 5 de *HeR*.

59 Senŝanĝe sub nova nomo

Laŭ *Esperanto*, n-ro 7-8/81, la nomo de "Centra Laborrondo Esperanto en GDR" estas ŝanĝita al "Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR". La ŝanĝo de la nomo estas farita ne de la esperantistoj, sed de la prezidio de Kulturligo de GDR. La nova nomo eble kredigos iujn naivulojn, ke temas pri iu nova, sendependa Esperanto-Asocio en GDR. Fakte, ĉio restis absolute la sama kiel antaŭe: instanco de la ŝtata-partia Kulturligo, aganta plene laŭ la programo kaj konkretaj instrukcioj de la orientgermana Komunista Partio, siavice senkondiĉe dependa de la sovetia ŝtata-partia linio. Tion eksplicite konfirmas la ĉefartikolo en *der esperantist*, n-ro 2/81, en kiu la 26-a Kongreso de la KP de Soveta Unio estas ligita al la X-a Partia Kongreso de GDR, kaj la "klaraj celoj" de la lasta altrudas konkretajn taskojn ankaŭ al Kulturligo kaj ĉiuj ĝiaj instancoj, inter kiuj la Laborrondo, nun Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Ĉar tiu partipolitika instanco estas "aliĝinta asocio" de UEA, estas tute klare, ke, kiel ĝis nun, ĝi klopodos realigadi la novajn taskojn ankaŭ en UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)*.

60 Pliaj pruvoj de la politikiĝo de TEJO

60.1 Celoj de MFDJ kaj TEJO: "Grandparte la samaj"

En *der esperantist*, n-ro 1/81, aperis intervjuo de András Lukács, junulara delegito (JD) kaj fakdelegito (FD) de UEA en Budapeŝto, kun "la 30-jara ĉilia komunista E.O. Fernandez", la prezidanto de la t.n. Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ). Tiu intervjuo estis unue publikigita en *Budapeŝta Informilo*, n-ro 4/80, unu el la organoj de HEA, plia partipolitika "aliĝinta asocio" de UEA.

El la intervjuo vidiĝas, ke la prezidanto de MFDJ scias tre malmulte pri la lingva problemo en la mondo kaj nenion pri Esperanto, malgraŭ la plurjara "kunlaboro" kun TEJO, la junulara sekcio de UEA. El tiu vidpunkto ĝi estas senvalora. Valora estas nur la konfeso pri la vera partipolitika karaktero de la rilatoj inter MFDJ kaj TEJO. Interalie, la

intervjuito diris, ke "la celoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO estas grandparte la samaj".

60.2 IUS kaj TEJO

Laŭ *Budapeŝta Informilo*, n-ro 11/80, kaj *der esperantist*, n-ro 1/81, András Lukács kaj Sándor Revesz, reprezentantoj de la junulara sekcio de UEA, dum du tagoj vizitis en Prago la sidejon de Internacia Unuiĝo de Studentoj (IUS), kie ili estis akceptitaj de la prezidanto kaj tri vicprezidantoj de IUS. Laŭ la informo, la funkcioj de IUS "konfirmis la pretecon de IUS evoluigi kaj fortikigi la kunlaboron inter IUS kaj TEJO".

60.3 Kio estas MFDJ kaj IUS?

En ĉap. 4.3 de *Hamburgo en Retrospektivo* troviĝas detaloj pri tiuj du partipolitikaj organizaĵoj. Ĉi tie estu nur dirite, ke ambaŭ apartenas al la grupo de t.n. "parakomunistaj organizaĵoj" de sovetia speco, t.e. plene dependaj de Moskvo. MFDJ estis fondita en 1945. Misgviditaj de la vorto "demokrata" en la titolo, en la komenco multaj fakte demokratizaj junularaj organizaĵoj aliĝis al ĝi. Kiam ili post nelonge konstatis, ke MFDJ estas nek demokrata, nek celas proksimigi la gejunulojn de ĉiuj landoj, sed agadas kiel instrumento de porsovetia propagando, ili povis fari nenion alian ol ekŝiĝi, ĉar montriĝis, ke per lerta manipulado la sovetiistoj ekkaperis ĉiujn decidajn poziciojn. Ĝis 1951 la sidejo estis en Parizo. En tiu jaro la franca registaro elpelis ĝin pro subversaj (subfosaj) politikaj agadoj kaj la sidejo estis translokigita en Budapeŝton, kie ĝi plu troviĝas kaj kie ankaŭ UEA nun havas dependan "scienteknikan oficejon" (v. eron 53 de tiu ĉi rubriko). IUS havas identajn celojn, sed ĝi kampanjas unuavice inter la studentaro. Ĝia sidejo estas en Prago.

Ambaŭ organizaĵoj havas intimajn reciprokajn rilatojn. MFDJ, IUS kaj aliaj parakomunistaj internaciaj organizaĵoj kampanjas por la sovetia koncepto de monda paco (*pax sovietica*) kaj "kontraŭ imperialismon", "kontraŭ koloniismon", "kontraŭ la neŭtronan bombon", sed nur "en Okcidenta Eŭropo", ktp. laŭ la konata linio en la t.n. "ideologia lukto". Estas bone ripeti, ke en 1950, lige kun la konflikto inter Stalin kaj Tiĉo, MFDJ kaj IUS eksigis siajn respektivajn jugoslaviajn sekciojn el la du organizaĵoj per rezolucioj, en kiuj la jugoslaviaj gejunuloj estis deklaritaj "perfiduloj de la afero de la paco kaj demokrateco" kaj "dizertintoj fuĝintaj en la tendaron de imperialistaj militistoj"! Tiel.

Jen, do, la internaciaj "demokratiaj" organizaĵoj, kies celoj estas "grandparte la samaj", kiel tiuj de TEJO, kaj kiuj konfirmis la pretecon eĉ

pli evoluigi kaj fortiki la kunlaboron kun la junulara sekcio de UEA. Ĉio ĉi okazas sen kontraŭstaro, do kun konsento de la posthamburgaj gvidantaroj de UEA, sen rezisto fare de la membraro de UEA/TEJO, eĉ sen kia ajn protesto de Jugoslavia Esperanto-Ligo aŭ de ĝia junulara sekcio, kies membrojn, kiel parton de la jugoslavia junularo, la du organizaĵoj kalumnie insultis.

Ĉu surprize, ke sendependaj politiksciencaj institutoj kaj aliaj instancoj ekster la Esperanto-Movado konstatas la kreskantan unudirektan politikigadon de UEA ekde la eventoj de 1974?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 4.2 kaj 5 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

61 Iom pli pri M.E.M.

61.1 Nova n-ro de "Paco"

Meze de 1981 aperis la n-ro por 1980 de *Paco*, bulteno de la MEM-Sekcio de GDR, Kulturligo de GDR (asocia sidejo: Centra Laborrondo Esperanto). La grandformata, 40-paĝa kajero, presita sur luksa papero kaj riĉe ilustrita estas preskaŭ komplete dediĉita al partipolitika propagando kaj laŭdado de ĉio sovetia, inkluzive la invadon de Afganio, kaj al atakado de NATO kaj de la okcidentaj demokratioj, ĉio laŭ la konata sovetia politika linio. En la cetera parto troviĝas bona artikolo de Eliza Kehlet "Denaskaj Esperantistoj", represita el *Kontakto* n-ro 60/78, kaj misprezenta artikolo pri la SAT-Kongreso de 1926 en Leningrado kun piednoto de la redaktoro, ke SAT "tiamtempe estis progresema", kio implicas, ke nun ĝi estas "reakcia" (!)

La eldoninto estas Centra Laborrondo, nun Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, samtempe "aliĝinta asocio" de UEA. La respondeca redaktoro estas D-ro D. Blanke, komitatano de UEA, membro de la estraro de ĝia CED (fakte ne funkcia) kaj membro de ĝia Komisiono pri Planado (de kiu oni plu atendas konkretan planon).

61.2 M.E.M. ĉe la Monda Parlamento de Popoloj

Tiu "parlamento", fakte plia instrumento de sovetia propagando, okazis dum septembro 1980 en Sofio. La delegacio de MEM konsistis el kvin membroj sub la gvido de N. Aleksiev, honora prezidanto de MEM kaj nun ankaŭ honora membro de UEA (pri la "meritoj de N. Aleksiev por UEA v. eron 52.2 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto*, n-ro 35 (5) 1981,

p. 105). V. Oljanov, alia membro de la delegacio, estas delegito (D) kaj fakdelegito (FD) de UEA en Sofio, samtempe ankaŭ ĉefredaktoro de *Paco* kaj membro de la Sekretariato de MEM.

La supraj du informoj ĵetas plian lumon sur la ligojn, ankoraŭ ne formaligitajn, inter MEM kaj UEA. Vere ne estas surprize, ke sendependaj politiksciencaj institutoj kaj aliaj instancoj ekster la Esperanto-Movado konstatas la kreskantan unudirektan politikiĝon de UEA ekde la eventoj de 1974.

Ankaŭ tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 4.2 kaj 5 de *HeR*.

62 IEAJ ne ekzistas – laŭ la *Jarlibro* de U.E.A.

Sur p. 63 de la *Jarlibro* de UEA por 1981 (publikigita en julio) troviĝas listo de internaciaj Esperanto-organizaĵoj ne ligitaj kun UEA. Estas donitaj koncizaj informoj pri SAT kaj ĝiaj organoj, pri MEM kaj pri kvin aliaj organizaĵoj, inter kiuj ankaŭ Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, sed estas komplete ellasitaj ne nur la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj ĝia organo *Horizonto*, sed ankaŭ Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), daŭre funkcia ekde la fondiĝo en 1957, kaj de ĝia organo *Internacia Jura Revuo*, la plej prestiĝa kaj plej grava faka Esperanto-periodaĵo en la nuntempa Esperanto-Movado. Ne estas klare, ĉu tiuj ellasoj estas faritaj laŭ kaprica decido de la ĉefuloj en la CO de UEA, aŭ laŭ instrukcioj de la Estraro. En ĉiu okazo plia prilento de faktoj. Al kiu utilas tio?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 16.4 kaj 16.2.2 de *EeP*.

63 Konfirmo pri la nefunkciado de CED

Jam delonge ni konstatis, ke post Hamburgo CED ĉesis funkcii (interalie, en *Hamburgo en Retrospektivo*, p.79 de la dua eldono, 1979, kaj en ero 52.3 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 35(5), 1981, p.106). Nun estrarano de tiu nefunkcia, pure surpapa CED, Detlev Blanke, konstatas esence la samon en cirkulero de la 6-a de februaro 1981, kiun ni ĵus tralegis. Jen kelkaj eltiraĵoj: "...*Mi vane serĉis en la resumo/ de la Estrara Raporto/ ion konkretan pri CED kaj pri planado*" – "*La 9 elektitaj 'CED-estraranoj' ekde aŭgusto /1980/ atendas vane iujn signojn, informon, stimulon...*" – "*La Estraro ne disponas pri klara strategio kaj taktiko, se temas pri ia rolo de la scienco en la antaŭenigo de Esperanto*" – "*Tiu situacio... klarigas la pasivecon, se ne paroli pri kaoseco, pri CED*" – "*Oni komencis tiujn*

projektojn kun pompaj anoncoj (CED-rubriko en 'Esperanto '), poste forgesis aŭ ne plu interesiĝis pri ili. Tio estas komplete neserioza situacio por 'scienca institucio kiel CED" – "LPLP /la trompa, kvazaŭa daŭrigo de la iam prestiĝa revuo de CED La Monda Lingvo-Problemo/ komplete glitis el niaj manoj. La esperantlingvaj resumoj mizeriĝis aŭ tute malaperis.."

Rimarko: En la supra teksto la partetoj en rektaj krampoj /.../ estas niaj aldonoj por komprenigi la sencon de la citaĵo, dum la parteto en rondaj parentezoj (...) troviĝas en la originalo.

Ne necesas kia ajn komento. Oni nur povus demandi sin, ĉu D-ro D. Blanke, mem estrarano de tiu praktike neekzistanta CED, ne sentas kunrespondecon pro tiu mizera stato, al kiu la posthamburgaj gvidantaroj de UEA reduktis tiun iam florantan institucion, al kies agadoj grandparte ŝuldiĝas la antaŭhamburgaj atingoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2 de *EeP*.

64 Ankoraŭ pri la membro-nombro de UEA

S-ro G. Maertens, la nuna prezidanto de UEA, kaj la redaktoro de tiu ĉi rubriko interŝanĝis leterojn, kies partoj rilatantaj al la membro-nombro de UEA aperas sube:

En sia letero de 16.10.81 S-ro Maertens skribis:

"Estimata redaktoro, Ni skribas por atentigi vin pri erara prezento pri la membraro de UEA, kiun vi aperigis en via n-ro 1981/3 sur la p. 62, kaj kiun vi ripetis en n-ro 1981/5 sur la p. 105. Temas pri la nombro de Aligitaj Membroj (pli frue nomataj Asociaj Membroj), kaj precipe pri la Junaj Aligitaj Membroj (J-AM)".

"En 1977 la Centra Oficejo ordigis la administradon de la Aligitaj Membroj, por ke la nombro de Junaj Aligitaj Membroj definitive ĉesu esti 'arbitra kaj nekontrolebla'. Por ĉiuj tiuj 7064 J-AM la CO ricevis la Statute devigan kotizon. Ili ĉiuj estas egale validaj kaj kontrolataj, kiel la 20490 Aligitaj Membroj, kiuj estas pli-ol-26-jaraj".

"Kiam Landa Asocio plenskribas la respondilon pri siaj Aligitaj Membroj, ĝi samtempe deklaras, kiom el tiuj estas malpli-ol-26-jaraj. Tiuj pli-ol-26-jaraj eniras la kategorion AM, tiuj malpli-ol-26-jaraj eniras la kategorion J-AM. Surbaze de tiu deklaro la Landa Asocio devas pagi al UEA la kotizojn". "Do, la ĝusta cifero por la sumo de ĉiuj Aligitaj Membroj de UEA por 1980 estas nepre 27554. Tio estas fakto pruvebla per la financaj dokumentoj. Ni firme petas vin de nun ne plu ŝajniĝi, ke tio ne estas la vero.

Kore salutas, G. Maertens, prezidanto de UEA"

En sia respondo de 21.10.81 la redaktoro de tiu ĉi rubriko skribis:

"Estimata Sinjoro Maertens, Diference de la organo de UEA, kiu ekde la fino de 1974 ĝis nun ne publikigis kiun ajn el la multnombraj korektoj pri faktoj (inkluzive la leteron de 22.08.81 de la antaŭa Honora Prezidanto de UEA S-ro H. Holmes al vi pri la donaco Dinslage), kiel respondeca redaktoro de la rubriko ED en Horizonte mi prizorgos, ke via deklaro pri la nombro de membroj estu publikigita".

"Por mia orientiĝo mi ŝatus scii : (i) ĉu tiuj J-AM estas samtempe membroj de TEJO, aŭ TEJO havas aliajn membrojn kaj, se tiel, kiom da ili; (ii) kiamaniere la Estraro pere de la CO "kontrolas" la nombron, ĉu nur laŭ la pagita kotizo, aŭ surbaze de listo kun ĉiuj nomoj; (iii) kiom alta estas la kotizo de J-AM kaj kiom tiu de AM; (iv) ĉu la nombro de J-AM estas aldonata al tiu de AM por determini la nombron de komitatanoj A, je kiu rajtas aliĝinta LA? Tio – kaj ankaŭ aliaj novaj reguloj – estas malklara, ĉar, laŭ mia scio, amendita aŭ nova Ĝenerala Regularo ankoraŭ ne estas publikigita. Mi estus tre danka, se vi havus la afablecon respondi al la supraj demandoj. Mi nepre deziras eviti kiun ajn, eĉ la plej etan erareton pri faktoj en miaj studoj kaj analizoj pri la nuntempa Esperanto-Movado, same kiel mi evitis ilin en la pasinteco.

Kun koraj salutoj, D-ro Ivo Lapenna"

La prezidanto de UEA neniam respondis al la demandoj (i) ĝis (iv) en mia supra letero. Tamen, sen tiuj respondoj ne estas eble ricevi klaran bildon pri la fakta situacio kompare kun tiu en 1973, la lasta jaro antaŭ Hamburgo, kaj pro la nepublikigo de la novaj reguloj aŭ nova Ĝenerala Regularo ĉio tiurilate restas sekreta. Ekzemple, oni konsideru, ke en 1973 tute ne ekzistis la kategorio de J-AM, sed nur tiu de AM, dum la tiamaj "junaj esperantistoj" estis organizitaj en TEJO kiel junulara sekcio de UEA kaj, laŭ la "deklaro" de la Estraro de TEJO, ĝi havis 9853 membrojn, kion mi rigardis nerealeca. Tamen, se laŭ la nuna nekonata sistemo eĉ nur duono de tiuj preskaŭ 10000 membroj de TEJO en 1973 estus aldonita al la Asociaj Membroj por tiu jaro, la nombro de AM plus J-AM estus 27379 por 1973 kaj 30890 por la jam fama hamburga jaro 1974.

En ĉiu okazo, neniel subtaksante la valoron de AM, nun ankaŭ de J-AM, pri kiuj la Statuto tamen nenion diras, ĉiuj koncernatoj bone scias, ke la "deklaro" de la Landaj Asocioj pri tiuj membroj, kaj eĉ la pagoj por ili, ne povas reflekti la faktan staton, se oni ne liveras listojn kun iliaj nomoj. Decidaj ĉiam estis kaj restas la individuaj membroj, kaj ilia nombro malkreskis de 7231 en 1973 al 6629 en 1980, do perdo de 602 IM eĉ en la sepa jaro post Hamburgo, pri kio respondecas la kaŭzintoj de la malbono, certe ne la personoj, kiuj nur konstatas la faktojn.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 kaj 18.7 de EeP.

65 Pri H. Hodler kaj la origino de "Esperanto"

Monata Cirkulero, organo de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (Svislando), publikigis en n-ro 130 de septembro 1981 tre interesan dokumentan materialon eltrovitan de D-ro André Vedrine el Lyon (Francio) pri la grandaj malfacilaĵoj, kiujn frontis H. Hodler okaze de la transpreno de la gazeto *Esperanto*. Estis konate, ke Berthelot estis la fondinto de *Esperanto* kaj ke "li aŭ ebla posteulo vendis la gazeton, post ŝajne malbonaj spertoj, al Hodler" (Ed. Stettler, *Hector Hodler*, UEA, Genève, 1928). Verkante *Historieton de Esperanto en Lyon*, D-ro Vedrine nun malkovris en arkivoj dokumentan korespondadon inter H. Hodler kaj H. Tarry, el kiu sekvas, ke tiu H. Tarry estis la "ebla posteulo". Kontraŭe al la decido de la Administracia Konsilantaro de la gazeto, tiu "posteulo" deziris, ke la gazeto restu en Francio, kaj per sia obstino kaŭzis al Hodler ĝenojn. Hodler eĉ minacis per proceso, se li ne ricevos ĉiujn dokumentojn rilatantajn al *Esperanto* konforme al la decido de la Konsilantaro.

La malkovro de D-ro Vedrine, per si mem interesa el historia vidpunkto, samtempe plian fojon konfirmas, ke la ĉefaj aktivuloj en la Esperanto-Movado devis ĉiam sperti malfacilaĵojn kaj personajn malagrablaĵojn, se ili klopodis krei ion vere pozitivan.

Ni atentigas, ke en n-roj 119-129 de la sama *Monata Cirkulero* aperis serio da artikoloj pri la vivo kaj pensoj de Hodler. Ili ĵetas plian lumon sur la noblan personecon de la fondinto de UEA, kiu dum sia tuta vivo, bedaŭrinde tro mallonga, restis fidela al la idealoj de humaneco, demokrateco kaj sincera internaciismo.

La atentigoj en tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 10.1.2 kaj 14.3 de *EeP*.

66 "Esperanto" por komencantoj

La novembra *Esperanto* (n-ro 11/81) estas intence "konstruita nur per eroj" (t.e. verkita per vortelementoj) el "listo de 1000 vortopartoj" (kun tuja klarigo kio estas "vorto-parto"). Verŝajne tiu n-ro de *Esperanto*, negative unika en la historio de UEA – plej kredeble ankaŭ en la historio de kiu ajn ĉeforgano de kiu ajn serioza monda organizaĵo – estos recenzita en la rubriko *Tra la Esperanto-Gazetaro*. Ĉi tie ĝi meritas nur tri koncizajn rimarkojn:

1. Estas bone prizorgi literaturon kaj periodaĵojn por komencantoj. Tio estis kaj plu estas farata de diversaj eldonejoj. Sed transformi eĉ unusolan n-ron de *Esperanto*, ĉeforgano de monda organizaĵo en konsultaj rilatoj

kun Unesko ekde 1954, en 1000-vortan legaĵon por komencantoj estas tragikomika por UEA kaj humiliga por la Internacia Lingvo.

2. La redakcia aserto sur la interna kovrilpaĝo, ke la revuo *Esperanto* plu celas ebligi al la legantoj "*plenan informitecon pri ĉio koncernanta la Internacian Lingvon kaj la tutmondan Esperanto-Movadon*" estas plia malvero en la longega vico da malveroj kaj prisilentoj. Tion pruvas ankaŭ tiu ĉi n-ro, en kiu sur p-oj 184-85 estas laŭde listigitaj diversaj Esperanto-periodaĵoj, pluraj tute sensignifaj, kaj propagande laŭdataj kelkaj konate partipolitikaj de la sovetia bloko, precipe *Paco* (eĉ kun reproduktita kovrilpaĝo), sed ne estas menciitaj *Horizonto*, *Internacia Jura Revuo*, la jugoslavia *Voĉo* k.a., kiuj pro tiu aŭ alia kaŭzo "ne ĝuas la favoron" de la redakcio de *Esperanto*.

3. Se oni (kiu, fakte?) faris la eraran decidon publikigi tian n-ron por komencantoj kaj tiel senigi la seriozajn abonantojn de plia n-ro en unu jaro, oni almenaŭ devis rigore atenti al la lingvo. Fakte, en ĝi troviĝas ĝenaj malglataĵoj kaj eraroj, ekz. "geinfanoj" sur p. 195 anstataŭ "infanoj": knabo kaj knabino estas infanoj, ne geinfanoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 10.1.2 de *EeP*.

67 Pliaj partipolitikaj agadoj en ĈSSR kaj GDR

La fakto, ke en la lasta tempo tiu ĉi rubriko ne prezentis pliajn pruvmaterialojn pri partipolitikaj agadoj de "landaj asocioj" aliĝintaj al UEA, neniel signifas, ke tiuj partipolitikaj agadoj ĉesis. Ili enuige ripetigas kaj abundas precipe en ĈSSR kaj GDR. Ekzemple, laŭ la Ĉeĥa *Starto* (5/81), ĈEA ricevis fine de la pasinta jaro "multajn rezoluciojn", en kiuj oni "energie kondamnas la produktadon de neŭtronarmiloj, kiun malfermis usona prezidento Reagan". Ankaŭ la estraro de ĈEA "akceptis decidon akre protesti kontraŭ tiuj manieroj, kiujn uzas usona prezidento Reagan". Similajn antaŭaranĝitajn rezoluciojn akceptis aliaj blokaj asocioj apartenantaj al UEA.

Utilas memori, ke la 14-a Konsultiĝo de la t.n. "representantoj de la Esperanto-organiz/aĵ/ojen socialismaj landoj" (preskaŭ ĉiuj el ili aliĝintaj asocioj de UEA), okazinta en Pĥerov en 1981, akceptis Rezolucion, per kiu ĝi "senrezerve subtenas ĉiujn sociajn fortojn, organizaĵojn kaj movadojn, kiuj energie kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj destinitaj por lokigo sur la teritorio de okcidenta Eŭropo".

Superflue diri, ke en ĉiuj ĉi "rezolucioj", "protestoj" kaj "decidoj" ĉiam temas pri la "usona imperialismo", neniam pri la sovetia; ĉiam pri nukleaj armiloj de la Okcidento, neniam pri la sovetiaj, same detruaj; ĉiam pri kontraŭstaro al lokigo de nukleaj armiloj en okcidentan Eŭropon, neniam pri ilia lokigo en la orientan, ktp.

Por la "pacamaj reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj en socialismaj landoj – samtempe (kaj tio gravas el nia vidpunkto) komitatanoj de UEA – la sovetia invado de Afganio (nb. sen nukleaj armiloj) neniam okazis, ĉar tio tute ne estis invado, sed nur "frata helpo" al la afgana popolo por "protekti ĝin kontraŭ la ŭsonan imperialismon" (sic!). Ankaŭ la soldata botpremo de la ĉeĥa-slovaka printempa burĝono (plian fojon sen nukleaj armiloj) estis nenio alia ol plenumo de "socialisma devo" surbaze de "proleta internaciismo", dum la pola 13-a de decembro estis "lastmomenta neniigo" (ankoraŭfoje sen nukleaj armiloj) de "imperialisma intrigo en kiu "evidente" partoprenis eĉ la Esperanto-elsendoj de Radio Polonia (ĉesigitaj la saman tagon verŝajne por malebligi "imperialisman propagandon") kaj PEA, kvankam ĝiaj "reprezentantoj" fidele kunsubskribis ĉiujn "rezoluciojn" kaj "protestojn" kontraŭ la "ŭsonan imperialismon".

Kutime tiu ĉi rubriko prezentas faktojn, sed ne komentas. Ĉi-foje ni ne povas ne fari du rimarkojn:

1. Ni konstatas nur tiujn partipolitikajn agadojn, kiuj okazas en la kadro de UEA kaj sole tial, ĉar ili okazas en UEA. Alie ni eĉ ne menciis ilin en *Horizonto*. Tion ni faras kun la sola celo malhelpadi plian kompromitiĝon de Esperanto kaj, se iel eble, revenigi la Asocion al la antaŭhamburgaj neŭtraleco kaj sendependeco. Se al iuj ne plaĉas la faktoj, ili bv. skribi al UEA, ne al ni; se iuj malaprobas la konstaton de la faktoj, ili bv. skribi al ni, kaj ni volonte publikigos klerajn reagojn.

2. Laŭ la Gvidprincipoj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, la lokaj grupoj en GDR devus okupiĝi pri "politikaj ĉefproblemoj de la evoluo de GDR kaj de la internacia politiko" (*der esperantist* 4/81, p. 81), kompreneble laŭ la oficiala linio de la Partio (kun majuskla P). Malgraŭ "la tre grava helpo", kiun "al Kulturligo kaj la Esperanto-Movado en GDR donis la Partio" (*der esperantist* 5/61 p. 100), ŝajnas, ke la lokaj grupoj eĉ en GDR tediĝis de tiuj "politikaj ĉefproblemoj" kaj pasiviĝis. *der esperantist* plendas, ke la "malforta ĉenero en la ĝisnuna agado estas la grupoj", en kiuj necesos "konsiderinde altigi la intelektan nivelon" kaj "doni al ĉiu grupo konkretajn taskojn", ktp. (sama n-ro p. 115).

Oni povas demandi sin kian sencon plu havas eĉ el la vidpunkto de la kontraŭneŭtraluloj en UEA – tiu tuta partipolitika propagando, kiu tiel grave damaĝas la reputacion de Esperanto. En Okcidento, parte dank' al N.E.M. kaj *Horizonto* ĝi apenaŭ havas ian rimarkeblan eĥon. Eĉ sinceraj esperantistoj-komunistoj travidas ĝian malsincerecon kaj forĵetas ĝin. En la blokaj landoj ordinaraj esperantistoj ĉiam pli kaj pli distanciĝas kaj la plej kuraĝaj eĉ sukcesas sendadi kortuŝajn vortojn de apogo al la humaneca linio de N.E.M. La ekzemplo de Pollando montras,

ke per dulinia dekreto, kiel ni jam delonge antaŭvidis, la tuta agado por Esperanto povas esti haltigita aŭ eĉ ĉesigita. Morgaŭ tio povos okazi en GDR, USSR kaj en kiu ajn alia lando kun simila regadsistemo, se la partiaj/ŝtataj aŭtoritatoj konstatos, ke la mono elspezata por politika propagando per Esperanto ne donas la atenditajn rezultojn, ĉar la esperantismaj humaneco kaj internaciismo montriĝis multe pli fortaj, ol la pagata partipolitika agitado/propagando. En UEA mem kaj en TEJO la ĉefaj komplotintoj de Hamburgo, "farinte sian laboron", praktike malaperis.

En tiaj kondiĉoj la nuna gvidantaro de UEA agus tre saĝe, se ĝi atente rekonsiderus la tutan situacion kaj trovus kontentigajn solvojn por multaj brulantaj problemoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2 de *EeP* kaj ĉap. 3 de *HeR*. V. ankaŭ la ĉefartikolon en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*.

68 Kontraŭstatuta membreco

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR estas parto de tiu ŝtata-partia organizaĵo. La membreco en la Esperanto-Asocio "realiĝas per la membreco en Kulturligo". Tio signifas, ke por fariĝi membro de Esperanto-Asocio en GDR oni unue devas esti membro de la ŝtata-partia Kulturligo.

Tiu regulo kontraŭas eĉ al la nova Statuto de UEA, kiu preskribas en Art. 13, ke al UEA povas aliĝi nur landa asocio, kiu estas "laŭorde organizita kaj vaste malfermita al civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno..."

Evidente, Esperanto-Asocio en GDR, limiganta la rajton membriĝi nur al la membro de la Kulturligo, tute ne estas "vaste malfermita al la civitanoj de sia lando" kaj tial devus esti eksigita el UEA konforme al alineo 2 de la sama Art. 13. Kompreneble, en la nunaj kondiĉoj tio estas malebla. Ĉu troviĝos komitatano, kiu kuraĝos almenaŭ levi la demandon en la Komitato de UEA?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.1.1 de *EeP*.

69 Kontrakto SAT – MEM

En *Sennaciulo* de januaro 1982 estas publikigita Deklaro pri Kunlaborado inter SAT kaj MEM (Mondpaca Esperanto-Movado). Laŭ tiu Deklaro, la estraroj de la du organizaĵoj decidis interalie: plivastigi kontaktojn inter la membraroj, aranĝi komunan packampanjon, zorgi

pri gazetinterŝanĝoj kaj informartikoloj koncerne la pacmovadon, instigi siajn anojn reciproke partopreni en la pacistaj aranĝoj ĉe kongresoj aŭ konferencoj.

Necesas atendi kelkan tempon por vidi kiel la interkonsento funkcios en la praktiko, tute speciale ĉu la membroj de SAT, kiuj ne estas membroj de MEM, povos libere esprimi siajn opiniojn pri paco en la blokaj landoj same tiel, kiel la membroj de MEM libere esprimas siajn opiniojn en la okcidentaj demokratioj, kaj ĉu la publikaĵoj de SAT povos libere cirkuladi en USSR, GDR, ĈSSR kaj aliaj landoj sub kontrolo de Moskvo same tiel, kiel *Paco* kaj aliaj luksaj publikaĵoj de MEM, abunde subvenciataj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, libere cirkulas en la okcidentaj demokratioj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 19.3 de *EeP* kaj ĉap. 2.1 de *HeR*.

70 En EEK altiĝas la kostoj de multlingveco

70.1 Enkonduka rimarko

Pri diversaj aspektoj de la lingva problemo en internacaj rilatoj ekzistas jam sufiĉe abunda literaturo en Esperanto. Ankaŭ la redaktoro de tiu ĉi rubriko pritraktis tiun demandon en verkoj, studoj kaj multnombraj artikoloj, interalie en la Unua Parto de *Retoriko*, en *Esperanto en Perspektivo* kaj en la periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo*. Dum sia funkciado en la periodo 1952-1974 la iama Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) eldonis amason da dokumentoj, el kiuj pluraj rilatis ankaŭ al la ekonomia aspekto de multlingveco en internaciaj organizaĵoj kaj institucioj. Pro la bedaŭrinda fakta malapero de CED, tiu ĉi rubriko klopodas almenaŭ partete plenigi la ekestinta vakuon ankaŭ rilate la ekonomian aspekton.

En *Horizonto* n-ro 3/82, p. 72, aperis traduko de informo el *Berlingske Tidende* pri granda subvencio de Eŭropa Ekonomia Komunaĵo (EEK) al du elektronikaj firmaoj por realigi projekton de maŝina tradukado inter la oficialaj lingvoj de EEK pere de Esperanto kiel pontolingvo. En la informo estas dirite, ke la nuna situacio en EEK "postulas ampleksan personaron kaj tre grandajn kostojn".

Kiom precize?

70.2 Kostoj kaj aliaj problemoj

Laŭ artikolo en n-ro 3/82 de *Europe*, periodaĵo publikigata de la Komisiono de EEK, en 1979 estis tradukitaj pli ol unu miliono da paĝoj en la kadroj de la Eŭropaj Komisiono, Parlamento, Konsilio kaj

Kortumo. Pli ol 40% de la tuta buĝeto de EEK estas elspezataj por tradukado, interpretado kaj la kunligitaj servoj. En 1979 la kosto estis ĉ. 214 milionoj da anglaj pundoj. Oni kalkulas, ke en 1982 la kostoj superos 250 milionojn da pundoj.

La prognozo por 1982 estas bazita sur la nuna lingva situacio en EEK. Kiel konate, en EEK ĉiuj lingvoj de la ŝtatoj-membroj estas egalaj. Komence estis nur 4 oficialaj lingvoj; post la aliĝo de Britio kaj Danlando ilia nombro altiĝis al ses. Nuntempe, pro la aliĝo de Grekio komence de la pasinta jaro, la oficialaj lingvoj estas la angla, dana, franca, germana, greka, itala kaj nederlanda. Ĉar dokumento aŭ kiu ajn alia teksto en kiu ajn el la sep lingvoj devas esti tradukita en la ses aliajn, entute estas 42 lingvaj paroj. La kalkulon oni faras laŭ la formulo $n(n-1)$, kie n estas la nombro de oficialaj lingvoj. Sekve, kiam Hispanio kaj Portugalio aliĝos al EEK, la nombro de lingvaj paroj estos 72. Tio kaŭzos ne nur konsiderindan plian altiĝon de la kostoj, sed ankaŭ aldonos novajn problemojn. Unu el ili estos trovi kompetentajn tradukistojn kaj interpretistojn por ĉiuj lingvaj paroj. Se estas relative facile trovi kompetentulojn por paroj kiel angla-franca, aŭ germana-itala ks., estas ege malfacile havigi kompetentajn tradukistojn kaj interpretistojn, ekzemple, por la greka-dana, aŭ portugala-nederlanda kaj similaj paroj.

Ĝis nun, dank' al la grandegaj elspezoj, la lingvaj servoj funkciis relative kontentige, sed ne estas malfacile antaŭvidi, ke la pli granda nombro da lingvoj kaŭzos ĝenajn prokrastojn pro la regulo, ke la dokumentoj en ĉiuj oficialaj lingvoj devas esti samtempe publikigitaj.

La Komisiono kaj aliaj instancoj en EEK fine ekkonsciis pri la tuta kompleksa problemaro, kaŭzita de multlingveco. En la buĝeto troviĝas elspezo de 8,5 milionoj da pundoj por esplora programo celanta evoluigi eŭropan sistemon de maŝintradukado. Parton de tiu sumo verŝajne ricevos la du elektronikaj firmaoj, kiuj tiucele utiligos Esperanton kiel pontolingvon, se tiu informo estas ĝusta.

Tia sistemo neniel signifas, ke tradukistoj kaj interpretistoj ne plu estos bezonataj, sed, se sukcesa, ĝi povus multrilate faciligi ilian laboron. Io pozitiva jam estas atingita: *eurodicautom*, t.e. aŭtomata elektronika vortaro de fakaj terminoj, juraj kaj aliaj, en la sferoj de aktivado de EEK. Tio ebligas al la tradukistoj tuj trovi adekvatajn terminojn, ĉiam la samajn, en kiu ajn lingvo de EEK.

70.3 Komento

Kelkaj pensoj altrudiĝas:

(i) Maŝintradukado, eĉ la plej perfekta, neniam povos anstataŭigi

rektajn interhomajn kontaktojn. Se, kiel oni esperas, ĝi povos kontentige helpi la tradukajn servojn en EEK, ĝi neniel helpos la milionajn amasojn en Eŭropo – nek kie ajn ekster ĝi – kiuj ĉiam pli urĝe bezonas simplan lingvan komunikilon por internacia rilatado sur ĉiuj niveloj. Altrudi al Eŭropo kiun ajn nacian lingvon, aŭ atendi, ke, pro la ebla malsukceso de maŝintradukado, "nature" altrudiĝos unu nacia lingvo super la aliaj, signifas terure subtaksi la naciajn sentojn de la nuntempaj nacioj. Lige kun tio ni revenas al la menciita artikolo en Eŭropo kaj citas el ĝi saĝajn vortojn de Albert Bachrach, ĉefo de la Komisiona traduka servo en Luksemburgo: "Se vi rekonas la lingvon de iu lando, vi eble preferos respekti tiun landon, ol invadi ĝin; sed se vi altrudas vian lingvon al ĝi, vi invadas ĝin eĉ ne rimarkante tion".

(ii) La unuecigita faka terminaro en EEK, sen kiu, evidente, *eurodicautom* ne povus funkcii, estas ege instrua por la Esperanto-parolantoj. Ne enirante en diskuton ĉu iu faka termino estas pli aŭ malpli bona ol ebla alia, oni ĉesu eksperimentadi kaj prefere uzu la jam establitajn fakajn terminojn en ĉiuj branĉoj en kiuj ni jam kreis ilin. Ekzemple, oni ne uzu "Komunumo" au "Komunumaro" aŭ "Komunumoj" anst. "Komunaĵo" por EEK, nek oni uzu "Naciario" anst. "Nacioj" por Unuiĝintaj Nacioj, ktp., ktp.

(iii) La nuna lingva situacio en EEK kaj entute en Eŭropo prezentas multnombrajn eblecojn por efika agado favore al Esperanto. Tio estas unuavice la tasko de Eŭropa Klubo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 1.3.5 de *Esperanto en Perspektivo*.

71 IM de UEA en 1981

Laŭ la statistiko pri la membraro de UEA en 1981 (*Esperanto* 2/82, p. 39), la Asocio havis en la pasinta jaro 6727 individuajn membrojn, 98 pli ol en 1980. Do, sep jarojn post la eventoj de Hamburgo UEA ankoraŭ ne atingis la nivelon de 1973, kiam UEA havis 7231 individuajn membrojn, t.e. 504 pli ol en 1981. Pri la asociaj membroj ni ne povas fari komparon, ĉar ni neniam ricevis respondon al konkretaj demandoj faritaj al la prezidanto de UEA, kaj tial la afero restas malklara (v. ED en *Horizonto* 1/82, p-oj 10-11). Necesas, tamen, rimarkigi ion. Pli frue oni ĉiam faradis la statistikon pri la antaŭa jaro iam en februaro aŭ marto de la kuranta surbaze de la *pagitaj kotizoj* je la 31-a de decembro. UEA asertas, ke ankaŭ nun oni agas tiel. Ŝajnas ke tiu aserto ne estas ĝusta. En raporto pri la UK en Brazilio, publikigita en la sveda *La Espero* de oktobro 1981, estas dirite:

"Komence ŝajnis, ke la Komitato ne povos labori, ĉar la direktoro de la CO de UEA raportis, ke pluraj landaj asocioj ne pagis sian membrkotizon. Estis tiel rimarkinde multaj, ke oni devis fondi specialan komisionon por esplori la unuopajn kazojn... La kaŭzo de tiuj amasaj nepagoj estis, ke UEA tro malfrue elsendis cirkuleron al la landaj asocioj, en kiu ĝi enketis pri la nombro de asociaj membroj".

Ŝajnas, ke la afero estis iel ordigita, ĉar, laŭ la raporto, "sabaton ĉiuj komitatanoj rajtis partopreni plene". Estu kiel ajn, evidente oni ne povas fidi, ke la statistiko pri la membraro, surbaze de pagitaj kotizoj ĝis la fino de decembro de la antaŭa jaro, estas ĝusta. Tute certe ĝi ne estis ĝusta rilate IM en 1980.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 kaj 18.7 de *Esperanto en Perspektivo*.

72 Ĉirkaŭ 200 indiĝenaj lingvoj en Aŭstralio

En *Retoriko* (3-a eldono, Rotterdam, 1971) kaj poste, pli koncize, en *Esperanto en Perspektivo* estas pritraktitaj diversaj diferencigaj kaj unuecigaj faktoroj, kiuj seninterrompe – sed ne kun la sama efiko en ĉiu epoko kaj en ĉiu medio – influas je la lingvo. Dum la diferencigaj faktoroj efikas izolige aŭ disrompe, malhelpante aŭ malebligante kreigon de komunaj lingvoj por pli grandaj komunajoj sur pli vastaj teritorioj, aŭ eĉ kaŭzante disfalon de jam kreigitaj komunaj lingvoj, la unuecigaj faktoroj efikas malizolige kaj kuntene, kondiĉante la formigon kaj evoluon de unuecaj komunaj lingvoj super la iamaj multlingvecoj sur la samaj teritorioj. Kiel montrite en *Retoriko*, lige kun la ĝenerala progresado de la homaro la unuecigaj faktoroj amasiĝas kaj fariĝas ĉiam pli gravaj, dum la diferencigaj faktoroj ludas pli kaj pli modestan rolon. Por korekta kompreno kaj ĝusta pritakso de la pozicio de Esperanto kaj de ĝiaj perspektivoj por la estonteco en la kadro de la ĝenerala fluo en la lingvo-evoluo, tiu fakto havas unuarangan signifon, ĉar ĝi science respondas al la demando, ĉu la homaro evoluas inverse, de multlingveco al estonta unulingveco.

En ambaŭ verkoj estis emfazite, ke diversaj diferencigaj faktoroj, inter kiuj la geografia, ludis tre gravan rolon precipe sur la unuaj, primitivaj evoluŝtupoj de la homaro, kvankam ankaŭ en nia moderna mondo ili ne perdis komplete sian valoron. Kiel unu el la ekzemploj estis menciita la multlingveco de la indiĝena praloĝantaro de Aŭstralio. Laŭ artikolo de R. B. Koplán en *The Linguistic Reporter*, la lingvoj de la aŭstraliaj indiĝenoj (praloĝantoj) plu restas malbone komprenataj. En Aŭstralio ankoraŭ troviĝas ĉ. 150 000 indiĝenaj praloĝantoj kaj ili plu parolas ĉ.

200 malsamajn lingvojn. Unuopajn lingvojn, ĉ. dek procentojn el la 200, parolas ne pli ol 100 personoj. Entute, nur ĉ. 20 lingvoj ricevis skribon. En la t.n. "rezervejoj", t.e. regionoj rezervitaj por la praloĝantoj, evoluis ankaŭ multnombraj piĝinoj, dum en la urboj la indiĝenoj uzas diversajn nenormajn formojn de la aŭstralia angla, sufiĉe diferenca de la angla-angla.

La supraj informoj, bazitaj sur freŝdataj esploralaboroj pri la indiĝenaj lingvoj de la praloĝantoj en Aŭstralio, donas plian apogon al la tezo, ke en la lasta analizo la evoluvojo kondukas de la iam grandega multlingveco de la prahomaj sociaj grupetoj, tra relative malgranda nombro da komunaj normaj lingvoj, al la tuthomara komuna norma lingvo, eble en ne tro malproksima estonteco. Esperanto troviĝas tute sur tiu vasta evoluvojo, kiu, tamen, estas nek rekta, nek glata, sed plena de zigzagoj kaj obstakloj, kelkfoje kaŭzantaj haltojn aŭ eĉ sporadajn retropaŝojn.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 2.1 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)*.

73 ĈEA ligita al ŝtata/partia kulturpolitiko

Laŭ la ĉeĥa *Starto* (N-ro 2/82), en marto ĉi-jara okazis la 4-a Kongreso de tiu asocio. Tio signifas, ke la nuna ĈEA, fakte sekcio de la ŝtata-partia aparato, forviŝis ĉiujn Esperanto-kongresojn de la iam brila Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio, precipe inter la du mondmilitoj, kaj kalkulas nur la siajn.

Oni sciigas, ke la Kongreson alparolis Libuše Vanková, kiu reprezentis la Kulturministerion de ĈSR. Interalie ŝi diris: "Surbaze de regulaj pritaksadoj dum /la/ lastaj jaroj mi povas respondece diri, ke ĈEA aktive ligiĝas al realigado de /la/ kulturpolitika linio de nia ŝtato". Parolante pri la membreco de ĈEA en UEA, ŝi diris, ke la partopreno de ĉeĥaj-slovakaj organizaĵoj en internaciaj asocioj estas "ĉiam pli kaj pli juĝata el la vidpunkto kion tiu ĉi membreco povas doni al nia ŝtato", kaj ŝi laŭde emfazis, ke ĈEA estas taksata de la ŝtataj-partiaj instancoj "kiel unu el la plej aktivaj interesorganizaĵoj".

Tiele, plian fojon estas oficiale rekonite, ke ĈEA estas nenio alia ol transmisia rimeno de la ŝtata-partia t.n. "kulturpolitiko" de ĈSR. Kun la escepto de politikaj analfabetoj, ĉiu scias, ke tia "kulturpolitiko" fakte signifas mortigadon de kulturo kaj amasan likvidadon de scienculoj, verkistoj, poetoj, artistoj kaj aliaj fakte kulturaj agantoj. Unu el la lastaj viktimoj de tiu "kulturpolitiko" en ĈSR estas la literatura historiisto Ivan Jirous. En julio pasinta li estis kondamnita je tri kaj duona jaroj da mallibereco pro helpo donita al publikigo de neoficiala kultura revuo. Liaj familianoj rajtos viziti lin unufoje jare dum unu horo.

Al tia "kulturpolitiko" estas ligita ĈEA, pli precize ĝia nuna gvidantaro nomita aŭ aprobita de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, ĉar, laŭ daŭre ricevataj informoj, eĉ en Ĉeĥoslovakio mem "la realigado de la kulturpolitika linio de nia ŝtato" trovas nenian apogon inter la kleraj esperantistoj, dum en la eksterbloka Esperanto-Movado la influo de tiu "unu el la plej aktivaj interesorganizaĵoj" konsiderinde malkreskis ekde Hamburgo (1974) kaj nun estas preskaŭ neglektebla. Feliĉe. Tio ŝuldiĝas al diversaj faktoroj, interalie ankaŭ en la sino de UEA, sed ĉefe al la demokrata, humaneca, internaciisma linio de *Horizonto*.

En ĉiu okazo, la "enŝaltita" ĈEA, eĉ se ĝi prezentas la solan eblecon iel uzi la Internacian Lingvon en tiu lando, nigre makulas la purajn, demokratajn tradiciojn de la iama esperantismo en Ĉeĥoslovakio, dum ĝia membreco certe ne estas honoriga por UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.8 kaj 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 7.3.3 de *Hamburgo en Retrespektivo*.

74 Estrara raporto pri la agado de UEA en 1981

74.1 Ĝenerala rimarko

Dum la antaŭhamburga prospera periodo la *Jarlibro* de UEA regule aperadis en du partoj de entute 600-850 paĝoj depende de la bezonoj. La Dua Parto, aldone al multaj interesaj informoj aŭ eĉ fakterminaroj, entenis ankaŭ la ampleksan Estraran Raporton kaj koncizan trarigardon pri la agadoj de la aliĝintaj organizaĵoj. Tiu grava dokumento, vera batalilo en la manoj de aktivuloj, havis kvindekdaŭrajn paĝojn kaj donadis klaran bildon pri la plenumitaj laŭplanaj laboroj, konkretaj atingoj kaj perspektivaj taskoj. Ĝi estis publikigata ankaŭ kiel aparta broŝuro. Post Hamburgo (1974) la Estrara Raporto aperas en la revuo *Esperanto*, kio ja signifas "konsiderindan financan ŝparon", sed kio samtempe senigas la membrojn-abonantojn de preskaŭ unu tuta n-ro de la revuo. La Raporto por 1981 estas publikigata en la maja n-ro, kiu aperis nur meze de junio.

Se oni esceptas la pure teknikajn informojn en la sekcioj pri ĝeneralaĵoj, administrado, financoj, revuo, kongreso, libroservo (bone funkcia) k.s. rutinaĵoj, apenaŭ io estas trovebla pri faktaj agadoj kaj konkretaj rezultoj sur kampoj, pro kiuj UEA ekzistas. Ekzemple, al la sekcio pri informado oni povas sciiĝi, ke oni plu diskutas (jam 8 jarojn!) ĉu argumentadi por Esperanto kiel solvo de la lingva problemo, aŭ prezentadi ĝiajn praktikajn aplikojn, anstataŭ tutsimple agadi paralele laŭ ambaŭ direktoj. Oni daŭrigas la diskutadon ankaŭ pri

"prioritatoj", anstataŭ ekspluatadi almenaŭ kelkajn el la amaso da informeblecoj, ĉu "prioritataj" aŭ ne, konforme al la fama Principaro de Frostavallen, nun bedaŭrinde komplete neglektata. La saman impreson oni ricevas legante la sekcion pri "esploro kaj dokumentado", t.e. pri la sfero siatempe (1952-1975) prizorgata de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kiu bedaŭrinde ne plu funkcias. Efektive, tuta aro da kampanjoj kaj agadoj de la antaŭhamburga periodo jam delonge aŭ formortis aŭ estis ĉesigitaj, pri kio la nuna prezidanto de UEA kaj kelkaj el la estraranoj certe ne respondecas. Ekde 1974 UEA ne plu havas laborprogramon, sed espereble baldaŭ la Komitato konfirmos la planon de UEA en la kadro de la ĝenerala programo por la memorigo de la 100-jara jubileo de Esperanto. La novaj Kongresa Regularo kaj Ĝenerala Regularo, promesitaj tuj post la akcepto de la nova Statuto, ankoraŭ ne estas publikigitaj, eble eĉ ne akceptitaj. Krome, "malgraŭ (aŭ pro?!) la multaj komisionoj, tre granda nombro da geoficistoj kaj gevolontuloj, komputiloj, diversaj novaj oficejoj, eĉ la revuo kaj la *Jarlibro* (preskaŭ duonigita) aperas nur kun grandaj malfruigoj. Tio ripetiga en 1982: la aprila n-ro de *Esperanto* aperis meze de majo, la maja meze de junio, la junia meze de julio ktp., dum la *Jarlibro* por 1982 verŝajne aperos nur fine de tiu ĉi jaro, kiam ĝi estos multrilate neaktuala. Pretere dirite, *Horizonto* – sen unusola oficisto, kompensata volontulo, komputilo aŭ komisiono – aperas plej regule komence de ĉiu dua monato.

Ne estas surprize, ke eĉ la redaktoro de *Esperanto* en sia kovrilpaĝa redakcia noto plendas, ke la "Raporto havas plurajn mankojn", sed tamen li "iel esperas", ke "la plimulto de la legantoj" legos ĝin. Ni tre dubas, ĉu eĉ parteto interesiĝos pri tia Raporto, sed ni ja esperas, ke almenaŭ kelkaj membroj, precipe komitatanoj atente trastudos ĝin kaj ekdiskutos pri tiu fakte diskutinda situacio.

74.2 Iom pri la financoj

Estas publikigitaj nur la spezkonto kaj la bilanco, sen kia ajn detaligoj pri la fondaĵoj, kapitalaj kontoj, propaganda konto ktp., kiel tio estis farata antaŭ Hamburgo. Tial estas maleble analizi la financon raporton el vidpunkto de la celoj de la Asocio. Tamen, kelkaj eroj estas okulfrapaj. La sumo de la rimedoj (enspezoj) estis 671.029 ned. guldenoj, tiu de la kostoj (elspezoj) estis 664.806 gld., tiel ke la pozitiva saldo estis 6.223 gld. La salajroj de la geoficistoj en la CO kaj kompensoj al la gevolontuloj (meze 10,5 kompare kun 9,4 en 1980) estis entute 318.588 gld., dum la vojaĝkostoj postulis tre altan sumon de 42.956 gld. Do, ĉ. 26.000 gld. pli ol duonon de ĉiuj rimedoj la Asocio elspezis por salajroj, kompensoj kaj vojaĝkostoj. Konsiderante la foreston de kampanjoj kaj de nerutinaĵ

konkretaj agadoj, kiel ankaŭ la prokrastojn en la publikigado de la revuo kaj *Jarlibro*, oni povas demandi sin, ĉu tiu grandega sumo estis racie elspezita.

Plue, la *Jarlibro* havis 392 paĝojn kompare kun la 720 p. de la du partoj en 1973, la lasta plena jaro antaŭ Hamburgo. En 1981 ĝi kostis nete 37.134 gld. Se la nuna UEA publikigus ankaŭ la duan parton, tiel ke ambaŭ partoj havus 720 paĝojn, la plia neta kosto estus 31.050 gld. Tio signifas, ke, eĉ senkonsidere al ĉio cetera, la spezkonto ne montrus pozitivan saldon de 6.223 gld., sed negativan (perdon) de minimume 24.829 gld. Minimume, ĉar la publikigo de la dua parto pro la nuna laborstilo verŝajne postulus plian oficiston kaj plian salajron.

Diference de la redaktoro, kiu en la menciita redakcia noto iel timeme koncedas, ke "iom da sana kritiko povas influi nur bone", ni opinias, ke multe da saniga kritiko kun samtempa serioza rekonsidero de la tuta situacio en UEA en la ŝanĝiĝantaj kondiĉoj estas esenca ankaŭ el vidpunkto de la taskoj, kiujn la Asocio devus plenumi. Espereble, la komunaj agadoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj por la Jubilea Jaro ne nur konsiderinde kontribuos al progresigo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo, sed estos utilaj ankaŭ por UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5 kaj 18.6 de *EeP*.

75 Inaŭgura kongresa parolado en nacia lingvo

Por la unua fojo en la historio de la universalaj kongresoj kaj de kiu ajn internacia Esperanto-kongreso, la inaŭgura parolado de la 67-a UK de Esperanto en Antverpeno estis farita en nacia lingvo. Parto de la kongresanoj – ne ĉiuj – ricevis stencilitan Esperanto-tradukon (ankaŭ tio kostas), kiu poste aperis sur p-oj 143-146 de la septembra *Esperanto*.

Laŭ invito de UEA, tiun franclingvan paroladon faris S-ro Mustafa Masmoudi, antaŭe ambasadoro de Tunizio ĉe Unesco kaj Prezidanto de la Interŝtata Kunordiga Konsilio pri Informado de la Nealiancitaj landoj. En la parolado troviĝas multaj malĝustaĵoj pri faktoj kaj same multaj antaŭjuĝoj, je kiuj, laŭ nia scio, neniuj ĝis nun reagis. La kvintesenco estis lia konsilo "konvinki la mondan opinion pri la neceso meti la problemon de la lingvoj sur la internacian scenejon – por poste proponi kiel unu *el la eventualaj solvoj la kreon de universala helplingvo*."

Do, la Internacia Lingvo ne ekzistas, ne funkcias jam preskaŭ 100 jarojn, sed oni devas krei ian novan *helplingvon*! Kaj tion oni diras en nacia lingvo (kun stencilita esperantlingva traduko!) al monde internacia kongreso, kiu praktikas sole la Internacian Lingvon. Vere, la pacienco

kaj toleremo de la esperantistaro kolektiĝinta en Antverpeno estas admirindaj. Estas surprize, ke ili, aŭ almenaŭ la plimulto, ne forlasis la inaŭgurejon, sed aŭskultis ĝis la fino tiaspecan longan paroladon de ĉ. tri kvaronoj de horo en lingvo, kiun nur la franclingvanoj povis kompreni kaj parto de la aliaj sekvi, se ili havis plian eron da pacienco, el stencilita traduko. Tio povas esti bona kiel ekzerco en supera kurso de la franca, sed ne en solena inaŭguro de universala Esperanto-kongreso, au en kiu ajn alia internacia Esperanto-kongreso, konferenco aŭ alispeca renkontiĝo.

Ĝis nun ni klopodis, almenaŭ partete kun sukceso, enkonduki la Internacian Lingvon kiel egalrajtan en nacilingvajn internaciajn kongresojn; nun ni allasas nacian lingvon por la inaŭgura parolado de universala Esperanto-kongreso. Ĝis nun ni faradis kalkulojn pri la kostoj de multlingveco en interŝtataj kaj internaciaj organizaĵoj uzantaj naciajn lingvojn; se oni daŭrigas kaj vastigas la unikaĵon de Antverpeno, baldaŭ ni devos fari kalkulojn pri la kostoj de multlingveco - en la Esperanto-Movado!

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 13 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)*.

76 Plia partipolitika kompromitiĝo de UEA mem

La 1-an de julio 1982 UEA kaj Bulgara Asocio pri UN komune prezentis petskribon pri malarmado al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Laŭ nekontrolita aserto, la petskribon subskribis 103 000 bulgaraj civitanoj. La delegacion gvidis D-ro H. Tonkin, nun estrarano de UEA kaj reprezentanto de la Asocio ĉe UN, akompanata de S-ro Krum Hristov, ambasadoro de Bulgario ĉe UN.

En la revuo *Esperanto*, organo de UEA, ni ne rimarkis informon pri tio. Ne estas konate, ĉu tiun bulgaran petskribon pri malarmado D-ro Tonkin prezentis al UN kun aprobo de UEA, aŭ proprainciate. Laŭ n-ro 1 de la kongresa eldono de *Heroldo* en Antverpeno, el kiu pro foresto de aliaj fontoj ni ĉerpis la supran informon, "la ĉefa organizanto de la kolektado de subskriboj en Bulgario estis Bulgara Esperantista Asocio". Kiel kutime, ankaŭ ĉi-foje tiu gazeto grave misprezentis per ellaso. El dokumento ricevita de la Sekretariato de UN vidiĝas, ke la petskribon kune organizis Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara Komitato de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kio, kiel konate, jam delonge estas la samo. Eĉ la sama adreso estas indikita sur la dokumento: BEA – Bulgara MEM Komitato, bul. "Hristo Botev", 97, 1303, Sofio.

En la verko *Hamburgo en Retrospektivo* troviĝas dokumentita subĉapitro pri MEM kaj pri ĝia subfosa partipolitika agado en la Esperanto-Movado konforme al la direktivoj de la t.n. Packonsilantaro, siavice plene sub kontrolo de la Komunista Partio de Soveta Unio (p-oj 29-33). Kiuj interesiĝas pri la tiurilataj faktoj, bv. legi aŭ relegi ĝin lige kun la nuna preskaŭ nekredebla elpaŝo de la respondeculoj en UEA. Ekster la Esperanto-Movado ĉiu eĉ nur iom politike informita homo scias, ke tiu t.n. Monda Packonsilantaro, kaj tial ankaŭ MEM, estas unu el la transmisiaj rimenoj de la sovetia agitada/propaganda maŝinaro, senkondiĉe apoganta la sovetian eksteran politikon, inkluzive la sovetiajn konceptojn pri paco, malarmado ktp.

Eĉ se BEA/MEM estus prezentinta la petskribon en sia nomo pere de la ambasadoro de Bulgario ĉe UN, tio estus kompromita por UEA, ĉar BEA estas ĝia aliĝinta organizaĵo, do konsista parto de UEA. Ĉi tiel la afero estas multe pli serioza, ĉar la suproj de UEA rekte intervenis pere de sia oficiala reprezentanto. Oni povas demandi sin aŭ, prefere, la respondeculojn de UEA, kial la Asocio devis prezenti al UN petskribon de partipolitika movado/organizaĵo plene kontrolata de Moskvo. Kial UEA, jam pli ol sufiĉe partipolitike kompromitiĝinta pro la eventoj de Hamburgo, faris tiun plian, escepte gravan kompromitan paŝon? Ĉu fakte ĉiuj membroj de la Asocio aprobas, ke UEA oficiale transdonu al UN petskribon de partipolitika organizaĵo, almenaŭ formale ankoraŭ ne apartenanta al ĝi? Kiu decidis pri tiaj aferoj?

Ne estas surprize, ke jam pli frue la 15-a t.n. konsultiĝo de la t.n. reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj el la blokaj landoj, okazinta en Erevan (USSR), kun plezuro konstatis, ke "*UEA ... ebligas disvolvon de internacia porpaca organizo/organizaĵo, nia korekto/MEM kaj ĝian aktivadon ankaŭ sur la tereno de UEA*" (Ĉeĥa *Starto*, n-ro 3/82, p.5). La transdono de tiu petskribo estas eĉ multe pli ol la nura ebligado al MEM "aktivadi ankaŭ sur la tereno de UEA".

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.8 kaj 18.2.1 de *EeP* kaj ĉap. 3.3 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

77 Sovetiaj frontorganizaĵoj en kontraktaj rilatoj kun UEA

En n-ro de marto-aprilo de la periodaĵo *Problems of Communism* (Problemoj de Komunismo) estas publikigita listo de la komunistaj partioj kaj de la sovetiaj frontorganizaĵoj (t.n. "transmisiaj rimenoj") en la

tuta mondo, kun esencaj detaloj pri la membronombro de ĉiu partio en ĉiu unuopa lando, kaj la nombro de filioj en la kazo de la frontorganizaĵoj. La listo estas farita de R. E. Staar kaj la Hoover Instituto pri Milito, Revolucio kaj Paco en Stanford (Usono).

En la listo de la dek plej gravaj sovetaĵaj frontorganizaĵoj, kies agadoj estas senkondiĉe subigitaj al ordonoj kaj instrukcioj de Moskvo, troviĝas ankaŭ la Monda Federacio de Demokrata Junularo kun sidejo en Budapeŝto (en kontraktaj rilatoj kun TEJO, la Junulara Sekcio de UEA); la Internacia Unio de Studentoj kun sidejo en Prago (en amikaj rilatoj kun TEJO, la Junulara Sekcio de UEA); kaj la Monda Packonsilantaro kun sidejo en Helsinko, al kiu apartenas la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kies ĉefuloj siavice regas en nombro da landaj Esperanto-organizaĵoj apartenantaj al UEA kaj estas komitatanoj de UEA kiel reprezentantoj de siaj respektivaj aliĝintaj landaj asocioj. Unu el ili, S-ro Aleksiev, samtempe membro de la Monda Packonsilantaro, estis elektita en 1981 Honora Membro de UEA.

Kiel ni informis en *Horizonto* n-ro 6/82, p. 155-156, D-ro H. Tonkin, nun Estrarano de UEA kaj ĝia reprezentanto ĉe la Sekretariato de UN en New York transdonis al la Sekretariato de UN petskribon pri malarmado de la Bulgara Sekcio de MEM kaj de BEA, kio praktike estas la sama afero. D-ro Tonkin faris tion ne kiel privatulo, sed en la nomo de UEA kiel ĝia oficiala reprezentanto ĉe UN.

Ĉio-ĉi plian fojon konfirmas la faktojn, analizojn kaj prognozojn en la verko *Hamburgo en Retrospektivo*. Tamen, plu troviĝos multaj, kiuj preferas fermi siajn okulojn, ol rigardi kaj vidi la realaĵon. Laŭ nia opinio estus urĝe necese, ke en tiu ĉi lasta momento, antaŭ ol estos tro-tro malfrue, la nuna gvidantaro de UEA plej atente ekzameni la partipolitikan influon en UEA por malebligi kian ajn plian partipolitikan kompromitiĝon.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.8 kaj 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo*, kaj ĉap. 3.3 kaj 4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

78 Stratoj kaj placoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto

(Enketo de ED: Renkonte al la Jubilea Jaro 1987)

Inter la multflankaj agadoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kiu funkciis de 1952 ĝis 1975, troviĝis ankaŭ enketoj pri stratoj kaj placoj kun la nomo de la aŭtoro de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof, aŭ de la lingvo mem. La lasta, plej kompleta enketo estis farita en 1965. En 1966 CED eldonis dokumenton A/5-3, en kiu sur

12 paĝoj estis listigitaj ĉiuj urboj kun stratoj aŭ placoj laŭ unu el la du nomoj kaj indiko pri la jaro de la inaŭguro.

Laŭ tiu dokumento, en 1965 entute ekzistis 291 tiaj stratoj aŭ placoj en 25 landoj (parenteze ilia nombro): Francio (48), Brazilo (36), Bulgario (34), Pollando (34), Italio (31), Germanio (20), Hispanio (16), Nederlando (14), Hungario (13), Aŭstrio (9), Israelo (9), Soveta Unio (5), Argentino (4), Belgio (3), Britio (2), Ĉeĥoslovakio (2), Jugoslavio (2), Norvegio (2), Aŭstralio (1), Finnlando (1), Kanado (1), Libano (1), Nov-Zelando (1), Svedio (1), Svislando (1).

Krome ekzistas en:

Aŭstrio: Esperanto-monumentoj en Wien, Wörgl kaj Linz; Esperanto-Muzeo en Wien; Esperanto-memortabuloj en Wien kaj Wiener Neustadt.

Brazilo: Du Esperanto-monumentoj (ne estis eble havigi pli precizajn informojn).

Bulgario: Monumento al Zamenhof en Dimitrovgrad; aŭtobusaj haltejoj kun la nomo "Esperanto" en Varna, Kazanlak, Stara Zagora kaj Ruse; Hospitalo Zamenhof en Rozino; montodomoj "Esperanto" sur Vitoŝa kaj Orjaĥovo.

Britio: Benko "Esperanto" en Bournemouth.

Ĉeĥoslovakio: Esperanto-monumento en Bohumin.

Francio: Kampadejo "Zamenhof" en Vallon Pont d'Arc.

Germanio: Memorŝtono al Zamenhof en Flonheim.

Italio: Memortabulo al Zamenhof en Udine.

Nederlando: Esperanto-monumentoj en Den Burg (Texel), Bergen op Zoom kaj Utrecht.

Hungario: Fonto Esperanto en Miskolc.

Stratoj, placoj, monumentoj, memortabuloj ks. estas daŭraj memorigiloj pri la ekzisto de Esperanto kaj pri la tuthoma grandeco de D-ro L. L. Zamenhof. Tial la Baza (Kadra) Programo por la Jubilea Jaro 1987 interalie antaŭvidas agadojn ankaŭ sur tiu ĉi kampo. Aktivaj landaj Esperanto-organizaĵoj, lokaj societoj aŭ eĉ unuopuloj devus jam nun ekagi, por ke en 1987, aŭ antaŭ tiu jaro, ankaŭ en iliaj respektivaj urboj, placoj aŭ stratoj ricevu la nomon Zamenhof aŭ Esperanto, aŭ cele al starigo de memortabuloj, monumentoj kaj similaj daŭraj publikaj memorigaĵoj.

Siatempo CED povis fari tiajn enketojn kaj publikigi la rezultojn, ĉar ĝi havis multajn kunlaborantojn en diversaj landoj. Nun, bedaŭrinde, CED ne plu ekzistas, kaj la redaktoro de tiu ĉi rubriko pro manko de tempo kaj rimedoj ne povas organizi plian. Evidente, por sukcese realigi iniciatojn direktitajn al la menciitaj memorigaĵoj, la koncernaj proponoj devus esti apogitaj de precedentoj, troveblaj en Dok. A/5-3. Seriozaj

interesiĝantoj, kiuj fakte deziras ion entrepreni tiurilate, verŝajne povos havigi ĝin de la CO de UEA en Rotterdam. Se pro kiu ajn kaŭzo tio neniel eblas, la administracio de *Horizonto* pretas sendi fotokopion de la sola ekzemplero en la arkivo de ED kontraŭ pago de la efektivaj kostoj. Krome, por kompletigi la dokumenton, ED petas informojn pri ĉiuj placoj, stratoj, monumentoj, memortabuloj kaj aliaj memorigaĵoj inaŭguritaj ekde 1966. Se la respondo al tiu ĉi alvoko estos kontentiga, ED publikigos en *Horizonto* kompletigan liston.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2.3 de *Esperanto en Perspektivo*.

79 Sovetiaj esperantistoj kontrolataj de KGB

En n-ro 2/83 de *Monato*, internacia magazino sendependa, aperis longa artikolo de ĝia redaktoro, S-ro Stefan Maul (*sm*) sub la titolo "La Kanto de Betulo". Surbaze de fidindaj fontoj la aŭtoro objektive prezentas la kontroladon de sovetiaj esperantistoj fare de KGB (*Komitet Gosudarstvenoj Bezopasnosti / Komitato pri Ŝtata Sekureco*), la misfama sovetia sekreta politika polico. Estus ne nur utile, sed vere necese, ke ĉiuj, kiuj ankoraŭ fermas la okulojn antaŭ la realaĵo kaj preferas kredi al lule dolĉaj vortoj, tralegu komplete tiun artikolon. Sube ni publikigas nur ĝian esencan parton:

"Nur nun atingas la redakcion de MONATO informoj pri opozicio, kiu estiĝis jam antaŭ kelka tempo en Sovet-Unio kontraŭ la tie en 1979 fondita centra Esperanto-organizaĵo ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj). Laŭ tiuj informoj, ASE fondiĝis pli-malpli laŭ ordono de KGB kaj la celo de ASE ne estas subteni Esperanton, sed kontroli la sovetiajn esperantistojn kaj iliajn kontaktojn kun alilandanoj. Ne estas sekreto inter la sovetiaj esperantistoj, ke la respondeca sekretario de ASE, menciita ankaŭ en la Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, estas KGB-ano. Ne mirigas do, ke li ne estis esperantisto, tamen intertempe sufiĉe bone regas la lingvon. Mirigas ankaŭ ne, ke – laŭ la protestoj de la opozicio – decidojn de ASE ne faras prezidanto aŭ estraro, sed ĝuste tiu sekretario Anatolij Vasiljeviĉ Berjoza. Ekzistas tre populara esperantlingva kanto, kiu aludas pri la eco de la betulo (*berjoza* signifas *betulo*); sovetiaj esperantistoj tuj komprenas, ke la kanto ne temas pri vera betulo, sed pri la viro kun tiu nomo. Jen la plej milda formo de opozicio ..."

"Se la opoziciuloj postulas, ke ASE ĉesu malhelpojn al agado de lokaj esperantistoj, tio ebligas la inversan konkludon: KGB-ano Berjoza bone plenumas sian taskon."

La informoj en la artikolo de *sm* en MONATO estas absolute ĝustaj. Pri la sama afero aperis 6-paĝa artikolo de sovetia kunlaboranto (kiu,

kompreneble devas resti anonima) en *Horizonto* n-ro 2/81, do antaŭ pli ol du jaroj. Tiu artikolo entenis eĉ pli da detaloj.

Al la redaktoro de tiu ĉi rubriko kaj al multaj aliaj la artikolo en MONATO diras nenion novan. Ke malantaŭ la hamburga konspiro troviĝis KGB mi sciis kun plena certeco ekde decembro 1973, kaj forte suspektis eĉ pli frue pro pluraj fidindaj informoj kaj pro la karaktero de la fikampanjo. Pri tio mi informis jam en la konata artikolo publikigita en *Esperanto* n-ro 4/74, represita en *Hamburgo en Retrospektivo*, 2-a eldono, p-oj 90-97. Mi nur uzis kaj plu uzas la formulon "ekstermovadaj partipolitikaj fortoj" anst. KGB. Tamen la artikolo de Stefan Maul en MONATO estas tre grava, ĉar ĝi esence konfirmas niajn informojn, bazitajn sur faktoj, almenaŭ ekde aprilo 1974. Krome, moralaj kaj intelektaj mizeruloj ne povos kalumnie disfamigadi, ke li "ĉion inventis, ĉar li ne fariĝis prezidanto de UEA" kaj similajn stultaĵojn, kiujn parto de la esperantistaro senpripense englutas kiel dolĉan ebriigan vinon.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 kaj 21.4 de *Esperanto en Perspektivo*.

80 Estrara raporto pri la agado de UEA en 1982

80.1 Ĝenerala rimarko

Por tiuj, kiuj ignoras aŭ emas forgesi, necesas plian fojon rememorigi, ke dum la antaŭhamburga prospera periodo la *Jarlibro* de UEA regule aperadis en du partoj de entute 600-850 paĝoj. La Dua Parto, aldone al multaj esence gravaj informoj por batalanta organizaĵo aŭ eĉ fakterminaroj, entenis ankaŭ la ampleksan Estraran Raporton, mallongajn objektivajn raportojn pri la agadoj de la aliĝintaj organizaĵoj kaj, aparte, koncizan trarigardon pri la aktuala stato de la Esperanto-Movado ĝenerale. Tiu grava dokumento de kvindeko da paĝoj donadis klaran, honestan bildon pri la plenumitaj laŭplanaj laboroj, konkretaj atingoj kaj perspektivaj taskoj. Ĝi estis publikigata ankaŭ kiel aparta broŝuro. Post Hamburgo (1974) la Dua Parto ne plu estas publikigata kaj la Estrara Raporto aperas en la revuo *Esperanto*. Tio signifas "ŝparon", sed ŝparon je la kostoj de ĉiuj individuaj membroj, kiuj tial estas senigitaj de la Dua Parto, kaj de la membroj abonantoj, kiuj tial estas senigitaj de preskaŭ unu tuta n-ro de la revuo. La Raporto por 1982 estas publikigita en la maja n-ro, kiu, same kiel la maja n-ro de 1981, aperis nur meze de junio. La diferenco estas, ke ĉi-foje eĉ la aprila n-ro de *Esperanto* aperis nur meze de junio, do kun 10-semajna malfruiĝo, kaj estis liverita samtempe kun la maja n-ro. Absolute senprecedenca en la tuta historio de UEA.

Se oni esceptas la kutimajn teknikajn informojn kaj rutinaĵojn, apenaŭ io pozitiva estas trovebla pri faktaj agadoj kaj konkretaj rezultoj en sferoj, pro kiuj UEA ekzistas. Kompense abundas senenhavaj frazoj kaj informoj, ofte malĝustaj aŭ nekontroleblaj, sed kelkfoje veraj pri atingoj de aliaj. Tion implicite rekonas eĉ la Raporto mem en la Finaj Vortoj sur p. 97. Fakte, preskaŭ nekredebla provo elturniĝi pravigante foreston de propraj rezultodonaj agadoj per sukcesoj – ofte nur imagitaj – de aliaj.

80.2 Kelkaj nekontesteblaj faktoj

La nuna administra aparato de UEA estas pli granda ol iam antaŭe. En 1982 en la CO meze laboris 12 oficistoj kaj salajrataj volontuloj, kompare kun 10,5 en 1981 kaj 9,4 en 1980. Malgraŭ tiu multnombra oficistaro, komputiloj, sep terminaloj, komisionoj, centroj kaj oficejoj, tamen la plej bazaj taskoj ne estas plenumataj. La *Jarlibro*, kiu devus aperi komence de la jaro, estis publikigita nur fine de 1982; la *Jarlibro* 1983, promesita por aprilo, aperis en julio; *Esperanto* estas publikigata kun grandegaj prokrastoj de pluraj semajnoj, eĉ de pli ol du monatoj (kronika malsano). Krome: "Ne aperis pluraj libroj..." (p. 85); "pro manko de disponeblaj homfortoj en la CO (! *nia esklamsigno*) aperis nur du novaĵbultenoj de IGS" (p. 89); "Projekto por traduki du librojn de Unesko en Esperanton malsukcesis pro lastmomenta nehaveblo de antaŭvidita subvencio" (p. 90); "La eldonritmo de la libroj de UEA serioze lamis dum 1982" (p. 92); "En 1982 *Kontakto* ankoraŭfoje perdis sian eldonritmon: aperis nur du el la kvar numeroj de la jarkolekto" (p. 93); "TEJO ankoraŭ ne sukcesis trovi prizorganton de sia revupartoj" (p. 93); la Komisiono pri Informado plian jaron faris fakte nenion kaj tiu gravega branĉo de aktivado, iam bonege funkcia, praktike ne plu funkcias. La Komisiono plu diskutas pri "prioritatoj" kaj "la celo estas trovi respondeculojn (fakulojn) por la prioritataj sektoroj de la informado..." (p. 89). Ktp., ktp.

Dum pluraj jaroj oni diskutis pri la nova Statuto kaj fine produktis tekston principe eraran kaj jure-teknike mankan, kiel ni siatempe montris. Nun la Raporto informas, ke fine, en 1982, estis akceptita reviziita Ĝenerala Regularo. La Raporto ankaŭ sciigas, ke la 4-a Baza Laborplano estos proponita al la Komitato en Budapeŝto. Ĉar la 3-a Baza Laborplano, akceptita antaŭ Hamburgo, neniam estis, nek povis esti plenumita pro la eventoj de 1974, signifas ke la posthamburgaj gvidantaroj dum plenaj 9 (naŭ) jaroj ne sukcesis ellabori kian ajn agadprogramon, kion, cetere, evidentigas la Estraraj Raportoj pri naŭjara vadado en cirklo, krome cirklo daŭre malatendiĝanta. Ŝajnas, ke ŝanĝado de regularoj estas ŝatokupo ankaŭ en TEJO: "Akceptiĝis (verŝajne "estis akceptita", aŭ,

tamen, nur aŭtomate "akceptiĝis", *nia rim.*) nova Komitata Regularo, laŭ kiu poste okazis pluraj poŝtaj voĉdonoj, kiuj ĉefe koncernis modifon de diversaj aliaj regularoj de TEJO" (p. 93).

80.3 Malĝustajtoj, prisilentoj, nekontroleblaj asertoj

Kvankam la nuna Raporto, same kiel la pasintjara, entenas ankaŭ kelkajn memkritikajn rimarkojn, kio estas almenaŭ iom esperiga, tamen ĝi multon kaŝas aŭ misprezentas, kio bedaŭrinde perdigas la kredindecon ankaŭ al la partoj enhavantaj, eble, ĝustajn informojn, ekzemple tiun pri la "centoj de Esperanto-kursoj en Ĉinio", kvankam en ĉiu okazo ni iom dubas, ke "*la gestudentoj* prave opinias, ke ilia lernado koncernas la tutan Esperanto-Movadon" (p. 97). La raporto asertas, ke helpe de la terminologia sekcio de la Scienca Eldona Centro (SEC) de UEA en Budapeŝto "nun estas kompilataj terminaroj pri mikrokomputiloj, radiotekniko, telekomunikado, medioprotektado, juro, ekonomiko kaj aliaj sciencoj" (p. 96). Ni scias kun absoluta certeco, ke (i) ekster la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) ne troviĝas unusola kompetenta kaj juristo kaj samtempe esperantisto, kiu kapablus kompili juran terminaron, kaj (ii) SEC neniam kontaktis IEAJ tiucele. Kiel, do, oni povas fidi, ke la informo pri la aliaj fakterminaroj estas ĝusta, se tiu pri la jura estas tucterte malĝusta aŭ anoncas ian novan fuŝaĵon?

En la sekcio pri la eksteraj rilatoj verŝajne la plej grava "atingo" estis la petskribo pri malarmado, kiun Prof. Tonkin en la nomo de UEA oficiale transdonis al UN. Sub granda foto pri tiu "evento" la Raporto komentas: "Temas pri iniciato de Kvakera Esperanto-Societo, kaj la subskribojn kolektis bulgaraj esperantistoj" (p. 91). Tio estas grava misprezento per ellaso. ED posedas fotokopion de la originala petskribo (fakte Alvoko), el kiu vidiĝas, ke la tutan aferon organizis Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara Komitato de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kio, kiel multfoje pruvite, estas la samo. MEM agas laŭ la direktivoj de la t.n. Packonsilantaro, la plej grava el la politikaj t.n. frontorganizaĵoj plene sub kontrolo de la sekcio pri agitado-propagando (Agitprop) de la Komunista Partio de Soveta Unio (v. ankaŭ ED en *Horizonto* 6/82 kaj 1/83). La misprezento montras, ke la aŭtoro de la Raporto bone konsciis pri tiu plia partipolitika kompromitiĝo de UEA, al kiu aldonan partipolitikan stampon donis la fakto, prisilentita en la Raporto, ke la transdonan ceremonion partoprenis la ambasadoro de Bulgario ĉe UN. Cetere, eĉ se ne estus tiel, kiel estas, kial la Estraro de UEA devus perdadi tempon kaj elspezadi monon por transdono de fremda petskribo al UN anstataŭ prizorgi la plenumadon de la plej fundamentaj taskoj, ekz. la

regulan kaj ĝustatempan publikigadon de la *Jarlibro*, *Esperanto*, *Kontakto* kaj aliaj publikaĵoj? Fine ni menciuj, ke en la Raporto ne troviĝas unusola vorto pri la komunaj agadoj por la Jubilea Jaro, pri kio *Horizonto* daŭre objektivite informadis. Tio klare montras, ke la postkulisaj veraj regantoj de UEA sabotis ilin ekde la komenco kaj fine devigis la prezidanton de UEA cedi al iliaj premoj.

80.4 Membraro kaj financoj

La nombro de individuaj membroj (IM) estis 6556 kompare kun 6727 en 1981, do malkresko de 2,5%. En 1973, la jaro antaŭ Hamburgo, UEA havis 7231 IM, kio signifas, ke en 1982 ĝi havis 675 IM malpli ol en 1973, do 9,4% malpli. Se oni konsideras la "eldonan ritmon" (fakte "malritmon") de la publikaĵoj kaj la supre menciitajn mankojn, estas surprize, ke la perdoj ne estas pli grandaj.

Laŭ la Spezokonto, la finsumo de ĉiuj kostoj (elspezoj) kaj rimedoj (enspezoj) estis 724.974 gld., t.e. 57.000 pli ol buĝetite. La salajroj de la geoficistoj kaj la kompensoj al la gevolontuloj estis entute 358.893 gld. kompare kun 318.588 gld. en 1981, dum la vojaĝkostoj postulis la sumon de 33.647 gld. kompare kun 42.956 gld. en 1981. Do 30.000 gld. pli ol estas la duono de ĉiuj kostoj de la Asocio elspezis por salajroj, kompensoj kaj vojaĝoj. Konsiderante la nuligon aŭ kompletan neglekton de preskaŭ ĉiuj antaŭhamburgaj multnombraj laŭplanaj aktivadoj kaj la foreston de kia ajn kampanjo aŭ de nerutinaj konkretaj agadoj, kiel ankaŭ la senprecedencajn prokrastojn en la publikigado de la *Jarlibro* kaj periodaĵoj, ŝajnas al ni, ke tiu granda, eksterproportia sumo estas neracie elspezita.

La kontoj montras *pozitivan saldon* de 3.400 gld. Ĝi ŝuldiĝas al la fakto, ke la Grafika Centro en Antverpeno (Antverpena Oficejo de UEA) atingis gajnon de 88.475 gld., el kio 78.475 gld. eniris en la rimedojn (enspezojn). Sen tiu enspezo ne estus pozitiva saldo, sed grandega defcito de 75.075 gld. Se, krome, UEA eldonadus ankaŭ la Duan Parton de la *Jarlibro* en la antaŭhamburga amplekso, la kosto estus minimume 30.000 gld., t.e. la defcito atingus la sumon de minimume 105.075 gld. La Raporto mem rekonas, ke la gajno de la Antverpena Oficejo "forigas la minacon pri serioza defcito", kaj ke tiu pozitiva rezulto ŝuldiĝas "ne nur al la sindona laboro de la tieaj stabanoj, sed ankaŭ al la subvencio de la belga ŝtato" (p. 86), kies alteco tamen ne estas indikita. La asocia kapitalo surprize altiĝis de 551.151 gld. en 1981 al 708.470 en 1982. La "salton" evidente kaŭzis tiuj "pluraj grandaj heredaĵoj kaj anonimaj donacoj" (p. 86), kies alteco

estas nenie indikita, sed kiu verŝajne estas 150.000 gld. Ne estas klare kial necesas tiu stranga sekreteco, nekutima en serioza financa raporto. Sen tiuj sekretaj heredaĵoj kaj anonimaj donacoj, kaj sen la kontribuo de la Antverpena Oficejo, la fakta defcito de 75.075 gld. malaltigus la asocian kapitalon de 551.151 al 476.076 gld. Kompreneble, oni ne povas kalkuli pri daŭraj grandaj heredaĵoj kaj donacoj, precipe ne surbaze de la nuna laborstilo de la gvidaj instancoj de UEA. En la bilanco ne estas prenita en konsidero la malplivalorigoj pro inflacio.

Institucio Hodler, siatempe fondita laŭ iniciato de F-ino M. Vermaas kun la celo subvenciadi utilajn agadojn en la Esperanto-Movado ĝenerale, "ne povis doni subvenciojn en 1982" (p. 87). Tion la Raporto pravigas per la "riparo- kaj instalo-kostoj de la domo en Antverpeno". Kvankam Institucio Hodler havas apartan juran personecon, tamen ekde la fondiĝo en 1968 ĝi estis tiel ligita al UEA, ke la antaŭhamburgaj Estraraj Raportoj de UEA ĉiam enhavis informojn pri la kapitalo, profito kaj alteco de la asignitaj subvencioj el la profito de la Institucio. La nuna Raporto komplete silentas pri tio, same kiel pri multaj aliaj kontoj, kiuj ĝis Hamburgo estis klare kaj precize prezentataj. La Antverpena Oficejo de UEA troviĝas en la Domo de la Institucio, aĉetita per ĝia mono. Se tiu mono estis bone investita laŭ la Statuto de la Institucio, la aĉeto de la domo devus doni profiton, sed tio ne okazis kaj la Raporto donas nenian eksplikon. Estas nekonate, ĉu la Antverpena Oficejo de UEA pagas al Institucio Hodler lupagon por la uzo de la domo. Se jes, en kiu alteco; se ne, kial ne? Ĉu la granda gajno de la Antverpena Oficejo ŝuldiĝas parte ankaŭ al nepago aŭ nur minimuma pago de luprezo, aldone al la subteno de la belga ŝtato (kiom?) kaj al komerce fakturitaj laboroj por ekstermovadaj klientoj (p. 84)? Ĉio-ĉi kaj multo alia estas enigmoj, kiuj postulas klaran respondon, ĉar estas vere preskaŭ nekredible, ke la konsiderinda kapitalo de la Institucio ne donis kian ajn profiton, tial ankaŭ ne povis doni unusolan subvencion. Estas strange legi, ke en tia situacio la Estraro de la Institucio intencas "relanĉi la varbadon de pruntoj kaj donacoj, kiuj pligrandigus la ekzistantan *rentodonan* (!) kapitalon" (p. 87, *niaj esklamsigno kaj emfazo*).

La Raporto tre diskrete informas, ke en 1982 estis vendita "la malnova ekspozicia librokolekto" por la sumo de 25.000 gld. (p. 89). Temas evidente pri la granda Universala Ekspozicio de Esperanto, kies unua elmonro okazis en Montevideo en 1954 (poste estis aliaj elmontroj) kaj grave kontribuis al la fama Rezolucio de Unesko de 10.12.1954. Tiele ankaŭ tiu impona ekspozicio, kiun per donacoj kreis tre multaj sindonaj esperantistoj el la tuta mondo, anstataŭ esti daŭre kompletigata kaj

elmontrata, estas fine likvidita kontraŭe al la intencoj de la donacintoj. El la kontoj ne vidiĝas en kiun eron eniris la sumo de 25.000 gld.

80.5 Konkluda rimarko

Escepte, pro la akriĝinta krizo en UEA, ni dediĉis al la analizo de la Raporto pli da tempo kaj pli da spaco, ol kutime. Ni tion faris kun la espero, ke la plej konsciencaj membroj kaj Komitatanoj de UEA atente trastudos la analizitajn – kaj ankaŭ la neanalizitajn – faktojn kaj konsciiĝos pri la granda danĝero, en kiu troviĝas la Asocio. Tia konsciiĝo estas antaŭkondiĉo por radikala, plej serioza kaj sincera rekonsidero de la tuta bedaŭrinda situacio kun la celo klopodi redoni al UEA almenaŭ parton de tiuj perspektivoj kaj laborritmo, kiujn ĝi havis antaŭ Hamburgo. Samtempe oni devas forĵeti la falsan, kontraŭsciencan tezon, ke "Esperanto estas nur lingvo, nenio plia", mortiganta idealismon, sindonon kaj oferemon, sen kiuj plua regreso en abismon estas nehaltigebla kaj reekiro laŭ la vojo de progreso neimagebla. Fine, oni ankaŭ komprenu, ke komputiloj kaj aŭtomatigo ja povas multe helpi, se inteligente utiligataj, sed ke ili ne kapablas kaj neniam kapablos produkti pli da scioj, ol la homa cerbo enmetis en ilin. En ĉiu okazo, eĉ la plej perfektaj komputiloj neniam anstataŭigos homajn pritaksojn kaj juĝojn.

Por senkomputila pripensado de ĉiuj kaj ekago antaŭ ol estos neripareble tro malfrue.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18 de *Esperanto en Perspektivo* kaj ĉap. 7.9 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

81. Plia konfirmo pri la rolo de KGB inter la sovetia esperantistaro

En n-ro 43 de ED (*Horizonto* 3/83, p. 77) aperis iom detala informo pri la kontrolado de la sovetiaj esperantistoj fare de KGB pere de ĝia agento A.V. Berjoza (Betulo). Kvankam ED sciis jam delonge, ke malantaŭ la partipolitika konspiro troviĝis KGB, pri kio ĝi publikigis abundajn dokumentitajn materialojn, tamen estis utile resumi en n-ro 43 de ED la longan artikolon de S. Maul aperintan en *Monato* 2/83 sub la titolo "La Kanto de Betulo", ĉar tiu artikolo, bazita sur aliaj fontoj, plene konfirmis la informojn de ED. La ĵus aperinta *Monato* n-ro 6-7/83 publikigis leteron de N.N. el Sovetio, kiu tekstas:

"Ne parolante pri ĉiuj interesaĵoj, mi aparte dankas al vi pro tute ĝusta prezentado de la betula kanto. Esperanto-movado ĉi tie restas la sama. En ĝi

abundas politikaĉprelegoj kaj dimanĉ-laboraĉoj. Apenaŭ ĉio ĉi logos homojn al la klubo: ĉiuj jam lacis de tio en siaj oficejoj”.

Komento superflua.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18,2.1 kaj 21.4 de *Esperanto en Perspektivo*.

82 Plia granda paŝo de UEA survoje al plena partipolitika kompromitiĝo

82.1 Paktado Packonsilio – UEA en Budapeŝto

"NOVAJ PAŜOJ AL ESTONTO" estas la titolo, diklitera, de informo en *Kongresa Budapeŝta Informilo* n-ro 1 de 30.07.83, per kiu ĝi sciigis la partoprenantojn de la 68-a UK de UEA, ke la vicprezidanto de UEA R. Corsetti kaj la estrarano pri eksteraj rilatoj H. Tonkin renkontiĝis la 27-an de Julio 1983 kun la prezidanto de la Mondpaca Konsilio, fakte Monda Packonsilio, Romeŝ Ĉandra, kiu tiutempe (ĉu hazarde?) feris en Hungario (v. la fotoreproduktaĵon). Kiel oni vidas, la fakta rezulto de tiu renkontiĝo estis, ke UEA planas kunlaboron kun la Packonsilio, interalie, en ligo kun la Internacia Jaro pri Paco kaj en agadoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Laŭ la jam bone establita kutimo okaze de tiaspecaj renkontiĝoj, Romeŝ Ĉandra, kompreneble, "esprimis sian favoran opinion pri Esperanto", sed mem nek ellernis Esperanton, nek verŝajne iam eklernos ĝin.

La rolo de la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), fakte filio de la t.n. Pac-Konsilio regata de Moskvo, en la konspiro de 1974 kaj en la postaj okazaĵoj en UEA, estas abunde dokumentita en la verko *Hamburgo en Retrospektivo* (precipe p-oj 29-33) kaj en tiu ĉi rubriko. Tamen, laŭ nia scio, por la unua fojo la oficialaj reprezentantoj de UEA, t.e. de la tuta membraro de UEA, nun paktas rekte kun la ĉefrolulo de la sovetia t.n. Monda Packonsilio kaj eĉ planas komunajn agadojn lige kun la Jaro pri Paco kaj ĉe UN. Evidente, la postkulisaj fortoj, kiuj fakte regas en UEA kaj direktas ĝian politikon ekde la hamburga puĉo, nun sentas sin tiel fortaj, ke ili ne plu bezonas sekretajn kunvenojn, kiel antaŭ Hamburgo, sed kuraĝas aperte, sen timo pri kia ajn serioza rezisto en la Komitato aŭ kritiko fare de la membraro, paktadi kun la ĉefa el la dek plej gravaj sovetiaj frontorganizaĵoj, senkondiĉe subigitaj al la direktivoj de la sovetia AGITPROPO (agitada-propaganda maŝinaro).

82.2 UEA en intimaj rilatoj kun Tri el la Dek

La labormetodoj de la ĉefaj dek sovetiaj frontorganizaĵoj estas ankoraŭfoje detale prezentitaj kaj analizitaj en longa artikolo, publikigita

en n-ro 2/82 de la prestiĝa *Problems of Communism* (Problemoj de Komunismo). Sur p. 104 ili estas listigitaj en alfabeto de siaj nomoj en la angla lingvo. En la fotoreproduktaĵo, kiun ni aperigas ĉi-loke ni substrekis la tri, kun kiuj UEA havas intimajn rilatojn ĉu rekte, ĉu pere de sia junulara sekcio TEJO. Ili estas: *International Union of Students* (Internacia Unio de Studentoj), *World Federation of Democratic Youth* (Monda Federacio de Demokrata Junularo) kaj *World Peace Council* (Monda Paktkonsilio), kies filio estas Mondpaca Esperanto-Movado (MEM). Al la lasta apartenas la ĉeffunkciuloj de la Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj en la landoj de la sovetia bloko kaj iliaj komitatoj en la Komitato de UEA. Krome en la Komitato troviĝas pluraj t.n. "kunvojaĝantoj" kaj en la Estraro almenaŭ unu. Nun tiu bloko en la gvidaj instancoj de UEA estas eĉ pli fortigita pro la akcepto de la Kuba Esperanto-Asocio, aperte malneŭtrala laŭ sia Statuto, kiel aliĝinta asocio de UEA, nete kontraŭe eĉ al la nuna Statuto de UEA. Pli grandan partipolitikan kompromitiĝon de la iam neŭtrala kaj sendependa UEA apenaŭ estas eble imagi. Pretere dirite, oni prave povas demandi sin, kial S-ro G. Maertens, kiu sendube ne estas sovetiisto, senproteste akceptas ĉion-ĉi, sed tio troviĝas ekster la nuna kunteksto. La paktado kun Romeŝ Ĉandra en Budapeŝto ankoraŭfoje kaj pli okulfrappe ol iam antaŭe konfirmas la submetiĝadon de UEA al sovetiisma koncepto de "paco". La naŭvuloj, kiuj ankoraŭ ne komprenas la realaĵon, kaj la bonkoruloj, kiuj por eviti konscienciproĉojn intence fermas la okulojn, ne estu surprizitaj, se ankaŭ UEA estos iam listigita kiel plia frontorganizaĵo de la sovetia eksterlanda politiko. Esperu, ke tio ne okazos, povas nur tiuj, kiuj blinde kredas, ke la politikaj servoj de la demokratiaj ambasadoj en Budapeŝto same blinde malatentis al tio, kio okazis en kongreso de ĉ. 5000 personoj, tute egale ĉu ili sciis Esperanton aŭ ne. Kompreneble, ĉiu rajtas esperi – almenaŭ tiun homan "rajton" neniu ĝis nun sukcesis malpermesi! – sed se UEA fakte estos registrita kiel sovetia frontorganizaĵo, ne nur ĝi, sed ankaŭ la tuta Esperanto-Movado, eĉ la lingvo mem estos politike kompromititaj por tre longa tempo, eble por ĉiam, eĉ se la membraro, fine konsciiĝinta pri la tuta afero, kaj alia gvidantaro rekondukos la Asocion sur la vojon de sendependeco kaj partipolitika neŭtraleco.

Provizore tio ankoraŭ ne okazas. La titolo en la *Kongresa Budapeŝta Informilo* reflektas la realaĵon, sed tamen ne estas tute ĝusta. Ne temas pri "novaj paŝoj al estonto", sed pri pliaj danĝeraj paŝoj al obskura estonteco sur la sama vojo de ligiĝo al fremda ideologio kaj de submetiĝo al ekstermovadaj politikaj fortoj. Kaj tiu vojo kondukos en abismon, se la demokrata parto de la membraro de UEA – do la granda plimulto de la individuaj membroj – ne haltigas la tiudirektan iradon per plej firma

KONGRESO BUDAPEŝTA INFORMILO

68-a UK • BUDAPEŝTO • KONGRESA ELDONO

1-a N-ro 1983 - 07/30

NOVAJ PAŝOJ AL ESTONTO

La 27-an de julio 1983 okazis renkontiĝo de reprezentantoj de UEA, d-ro Renato CORSETTI, vicprezidanto kaj d-ro Humphrey TONKIN, estrarano pri eksteraj rilatoj kun s-ro Romesh CHANDRA, prezidanto de la Mondpaca Konsilio, kiu nuntempe ferias en Hungario.

La renkontiĝo, kiu estis aranĝita laŭ invito de s-ro Chandra, estis okazo por reciproka informiĝo kaj por interŝanĝo de opinioj pri eventuala kunlaboro, interalie en kuniĝintaĵ Nacioj.

1986 kaj en la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj.
S-ro Chandra esprimis sian favoran opinion pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia kontribuo al kompreno inter la homoj. Li emfazis la gravecon de komuna lingvo: „Necessa komuna dialogo por solvi mondajn problemojn prefere ol milito”.

International Communist Fronts, 1982

Table 1: International Communist Front Organizations

	Year Founded	Headquarters	Claimed membership	Affiliates	Countries
Afro-Asian People's Solidarity Organization (AAPSO)	1957	Cairo	No data	87	At least 80
Christian Peace Conference (CPC)	1958	Prague	No data		Nearly 80
International Association of Democratic Lawyers (IADL)	1946	Brussels	Ca. 25,000		Over 120
International Organization of Journalists (IOJ)	1946	Prague	Over 180,000		109*
International Union of Students (IUS)	1946	Prague	Over 10,000,000	117*	
Women's International Democratic Federation (WIDF)	1945	East Berlin	Over 200,000,000	131*	116*
World Federation of Democratic Youth (WFDY)	1945	Budapest	Over 150,000,000	Over 270*	123*
World Federation of Scientific Workers (WFSW)	1946	Paris	Ca. 450,000	Ca. 33	Over 70*
World Federation of Trade Unions (WFTU)	1945	Prague	Ca. 206,000,000*	Ca. 90*	
World Peace Council (WPC)	1949	Helsinki	No data		Over 135

*New information.

SOURCES: Figures are from Richard F. Staar, "Checklist of Communist Parties and Fronts, 1981," *Problems of Communism* (Washington, DC), March-April 1982, p. 74, as updated by information from the following sources: for the IUS—CIK (Prague), Aug. 11, 1981; WIDF—*Women of the World* (East Berlin), No. 4, 1981; WFDY—*World Youth* (Budapest), No. 8, 1982; WFSW—*Izvestiya* (Moscow), Dec. 6, 1982; and WFTU—*Flashes from the Trade Unions* (Prague), Feb. 20, 1982.

kontraŭstaro, protestoj kaj postuloj kadre de siaj landaj asocioj, kaj rekte ĉe la gvidaj instancoj de UEA, ke tiu partipolitika manipulado de la Asocio ĉesu tuj kaj por ĉiam. *En la nuna situacio silenti signifas konsenti, kaj konsenti signifas kunrespondec.*

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 kaj 21.4 de *Esperanto en Perspektivo* kaj ĉap. 3.3 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

83 Freŝdataj informoj pri la lingvaj servoj de Eŭropa Konsilantaro kaj EEK

83.1 Rimarko

En la kadro de tre sukcesa seminario de Germana Esperanto Instituto (GEA), organizita de ties prezidanto kaj nun ankaŭ sekretario de la Akademio de Esperanto, D-ro W. Bormann, kaj okazinta de la 23-a ĝis la 25-a de septembro 1983 en Hamburgo, la redaktoro de tiu ĉi rubriko prelegis pri "La Lingvoj de la Eŭropaj Institucioj: Juraj, Politikaj, Ekonomiaj kaj Aliaj Aspektoj". En la prelego estis tuŝitaj ankaŭ la lingvaj servoj de la Eŭropa Konsilantaro kaj de la Eŭropa/j/ Ekonomia/j/ Komunaĵo/j/ (EEK). Jen la koncernaj partoj de la prelego:

83.2 Eŭropa Konsilantaro

Antaŭ mia forveturo mi ricevis de la Ĝenerala Sekretariato de la Eŭropa Konsilantaro tre afablan leteron kun detalaj informoj pri la tradukaj servoj.

Resume:

En 1982 en la Eŭropa Konsilantaro laboris 21 tradukistoj por la angla kaj 23 por la franca, krome pluraj provizoraj interpretistoj. La nombro de konstantaj interpretistoj estis 8 kaj ilia salajro estis preskaŭ 3 milionoj da francaj frankoj. La nombro de la provizoraj (portempaj) interpretistoj ne estas indikita, sed ĝi verŝajne superis 16, ĉar la elspezoj por iliaj kompensoj estis preskaŭ 8 milionoj da fr. fr. En la aldonaj servoj de la Centra Buroo, Sekretariato kaj Terminologio laboris 6 pliaj tradukistoj. La tuto de la buĝetaj kreditoj por 1982 estis 263.797.500 fr. fr.

Laŭ Art. 12 de la Statuto, la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Konsilantaro estas la angla kaj la franca, sed la Proceduraj Regularoj de la Komitato de Ministroj kaj de la Konsulta Asembleo difinas en kiuj cirkonstancoj kaj sub kiuj kondiĉoj aliaj lingvoj povas esti uzataj. Efektive, la nun valida Procedura Regularo de la Asembleo entenas nombron da preskriboj en Art. 17, 18 kaj 19. Laŭ Art. 17, la angla kaj franca (en la franca teksto:

franca kaj angla) estas la oficialaj lingvoj de la Asembleo, kaj ĉiuj dokumentoj de la Asembleo devas esti publikigitaj en tiuj du lingvoj. Tamen, aldone al la du oficialaj lingvoj, la germana kaj itala povas esti uzataj en la Asembleo kaj en ĝiaj komitatoj. Laŭ Art. 18, paroladoj farataj en unu el la oficialaj aŭ aldonaj laborlingvoj (germana kaj itala) devas esti simultane interpretataj en la aliajn oficialajn kaj laborajn lingvojn. Kiel oni vidas, en tiu ĉi kazo la termino "labora lingvo" havas tute alian senco, ol tiu termino havis en la komenco en UN, kaj fakte, kvankam ne formale, egaligas la du oficialajn kun la du laboraj lingvoj. La dua alineo de la sama artikolo entenas tre gravan regulon, laŭ kiu parolado farita en kiu ajn alia lingvo devas esti interpretita, se eble simultane, en unu el la oficialaj aŭ laboraj lingvoj, el kiu ĝi devas esti interpretata simultane en la aliajn oficialajn kaj laborajn lingvojn. La sola kondiĉo estas, ke la uzanto de tiu neoficiala kaj nelabora lingvo mem prizorgu la tradukon en unu el la oficialaj aŭ laboraj lingvoj. Sekve, tiu regulo ebligas, ke ankaŭ la Internacia Lingvo estu uzata por paroladoj kaj debatoj en la Asembleo. Laŭ Art. 19, la samaj reguloj, inkluzive tiun pri la uzo de neoficiala aŭ nelabora lingvo, aplikiĝas al la kunsidoj de la Komitatoj de la Asembleo. La pordo por Esperanto estas malfermita. Necesas trovi iun au iujn, kiu/j/ eniros. Por pripenso de la Eŭropa Klubo kaj Eŭropa Esperanto-Centro.

83.3 Eŭropa Ekonomia Komunaĵo / EEK /

Laŭ la Oficiala Gazeto (*Journal Officiel* en la franca) de la Eŭropaj Komunaĵoj N-ro C 188/13 de 22.07.82, la tradukaj servoj en Bruselo kaj Luksemburgo havas 1.233 geoficistojn, el kiuj 850 estas getradukistoj. Tio rilatas nur al tradukado, ne al la servoj de interpretado. Laŭ la sama fonto, la meza salajro de ĉiu tradukist/in/o estas 127.628 b. fr. monate, t.e. entute ĉ. 2,4 milionoj da anglaj pundoj jare nur por la salajroj de la personaro laboranta en la tradukaj servoj, ne kalkulante ĉiujn ceterajn elspezojn. Mi klopodis havigi precizajn informojn pri la tuto de la elspezoj por la tradukaj kaj interpretaj servoj, sed ne sukcesis. Per sia letero de 09.08.83, la Direktoro de la departemento "Tradukoj, Dokumentado, Reprodukado, Biblioteko", S-ro A. Ciancio, informis min, ke "pro la komplekseco de tiuj servoj kaj de iliaj aktivadoj, preciza respondo postulus konsiderindan laboron kaj tre longan prokraston". Do, eĉ la direktoro de la tradukaj servoj ne scias precize kiom ili kostas al EEK! La ĝenerala takso estas, ke la kostoj atingas proksimume 500 milionojn da dolaroj jare. Estas interese mencii, ke, laŭ la sama Oficiala Gazeto, responde al skriba demando de unu el la deputitoj, la

Komisiono asertis, ke la tradukaj-interpretaj servoj havas karakteron de "publikaj servoj" kaj estas subigitaj al premoj "de naturo politika, jura kaj administra", kaj ke en tiaj cirkonstancoj la konsideroj de "rentabileco" ("rentabilitato" laŭ PIV), praktikataj en privataj entreprenoj, "perdas ĉian signifon". Tio, fakte, estas ĝusta, sed nur en la nuna situacio. Tamen tio neniel signifas, ke EEK rajtus tiel rezignacie akcepti la nunan realaĵon eĉ ne provante serioze esplori la eblecojn de racia kaj multe pli ekonomia solvo per unusola, neŭtrale-homa lingvo.

Cetere, la produktivo de la diversaj tradukaj sekcioj variis inter 143,5 (angla) kaj 118 (dana) paĝoj monate fare de unu tradukist/in/o (3 paĝoj estas proksimume 1000 vortoj). En sia respondo la Komisiono tamen emfazas, ke tiuj paĝo-nombroj nur parte reflektas la faktan laboron, ĉar ili ne montras la esplorlaborojn rilate dokumentadon kaj terminologiajn problemojn, nek la multnombrajn konsultiĝojn por korekta kompreno kaj preciza traduko de alte specialigitaj tekstoj, la harmoniigon de multlingvaj tekstoj, precipe de tiuj, kiuj havas juran karakteron.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 1.3.5 de *Esperanto en Perspektivo*.

84 Malĝustaĵoj, mankoj kaj nekomprenejoj en "The Esperanto Movement" (La Esperanto-Movado) de Peter C. Forster

84.1 Pri la verko ĝenerale

La aŭtoro informas en la Antaŭparolo, ke la verko estas reviziita kaj ĝisdatigita versio de lia tezo "*A Sociological Study of the Esperanto-Movement*" (Sociologia Studo pri la Esperanto-Movado), kiun la Universitato de Hull (Britio) akceptis en 1977 por la grado de Doktoro pri Filozofio. La libron eldonis la konata eldonejo *Mouton Publishers – The Hague, Paris, New York* en 1982, do kvin jarojn post la doktoriĝo de la aŭtoro kaj ok jarojn post la eventoj de Hamburgo en 1974. Necesas tion diri por atentigi, ke la aŭtoro havis sufiĉe da tempo por trastudi kaj sciencaj analizi la partipolitikan intrigon de 1974 kaj ĝiajn sekvojn, kion li ne faris, kiel montriĝos poste.

La 413-paĝa libro konsistas el Antaŭparolo, Enkonduko, du ĉefaj partoj, Konkludo, ses apendicoj, Glosaro kaj Bibliografio. Estas strange, ke en tia verko mankas tema kaj persona indeksoj, kio grave malhelpas orientiĝon. En Parto I estas pritraktita la monda Esperanto-Movado, en Parto II Esperanto en Britio. *Horizonto* ne ricevis la libron por recenzo. Tial recenzo ne aperos. Sed la redaktoro de tiu ĉi rubriko ricevis la verkon

donace de amiko kaj, traleginte ĝin antaŭ nelonge, trovis, ke necesas iom pritrakti ĝin ĉi tie.

Kvankam la reviziita tezo de Forster enhavas valorajn sekciojn, precipe en la parto pri Esperanto en Britio, tamen en ĝi troviĝas ankaŭ tre multaj malĝustaĵoj, malzorge ellasitaj aŭ manke prezentitaj faktoj, kaj tial eraraj interpretoj kaj konkludoj. Mi notis centon da ili ekde la unua paĝo de la Antaŭparolo ĝis la lastaj paĝoj de la Bibliografio, sed limigos min sube al unu fundamenta kaj nur al kelkaj el la multnombraj rilatantaj aŭ rekte al mi persone aŭ al laboroj ligitaj al mia nomo en la Esperanto-Movado. Kaj tion mi faros sole por eviti, ke mia silento estu komprenata kiel konsento. Ĝi estas des pli necesa, ĉar en la Antaŭparolo la aŭtoro esprimas dankon al pluraj personoj, "unuavice" al mi, "pro iliaj interesiĝo kaj helpo" (en la plua teksto ĉiuj citaĵoj estos en Esperanto-traduko, farita de mi mem), kio povus kredigi la legantojn, ke mi almenaŭ certagrade kunrespondecas. Pretere dirite, Forster mencias mian nomon en societo de kelkaj aliaj esperantistoj en unu alineo, sed en nova alineo li dankas al personoj "en la akademia mondo", inter kiuj troviĝas ankaŭ nomoj de esperantistoj, ekz. tiuj de Bernard Golden, D-ro R. Wood kaj D-ro U. Lins. Tiamaniere la nova doktoro pri filozofio, kiu sur p. 232 objektive prezentas miajn akademian karieron kaj jursciencajn atingojn, en la Antaŭparolo de la sama libro eligas min el "la akademia mondo"! Sekvas la kutima formulo, ke danka mencio de iu nomo "ne necese implicas konsenton aŭ aprobon de la enhavo" fare de la koncernato. Estas vero, ke plurajn jarojn antaŭ la doktoriĝo kaj multajn jarojn antaŭ la publikigo de sia verko, la aŭtoro iom korespondis kun mi kaj petis de mi kelkajn konsilojn, sed li neniam konsultis min pri esence gravaj historiaj faktoj en la Esperanto-Movado aŭ pri eventoj ligitaj al mia nomo. Tial mi plene distancigas min de lia verko.

84.2 Iom pri la fontmaterialoj

Necesas fari almenaŭ du pliajn ĝeneralajn rimarkojn, ĉar ili rilatas al foresto de la necesa konscienca studado de fontmaterialoj en preparado de doktoreca tezo.

La unua koncernas la liston de la konsultitaj periodaĵoj (p. 405). En ĝi mankas la jugoslavia *La Suda Stelo*, unu el la plej elstaraj antaŭmilitaj periodaĵoj, redaktata tiutempe en la spirito de humaneca internaciismo kaj tial senkompromise kontraŭa al submetiĝo de Esperanto en kia ajn formo al naziismo/faŝismo. Malatenti tiun periodaĵon, vaste apogatan ankaŭ ekster Jugoslavio, necese kondukas al nekompreno de la reala situacio en la Esperanto-Movado en la periodo antaŭ la Dua Mondmilito.

En la listo mankas ankaŭ *Horizonto*, kvankam en septembro 1980, kiam la aŭtoro kompletigis la manuskripton, ĝi estis regule aperanta jam la trian jaron. Sen *Horizonto*, la laŭparolilo de la sendependa, humaneca esperantismo, ne eblas korekte pritaksi la staton en la posthamburga UEA kaj, pli vaste, en la Esperanto-Movado.

La dua rimarko rilatas al la sesa sekcio de la Bibliografio sub la titolo "Internacilingva Movado: Libroj, Broŝuroj kaj Raportoj (Ĝenerala Dokumentado)" (p-oj 406-412). Tie estas menciita nur unu dokumento de la iama Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED): tiu entenanta la liston de la lokaj Esperanto-societoj (1964). Tamen, inter 1952 kaj la fino de 1974 CED publikigis, aldone al kelkaj libroj, 325 dokumentojn en la serioj A-J, CED kaj CED/INT. Sen trastudo de tiu dokumentaro kaj de la tuta arkivo de CED oni povas nek objektivite sciiĝi pri faktoj, nek kompreni la dinamismon en la periodo 1950-1975. Plue, en tiu sama sekcio estas menciita la 1-a eldono de mia *Retoriko* (1950). Fakte, la aŭtoro estus devinta trastudi la 3-an, reviziitan kaj kompletigitan eldonon de 1971. Se li estus almenaŭ leginta tiun verkon, en kiu la tuta Unua Parto de 116 paĝoj rilatas al lingvo, li estus listiginta ĝin en la trian sekcion "Verkoj pri Lingvo" kaj, pli grave, eble evitinta bazajn konceptajn erarojn. Fine, en la sesa sekcio troviĝas tri el miaj fakaj-sciencaj nacilingvaj verkoj – *Conceptions Soviétiques de Droit International Public* (Sovetiaj Konceptoj de Internacia Publika Juro), *State and Law: Soviet and Yugoslav Theory* (Ŝtato kaj Juro: Sovetia kaj Jugoslavia Teorioj), kaj *Soviet Penal Policy* (Sovetia Punjura Politiko) – kiuj havas absolute nenian ligon, escepte de mia nomo, kun la "internacilingva movado: libroj, broŝuroj kaj raportoj (ĝenerala dokumentado)". Tio estas preskaŭ nekredeble malzorga aliro al fontaj studmaterialoj.

84.3 Fundamenta eraro kaj ĝiaj sekvoj

Ĉiuj principaj-konceptaj eraroj en la verko sekvas el unu fundamenta: la kompleta nekompreneo de la socia karaktero de lingvo, kiu ajn lingvo, fare de la aŭtoro. Tial li ankaŭ neniel komprenas la rilaton inter homkolektivo formiĝinta kiel klare distingebla aparta socia grupo (gento, tribo, hordo, klaso, kasto, nacio, k.a., inkluzive internacian homkolektivon), unuflanke, kaj ĝia respektiva lingvo, aliflanke. Estas vero, ke sur p. 105 Forster citas la faman lingviston E. Sapir, kiu prave skribis, ke "la nura fakto de komuna lingvo servas kiel siaspeca potenca simbolo de socia solidareco inter la parolantoj de tiu lingvo", sed la tuta libro, eĉ la teksto sub la menciita citaĵo montras, ke li malatentas la solidarigan rolon de la lingvo, ĉar li tutsimple ne komprenas la daŭran

interagan procezon inter socio kaj lingvo. Alie li ne skribus sur la sama p. 105 plurajn absurdaĵojn, ekzemple, ke Zamenhof en siaj paroladoj evoluigis la ideon pri "Esperanto kiel dua nacieco por la membroj de la Movado"! En tiu unusola konfuza frazeto troviĝas tri eraroj: (i) Zamenhof neniam evoluigis tiun ideon, sed ion tute alian; (ii) Esperanto estas lingvo kaj neniel povas esti "nacieco" en kiu ajn senco de la angla "nationality"; (iii) en tia kunteksto povus temi, se la tezo estus ĝusta, ne pri "membroj de la Movado", sed nur pri apartenantoj al la esperantlingva komunajo. Similaj malĝustaĵoj kaj kontraŭdiroj abundas en la libro.

Tiu fundamenta eraro kaŭzas nombron da principaj-konceptaj. Tri el ili estu menciitaj:

La aŭtoro aplikas al Esperanto la epiteton "*artefarita*" distinge de la naciaj lingvoj, kiuj kvazaŭe estas "*naturaj*". Jam sur la 1-a paĝo de la Enkonduko li senkritike transskribas la kontraŭscienca difinon donitan al Esperanto en *Shorter English Dictionary*, t.e. "nomo de artefarita lingvo inventita por universala uzo". Li, same senkritike, uzas tra la tuta verko la esprimojn "artefarita" por Esperanto, "inventinto" (*inventor*) por la iniciatinto de Esperanto, kaj "naturaj" por ĉiuj aliaj lingvoj (ekz. p-oj 3, 53, 54, 59, 60, 147, 177, 348, ktp, ktp.). Fakte, la diversaj naturismaj-biologiaj lingvistikaj skoloj estas jam delonge forlasitaj, kaj neniu serioza lingvisto aŭ sociologo rigardas la lingvon ia natura fenomeno. Kvankam nuntempe ekzistas diversaj lingvosciencaj fluoj, tamen ĉiuj konsentas pri la nekontestebla fakto, ke lingvo estas socia fenomeno, kies ekeston, evoluon kaj malaperon regas ne iaj biologiaj, naturaj aŭ mekanikaj leĝoj, sed ekskluzive sociaj en la vasta senco de la vorto. Tial estas grava kaj misgvida eraro nomi kiun ajn lingvon "natura" aŭ "artefarita". Se tiajn erarojn ripete faras jam dum jardekoj iuj vortaroj (ne ĉiuj) pro nescio aŭ intence, aŭtoro de doktoriĝa tezo devus ne fari ilin. Anstataŭ lerni eraran difinon el vortaro, li devus kritiki ĝin kaj doni science ĝustan difinon, atentigante pri tio la eldoniston. Finfine, Zamenhof, kiu ĉiam prave rigardis sin nur "iniciatoro" de la Internacia Lingvo, principe-koncepte ne estas pli "inventinto", ol estas Dante por la itala, Lj. Gaj por la kroata, V. Karadžić por la serba kaj multaj aliaj iniciatintoj por aliaj literaturaj (normaj) lingvoj. Tamen, neniam kiu ajn venis al la ideo nomi ilin "inventintoj", aŭ atribui al la normaj lingvoj iniciatitaj de ili la epiteton "artefaritaj". Kaj en kio, do, konsistas la "natureco" de kiu ajn norma lingvo, se ni devas lerni tiujn niajn proprajn naciajn lingvojn dum multaj jaroj por iel kontentige ellerni ilin kaj poste daŭre konsultadi gramatikojn kaj vortarojn por eviti erarojn? Kie, ekzemple, estas la "natureco" de la norma, literatura itala lingvo, se nur en tiu ĉi 1984-a jaro, do sep jarcentojn post la iniciato de Dante, oni atingis, ke nur 50% de la

itala popolo kapablu paroli ĝin? Simile statas ĉiuj naciaj normaj lingvoj en rilato al siaj respektivaj popoloj malgraŭ la nacilingvaj literaturoj, lernejoj, gazetaraj, radio, televido kaj aliaj unuecigaj faktoroj. (Pretere kaj parenteze dirite, la naivuloj, kiuj senpaciencaĝas, ĉar Esperanto ankoraŭ ne konkeris la mondon, aŭ la maliculoj-ignorantoj, kiuj riproĉe al la lingvo asertas la samon, fariĝus pli paciencaj aŭ malpli malicaj-ignorantaj, se ili iom pripensus la staton de siaj propraj naciaj lingvoj en rilato al la regionaj dialektoj kaj lokaj parolformoj).

Aliflanke, se la vorton "natura" oni komprenas en la senco "konforma kiel lingva instrumento al la bezonoj de logikaj pensado kaj esprimiĝo", oni povas nur konstati, ke Esperanto estas konsiderinde pli konforma al la racio, tial pli facile akirebla, do en tiu senco pli "natura", ol kiu ajn norma nacia lingvo, inkluzive la propran. Sed eĉ en tiu senco ne estas konsilinde uzi la vorton "natura" sen ekpliki pri la funkciado de normala homa cerbo kaj la kompleksa rilato inter lingvo kaj penso.

La nekompreno de tiu *idearo*, kiu estas ligita al la Internacia Lingvo kaj kiun Zamenhof nomis interna ideo, estas plia sekvo de la fundamenta eraro. En la Glosaro la aŭtoro difinas la internan ideon ("*inner idea*") jene: "la nebula valororientiĝo implicanta pacon, solidarecon, amikecon kaj justecon, kiu estas tradicie asociiĝinta kun Esperanto". Tiu "*inner idea*" (en la angla la esprimo estas eĉ pli maltaŭga ol "interna ideo" en Esperanto) treniĝas tra la tuta libro (p-oj 70, 96-97, 230-231, 254, 258 ktp.), kelkloke en ridinde absurda formo. Ekzemple, sur p. 230 estas asertite, ke "en la postmilita periodo la historion de la Esperanto-Movado markas tendenco al instituciigo de la 'interna ideo' kaj burokratigo de la strukturo". Mi estas tre aktiva en la Esperanto-Movado jam 55 jarojn, sed neniam mi aŭdis kion ajn pri ia tendenco "instituciigi la internan ideon" aŭ pri "burokratigo de strukturo"!

Lasante flanke tiun kaj aliajn absurdaĵojn lige kun la "interna ideo" en la pritraktata doktoreca tezo, mi ne povas ne diri plej firme, ke la idearo de Zamenhof en rilato al Esperanto tute ne estas "nebula", sed perfekte klara kaj esence ĝusta el scienca vidpunkto. Nebula ĝi estas nur por tiuj, kiuj mem havas tre nebulajn ideojn pri la socia funkcio de lingvo. La fakto, ke Zamenhof uzis neadekvatan esprimon neniel senigas la idearon de ĝia sociologia valoro. Mi mem ĉiam uzis la science adekvatan esprimon "humaneca internaciismo", kaj prilaboris ĝin en multnombraj studoj, artikoloj, prelegoj kaj paroladoj. Se Forster estus nur iom trastudinta tiun abundan materialon – kaj verkanto de doktoreca tezo pri la Esperanto-Movado devus studi tion ne iom, sed tre atente – li ja estus menciinta la Zamenhofan internan ideon, sed li ankaŭ estus devinta ekpliki ĝian veran senco konforme al la science prilaborita koncepto de humaneca

internaciismo. Bedaŭrinde, li tion ne faris. Tial neinformita leganto de lia libro necese ricevas la eraran impreson, ke la "valororientita" Esperanto-Movado estas ia stranga sekto bazita sur ia "nebula" kaj mistika "inner idea", kies adeptoj nomas sin "fellow-idealists" (fratuloj-idealistoj), kiel la aŭtoro komplete erare kaj misgvide tradukis la vorton "samideno(j)".

Tiu erara impreso pri sekteco estas fortigita per la tria sekvo de la fundamenta eraro: la amasa aplikado de la vorto "crank" (en la angla ne nur "strangulo", sed ankaŭ "maniulo") al esperantistoj plurloke en la libro. Sur unusola paĝo (371) *crank* kaj derivaĵoj aperas dekon da fojoj!

Estas vero, ke inter esperantistoj troviĝis kaj parte plu troviĝas ankaŭ diversspecaj, stranguloj, sed estas ankaŭ vero, ke (i) antaŭ ol fariĝi esperantistoj ili jam estis stranguloj, pro kio iliaj respektivaj naciaj lingvoj certe neniom perdis de sia valoro; (ii) ilia nombro en la Esperanto-Movado tre verŝajne estas proporcie malpli granda, ol la nombro de stranguloj en iliaj naciaj lingvokomunaĵoj, kaj (iii) en iuj landoj stranguloj relative abundas inter Esperanto-parolantoj, en aliaj ili estas malmultaj aŭ eĉ komplete forestas.

La aŭtoro objektive mencias mian sukcesan kontraŭbataladon de malutilaj strangaĵoj kompromitantaj la seriozecon de nia afero kaj malhelpantaj la disvastiĝadon de Esperanto. Sur p-oj 233-234 li eĉ aperigis en angla traduko longajn partojn de mia kritika artikolo pri la strangaĵoj dum la Berna Kongreso (1947), publikigita siatempe en *Internacia Kulturo*, kaj la esencajn erojn de la *Principaro de Frostavallen* (p. 241), sed tio ne sufiĉas. En tiaspeca verko devis esti profunde ekzamenitaj la specifaj formoj kaj kaŭzoj de strangaĵoj ĝenerale en diversaj sociaj medioj de diversaj landoj por komprenigi la aspektojn de kelkaj strangaĵoj en parteto de la Esperanto-Movado en iuj landoj. Kaj tio ne estas farita. Tial ankaŭ tiurilate la bildo estas falsa.

La demandoj tuŝitaj en tiu ĉi sekcio estas tiel ĉiuflanke jam pritraktitaj en Esperanto, ke por mi estis pli ol tede skribi la suprajn liniojn. Se P.G. Forster ne sciis tion, li povis kaj devis informiĝi ĉe mi. Se li sciis, pri kio mi dubas, sed ne emis trastudi ĉion, li devis atenti almenaŭ al la minimumo entenata en *Retoriko* (tria eldono), *Esperanto en Perspektivo*, ĉap. 18 (precipe 18.2 Bazaj Konceptoj), *Por Pli Bona Informado*, kaj en la longa artikolo "Kelkaj Lingvistikaj Demandoj", publikigita en *Belarto*, aprilo 1958, p-oj 51-63.

84.4 Kelkaj el multaj aliaj malĝustaĵoj

Jen nur kelkaj el tre multaj aliaj malĝustaĵoj kaj eraroj pri faktoj: P. G. Forster asertas, ke "en ĉiu okazo Esperanto ne estas neakordigebla kun iuj versioj de marksisma filozofio, kiel montras ĝia vivoforto en multaj

komunismaj landoj" (p. 7). Fakte, la vivoforto de Esperanto en tiuj landoj estis rimarkinda longe antaŭ ol en ili ekregis iliaj respektivaj komunistaj (sovetiistaj) partioj, kies ideologio, cetere, havas nenion komunan kun la originala marksismo, escepte de la nomo. Krome necesas distingi la vastajn tavolojn de la esperantistaro, por kiuj Esperanto donas almenaŭ iujn eblecojn de komunikado kun la ekstera mondo, disde la politikaj gvidantoj, por kiuj Esperanto valoras nur tiom, kiom ĝi servas kiel instrumento de partipolitika propagando. Tiu "kompromiso" povas ĉiumomente rompiĝi, kiel montras la spertoj sub stalinismo antaŭ la Dua Mondmilito kaj post ĝi.

La aŭtoro skribas, ke *"aliaj grupoj, kiuj ricevis specialan apogon de esperantistoj, estas la kvakeroj kaj Oomoto"* (p. 107). Fakte, "la esperantistoj" donis nek specialan, nek nespecialan "apogon" al tiuj "grupoj", sed ja troviĝis ankaŭ kvakeroj kaj oomotanoj, kiuj, same kiel centmiloj da aliaj personoj, ellernis la lingvon kaj fariĝis esperantistoj, t.e. Esperanto-parolantoj.

Laŭ Forster, *"la Ligo [de Nacioj] povus almenaŭ esti rigardata kiel malgranda paŝo antaŭen al internacia respektindeco de la esperantista ideologio"* (p. 171). Tiu "esperantista ideologio", kiu aperas multloke en la libro, neniam ekzistis nek povas ekzisti kiel *ideologio* en kiu ajn senco de tiu vorto, inkluzive la anglan *ideology*. Tute alia afero estas la idea aspekto aŭ solidariga rolo de kiu ajn lingvo, inkluzive de Esperanto, en rilato al la socia-lingva komunaĵo, al kiu ĝi apartenas. En ĉiu okazo la respektindeco de Esperanto ne dependis de la Ligo, nek povas dependi de tiaspecaj organizaĵoj, kiuj eventuale povas nur rekoni la *ekzistantan respektindecon* de la Internacia Lingvo, kiel tion faris la konata Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954. Plue: *"La franca perdis sian monopolon en diplomatia komunikado en la Traktato de Versailles pro la limigita scio de la franca fare de Lloyd George kaj Wilson"* (p. 171) kaj *"la Ligo de Nacioj estis oficiale dulingva"* (p. 175). Fakte, la monopolon de la franca ĉesis ne tial, ĉar Lloyd George kaj Wilson ne sciis ĝin, sed pro tute aliaj kaŭzoj, kaj la Ligo de Nacioj ne estis *oficiale dulingva*: kaj en la Pakto kaj en la Interna Regularo la esprimo "oficialaj lingvoj" estis intence evitita. Tion mi iom detale eksplikis en *La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj* (CED/Dok. A/II/5), kiun la aŭtoro, evidente, neniam vidis, sed kiun li estus devinta ne nur vidi, sed ankaŭ studi.

En tiu doktoreca tezo estas ankaŭ skribite, ke *"UEA diskutas ĉefe aferojn de la Esperanto-Movado, dum SAT donas la okazon paroli en Esperanto pri io alia"* (p. 210). Oni ricevas la impreson, ke paroli en Esperanto oni povas nur en UEA (ĉefe pri Esperanto-aferoj) kaj en SAT (pri io alia)! Kompatindaj tiuj centmiloj da Esperanto-parolantoj, kiuj troviĝas ekster

SAT kaj al kiuj tial ne estas donita la okazo paroli pri "io alia". Preskaŭ nekredible, ke tiaj sensecaĵoj povas troviĝi en verko pretendanta sciencecon.

Forster asertas, ke *"la komunisma ideologio akceptas la fundamentajn principojn de la interna ideo (inner idea, denove) de Esperanto: paco, justeco kaj tutmonda frateco"* (p. 227). Do, la komunisma ideologio akceptas ian "nebulan valororientiĝon" (v. supre). Fakte, plurfoje, sed precipe en la *Kritiko de la Programo de Gotha* Marx plej forte kaj eksplicite atakis la parton pri interpopola frateco kaj insiste kontraŭstarigis al ĝi la internacian solidarecon de la laboristaro. Sub Stalin kaj nuntempe la originala marksisma koncepto de proleta internaciismo ricevis la sencon de absoluta submetiĝo al la interesoj de Moskvo, dum internaciismo en la ordinara senco de la vorto estas nomata "burĝa kosmopolitismo" kaj rigardata kiel grava devojiĝo. La sovetiisma ideologio ne nur malakceptas, sed kontraŭbatalas per siaj jam konataj metodoj ĉion, kio ne estas strikte konforma al la linio de la Komunista Partio de Soveta Unio, interalie ĝuste tiun idearon, kiun Zamenhof nomis "interna ideo" kaj por kiu, kiel dirite supre, la esprimo humaneca internaciismo estas science adekvata. En la Esperanto-Movado tion klare montras la partipolitika kampanjo kondukinta al Hamburgo kaj daŭrigata post ĝi per ĉiuj eblaj rimedoj: ekde pseŭdosciencaj studoj sub masko de sciencoco, tra pamfletoj kaj artikoloj en sovetiismaj gazetoj kaj periodaĵoj (inkluzive la organon de la Brita Komunista Partio *Daily Worker* dum la Universala Kongreso de Esperanto en Londono, 1971), ĝis la vulgara ridindigado de "La Espero" dum la kongresoj de TEJO kaj nun ankaŭ de UEA. El la supre cititaj vortoj kaj el aliaj partoj de la libro vidiĝas, ke la aŭtoro komprenas nek la humanecan internaciismon, nek la originalan marksismon, eĉ malpli la sovetiismon kiel komplete deformitan marksismon. Por iom kompreni tion, li estus devinta atente trastudi almenaŭ la verkon *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA*.

Forster skribas, ke post Montevideo (1954) *"UEA estis, fakte, rigardata en iuj rondoj kiel progresiganta ne nur siajn proprajn celojn, sed la ideologion de Unesko (uneskismo)"* (p. 245). Tiu konkluda parteto sekvas post la epokfaraj rezultoj de "sciencaj" esploroj de la nova doktoro, laŭ kiu "la ofico de ĝenerala sekretario, enkondukita /en UEA/ en 1955 memorigas pri tia pozicio en UN", kvankam (i) ĝeneralan sekretarion aŭ sekretarion havas ĉiu bone organizita asocio, (ii) la Ĝenerala Sekretario de UN estas altege salajrata ĉefo de la administra aparato de UN (simile al la malbonege salajrata ĝenerala sekretario de UEA antaŭ 1955), kaj (iii) ekde 1955 la ĝenerala sekretario de UEA estas nesalajrata membro de la

Estraro. Do, eĉ se ekzistus ia simileco, ĝi dirus nenion, sed, fakte, nenia simileco! Plia "scienca" malkovro de la aŭtoro: la dokumentoj de CED estis "laŭ aspekto similaj al la dokumentoj de Unesko" kaj "la periodaĵo *Esperanto* komencis kreskante simili al *Unesco Courier*" !!! Vere, sen komento.

Sed kie, do, li trovis tiajn geniaĵojn, kiuj kvazaŭe kondukis al "uneskismo"? Li respondas per "ekzemple", kvankam temas pri sole, en la artikoletoj, en kiuj John Leslie sub pseŭdonimo Verdiro de unu n-ro al alia de la semajna gazeteto *The Socialist Leader* atakadis min per siaj fantaziaj inventaĵoj, ofte uzante alian pseŭdonimon por aprobi antaŭan atakon, kaj je protestoj respondadis, ke li havas nenion komunan kun la du pseŭdonimaj personoj. Forster mem informas, ke tiu J. Leslie estis rigardata "*cranky*", verŝajne en la senco "mania" (p. 280), sed tamen amplekse kaj senkritike resumas liajn maniaĵojn kaj la maniaĵojn de alia maniulo pri mi ("diktatoro", "kulto de personeco", "centralizismo" ktp.) plurloke en la libro (p-oj 247-250). Oni verkas eĉ ne parteton de doktoreca tezo laŭ nekontrolitaj onidiroj, klaĉadoj kaj inventaĵoj de maniuloj. Certe ne en la universitatoj, en kiuj mi instruis kaj instruas.

Cetere, ankaŭ Unesko ne havas "ideologion", sed estas organizaĵo de UN por edukado, scienco kaj kulturo, intertempe degenerinta, pri kio mi atentigis jam en 1970 en artikolo "Kien Unesko?", publikigita en *Esperanto*, n-ro 12/1970. Tiun artikolon kaj kelkajn aliajn pri la temo la aŭtoro estus devinta konsideri anstataŭ ripeti, ankoraŭfoje senkritike, stultaĵojn de maniuloj kaj primitivaĵojn de senkulturuloj, ekz. tiun sur p. 249, ke komercaj reklamoj en *Esperanto* (ekz. de Fiat kaj Philips) pli impresas, ol la tradukoj de *La Nobla Korano* kaj (kion P. G. F. ellasis) *La Dia Komedio*. Kvazaŭ entute povus temi pri dilemo: aŭ komercaj reklamoj aŭ literaturo kaj kulturo. Pretere dirite, kvankam li menciis en piednoto mian reagon en *Esperanto* n-ro 3/72 je tiu primitivaĵo publikigita en *Esperanto* n-ro 1/72 (plia "ekzemplo" de mia "malebligado de kontraŭaj opinioj!"), tamen li ne skribis unusolan frazeton pri la esenco de la reago.

84.5 Aparte iom pri Hamburgo (1974)

Se mi dezirus pritrakti nur duonon de la malĝustaĵoj, kontraŭdiroj kaj eĉ misprezentoj, pluraj n-roj de *Horizonto* ne sufiĉus. Pri tio mi rezignas. Sed la partoj de la libro rilatantaj al Hamburgo kaj ĝiaj sekvoj estas tiel komplete, de la komenco ĝis la fino, plenaj de misprezentoj, ke mi ne rajtas ne mencii almenaŭ 2-3 el ili.

Forster asertas, ke MEM "*inklinas apogi sovetian starpunkton*" (p.

399) kaj ke ĝi "nun ĉesis esti aliĝinta membro de UEA" (p. 258). Fakte, MEM estas parto de la Monda Packonsilio kaj kiel tia ne "inklinas", sed devas senkondiĉe apogadi kaj propagandadi la oficialan sovetian linion, kion ĝi ja faras. MEM neniam estis "aliĝinta membro" de UEA kaj tial ne povis "ĉesi esti". Alia afero estas, ke ĝiaj gvidantoj kiel funkciuloj de la Esperanto-organizaĵoj en la sovetiismaj landoj formas, kune kun la kunvojaĝantoj, la decide influan blokon en la Komitato de UEA. Tion la aŭtoro ne komprenas aŭ ne volas kompreni. Alie li ne ripetus, plian fojon *senkritike*, la asertojn de konata mensogofonto, ke ne ekzistas "pruvoj" pri la partipolitika "puĉo" de Hamburgo, nek li skribus en piednoto 55 sur p. 359, ke mia "versio" pri la hamburgaj eventoj troviĝas en *Hamburgo en Retrospektivo*, sed ne diras unusolan vorton en kio konsistas tiu mia "versio". Se li trovis tempon por veturi en Bulgarijon kaj viziti tie S-ron N. Aleksiev, la ĉefan organizinton de la konspiro, li povus kaj devis trovi tempon por fari salteton de Hull en Wembley. Al doktoriĝonto mi volonte estus montrinta la multkilograman dosieregon, sur kiu baziĝis *Hamburgo en Retrospektivo*, kaj ankaŭ multajn aliajn originalajn dokumentojn pri la postmilita periodo. Ĉar mi plu fidus je lia intelekta honesteco, mi ankaŭ fidus, ke, trastudinte tion, li ne skribus, ke ne ekzistas "pruvoj" kaj ke temas nur pri mia "versio".

Ĉerpante el la sama konate misinforma fonto, la aŭtoro asertas, ke mi "*formis mallongvivan movadon disiĝintan de UEA*" (p. 251). En tiu mallonga frazo troviĝas tiom da malĝustaĵoj, kiom da vortoj: (i) mi neniam "formis" movadon disiĝintan de UEA, sed, kune kun multaj aliaj, apogis kaj plu apogas la partipolitike neŭtralan kaj sendependan esperantismon, ekzistantan ekde la apero de Esperanto; (ii) tio, kion li nomas "disiĝinta movado", plu vivas kaj fortikiĝas, kiel, interalie, montras la konferencoj de N.E.M., la ekzisto de ICNEM kaj la revuo *Horizonto*; (iii) tre multaj apogantoj de la neŭtrala Esperanto-Movado neniam ekŝiĝis el UEA kaj tial ne povis "reveni" al la Asocio; (iv) pro Hamburgo UEA perdis en la unua jaro 1177 individuajn membrojn, do preskaŭ unu kvinonon de la tuta individua membraro; (v) en 1983, do dek jarojn post la lasta antaŭhamburga jaro, UEA plu havis nur 6439 individuajn membrojn kompare kun 7302 en 1973. Oni ne prezentas tiel false la faktojn en doktoreca disertacio. Io almenaŭ parte vera iel elglitis el la menso de Forster, kiam li diris en la lasta frazo de tiu sekcio rilatanta al Hamburgo: "Tiele, la specifa punkto de la konflikto leviĝis inter la "*cranks*" (stranguloj aŭ maniuloj) kaj tiuj celantaj internacian respektindecon /de Esperanto/" (p. 254). Parte vera tial, ĉar, kvankam kelkaj stranguloj/maniuloj sendube partoprenis en tiu tuta bedaŭrinda kaj hontinda afero, tamen la konspiro esence estis kaj restas partipolitika.

84.6 Konkluda rimarko

Mi ne scias laŭ kiuj kriterioj la Universitato de Hull donas doktorecon. En la Universitato de Londono doktoreca tezo devas esti "distinga kontribuaĵo al la sciuj pri la temo" kaj "originala kontribuaĵo" al la koncerna scienca branĉo. La tezo de Forster estas tre malproksima de tiuj kriterioj. En la Londona Universitato ĝi troviĝus en la antaŭcambro de doktoreco, kaj tie ĝi devus resti almenaŭ unu plian jaron por esti kompletigita, korektita kaj ĉiuflanke prilaborita, antaŭ ol esti prezentita por doktoreca ekzameno. Se Forster estus petinta mian helpon, pro la temo mi estus helpinta lin eĉ pli volonte, ol mi helpas la studentojn, kiuj doktoriĝas ĉe mi sub miaj gvidado kaj kontrolo. Mi fidus, ke en tiu okazo li estus verkinta disertacion sur la necesa scienca nivelo. Tre bedaŭrinde el akademia kaj aliaj vidpunktoj – ankaŭ el tiu de la Esperanto-Movado – li tion ne faris.

85 Esperanto en Montevideo (1954) laŭ la paperoj de Prof. Blinkenberg

85.1 Pri kio temas?

Prof. Andreas Blinkenberg estis unu el la membroj de la Delegacio de Danio dum la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta en Montevideo en 1954. Estas vaste konate, ke tiu Sesio de la Ĝenerala Konferenco akceptis la jam faman Rezolucion de la 10-a de decembro 1954 favore al Esperanto. Nuntempe estas malpli konata la fakto, ke en la kunsido de la Programkomisiono de la 4-a de decembro 1954 Prof. Blinkenberg lanĉis preskaŭ nekredible nekulturan atakon kontraŭ Esperanton, kaj ke en atmosfero de hontinda neseriozeco, kaŭzita de lia interveno, li sukcesis atingi, ke la apoga rezolucipropono de la Delegacio de Meksikio estis rifuzita per 23 voĉoj kontraŭ 3 favoraj (Meksikio, Urugvajo kaj Ĉinio) kaj 19 sindetenoj. Pri la sestagaj streĉaj eventoj, kiuj rezultigis la akcepton de la Rezolucio de 10.12.1954 favore al Esperanto, aperis detala raporto kaj dokumentoj en *Esperanto* de februaro 1955, en *Horizonto* n-roj 6/76, 1/77 kaj 2/77, kiel ankaŭ en ĉap. 22.3.4 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 767-773), kaj aliloke. Ĉiu interesiĝanto pri tiu tuta afero, decide grava en la historio de Esperanto, devus legi aŭ relegi tion, aŭ almenaŭ la menciitan sekcion en *ĜEP*. Ĉi tie necesas diri kelkajn vortojn nur pri la "urugvajaj menuoj" en la nekultura atako de Prof. Blinkenberg en la Programkomisiono. En la komuniko al la gazetaro, kiun mi diktis al la sekretario de Urugvaja Esperanto-Societo Prof. Victor

Luis Cao, bedaŭrinde forpasinta intertempe, kaj kiu poste aperis en la tuta urugvajaj gazetaro, estis interalie dirite:

"En la menciita Komisiono la reprezentanto de Danlando, evidente ne sciante kion ajn pri la temo – kvankam li diris, ke li estas lingvisto – parolis neserioze kaj senfundamente kun la celo provoki ridojn. Li, ekzemple ne hezitis diri, ke Esperanto eble taŭgas por verki urugvajajn menuojn, sed ne por la literaturo, kvankam je 100 paŝoj de Palacio Legislativo (la parlamentejo, en kiu okazis la Konferenco, nuna rim.) troviĝas Ekspozicio de elstaraj verkoj de la tuta monda literaturo; kvankam en tiu sama Ekspozicio (temas pri la Unua Elmonro de la Universala Ekspozicio de Esperanto, nuna rim.) estas troveblaj verkoj originale skribitaj en Esperanto, ankaŭ de konataj lingvistoj... Per sia kontraŭscienca kaj nekultura sinteno – kiu, krome, estas tre malbela ekzemplo de edukaj metodoj – li ofendis ne nur la 16.500.000 subskribintojn de la Peticio, ne nur la lingvistojn, kiuj parolas Esperanton, sed ankaŭ la landon, kiu gastigas la Konferencon".

La "urugvajaj menuoj" (manĝaĵoj), fakte tre bongustaj laŭ mia memoro, evidente ne plaĉis al Prof. Blinkenberg kaj tial li rigardis ilin tiel "primitivaj", ke Esperanto eble taŭgus nur por esprimi tiajn "primitivaĵojn", sed certe ne por la sublimaj sentoj de amo aŭ por literaturaj verkoj. Tio estis la senco de la "urugvajaj menuoj" en lia interveno kaj tio, en kunteksto de la tuta kontraŭkultura atako, kaŭzis veran kulturalan skandalon en Urugvajo kaj sekve ankaŭ en la medioj de Unesko.

85.2 La "urugvajaj menuoj" en la Dosiero Blinkenberg

Post la forpaso de Prof. Blinkenberg antaŭ kelkaj jaroj, liaj paperoj (notoj, korespondaĵoj, manuskriptoj) estis transdonitaj al la Ŝtata kaj Universitata Biblioteko en Århus (Danio). La afero pri Esperanto en Montevideo formas apartan, tre grandan dosieron. Nia abonanto S-ro Jens Stensgaard Larsen, laŭ profesio bibliotekisto, havis la paciencon fotokopii la tutan dosieron, tajpi la preskaŭ nelegeblajn manskribitajn franclingvajn tekstojn kaj traduki la danajn. Ĉion ĉi li afable sendis al mi, pro kio mi ankaŭ publike dankas al li.

El tiu abunda dokumenta materialo, kiun, fakte, oni devus komplete publikigi, vidiĝas, ke ne temis pri ia subita, nepreparita atako, sed pri bone planita agado por malsukcesigi la Peticion, kiel mi suspektis jam en la tempo de Montevideo. Tie troviĝas, ekzemple, lia unua skizo pri parolado farota en la Programkomisiono, tri pliaj skizoj, pluraj editoritaj versioj de la parolado. El korespondado pri la afero en la dana, angla, franca, hispana kaj germana vidiĝas la partopreno de aliaj personoj,

precipe de Prof. J. Nielsen, plia granda malamiko de Esperanto en la Delegacio de Danio. La dokumentoj evidentiĝas ankaŭ la eĥon, tre malagrablan por Prof. Blinkenberg, kaŭzitan de lia parolado. Tion montras ankaŭ lia dupaĝa skizo por defendo, kiu tamen restis nur skizo kaj neniam aperis. Ĉi tie estu citita nur la parto pri la urugvajaj menuoj, kiun, laŭ la paperoj, li eldiris en la kadro de sia atako de la 4-a de decembro en la Programkomisiono. En fidela Esperanto-traduko el la franca ĝi tekstas:

"Kaj tio estas esenca por ni: Esperanto ne estas, kaj ne povas esti, vera instrumento de kulturo (*substrekitaj en la originalo, nia rim.*) *ĝuste pro sia artefarita karaktero. Ĝi sendube povas servi por peti hotelĉambrom en la 5 aŭ 6 mondopartoj, sed se temas pri kunmeto de bona urugvaja menuo – kaj tie ni jam troviĝas sur la tereno de kulturo – Esperanto jam estus senpova (nia substreko). Kaj kiam oni parolas al ni pri tradukoj de Dante, de Shakespeare, de Racine, de Cervantes, de Goethe, de Dostojevski en Esperanto, oni sentas sin fantazii: la dieca muziko de tiuj grandaj genioj tradukita en lingvo malbone sonanta – kaj precipe sen resonoj profundaj –, lingvo, kiu neniam estis tiu de patrino aŭ de amanto (almenaŭ mi tion esperas), tio ne estas serioza. Sed tio estas tre grava: ĉar tio estas la neado mem de kulturo”.*

Kiel oni vidas, en la supra versio de la parolado, editorita de Prof. Blinkenberg, la urugvajaj menuoj aperas en tute alia lumo, ol en la teksto, kiun mi diktis al Prof. Cao en la nokto tuj post la atako en la Programkomisiono, do kun freŝa rememoro pri ĉio okazinta tie, kaj en ĉeesto de Prof. Fernandez-Menéndez, D-ro Pfefer kaj aliaj montevideaj geamikoj, kiuj ĉeestis tiun hontindan kunsidon de la Programkomisiono. Kiu versio, do, estas ĝusta?

85. 3 Komentoj

La prezento de la interveno de Blinkenberg en la komuniko de la Urugvaja Esperanto-Societo, kiun mi diktis al Prof. Cao, estas absolute ĝusta. Leginte nun lian editoritan version, mi fakte eĉ iom miris kiel mi povis tiel fidele resumi lian paroladon. Pri ĝi, inkluzive la urugvajajn menuojn, aperis artikoloj en la urugvaja gazetaro tuj la sekvintan matenon kaj abunde en la postaj tagoj. Ankaŭ la Montevidea Radio raportis kaj intervjuis min pri la afero. Okazis kultura skandalo, kiu ŝokis la publikan opinion de Urugvajo. Se tiuj informoj, ege embarasaj por Prof. Blinkenberg, ne estus ĝustaj, do li mem, aŭ la Ambasadato de Danio en Montevideo, aŭ la urugvaja Ministro de Edukado (samtempe prezidanto de la Konferenco) estus dementinta tiun eron, sed nenia

demento okazis. Same tiel Prof. Blinkenberg ne povis dementi la faktojn, kiujn mi kiel observanto de UEA prezentis en mia protesta letero de la 8-a de decembro 1954 al la Prezidanto de la Konferenco kun kopioj al la Ĝenerala Direktoro kaj la Prezidanto de la Ekzekutiva Komitato, distribuita tuj poste de la Sekretariato en la tiamaj laboraj lingvoj de Unesko al ĉiuj delegacioj. Pretere dirite, en tiu letero Prof. Blinkenberg ricevis bonan lecionon ankaŭ pro sia impertinenta diro, ke Esperanto ne taŭgas por literaturaj celoj, nek povas servi por esprimi amon. (La interesiĝantoj v. tiun leteron en *Esperanto* n-ro 2/1955, p-oj 57-59).

La malsameco inter la fakte eldirita parto rilate la urugvajajn menuojn kaj la teksto en la dosiero estas facile eksplikebla:

(i) Povas esti, ke la nuna teksto estis skribe preparita kiel gvidlinio por la parolado. Ĉar Blinkenberg libere parolis (ne legis), kiel estas kutimo en debatoj, li en sia malŝato de la urugvajaj manĝaĵoj kaj preskaŭ patologia malamo al Esperanto eldiris ion alian, "maldiplomatan", ol li "diplomate" antaŭpreparis. Ke la "urugvajaj menuoj" obsedis lin, montras ankaŭ unu el la skizoj de parolado: sur tiu paperfolio li per kraĵono aldonis marĝene "oni eĉ ne povus kunmeti /en Esperanto/ bonan urugvajan menuon".

(ii) Estas ankaŭ eble, eĉ pli verŝajne, ke la nuna teksto estas editorita versio de tio, kion li fakte diris. Kiel konate, en ĉiuj interŝtataj organizaĵoj (kaj en diplomatio ĝenerale) oni sendas la tekstojn de paroladoj kaj intervenoj al la delegito/reprezentantoj, kiuj faris ilin, por ke ili eventuale korektu la tekstojn antaŭ la publikigo en la oficialaj dokumentoj. Se oni konsideras la bruegon, kiun kaŭzis lia interveno, kaj la embarason, kiun li kreis per ĝi por si mem kaj por la dana registaro, oni povas esti preskaŭ certa, ke la nuna teksto estas esence ŝanĝita protokolo (surbendigita) rilate la eron pri la urugvajaj menuoj. Cetere, tiu ero logike sekvas (laŭ lia pensmaniero, kompreneble) post la ero pri la hotelĉambroj, ĉar mencio de hoteloj necese elvokas ideon pri restoracioj, precipe en menso de nelerta oratoro ne kapabla regi siajn pensojn, krome ekscitita kaj en tia stato elvaviganta sian malamon al Esperanto, pri kiu li fakte sciis nenion. Post tio sekvas la kontraŭtezo "Et quand on nous parle..." ("*Kaj* kiam oni parolas al ni..."), en kiu verŝajne la originala "mais" (sed) estas sufiĉe nelerte ŝanĝita al "et" (kaj). Evidente, en tia kunteksto la parolada strukturo estas: "Ĝi /Esperanto/ sendube povas servi por peti hotelĉambron en la 5 aŭ 6 mondopartoj aŭ por kunmeti urugvajan menuon. Sed kiam oni parolas al ni pri tradukoj de Dante, de Shakespeare ...".

(iii) Tuj post la finiĝo de la Konferenco mi klopodis havigi kopion de

ĉiuj magnetofone registritaj partoj rilatantaj al Esperanto. La Sekretariato donis al mi kopion de tiu parto de la plenkunsido de la 10-a de decembro, kiu rilatis al la diskuto pri Esperanto kaj la fina akcepto de la Rezolucio (mi plu konservas ĝin), sed sub diversaj pretekstoj rifuzis doni al mi sonbendan kopion de la debato en la Programkomisiono kun la interveno de Blinkenberg. Pro la tuta atmosfero de tiu kunsido, hontinda ne nur por Blinkenberg, sed ankaŭ por la plimulto de la ĉeestantaj delegitoj – ridoj de ignorantoj ja eksplodadis post la mencioj de la "urugvajaj menuoj", la "amantoj" kaj aliloke – tio estas tute komprenebla. Sed la ridoj jam delonge estis ĉesintaj, kiam la 10-an de decembro, en atmosfero plej solena kaj digna, en la ĉeesto de ĉiuj ĉefoj de delegacioj, la Ĝenerala Konferenco en sia lasta plenkunsido akceptis la Rezolucion. La dosiero de Prof. Blinkenberg en la Ŝtata kaj Universitata Biblioteko de Århus ne povas ŝanĝi historian fakton.

85.4 Prilingva postnoto

Kvankam lingvoprofesoro, Prof. Blinkenberg montris per siaj malfeliĉaj urugvajaj menuoj en kiu ajn el la versioj, ke li nenion komprenas pri la rilato inter lingvo kaj socio. Se io estas netradukebla en la vera senco de la vorto "traduki", tio estas la nacilingvaj nomoj de specife naciaj/etnaj objektoj aŭ nocioj, por kiuj, ĝuste pro la specifeco, ne ekzistas esprimoj en aliaj lingvoj. Al tiu kategorio apartenas ankaŭ la nomoj de specife naciaj aŭ eĉ nur regionaj/lokaj manĝaĵoj. La italaj *pizza*, *spaghetti*, *maccheroni*, *cannelloni* ktp., aŭ *ĉevap*, *ĉevapčić*, *sarma* ktp. en la jugoslaviaj lingvoj, kaj simile en ĉiuj aliaj, estas netradukeblaj. En aliaj lingvoj plej ofte ili estas uzataj en la originala formo, en restoraciaj menuoj kutime kun nacilingvaj mencioj pri la ingrediencoj. Esperanto ankaŭ tiurilate superas la naciajn lingvojn, ĉar eĉ tiaj vortoj povas esti facile kaj sukcese asimilitaj: spageto/j/, makaronio/j/, kanelono/j/, pico/j/, sarmo/j/, ĉevabo/j/, ĉevabeto/j/ ktp., el kiuj pluraj jam troviĝas en *Plena Ilustrita Vortaro*, dum aliaj povas esti laŭbezzone asimilitaj sen komplikaĵoj. Tial la elekto de la "urugvajaj menuoj" fare de Prof. Blinkenberg estis komplete maltrafa ankaŭ el pure lingvistika vidpunkto. Per ĝi li celis ridindigi la kulturajn atingojn kaj potencialojn de tiu, laŭ li, "primitiva lingvo", sed fakte li kompromitis siajn lingvosciencajn sciojn kaj ridindigis sin mem.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22. 3. 4 de *Esperanto en Perspektivo*.

86 Sovetiisma propagando en la nederlanda KEG

"Rusoj pri Paco" estas la titolo, sub kiu en la nederlanda *Komuna Esperanto-Gazeto* (KEG) aperis komence de 1984 en Esperanto-traduko la "Alvoko" de la Supera Soveto de USSR kaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Soveta Unio de la 22-a de decembro 1982 "al Parlamentanoj, Registaroj, Politikaj Partioj kaj Popoloj de la Mondo". Temas pri unu plia en la longa vico de sovetiismaj propagandaj/agitadaj aktoj celantaj altiri la simpatiojn de la "pacifistoj en la burĝa kampo", "senmoraligi la malamikon" kaj tiel malfortigi ĝian rezistokapablon, kiel Lenin aperte deklaris jam en 1922. Kun la escepto de kompletaj politikaj ignorantoj, al tiaj pure propagandaj/agitadaj materialoj neniu plu kredas, inkluzive, espereble, la grandan plimulton de la legantoj de KEG.

Estas vero, ke la Alvoko aperis en tiu parto de KEG, kiu estas rezervita por FLE kaj redaktata de ĝi, sed tio ne multon ŝanĝas en la afero. Cetere, estas dubinde, ĉu la demokrataj nederlandaj laboristoj-esperantistoj estis tre feliĉaj vidi tian tekston en sia parto de KEG. Estu kiel ajn, D-ro P. H. van Terwisga, membro de Nederlanda Esperanto-Asocio (NEA), trafe reagis per mallonga letero, kiu aperis en la aprila n-ro de KEG. Nun okazis io preskaŭ nekredibla. Anstataŭ danki al D-ro van Terwisga pro lia reago, la estraro de NEA sendis al li la 15-an de majo 1984 riproĉan leteron, en kiu estis, interalie, dirite:

"Ni devas komuniki al vi, ke ni en nia estrarkunveno de la 9-a de majo 1984 kun iom da bedaŭro preparolis vian artikolon en la aprila n-ro de KEG, "Rusoj pri Paco". Ni devis opinii, ke la enhavo de tiu artikolo transiris la neŭtralecon de nia societo... "

Do, laŭ la opinio de la estraro de NEA, aliĝinta asocio de UEA kun sidejo en Nederlando, publikigi en KEG sovetiisman partipolitikan propagandon estas tute en ordo, sed reagi (eĉ ne per "artikolo", sed per kelklinia letero) signifas "transiron de neŭtraleco" de NEA, do kontraŭneŭtralecan agon!

Okazis plia korespondado inter D-ro van Terwisga, kiu postulis pardonpeton pro tiu ofenda riproĉo de la estraro, unuflanke, kaj la sekretario de NEA, D-ro Verloren van Themaat, kiu preteratentis tiun pravan postulon, aliflanke. Estu citita nur esence grava parteto el la letero de D-ro van Terwisga de 29.07.84 al la estraro de NEA:

"Cetere ŝajnas al mi tre dezirinde, ke la aranĝo koncerne la kunlaboradon inter la partoprenantoj [organizaĵoj] en KEG estu ŝanĝita. Se unu el la partioj

(kiel la sola) pretendas havi la rajton esti politike neneŭtrala kaj vi kontestas al mi la rajton reagi, mi certe nuligos mian abonon kaj eksiĝos el membreco. Se, kontraŭe, vi kontentas esti kunvojaĝantoj de la sovetiistoj, estas via afero. Mi, tamen, certe ne kuniros tian vojon, kiu ŝajnas al mi treege malfavora al la Esperanto-Movado (ekster la komunistaj landoj)".

Pri tiu tuta afero aperis nenio en KEG. Kion pensas pri tio la membroj de NEA, la kristanoj en KUNE kaj ankaŭ la laboristoj en FLE ?

87 Kontrakto pri kunlaboro inter UEA kaj la sovetiisma MEM

Dum la Universala Kongreso de UEA en Budapeŝto (1983) la reprezentantoj de tiu Asocio, D-roj H. Tonkin kaj R. Corsetti, renkontiĝis kun S-ro Romeŝ Ĉandra, prezidanto de Monda Packonsilio, la ĉefa el la dek plej gravaj sovetiismaj t.n. frontorganizaĵoj. *Kongresa Budapeŝta Informilo*, n-ro 1 de 30.07.83 sciigis tion diklitere sur la unua paĝo sub granda titolo "NOVAJ PAŜOJ AL ESTONTO" (v. p. 149 en *Horizonto* n-ro 6/1984). Fakte, ne temis pri "novaj paŝoj", sed pri plia paŝo sur la descenda vojo de politikiĝo de UEA. Ĝi komenciĝis en Hamburgo (1974) kaj nun kondukis eĉ al formala kontrakto pri kunlaboro inter UEA kaj la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado, filio de la Monda Packonsilio, siavice sklavece sekvanta la sovetiisman partipolitikan linion. Tio okazis dum la pasinta UK en Vankuvro, kiel informis *Esperanto* en n-ro 9/84 sur p. 152. Verŝajne ĝi estas unu el la pliaj "novaj paŝoj" interkonsentitaj kun la prezidanto de la Monda Packonsilio, kiujn tiel klare kaj pompe antaŭanoncis *Kongresa Budapeŝta Informilo* en 1983 (v. p. 162).

Tia kruda malobservo de neŭtraleco – fakte nur aperta formaligo de la jam ekde Hamburgo praktikataj kontraŭneŭtralecaj agadoj – neniam okazis, nek estus povinta okazi antaŭ la eventoj de 1974. La antaŭa Statuto de UEA, strikte observata de la tiamaj komitatoj kaj estraroj de la Asocio, ja permesadis en Art. 16 kontraktojn pri kunlaboro kun internaciaj neneŭtralaj Esperanto-Asocioj, sed nur "*kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de Art. 4*", t.e. kun la principo de neŭtraleco, klare kaj precize formulita en la tiamaj Art. 4. Intertempe ambaŭ artikoloj – 16 kaj 4 – estas radikale ŝanĝitaj kun la evidenta celo malfermi la pardonon al neneŭtralaj, eĉ ideologie kontraŭneŭtralecaj organizaĵoj, ĉu en formo de aliĝo, ĉu en tiu de kontrakto pri kunlaboro. Cetere, kial la estraro de UEA ne publikigas tiun kontrakton? Ĉu en la Komitato de UEA neniu kontraŭstaris la aprobon? Kiom da komitatanoj, fakte, voĉdonis por la aprobo, kaj kiom kontraŭ, kaj ĉu ne ĉiuj komitatanoj el la

blokaj landoj voĉdonis por? Ne sole la membroj de UEA, sed ankaŭ aliaj esperantistoj, en kies nomo UEA plu pretendas paroli, rajtas plene sciiĝi pri la vero. Almenaŭ la individuaj membroj, kiuj formas la kernon de la Asocio kaj kreas ĝian financon bazon, povus kaj devus postuli klarigon pri tiu plia kruda kontraŭneŭtraleca ago. Ili ja estas la ĉefa kaj esenca parto en la strukturo de UEA. Tial, unuavice en ilia nomo oni faras tiajn kompromitajn kaj, krome, plene superfluajn kontraktojn kaŭzantajn nur malbonon, eĉ ne ereton da bono por Esperanto.

La eroj 83 kaj 84 kompletigas ĉap. 15.2.25 kaj ĉap. 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo*.

88 Stratoj, placoj kaj aliaj objektoj kun nomoj rilatantaj al Esperanto

Post dudekjara observado kaj esplorkonkludo S-ro Hugo Röllinger el Bad Kissingen (FR Germanio) kunmetis precizan statistikon pri ĉiuj stratoj, placoj, ĝardenoj, parkoj, ks. kun la nomo/j/ Esperanto kaj/aŭ Zamenhof, kiel ankaŭ pri monumentoj, memortabuloj ks. dediĉitaj al Esperanto kaj/aŭ Zamenhof. Laŭ tiu valorega dokumento, entute ĝis la 30-a de septembro 1984 ekzistis en 29 landoj 449 tiaj publikaj "objektoj". Laŭ la statistiko, kiun faris la siatempa Centro da Esploro kaj Dokumentado (CED), la 5-an de julio 1964 ekzistis 238 objektoj en 21 landoj. Laŭ la dokumento de la sama CED (Dok. A/5/3), la 31-an de decembro 1965, la nombro kreskis al 291 objektoj en 25 landoj, tiel ke la nuna statistiko montras plian konsiderindan kreskon. La tre konsciencie ellaborita dokumento de S-ro Röllinger estas dividita en pluraj partoj. En parto A troviĝas koncizaj informoj pri la nombrokresko de publikaj objektoj kun nomoj rilatantaj al Esperanto kaj/aŭ Zamenhof. En parto B estas indikitaj la fontoj. En C troviĝas listo de mallongigoj, kiuj en la ĉefa parto D montras pri kio fakte temas: avenuo, bulvaroj, ĝardeno, monumento, parko, placo, ŝipo, tabulo. En D estas indikitaj en alfabeto la landoj, urboj, karaktero de la objektoj kaj jaro de inaŭguro. En parto E troviĝas resuma bilanco pri la nombro de objektoj en unuopaj landoj. La rekordon havas Francio kun 82 objektoj. Sekvas Brazilo kun 48 objektoj, FR Germanio kun 44 objektoj, Bulgario kaj Pollando kun 42 ktp. Fine, en parto F la aŭtoro donas utilajn kaj saĝajn konsilojn pri la utiligo de la dokumento fare de la landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj por inaŭguro de pliaj stratoj, placoj, ĝardenoj kaj aliaj Esperanto-"objektoj" precipe lige kun la Jubilea Jaro en 1987.

Kiel konate, en la Baza Agadprogramo por la Jubilea Jaro, kiun ICNEM proponis kiel komunan vastan kadron de aktivadoj por tiu unika kultura evento, sed kiun UEA rifuzis eĉ pridiskuti, troviĝas ankaŭ ero pri starigo de pliaj monumentoj al Zamenhof aŭ Esperanto, kaj pri pliaj placoj, stratoj ktp. kun nomoj rilatantaj al Esperanto aŭ Zamenhof kiel aŭtoro aŭ iniciatinto (nepre ne "inventinto") de la Internacia Lingvo. Kvankam la ideo pri komunaj agadoj bedaŭrinde fiaskis, nenio malhelpas, ke la lokaj Esperanto-societoj klopodu realigi tiun eron. La okazo estas unike taŭga: centjara datreveno de Esperanto, kaj la precedentoj – tre gravaj por sukcesigi la klopodojn – multnombraj, kiel evidentigas la pritraktata dokumento. Fakte, ĝi interesos ĉiun seriozan esperantiston, sed ĝi estas nemalhavebla por tiuj, kiuj intencas entrepreni paŝojn ĉe siaj lokaj aŭtoritatoj cele al inaŭguro de iu Esperanto-"objekto" en la koncerna loko. Oni ne forgesu, ke tiaj Esperanto-"objektoj" estas ne nur rekonoj al D-ro Zamenhof kaj al la granda valoro de lia genia verko, sed ankaŭ daŭra atentigado pri la ekzisto kaj funkciado de la Internacia Lingvo.

La aŭtoro verkis sian dokumenton "omaĝe kaj gratule al la Fondinto de CED", pro kio la redaktoro de tiu ĉi rubriko ankaŭ publike dankas al li. La stencilita 20-paĝa dokumento en formato A4 kostas nur 4 internaciajn respondkuponojn. Post la 1-a de marto 1985 oni povos ĝin mendi je la adreso de la aŭtoro: *S-ro Hugo Röllinger, Theresienstr. 23, D-8730 Bad Kissingen, FR Germanio.*

Tiu-ĉi ero kompletigas kaj anstataŭigas Dok. A/5/3 de la iama *Centro de Esploro kaj Dokumentado*.

89 Konferencoj kaj raportoj de CED en la angla aŭ CRD kontraŭ CED

89.1 CRD kontraŭ CED

Ĝis nun okazis en New York tri konferencoj de la anglalingva *Center for Research and Documentation on World Language Problems* (CRD), t.e. la nuna laŭnoma posteulo de la iama Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo (CED), fondita la 1-an de januaro 1952 kaj funkcia sub tiu nomo kaj laŭ la originaj celoj ĝis la fino de 1974. Ĝia fundamenta celo estis aperte – do, ne kaŝe aŭ sub falsaj pretekstoj – pledadi por la Internacia Lingvo (Esperanto) laŭ sciencaj metodoj kaj per sciencaj argumentoj bazitaj sur rigore kontrolitaj faktoj. Pri la agadoj kaj atingoj de la tiutempa CED ĉiu interesiĝanto povas koncize informiĝi el la verko *Esperanto en Perspektivo*, eldonita de CED en 1974 (p-oj 669-678), kaj pli detale el la Raportoj de CED en la *Jarlibroj* de UEA 1952-1975.

Tio, kio nun okazas sub la nomo de CED, se entute io okazas, ne nur ne havas kion ajn komunan kun la antaŭhamburga CED, sed rekte kontraŭas al ĝiaj originaj celoj kaj al ĝia tuta senco, kiel plian fojon evidentigas la Raportoj pri la novjorkaj konferencoj.

89.2 Neutiligeblaj materialoj

La temo de la unua konferenco (decembro, 1982) estis *"World Communications Year 1983: Language and Language Learning"* (Monda Jaro de Komunikado: Lingvo kaj Lingvolernado). La Raporto havas 96 paĝojn. La temo de la dua konferenco (decembro, 1983) estis *"Language Behaviour in International Organizations"* (Lingva Konduto en Internaciaj Organizaĵoj). La Raporto ampleksas 156 paĝojn. Kun la escepto de unusola kontribuado en la franca, ĉio cetera en la du Raportoj estas en la angla. Eĉ ne unu kontribuado en Esperanto, aŭ almenaŭ resumeto en Esperanto de iu el la nacilingvaj kontribuadoj. Aldone al inaŭguraj paroladoj en la angla (unu en la franca) dum la lastjaraj kongresoj de UEA, kio estas senprecedenca skandalo, nun, do, ankaŭ la iama CED, nun CRD, angliĝas. La tria konferenco estis okazonta la pasintan decembron (1984), sed ni ne scias, ĉu ĝi fakte okazis. Raporto pri tiu konferenco, se ĝi okazis, ne atingis nin.

En la du Raportoj estas pritraktitaj diversaj temoj, ekz. la lingva edukado en Usono, la nova teknologio de lingvolernado, la organizacia kaj individua dulingvismo en la Sekretariato de UN, la pozicio de la hispana en la Sekretariato de UN, la interŝanĝoj de tradukistoj kaj terminologoj sur la internacia scenejo (en la franca), eĉ la lingvaj problemoj dum la multnaciaj militaj operacioj en Koreio. Kelkaj el la kontribuadoj estas neinteresaj, sed pluraj estas vere valoraj. La tutan valoran parton la antaŭhamburga CED sendube estus utiliginta kiel solidan bazon por prilaboro kaj publikigo de dokumentoj – en Esperanto, kompreneble – bone uzeblaj de la tiamaj preskaŭ cent kunlaborantoj de CED kaj de trideko da tiutempe funkciantaj landaj informaj fakoj de UEA cele al plua kaj plia argumentado favore al la Internacia Lingvo kaj fortikigo de ĝiaj pozicioj. Ĉi tiel praktike estos nenia utilo, ĉar (i) anglalingvaj tekstoj (unu en la franca) ne estas uzeblaj de tiuj, kiuj ne scias la anglan (en unu kazo la francan), kaj eĉ la anglalingvaj organizantoj de tiuj konferencoj devus scii, ke amaso da esperantistoj ne scias la anglan, kaj ke eĉ la sciintoj aktivus por Esperanto kiel lingvo de internacia komunikado, kaj mem uzas ĝin tiucele, ne la anglan aŭ kiun ajn alian nacian lingvon; (ii) internacia reto de CED-kunlaborantoj ne plu ekzistas; (iii) CED-dokumentoj en Esperanto kun nacilingvaj tradukoj ne plu estas eldonataj;

(iv) ankaŭ la informa aparato de UEA kun multnombraj landaj informaj fakoj jam delonge komplete kolapsis (laŭ la financa raporto de UEA por 1984 la t.n. "propaganda konto" konsistis el 0 /nulo/ guldenoj). En tiaj kondiĉoj, bedaŭrinde, valoraj informoj pri faktoj, donitaj de kompetentaj personoj, precipe rilate la lingvan situacion en la Sekretariato de UN, restos morta kapitalo el la vidpunkto de la intereso de Esperanto.

89.3 Esperanto ne ekzistas

Neniu el la kontribuajtoj pritraktas kiun ajn el la multaj aspektoj de la lingva obstaklo al internacia komunikado lige kun la realaj kaj potencialaj solvoj, kiujn prezentas Esperanto. Eĉ ne unu el la Esperanto-parolantoj, kiuj partoprenis la du konferencojn (H. Tonkin, B.A. Sherwood kaj J. Pool), venis al ideo prezenti raporton pri la aktuala uzo de Esperanto kiel instrumento de lingva komunikado en internaciaj rilatoj sur diversaj niveloj, nome ekde simplaj personaj kontaktoj ĝis la utiligo de la lingvo por fakaj kaj sciencaj celoj. Fakte, se oni esceptas la kontribuajton de Bruce Sherwood pri lernado de Esperanto helpe de elektronika korektado de la prononco (pri kies valoro ni ne povas juĝi, ĉar ni ne scias, ĉu la "instruisto" de la maŝino "instruis" al ĝi la ĝustan prononcon), eĉ la nura vorto "Esperanto" apenaŭ troveblas en la du volumoj. En la nuna CRD, kontraŭe al la iama CED, la Internacia Lingvo praktike ne ekzistas. Oni ricevas la impreson, ke oni timas eĉ la vorton "Esperanto".

Laŭ la Jarlibro de UEA, la nuna estraro de CED (angle CRD) konsistas el H. Tonkin (respondeca estrarano), D. Blanke, P. Daŝgupto, B. Golden, U. Lins., J. Pool, B. Sherwood kaj E. Symoens. Ne estas konate, ĉu tiu estraro fakte ion faras, ĉar absolute neniam rezultoj estas videblaj, se oni esceptas la anglalingvajn novjorkajn konferencojn. Tamen estus interese scii, ĉu la tuta estraro decidis havi tiaspacajn konferencojn kaj, se jes, ĉu ĉiuj estraranoj aprobas ilian anglalingvan, Esperanto-kaŝan karakteron.

89.4 Ne nur intelekta stagno, sed intelekta malhonesteco

Kiel *Horizonto* informis en n-ro 4/85 sur p. 86, UEA publikigis bruŝuron pri la rilatoj inter UEA kaj Unesko, en kiu ne troviĝas unusola linio pri mi, eĉ por ne paroli pri miaj iniciatoj kaj atingoj sur tiu kampo: konsultaj rilatoj, Rezolucio de 1954 favore al Esperanto, Serio Oriento-Okcidento, diversaj eldonaĵoj en Esperanto (ne en la angla!) je la kostoj de Unesko, ktp. dum mia fakta gvidado de la eksteraj rilatoj de UEA dum pli ol kvaronjarcento. En la Esperanto-elsendo de la Svisa Radio de 03.11.84 C. Gacond nomis tian prisilentadon "intelekta stagno".

En la fino de ambaŭ pritraktataj Raportoj troviĝas informoj pri tiu CRD, laŭnome – estu ripetita – daŭrigo de la iama CED. Plian fojon mia nomo eĉ ne estas menciita. Absolute nenio estas dirita pri la fondo de CED, pri la libroj kaj centoj da dokumentoj, kiujn ĝi publikigis, pri la fondo kaj regula aperado de la prestiĝa revuo *La Monda Lingvoproblemo* sub aŭspicioj de CED, nek pri kiu ajn alia agado de CED dum ĝia 23-jara funkciado sub mia honorofica direktoreco. Plue, ne estas menciita la fakto, ke CRD (CED) estas institucio de UEA.

Tia prisilento – fakte nur parteto de la ĝenerala multjara prisilentado kaj mis prezentado de kio ajn ligita al mia nomo – estas neimagebla en kiu ajn kultura organizaĵo, des malpli en institucio pretendanta sciencecon. Tio ne estas sole "intelekta stagno". Ĝia vera, neeŭfemisma nomo estas intelekta malhonesteco. Tion mi diras sen ereto da persona amaro – nenio en la nuna UEA povas en kiu ajn senco amarigi min persone –, sed ja kun sento de profunda bedaŭro pro la terure falinta intelekta kaj etika niveloj de la gvidaj instancoj de UEA, kio en la nunaj kondiĉoj necese stampas la Asocion kaj, eĉ pli bedaŭrinde, kompromitas la Esperanto-Movadon kaj la lingvon mem.

Ĉu fakte ĉiuj membroj de la estraro de CED (CRD) – ekzemple Daŝgupto, Golden, Lins, Symoens por menci i kelkajn nomojn eksplicite – aprobas tiajn falsajojn? Ĉu inter la komitatanoj de UEA ne troviĝas almenaŭ kelkaj, kiuj kondamnas ilin? Se jes, kiel mi supozas, kial ili ne aŭdigas publike siajn voĉojn? Kaj, fine, ĉu la Membroj de la Patrona Komitato de UEA kaj almenaŭ parto de la Honoraj Membroj de la Asocio ne devus rekonsideri sian Patronecon resp. Honoran Membrecon por ne kompromiti siajn honorindajn nomojn per patronado resp. honorigado de organizaĵo regata laŭ metodoj aplikataj nur en totalismaj ŝtatoj? Nun mi plian fojon konstatas kiel prave mi agis, kiam jam en 1974 mi ekŝiĝis el Honora Membreco kaj rifuzis akcepti la proponitan Honoran Prezidantecon de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo* kaj la tutan verkon *Hamburgo en Retrospektivo*.

90 Pliaj lingvaj problemoj en EEK de Dek Du

90.1 Egalrajteco de lingvoj

En la Eŭropa(j) Ekonomia(j) Komunaĵo(j) /EEK/ ĉiuj lingvoj de la ŝtatoj-membroj estas oficialaj kaj egalrajtaj. En la komenco, en la t.n. Eŭropo de SES (Belgio, Francio, FR Germanio, Italio, Luksemburgo kaj

Nederlando), nur 4 lingvoj estis oficialaj: la franca, germana, itala kaj nederlanda. Post la aliĝo de Britio, Danio kaj Irlando en 1973 aldoniĝis du pliaj oficialaj lingvoj, la angla kaj dana, ĉar Irlando uzas la anglan (pro konstituciaj kaŭzoj nur la aliĝtraktato estis en la gaela). En 1981, post la aliĝo de Grekio, ankaŭ la greka fariĝis oficiala. Kiam la 1-an de januaro 1986 Hispanio kaj Portugalio fariĝos membroj de EEK, iliaj du lingvoj estos aldonitaj. Do, en Eŭropo de Ses estis 4 egalrajtaj oficialaj lingvoj, sed en Eŭropo de Dek Du ilia nombro altiĝos al 9. Tio konsiderinde komplikos la jam pli ol komplikitan kaj tre multekostan lingvan situacion.

La redaktoro de tiu ĉi rubriko jam abunde pritraktis en studoj, artikoloj kaj prelegoj la lingvan problemon en internaciaj rilatoj ĝenerale, kaj speciale en diversaj internaciaj institucioj, inkluzive de la eŭropaj, laste en ero 80 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 2/84. Ĉi tie estu tuŝitaj nur kelkaj novaj aspektoj, kiujn frontos EEK de Dek Du.

90.2 Problemoj pro la dana kaj greka

En la Komunaĵo de Ses kun kvar lingvoj nur ok interpretistoj sufiĉis por ĉiu kunveno aŭ kunsido de la diversaj organoj kaj instancoj de EEK, ĉar ĉiu interpretisto devas esti kapabla interpreti el du fremdaj lingvoj en sian gepatran. Kiam en 1973 estis aldonitaj la angla kaj dana, kaj precipe post la aldonado de la greka en 1981, la problemado de interpretado kaj tradukado fariĝis multe pli kompleksa kaj multekosta. Interalie, problemojn en la komenco kaŭzis ankaŭ la malebleco trovi kompetentajn interpretistojn por la kombinaĵo dana-greka, kiel sciigas n-ro 6/85 de *Europe 85*, organo de la Komisiono de EEK, el kiu ni ĉerpas la informojn. Tial la Komisiono decidis mem trejni konferencajn interpretistojn por la du lingvoj. Ĝi instigis plurajn konstantajn interpretistojn lerni la danan kaj grekan por atingi almenaŭ pasivan tradukan kapablon.

90.3 Progresia kresko

Ĉar ĉio dirita aŭ skribita en kiu ajn oficiala lingvo devas esti interpretita/tradukita en ĉiujn aliajn oficialajn lingvojn, la nombro de lingvaj kombinaĵoj progresie kreskas laŭ la formulo $n(n-1)$, en kiu n estas la nombro de lingvoj. Sekve la nombro de lingvaj kombinaĵoj de la iamaj 4 oficialaj lingvoj estis 12; por la nunaj 7 oficialaj lingvoj ĝi estas 42; kaj por la 9 oficialaj lingvoj ekde 01.01.1986 ĝi estos 72. Tial por ĉiu kunveno necesos havi minimume 30 interpretistojn por la 72 lingvaj kombinaĵoj. Nuntempe la kostoj de interpretado por la 7 lingvoj (42 kombinaĵoj)

estas 3000 anglaj pundoj tage por ĉiu kunveno. La Komisiono, Konsilio de Ministroj, Ekonomia kaj Socia Komitato kaj Eŭropa Investa Banko ĉiujare kunvenas dum ĉ. 8300 tagoj. Do, la interpretado – sen kalkuli ĉiujn aliajn altegajn kostojn de la lingvaj servoj – nur en la menciitaj organoj/instancoj kostas ĉ. 25 milionojn da anglaj pundoj jare. En EEK de Dek Du kun 9 oficialaj lingvoj (72 kombinaĵoj) tiuj kostoj duobliĝos. Al tiuj kostoj necesas aldoni la kostojn de aliaj organoj/institucioj de EEK, ekzemple la Kortumo aŭ la Eŭropa Parlamento, en kiu ĉiu eldirita vorto nuntempe kostas 5 anglajn pundojn por interpretado. Verŝajne la plej multekostaj vortoj en la historio de la homaro! Tiujn kaj multajn aliajn kostojn de multlingveco finfine pagas la civitanoj de la ŝtatoj apartenantaj al EEK.

90.4 Lasta momento por ekagi

Ju pli komplikiĝas la lingva situacio en EEK – kaj ekster ĝi en la tuta mondo, sed tio restu flanke en la nuna momento – des pli kreskas la ŝancoj de Esperanto. Sed, kompreneble, la ŝancoj per si mem solvos absolute nenion, se oni ne scias ĝustatempe, laŭplane kaj kompetente utiligi ilin. Tiun grandan, komplikan kaj respondecan taskon ne kapablas plenumi unuopuloj, kiom ajn bonintencaj, sed nur kompetentaj instancoj kun kompetentaj kaj sindonoj kunlaborantoj en la landoj de EEK surbaze de bone pripensita perspektiva agadprogramo. Tian agadprogramon la redaktoro de tiu ĉi rubriko ellaboris jam en 1977 kaj Eŭropa Klubo akceptis ĝin en 1978 en iom amendita formo. Tiutempo ŝajnis, ke Eŭropa Klubo povus realigi ĝin, sed bedaŭrinde nenio okazis. Nun Eŭropa Klubo estas likvidata, eble eĉ likvidita. Kiu alia kapablas plenumi la taskon? Eŭropa Esperanto-Centro? Eŭropa Esperanto-Unio? UEA mem? Dubinde en la nunaj cirkonstancoj. Kaj tiel plej kredeble plia bonega ŝanco restos sen kia ajn rezulto. En ĉiu okazo, al seriozaj kaj bone planitaj klopodoj ni ĉiam estas pretaj doni nian fakan helpon.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 1.3.5 de *Esperanto en Perspektivo*.

91 Nova historia verko de M. Gjivoje (Ĝivoje) pri la jugoslavia Esperanto-Movado

91.1 Ĉirkaŭ 1200 biografioj

En la eldono de "Voĉo" (Borovo, Jugoslavio) ĵus aperis *Leksikono de Aktivaj Jugoslaviaj Esperantistoj*, la lasta el la verkoj de Marinko Gjivoje (1919-1982), je kiu li laboris ĝis la lasta momento de sia vivo, sed ne

sukcesis fini. Tial Lucija Borčić, tre aktiva en la Esperanto-Societo "Bude Borjan" en Zagreb, iom kompletigis kaj finredaktis ĝin.

La libro havas 312 paĝojn, el kiuj 283 entenas pli aŭ malpli koncizajn biografiojn de aktivuloj ekde la komenciĝo de la Esperanto-Movado en la landoj de hodiaŭa Jugoslavio antaŭ la Unua Mondmilito ĝis la nuntempo. Sur ĉiu paĝo troviĝas meze 3-5 biografioj, tiel ke la tuta libro donas informojn pri ĉ. 1200 personoj. La verko estas rezulto de vere grandega laboro, kiu por la lasta fojo konfirmas la esportalenton kaj laborkapablon de la aŭtoro.

Oni ne povas atendi, ke en tia verko ne enestos eraroj. Agrabla surprizo estas, ke ilia nombro estas malgranda kaj ke temas pri relative ne tre gravaj ellasoj, neĝustaj aldonoj kaj, en iuj okazoj, foresto de objektiva pritakso de la rolo, kiun ludis unuopaj personoj en la Jugoslavia Esperanto-Movado.

91.2 Kelkaj ekzemploj

Jen nur kelkaj ekzemploj de malĝustaĵoj en la biografioj de kelkaj el la multaj aktivuloj, kiujn la redaktoro de tiu ĉi rubriko persone konas aŭ konis.

Danko Bedeković, la filo de Danica Bedeković (pionirino en Kroatio ekde 1905), tute ne estas menciita, kvankam li tre aktivis en Studenta (poste Akademia) Esperanto-Klubo en Zagreb dum siaj studentaj jaroj. Aliflanke, en la biografioj de Danica Bedeković kaj de pluraj aliaj troviĝas mencioj, ke ili estis kunfondintoj de tiu fama klubo en 1929, kvankam la solaj kunfondintoj estis Ivo Godek kaj la redaktoro de tiu ĉi rubriko, tiutempe studentoj de la unua jaro en la Universitato de Zagreb. D-ro Ante Gropuzzo ne estis advokato, sed juĝisto de supera kortumo en Zagreb. Ne estis li, kiu "esperantigis sian tutan familion", sed lia filino Nada Gropuzzo, ellerninte Esperanton kiel tre juna gimnazianino en unu el miaj kursoj, "esperantistigis" siajn gepatrojn kaj gefratojn tiel, ke ili ĉiuj ellernis la lingvon en miaj postaj kursoj. Similaj eraretoj troviĝas ankaŭ en kelkaj aliaj biografioj.

En la biografieto, kiun mi sendis al Marinko Gjivoje laŭ lia siatempa peto, troviĝas kelkaj informoj, kiuj en la libro estas ellasitaj. Aliflanke, aŭ la aŭtoro aŭ la redaktorino aldonis, ke mi "estas ekde 1976 kunfondinto de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj la revuo *Horizonto*", kio ne estas ĝusta. Mi nek fondis, nek povis fondi la neŭtralan Esperanto-Movadon, ĉar ĝi ekzistas ekde 1887. En 1975 ni nur daŭrigis kaj plu vivtenas ĝin. Mi ne estis kunfondinto de *Horizonto*. Tiu honoro apartenas al F-ino Inès Gastón el Zaragoza (Hispanio). Plue, mi ne estis prezidanto de Jugoslavia

Esperanto-Ligo (post la milito: Federacio) de 1937 ĝis 1941, sed de 1937 ĝis la fino de 1949, kiam mi forlasis Jugoslavion. (Pretere dirite: en *Horizonto* n-ro 6/84 sur paĝoj 158-161 troviĝas koncizaj kaj precizaj biografiaj informoj pri mi; se iu en la estonteco deziras skribi ion pri miaj vivo kaj laboro, do li/ŝi bonvolu ĉerpi la informojn el la biografiaj notoj en tiu n-ro de *Horizonto*, ne el iaj nefidindaj aŭ eĉ obskuraj fontoj).

91.3 "Instituto por Oficialigo de Esperanto"

En la pli ol 2-paĝa biografio (aŭtobiografio?) de Tibor Sekelj (verŝajne la plej longa en la libro) troviĝas pluraj blufoj kaj malĝustajtoj. Ekzemple, li asertas, ke li "kunlaboris en fondado kaj gvidado de la Zagreba Akademia Esperanto-Klubo" (AEK). Fakte, li partoprenis nek en la fondado, nek en la gvidado de AEK, sed ja estis unu el ĝiaj membroj, ĉestis ĝiajn kunvenojn, de tempo al tempo prelegis kaj partoprenis en aliaj programoj. Pri sia Instituto por Oficialigo de Esperanto (kia scienca modesteco: instituto por oficialigo de Esperanto!) T. Sekelj skribas en la tria persono:

"En 1964, kiam UEA rifuzis lian proponon pri ekago por enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon laŭ nova, universala metodo, li kune kun sia frato Antonije fondis kaj dum ĝia okjara funkciado prezidis la Internacian Instituton por Oficialigo de Esperanto (IOE). Ĝia agado estis dividita en 9 branĉojn de la homa aktivado, en kiuj ĉirkaŭ 500 kunlaborantoj el multaj landoj aktivis. Fine, pro la kontraŭstaro al IOE flanke /fare, *nia rim.* / de I. Lapenna, Sekelj decidis ĉesigi la Instituton kaj forlasis la E-Movadon" (p. 210).

Kompreneble, neniu serioza homo povis doni apogon al tiu tuta blufoj, kiu kaŭzis multe da malbono al Esperanto kaj kiun siatempe primokis gravaj jugoslavaj gazetoj. Tamen, se hazarde troviĝas iu naivulo, kiu kredas al tiaspecaj fantaziaĵoj de T. Sekelj, li devas konkludi, ke tiu I. Lapenna, "konata malamiko de Esperanto", tute sola, per sia grandega forto sukcesis malebligi, ke T. Sekelj kun siaj "ĉirkaŭ 500 kunlaborantoj" (!) realigu oficialigon de Esperanto en 9 (en 1964 en Hago estis 88, sed ni restu ĉe 9) branĉoj ne de animala, sed "homa aktivado", do atingu ion, kion nek Zamenhof, nek Hodler, nek Privat, nek centoj da aliaj pioniroj, fakte la tuta Esperanto-Movado sukcesis atingi! Alivorte: se mi ne kontraŭstarus, dank' al la laboro de T. Sekelj kaj IOE hodiaŭ Esperanto estus oficiala lingvo de UN, de EEK, de ĉiuj internaciaj organizaĵoj kaj de ĉiuj internaciaj rilatoj almenaŭ en la 9 branĉoj de "homa aktivado"!

Necesis diri tiujn kelkajn vortojn pri IOE, ĉar ne estas la unua fojo, ke T. Sekelj asertas la samon lige kun tiu fantomo, kiun li kuraĝis nomi

"Instituto por Oficialigo de Esperanto". T. Sekelj sendube havas ankaŭ meritojn por Esperanto. Li agus saĝe, se verkonte siajn aŭtobiografiojn, en la estonteco li forgesus IOE, la Karavanon de Amikeco tra Afriko, la esperantistigon de 10.000 (nek pli, nek malpli) doganistoj en la valo de Danubo kaj similajn fuŝaĵojn, kaj limigus sin al tiuj siaj atingoj, kiujn neniu neas, ekzemple al siaj libroj, inkluzive la aventurajn, en kiuj fantaziaĵoj estas allaseblaj kaj povas esti tre amuzaj por la legantoj.

* * *

La supraj rimarkoj neniel celas senvalorigi la verkon de Marinko Gjivoje. Kune kun lia *Historio de Esperanto-Movado en Jugoslavio*, kies 2-a eldono aperis en 1978, la nuna *Leksikono* prezentas valoran historian materialon pri la Esperanto-Movado en Jugoslavio. Singarde kaj kun iom da rezervoj la estontaj historiistoj povos ĉerpi el ĝi amason da utilaj informoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.20 de *Esperanto en Perspektivo*.

92 Unesko gratulas la centjaran jubileon

92.1 Teksto de la Rezolucio XI .4.4.218

La 23-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta en Sofio, Bulgario, de la 8-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro 1985, akceptis la 8-an de novembro rezolucion rilatantan al la centjariĝo de Esperanto. La originalon en kiu ajn el la oficialaj lingvoj de Unesko ni ankoraŭ ne vidis, sed jen la Esperanto-traduko laŭ *Esperanto*, organo de UEA, n-ro 12/85:

REZOLUCIO XI.4.4.218

Festado de la centjariĝo de Esperanto

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV. 1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

Notante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝia partopreno en tiu agado,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. Gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. Petas la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;
3. Invitas la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;
4. Rekomendas al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

Akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko
la 8an de novembro 1985

92.2 Komentoj

Se oni esceptas la gratulon, nepre notindan, la Rezolucio alportas nenion novan. Sed ankaŭ la gratulo estas nur normala sekvo de la jam fama, principe grava Rezolucio de la 10-a de decembro 1954, n-ro IV. 1.4.422, kiun la 8-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis en Montevideo, kaj de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko, establitaj per decido de la sama sesio kaj plifortigitaj en 1961. Estas bone, ke en la konsideroj estas ripetita kaj tiel rememorigita la esenca parto de la Rezolucio de 1954 rilate la atingojn de Esperanto. Ankaŭ la peto direktita al la Ĝenerala Direktoro sekvi la evoluon de Esperanto estas nenio alia ol ripeto, bedaŭrinde malfortigita, de la ero IV.1.4.424 de la Rezolucio de 1954, per kiu la Ĝenerala Konferenco ne "petis", sed "komisiis la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo..."

Tian kaj eĉ multe pli trafan rezolucion la Ĝenerala Konferenco estus facile akceptinta eĉ se Unesko ne troviĝus en la nuna intelekta, etika kaj financa krizo.

Tre bedaŭrinde, la Rezolucio de la 8-a de novembro 1985 havas du preskaŭ nekredeblajn mankojn... La unua estas, ke en la konsideroj tute ne estas menciita la alta honorigo, kiun ricevis la nomo de Zamenhof en 1959, kiam Unesko per decido de la 25-a de novembro 1959 deklaris D-ron L. L. Zamenhof "unu el la grandaj personecoj de la homaro" kaj invitis la registarojn de la Ŝtatoj-Membroj kaj la naciajn Unesko-komisionojn celebri la 100-jaran datrevenon de lia naskiĝo (Dok. 55/EX/SR 5 de la 27-a de novembro 1959). La dua eraro estas la ellaso de Esperanto el la listo de memorindaj jubileoj en 1987. Evidente, la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de UEA, kiu dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo verkis la projekton de la rezolucio, sciis nenion pri la decido de Unesko deklari D-ron Zamenhof unu el la grandaj personecoj de la homaro, kvankam ĝi povis facile informiĝi pri tio el la *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro* (CED, Londono, 1960, p. 103) aŭ el la verko *Esperanto en Perspektivo* (CED, London – Rotterdam, 1974, p. 776). Same evidente, la Komisiono ne sciis kion ajn pri la listo de celebrindaj datrevenoj en 1987. Alie oni neniel povas kompreni tiujn du gravajn ellasojn, ĉar estas neimageble, ke pro kiuj ajn kaŭzoj la Komisiono estus farinta tion intence. En ĉiu okazo ne tre flate por komisiono, kies tasko estas okupiĝi pri la eksteraj rilatoj de UEA.

La invito (kun karaktero de rekomendo) al la Ŝtatoj-Membroj kaj la rekomendoj al la neregistaraj organizaĵoj (p-toj 3 kaj 4 de la Rezolucio) estas internacijure nedecidaj. La rekomendoj de la nuntempa kompromitiĝinta Unesko bedaŭrinde havas eĉ malpli grandan morale-preman forton, ol la rekomendoj de aliaj interŝtataj organizaĵoj. Baldaŭ montriĝos, ĉu UEA estas kapabla atingi efektivigon de almenaŭ iu el la rekomendoj, el kiuj multajn la Esperanto-Movado estus povonta realigi per komunaj fortoj konforme al la Baza Laborprogramo por la Jubilea Jaro, senkonsidere al tiu manka Rezolucio, se nur UEA estus akceptinta nian proponon kaj ripete etenditan manon.

En la lumo de tiuj faktoj la ĉefartikolo sub la bombasta titolo "Sofio pli ol Rekonfirmas Montevideon" en *Esperanto*, n-ro 12/85, kaj la iom infaneca dramigo de la afero fare de la observanto de UEA en Sofio, Tibor Sekelj, en la sama numero montriĝas kiel troblovita sapobalono.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22. 3 de *Esperanto en Perspektivo*.

93 Ankoraŭ iom pri Unesko

93.1 Usono kaj Britio atakitaj de UEA

En n-ro 89 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* 1/86) estis koncize analizita la Rezolucio de la 8-a de novembro 1985, per kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko gratulis la Esperanto-Movadon okaze de la centjariĝo de Esperanto. En ĉefartikolo publikigita en *Esperanto*, la oficiala organo de UEA, la ĝenerala direktoro de tiu Asocio ne nur klopodis per bombastaj vortoj iel gravigi tiun sensignifan Rezolucion, sed li ankaŭ utiligis la okazon por insulti Usonon kaj Brition. Li skribis:

"Se Usono forlasis Uneskon antaŭ unu jaro, se Britio vasale sekvis antaŭ kelkaj semajnoj, tio grave malkontribuas al la kaso de Unesko, sed ĝi devus aliflanke kontribui al prestiĝo de Unesko, ĉar ĉiam estas virto rifuzi danci laŭ la trudita muziko" (n-ro 12/85, p. 202).

Ĉar la Estraro de UEA ne distancigis sin de tiu ofendo al la du demokratioj, oni devas rigardi la insulton kiel plian manifestiĝon de la porsovetsisma, kontraŭokcidenta kaj kontraŭdemokrata linio de la nuna UEA, kvankam ankaŭ UEA, same kiel Unesko, vivas ĉefe el kotizoj, donacoj kaj heredaĵoj el tiu daŭre insultata, kalumniata kaj alimaniere atakata libera okcidenta mondo. Per tio UEA ankoraŭfoje montras, ke ĝi ja "dancas", ne tre "virte", "laŭ la trudita muziko".

En la sama ĉefartikolo estas ankaŭ dirite: "Unesko onidire ne plu estas tio, kio ĝi estis. Feliĉe!" (p. 202). Se tiu aroganta primitivaĵo estus aperinta en iu loka bulteneto, estus profunde sub la nivelo de tiu ĉi rubriko eĉ menciit ĝin. Sed ĝi estas presita en la organo de UEA, kiu pretendas esti la sola reprezenta organizaĵo de la Esperanto-Movado. Tial necesas reagi. Se ne pro aliaj kaŭzoj, do almenaŭ pro historiaj motivoj: por ke poste oni ne diru, ke per sia silento ĉiuj konsentis.

93.2 Kio estis Unesko?

Konforme al Art. 55(b) de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, en 1945 Britio kaj Francio invitis ĉiujn tiamajn Ŝtatojn-Membrojn de UN partopreni konferencon en Londono kun la celo fondi mondan organizaĵon por edukado, scienco kaj kulturo. Post dusemajna sukcesa laboro (de la 1-a ĝis la 16-a de novembro 1945) la Konferenco akceptis la Konstitucion de la nova organizaĵo kun la nomo Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, ĝenerale konata kiel Unesko (UNESCO).

La esenca ideo de la Preamblo, ke "ke la militoj naskiĝas en la spiritoj de la homoj kaj ke ĝuste tie devas esti konstruataj la defendoj de la paco", estis prilaborita en la teksto de la Konstitucio kaj en la Baza Programo. La emfazo estis je internacia kompreniĝo, popola edukado, konservo de la kultura heredaĵo de la homaro kaj de ĝia plua evoluigo, progresigo kaj disvatigo de scioj, libera interŝanĝado de informoj, ĉio-ĉi sen kia ajn diskriminacio. Por povi efike atingi tiujn celojn la Konstitucio preskribis, ke la Ŝtatoj-Membroj elektos siajn reprezentantojn en la Ĝenerala Konferenco elinter personoj kompetentaj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo (Art. 4), kaj ke siavice la Ĝenerala Konferenco klopodos elekti "personojn kompetentajn en la sferoj de artoj, literaturo, scienco, edukado, vastigo de scioj" kiel membrojn de la Ekzekutiva Komitato (Art. 5.2). La samo validis por la Ĝenerala Direktoro kaj la oficistaro de la Sekretariato (Art. 6). La celo de tiuj preskriboj estis atingi, ke la tri ĉefaj organoj de Unesko – Ĝenerala Konferenco, Ekzekutiva Komitato kaj Sekretariato – konsistu el rekonitaj kompetentuloj sur la agadkampoj de Unesko kaj ke ili estu maksimume sendependaj en rilato al la Ŝtatoj-Membroj. Efektive, ĝis la mezo de la kvindekaj jaroj tiuj principoj estis strikte observataj kaj, rezulte, Unesko ĝuis altan respekton en mondaj kulturaj medioj. Sufiĉas diri, ke la unua Ĝenerala Direktoro estis Sir Julian Huxley, mondfama sciencisto.

Tia prestiĝa Unesko establis la konsultajn rilatojn kun UEA la 8-an de decembro kaj akceptis la principe gravan Rezolucion favore al Esperanto la 10-an de decembro 1954.

93.3 Kio estas Unesko hodiaŭ?

Post la aliĝo de Soveta Unio kaj de ĝiaj aliancanoj iom antaŭ la 8-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo (1954) oni faris fatalajn ŝanĝojn en la Konstitucio de Unesko. Ilia kvintesenco konsistis en tio, ke la principo de personaj kompetenteco kaj maksimuma sendependeco estis anstataŭigita per la subigo de kreskante nekompetendaj delegitoj en la Ĝenerala Konferenco kaj de la membroj de la Ekzekutiva Komitato al iliaj respektivaj registaroj. Kiel antaŭvidite en la artikolo "Kien Iras Unesko?" de la redaktoro de tiu ĉi rubriko (tiutempe prezidanto de UEA) en *Esperanto* n-ro 12/70, tiuj ŝanĝoj faciligis la transformon de Unesko el monda reprezenta kultura instanco, maksimume sendependa de la Ŝtatoj-Membroj, en burokratan, senefikan sinekuron kaj en instrumenton de kontraŭokcidenta kaj kontraŭdemokrata partipolitika propagando. La degenero atingis kulminon sub la gvidado de la nuna

Ĝenerala Direktoro, S-ro Amadou M'Bow, franclingvano el Senegalio. Interalie, li estas konata pro ekspluatado de sia pozicio por havigi al si honorajn akademiajn titolojn: li jam atingis 21, inkluzive tiun de la ŝtata Universitato de Mongolio, sed ŝajnas, ke li celas al 50.

Multe pli grava ol tiu persona ambicio estas la fakto, ke pro sia funkcio li respondecas pri la lukso kaj korupto en la sidejo de Unesko en Parizo, kaj pro la kontraŭokcidenta politikiĝo de la organizaĵo.

Rilate la politikiĝon estu, ekzemple, menciita la t.n. Maĵora Programo 13, kiu estis vaste misuzata por kontraŭokcidenta propagando; aŭ la agadoj por la t.n. Nova Monda Ordo pri Informado kaj Komunikado, kiu fakte celas cenzuradon kaj manipuladojn de novaĵoj, do precize la malon de la libera fluo de informoj konforme al la Konstitucio de Unesko.

La administraj kostoj fariĝis neelteneblaj: ĉ. 80%-oj de ĉiuj enspezoj estis elspeszataj en la pariza sidejo, kaj nur 20%-oj estis uzataj por aliaj celoj, el kiuj nur parto rilatis al edukado, scienco kaj kulturo.

Pro tiu situacio Usono, kiu kontribuadis 25%-jn de ĉiuj enspezoj, ekŝiĝis en 1984. Tamen, eĉ post la ekŝiĝo de Usono, kvankam oni necese devis malaltigi la elspeszajn, la malŝparado por la senefika burokrata aparato estis nur parte reduktita. Ekzemple, al la Ĝenerala Konferenco en Sofio veturis 900 geoficistoj de la Sekretariato je la kostoj de la Organizaĵo, kompreneble!

Britio daŭre insistadis, ke la administraj elspeszaj devus esti radikale malaltigitaj, kaj ke la programoj rilatantaj al forigado de analfabeteco kaj ĝenerale al edukado, scienco kaj kulturo devus ricevi prioritaton je la kosto de ideologiaj, fakte kontraŭokcidentaj, kaj pure teoriaj programoj. Ĉar tiuj postuloj ne estis kontentige solvitaj en Sofio, Britio ekŝiĝis la 5-an de decembro 1985. Tio perdigis al Unesko pliajn 6 milionojn da anglaj pundoj jare. Britio donos la ŝparitajn milionojn al la Brita Konsilio (British Council), kiu utiligos la tutan sumon por rekta eduka-sciencakultura helpo al landoj de la t.n. tria mondo. Ĝia starpunkto estas, ke disvastigo de scioj, unuavice forigado de analfabeteco, estas same necesaj al la tria mondo, kiel havigado de akvo al aridaj regionoj, kaj ke 6 milionoj en formo de rekta helpo estas kvinoble pli ol 20%-oj de tiu sumo por nereakta pere de la nuna Unesko.

Ĉu vere estas tiel "feliĉe", ke Unesko ne plu estas tio, kio ĝi estis, kiel asertas la oficiala organo de UEA? La legantoj juĝu mem.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3 de *Esperanto en Perspektivo*.

94 UEA: Membroj kaj financoj

94.1 Nombro de individuaj membroj

Laŭ la oficiala statistiko, publikigita en *Esperanto* n-ro 2/86, p. 39, en 1985 UEA havis entute 6536 Individuajn Membrojn (IM). En 1973, la lasta jaro antaŭ la hamburgaj eventoj, UEA havis 7231 IM. En siaj statistikoj kaj oficialaj raportoj la Estraro de UEA ĉiam prisilentas la fakton, ke la hamburga puĉo (1974), inspirita de parti-politikaj fortoj ekster la Esperanto-Movado, tuj kaŭzis interalie ankaŭ grandegan perdon de la kerna, individua membraro. Dek unu jarojn post Hamburgo la situacio neniel pliboniĝis: kiel oni vidas, en 1985 UEA havis preskau 700 IM malpli, ol en 1973.

Anstataŭ serioze fronti la verajn kaŭzojn de la membroperdo kaj de la ĝenerala regreso por trovi la ĝustajn sanigajn rimedojn, la Komitato de UEA decidis en Aŭgsburgo (1985) artefarite altigi la nombron. Ĝi enkondukis eksperimente por la jaroj 1986-1988 novan kategorion "Membro kun Gvidlibro" (MG). La kotizo de MG estos nur 12 ned. guldenoj jare, dum tiu de Membro kun Jarlibro (MJ), ĝis 1986 la plej malalta kategorio de IM, estas 28 gld. Tiu MG ricevos ne la Jarlibron, sed ĉ. 100-paĝan represajon kun informoj pri UEA kaj la Esperanto-Movado ĝenerale, la librokatalogon kaj la Estraran Raporton, sed ne la Liston de la Delegitoj. MG estos plenrajta IM, t.e. havos ankaŭ la rajton elekti kaj elektiĝi al diversaj funkcioj kaj organoj de UEA, Tiele, por la unua fojo ekde la fondiĝo de UEA en 1908 ekzistos Individuaj Membroj, kiuj ne ricevos la Jarlibron de la Asocio, sed ian surrogaton. Ne sufiĉis al la nuna gvidantaro de UEA, ke ĝi tuj post Hamburgo senigis la Individuajn Membrojn de la 350-paĝa Dua Parto de la Jarlibro. Nun ekzistas IM sen la Jarlibro!

La evidenta celo de tiu plia manovro estis artefarite kreskigi la nombron de IM en la Jubilea Jaro 1987. Kontraŭe al tiu esperata celo, plej verŝajne okazos, ne nur malmultaj, kiuj ĝis nun ne estis IM, aliĝos al la nova kategorio MG, kaj ke sufiĉe multaj ĝisnunaj MJ fariĝos MG por ŝpari 16 gld. jare. La rezulto estos, ke verŝajne iom kreskos la tiel manipulita nombro de IM, precipe per alflueto el Orienta Eŭropo, sed ke plu malaltiĝos la nombro de veraj, tradiciaj IM de UEA.

Se la gvidantaro de UEA ne estus obstine rifuzinta la plurfoje faritajn proponojn de ICNEM pri komunaj agadoj, aŭ almenaŭ pri formala kontrakto pri kunlaboro okaze de la Jubilea Jaro 1987, la nombro de Individuaj Membroj de UEA estus altiĝinta sen tiaspecaj manipuladoj.

94.2 Deficitoj

Tuj post Hamburgo la nova gvidantaro de UEA nuligis aŭ limigis tutan aron da agadoj, kiel detale prezentite en la verko *Hamburgo en Retrospektivo*. Tiuj "ŝparoj", fakte detruado de la pene atingitaj strategiaj pozicioj kaj bazo por pluaj sukcesaj aktivadoj, kaŭzis, ke en la unuaj jaroj post Hamburgo la saldoj ne estis negativaj. Kiel atendite, la situacio komplete ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj ankaŭ tiurilate: en 1983 la deficito de la Asocio estis 30.303 gld., en 1984 ĝi atingis rekordon de 115.392 gld., – la plej alta en la tuta historio de UEA. La deficito por 1985 ankoraŭ ne estas konata, sed oni atendas, ke ĝi denove estos tre alta. La buĝeto por 1986, akceptita de la Komitato en Aŭgsburgo, antaŭvidas deficiton de 54.300 gld.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18, precipe 18.5 kaj 18.6 de *Esperanto en Perspektivo* kaj ĉap. 5. 1 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

95 La puĉo en Pola Esperanto-Asocio (PEA)

95.1 Dokumentoj

La dokumenta materialo publikigita en *Horizonto*, n-ro 1/86 ("Oni ne Diru, ke ili ne sciis" de W. Ŝelazny, "Simbolo pri la Jubilea Jaro Malpermesita en Pollando"); n-ro 2/86 ("Jubilea Kongreso Organizata de Politikaj Komisaroj" de I.L.; "Puĉo en Pola Esperanto-Asocio" de W. Ŝelazny, "Forpelo de la Redakta Komitato de *Pola Esperantisto*"); n-ro 3/83 ("Publika Letero de SAT al ..." kaj "Membro de HPK de UEA pri la UK de UEA en Varsovio") estas nur parto de la dokumentaro pri la puĉo en Pola Esperanto-Asocio (PEA). Aliaj gravaj dokumentoj estas:

(i) Esperanto-traduko de la Decido de la 17-a de oktobro 1985, per kiu la Departemento pri Sociaj kaj Administraj Aferoj de la Metropolo Varsovio likvidis la ĉefan Konsilantaron kaj la Ĉefan Estraron de PEA, kaj nomumis "Provizoran Estraron", konsistantan el naŭ "civitanoj" (komisaroj) kun iliaj plenaj nomoj. La dokumento estas publikigita en *La Gazeto*, n-ro 3/86.

(ii) Artikolo de W. Ŝelazny, antaŭe demokrate elektita membro kun funkcio de "prokuroro" en la Ĉefa Estraro de PEA, sub titolo "Kaj Rapide Kreskas la Afero", en kiu li kompetente, kun plena kono de la faktoj, pritraktas la Decidon pri la likvido kaj donas pliajn precizajn informojn pri la fono de la puĉo. La artikolo aperis en *La Gazeto*, n-ro 3/86.

(iii) Fotokopiaĵoj de tri dokumentoj: la invito de PEA de 27.07.83 al SAT (kaj aliaj) okazigi sian jubilean kongreson en Pollando; la urĝigan

leteron de SAT de 17.10.85 al PEA; la respondo de PEA de 24.01.86, per kiu la komisaroj revokas la inviton de 1983 kaj tiel malebligas al SAT okazigi sian jubilean kongreson en Pollando. La fotoreproduktaĵoj estas publikigitaj en *Sennaciulo* n-ro 4 de aprilo 1986. Oni rimarkos, ke sur la leterpapero de PEA estas forstrekitaj la vortoj "Ĉefa Estraro".

Estas notinde, ke en *Esperanto*, oficiala organo de UEA, ĝis la mezo de majo 1986 aperis nenio, eĉ ne aludeto pri la puĉo, kvankam, evidente, la Estraro de UEA ne povis ne scii pri ĝi, ĉar ĝi okazis la 17-an de oktobro 1985. Verŝajne, post plurmonata cerbumado kiel misprezente elturniĝi, la organo de UEA publikigis ion en la aprila aŭ iu posta n-ro.

Por kompletigi la bildon ankoraŭ io:

La ĉefa organizinto de la puĉo en PEA estis Andrzej Grzebowski, kiu dum la elektoj de la estraro de PEA en 1984 ne estis reelektita (*La Gazeto*, n-ro 3/86, p. 6), sed tamen restis komitatano de UEA (*Jarlibro* 1985, p. 10). La sama A. Grzebowski kaj du el la nun nomumitaj komisaroj – M. Dobrzyński kaj S. Świstak – estis komitatanoj de UEA en 1974 (*Jarlibro* - 1974, p-oj 6, 7, 9). Ili kune kun la aliaj UEA-komitatanoj el la blokaj landoj kaj la "kunvojaĝantoj", partoprenis en la hamburga partipolitika puĉo en UEA. La identeco kaj kontinueco estas pli ol klaraj.

Oni nepre atentu ankaŭ al pluraj eroj en la rubriko "Tra la Esperanto-Gazetaro" en tiu ĉi n-ro, precipe al tiuj rilatantaj al *der esperantist*, *La Pacaktivulo*, *Internaciisto*, *Sennaciulo* kaj *SAT-Amikaro*.

95.2 Ĝenerala komento

La puĉo en PEA kaj la malpermeso al SAT kongresi en Pollando estas ŝokaj por ĉiuj kun la escepto de la ĝisostaj sovetiistoj kaj de la komplete enŝaltitaj kunvojaĝantoj, sed certe ne surprizaj por ni kaj por tiuj, kiuj atente legis la verkon *Hamburgo en Retrospektivo* kaj la dokumentajn materialojn publikigitajn en tiu ĉi rubriko. La partipolitika konspiro en UEA komenciĝis en la fruaj sepdekaj rezulte de la ĝenerala instrukcio de Moskvo ekkaperi la plej gravajn neregistarajn organizaĵojn en konsultaj rilatoj kun UN kaj/aŭ Unesko, kaj transformi ilin en la t.n. "transmisiilojn" de la sovetia monda strategio. Malgraŭ mia admono en la jam historia *APRILA ARTIKOLO* (*Esperanto*, n-ro 4/74) pri la danĝero, kaj malgraŭ la fakto, ke en la elektoj de la Komitatanoj B en 1974 mi ricevis plebiscitan apogon de la individua membraro, la sovetiismaj komplotintoj kun la helpo de la kunvojaĝantoj (kaj kelkaj ambiciuloj) povis kontraŭstatute manipuli la Komitaton de UEA kaj la puĉo sukcesis. La plua, kreskanta politikigado de UEA estas nenio alia ol laŭvicaj sekvoj de la hamburga puĉo. Ili estus eĉ pli katastrofaj, se la ekzisto de *Horizonto* kun tiu ĉi

rubriko ne malebligus eĉ pli fatalajn mispaŝojn. Nun necesas iom atendi por vidi kio okazos: ĉu eĉ post tiuj ŝoke krudaj eventoj en PEA la Estraro de UEA plu obstine restos ĉe sia decido "jubilee" kongresi en Varsovio, aŭ ĝi aŭdacos proponi al la Komitato en Pekino elekti alian urbon en iu demokrata lando; ĉu fakte la Estraroj de UEA kaj TEJO kuraĝos nuligi la kongreson de TEJO en Israelo, kiel postulas "la 18-a konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj" (v. la eron *der esperantist* en "Tra la Esperanto-Gazetaro" en tiu ĉi n-ro); ĉu, fine, inter la komitatoj de UEA, Honoraj Membroj de UEA, Membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj landaj asocioj aliĝintaj al UEA troviĝos almenaŭ kelkaj, kiuj publike protestos pro tiuj pliaj krudaj, nun eĉ tute apertaj, intervenoj de ekstermovadaj partipolitikaj fortoj? Ne nur protesti, sed ankaŭ tiri la konsekvencojn, se la protestoj restos senrezultaj.

95. 3 Aparte pri PEA

Kiel pruvite jam plurfoje, la decidaj organoj de la Esperanto-organizaĵoj en la blokaj landoj estas plene sub kontrolo de siaj respektivaj komunistaj-sovetiistaj partioj kaj devas propagandi la sovetian eksterlandan politikon. Ekde 1974 ili tion libere faras en la sino mem de UEA sen kia ajn rezisto fare de la Estraro kaj Komitato de la Asocio aŭ de la aliĝintaj landaj asocioj en demokrataj landoj. Tiel estis ankaŭ en PEA. Sed dum la ioma liberaliĝo en la periodo de "solidarność" ankaŭ la membroj de PEA povis iom libere ekspiri kaj demokrate elekti la Ĉefan Konsilantaron kaj la Ĉefan Estraron de sia Asocio. La likvido de tiuj demokrate elektitaj organoj kaj la nomumo de komisaroj signifas tutsimple revenon al la stato antaŭ "*solidarność*" kaj egalas al la situacio de la aliaj Esperanto-organizaĵoj en la landoj de la sovetia bloko.

Fakte, do, nenio nova kaj nenio surpriza por la informitoj. Kio vere kaŭzis la ŝokan surprizon en la pli vastaj tavoloj de la neinformita esperantistaro, estis la krudeco de la puĉo: per dekreto de la ŝtata-partia aŭtoritato. Ĝuste tiu krudeco espereble malfermos la okulojn de tiuj, kiuj ĝis nun tenis ilin fermitaj. Ankaŭ en la Komitato de UEA. Kelkajn malsanojn oni kuracas per ŝokoj!

En la nuna situacio UEA devus ne nur rezigni pri sia jubilea kongreso en Varsovio, sed ankaŭ eksigi PEA el UEA konforme al Art. 13 de sia propra Statuto, ĉar, evidente, PEA ne estas "asocio laŭorde organizita", nek ĝi estas "vaste malfermita al la civitanoj de sia lando". Sed, kompreneble, la nuna Komitato de UEA, regata de sovetiismaj fortoj, certe ne faros tion.

95.4 Kio verŝajne okazos?

Jen kio: Per sia postulo, ke la kongreso de TEJO ne okazu en Israelo, "la 10 Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj" agis plene konforme al sovetia politiko rilate Israelon, kaj tiel plian fojon pravigis sian ekziston antaŭ siaj partiaj aŭtoritatoj. La TEJO-Kongreso okazos en Israelo, kiel planite: apenaŭ estas imageble, ke la Estraroj de UEA kaj TEJO kuraĝus nuligi 3 monatojn antaŭ la okazigo. Ankaŭ la Jubilea UK de UEA, malgraŭ la verŝajnaj protestoj, okazos en Varsovio. Tiele la gvidaj instancoj de UEA plian fojon "pruvos" al naivuloj, ke UEA "ne estas regata de ekstermovadaj partipolitikaj fortoj", t.e. sovetiismo, sed "sendepende faras siajn decidojn". La "reprezentantoj" de "la 10 Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj" tre facile pravigos sin antaŭ siaj partiaj instancoj (se ne temas pri jam pli frue interkonsentita manovro) per "ni oferis la negravan TEJO-Kongreson en Israelo, al kiu en ĉiu okazo 'ni ne sendos niajn gejunulojn', por havi la gravan, grandan, jubilean valutdonan UEA-Kongreson en Varsovio". Tiel proksimume. Lerte. Kaj ĉio denove estos en "perfekta ordo". Escepte ke, eble, forestos la promesita amasa partopreno el landoj kun valoraj valutoj, tiel ankaŭ la valoraj valutoj, sole kio interesas la reĝimon.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.28, 18.2.1, 19, 21.4.4 de *Esperanto en Perspektivo*, kaj ĉap. 5 kaj 7.1 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

96 Pliaj dokumentoj pri la puĉo en PEA kaj pri la UK de UEA en Varsovio

96.1 Kial SAT ne rajtas kongresi en Pollando

En n-ro 92 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 4/86, paĝoj 79-81) aperis listo de dokumentoj pri la politika puĉo en Pola Esperanto-Asocio (PEA) kaj pri la malpermeso al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigi sian Jubilean Kongreson en 1987 en Pollando. La malpermeson eksplikas la fakto, ke SAT estas plurtendenca, sendependa, demokrata laborista Esperanto-organizaĵo, kiu, same kiel en la tridekaj jaroj, sukcese rezistas dogmigon kaj sian subigon al ekskluziva sovetiismo. Tion pravas ankaŭ pamfleto, kiun la "Gvidantaro de Pola Esperanto-Asocio", t.e. la politikaj komisaroj nomumitaj de la pollandaj politikaj aŭtoritatoj, dissendis al la Esperanto-gazetaro. El ĝi vidiĝas, ke la inviton, faritan de PEA al SAT en 1983 kongresi en Pollando en 1987, la nova "gvidantaro" nuligis, ĉar

en *Sennaciulo*, organo de SAT, "komencis aperi artikoloj misprezentaj kaj misfamigantaj Pollandon kaj aliajn socialismajn landojn", t.e. kuraĝis diri la veron pri *solidarność*, pri la subpremo de la klopodo krei liberajn laboristajn sindikatojn en Pollando kaj ĝenerale pri la situacio sub la regado de generalo Jaruzelski. Tiujn "krimojn" kompletigis plia "krimo": artikolo "Pri Konferenco de Jalta – 40 Jaroj", "per kiu SAT dubindigas la gravecon de /la/ Jalto-decidoj". Tute klare: kia ajn devojiĝo for de la sovetiisma linio estas neallasebla "krima ago"; ĉar la "krimuloj" ne estas aresteblaj, la "puno" povas esti nur konfiskado de la organoj de SAT (kaj ne nur de SAT, sed eĉ de *Monato*) kaj malpermeso al SAT kongresi en tiu lando. Aludante al la eventoj de la tridekaj, kiam la tiamaj sovetiistoj-stalinistoj sensukcese klopodis ekkaperi SAT, la pamfleto diras: "Estas bedaŭrinda afero, ke la gvidantaro de SAT ne eliris ĝustajn konkludojn el sia historio, ne lernis el /la/ amaraj spertoj de la pasinteco". Prave, se temas pri la akcepto de la riska invito de 1983; malprave, se temas pri la nuna rifuzo, ĉar SAT havas la okazon plian fojon konstati, ke la nuntempa sovetiismo en la Esperanto-Movado estas esence identa kun la sovetiisma frakcio en SAT en la tridekaj.

Intertempe SAT trovis bonan solvon: laŭ la invito de la urbestro de Bologne-sur-Mer, ĝi havas sian Jubilean Kongreson fine de aŭgusto 1987 en la urbo de la Unua Esperanto-Kongreso en demokrata Francio.

96.2 La politika polico permesas al UEA kongresi en Varsovio

Laŭ plej fidinda informo el Pollando, la Ministerio pri Internaj Aferoj, per sia Dekreto de la 19-a de junio 1986, permesis al Universala Esperanto-Asocio okazigi sian kongreson en la Jubilea Jaro en Varsovio de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987. Do, ne pli frue, sed nur la 19-an de junio 1986, post kiam estis likviditaj la demokrate elektitaj instancoj de PEA kaj nomumitaj la komisarioj, venis ne invito de iu kultura instanco, sed permeso de la Ministerio pri Internaj Aferoj, t.e. de la politika polico, por la UEA-Kongreso en Varsovio. Tiom por kompletigi la dokumentaron pri tiu bedaŭrinda afero.

96.3 Reagoj en UEA

La Estraro de UEA kaj ĝia organo *Esperanto* prisilentis al la membraro ĉion pri la puĉo kaj pri la fakta situacio en PEA. Laŭ nia scio, en la Komitato de UEA la sola reago estis tiu de S-ro Dietrich M. Weidman, svisa Komitatano A. En sia "Malfermita Letero", verkita laŭ peto de

Svisa Esperanto-Societo kaj adresita al pluraj Esperanto-organizaĵoj kaj periodaĵoj, interalie al ICNEM/HORIZONTO, li prezentas la situacion surbaze de personaj spertoj dum vojaĝo en Pollando kaj konkludas:

"Estas tamen pensige, ke la Pola Registaro limigas asocion en ĝia libereco. Se en tio nenio okazos /se tiurilate nenio ŝanĝiĝos, *nia klariga korekto*/, UEA nepre devus pripensi la kongreslokon venontjaran. Ne decas al tutmonda organiz/aĵ/o tutsimple silenti, se io tia okazas al la filiaj organiz/aĵ/oj."

Ne estas konate, ĉu la Komitato de UEA dum siaj kunsidoj en Pekino donis kian ajn sekvon, aŭ eĉ nuran atenton al la publika letero de sia svisa komitatano. Ankaŭ la starpunkto de Svisa Esperanto-Societo ankoraŭ ne estas konata.

Aliflanke, la ĝenerala direktoro de UEA, en sia raporto pri la aprila kunsido de la Estraro, skribis en la maja n-ro de *Esperanto*, p. 81:

"La Estraro konstatis, ke la preparlaboroj por la centra priŝto de la Centjara Jubileo de Esperanto – en ties patrujo – tre bone progresas malgraŭ la diversaj ŝanĝoj en la gvidaj organoj de PEA mem. Cetere, tiujn ŝanĝojn la Estraro konsideras interna afero de PEA, kiu, estante la plej granda kaj la plej forta Esperanto-organizaĵo, *kapablas mem solvi siajn eventualajn problemojn*" (*nia emfazo*).

En tiuj kelkaj linioj troviĝas tri asertoj, kiuj misgvidas, fakte trompas la membraron de UEA:

(1) La aŭtoro komplete prisilentas la politikan puĉon kaj kredigas, ke temis nur pri iaj laŭstatutaj "diversaj ŝanĝoj".

(2) Tiun falsajon li firmigas per la aserto, ke "tiujn ŝanĝojn la Estraro /de UEA/ konsideras interna afero de PEA". Efektive, se fakte temus pri laŭstatutaj ŝanĝoj, ili ja estus interna afero de PEA. Sed temas pri "ŝanĝoj" *altruditaj per dekreto de la ŝtata politika aŭtoritato* kontraŭe al la Statuto de PEA. Eĉ se PEA ne estus parto de UEA, tiaj "ŝanĝoj" devus indignigi la Estraron de UEA kaj elvoki ĝian energian proteston pro la forpelo de demokrate elektitaj instancoj de Esperanto-organizaĵo, tute egale ĉu "granda" aŭ "malgranda". Sed PEA estas parto de UEA, havas siajn komitatanojn en la Komitato de UEA kaj la "ŝanĝoj", t.e. la puĉo, estas rekte kontraŭaj al Art. 13 eĉ de la nuna Statuto de UEA, ŝanĝita post Hamburgo (1974) por adapti ĝin al la veraj celoj de la tiamaj komplotintoj. Sed, kiu en UEA entute atentis al tiu paperĉifono, kiu nomiĝas Statuto? Fakte, nomi la puĉon en PEA "diversaj ŝanĝoj" estas tute konforma al la hamburga konspira spirito kaj prezentas nenion novan al konantoj de la realaĵo en UEA.

(3) Kompreneble, la membraro de PEA ja "kapablas solvi siajn eventualajn problemojn". Tion ĝi estis montrinta ankaŭ per sia

demokrata elekto de la nun perforte forpelitaj elektitoj. Sed la vera problemo estas, ke la pola politika aŭtoritato, nun eĉ kun la aprobo de la Estraro kaj, antaŭvideble, ankaŭ de la Komitato, *malpermesas al PEA solvi siajn problemojn*.

Per tio ni finas la dokumentadon pri la puĉo en PEA kaj pri la sinteno de la gvidaj instancoj de UEA en tiu plia nigra makulego sur la nomo de la Asocio. Ni revenos al la afero nur se iu escepte grava evento devigos nin fari tion. Nun, surbaze de la prezentitaj nekontesteblaj faktoj ĉiu povas formi sian propran opinion kaj agi konforme al sia konscienco. En ĉiu okazo, sen tiu ĉi rubriko kaj entute sen *Horizonto* neniu povos kiam ajn skribi la historion de la Esperanto-Movado por la periodo ekde 1974.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.28, 18.2.1, 19.2.5 – 19.2.8, 21.4.4 de *Esperanto en Perspektivo*, kaj ĉap. 5 kaj 7.1 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

97 La financoj de UEA en katastrofa stato

En 91.2 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 3/86, p. 56) ni antaŭvidis, ke la defcito de UEA por 1985 "denove estos tre alta". El la Financa Raporto, publikigita en *Esperanto* de junio 1986, nun montriĝas, ke la defcito en 1985 estis 93.575 gld. En 1984 la defcito estis 115.392 gld., en 1983 ĝi estis 30.303 gld. Tio signifas, ke en la tri lastaj jaroj la perdoj estis entute 239.270 gld., el kio 208.967 en 1984 kaj 1985, t.e. pli ol 104.000 gld. jare.

Estas notindaj kelkaj tre altaj kostoj: por la salajroj, volontula servo, sociaj asekuroj kaj trinkaĵoj (ronde) 360.000 gld.; por la vojaĝkostoj de la Estraro, komisiitoj, oficistoj kaj reprezentigo 57.000 gld. (ne estas dirite kial necesis vojaĝi tiel multe, nek ĉu tiu vojaĝado donis kian ajn pozitivan rezulton); por la korespondkostoj de la Estraroj de UEA/TEJO kaj komisiitoj 8.000 gld. Do, el la tuta sumo de la elspezoj en alteco de ronde 738.500 gld., la salajroj, vojaĝado kaj korespondado de funkciuloj ekster la CO englutis 425.000 gld., t.e. 57,55%.

(Pretere dirite: Se ni havus je dispono unujaran defciton de UEA, aŭ eĉ nur la sumon de 57.000 gld. elspezitaj por vojaĝado, ni povus fari bonegan, mondvastan informadon pri Esperanto en la Jubilea Jaro!).

La fakta financa situacio de UEA bedaŭrinde estas eĉ pli malbona, ol montras la grandegaj defcitoj, neniel pravigeblaj, ĉar la posthamburgaj gvidantoj nuligis aŭ neglektis praktike ĉiujn antaŭajn multnombrajn agadojn, ne enkondukis novajn kaj en 1985 eĉ reduktis la grandecon de la nur unuvoluma Jarlibro. En sia ege kritika Raporto la oficiala revizoro, S-ro L. Hordijk, interalie skribis:

"Mi ankaŭ konstatis, ke la ĝenerala politiko de UEA ne pliboniĝas, ĉar oni per kompensoj el kapitalaj kontoj *kaŝas la veran deficiton de la Spezokonto* ... Krome, oni ne adaptis (t.e. ne altigis) la rezervon por dubindaj debitoroj (nun 120.209,75 gld.), por preni en konsideron la nunan situacion, *en kiu 146.749,90 gld. estas juĝeblaj kiel dubindaj*" (*nia emfazo*).

Aliflanke, la komitataj revizoroj, S-roj Fred de Geus kaj Bob Venhuizen, skribis en sia Revizora Deklaro:

"Du gravaj pasintjaraj plendoj de la profesia revizoro restas validaj, sed ne plenumitaj: prefere oni ne rigardu donacojn kiel negativajn kostojn, sed kiel ekstrajn amortizojn; *kompensoj estas nur manipulado en kaŝita formo* ... UEA entute havas 26 debitorojn, kiuj ŝuldas po pli ol mil nederlandajn guldenojn, *inter ili 20 Esperanto-asocioj aŭ institutoj. La ŝuldo de tiu grupo sumiĝas je 270. 505,95 gld.* Jam du jarojn ni plendas, ke UEA nenion faras por redukti tiun sumon. *Efektive la sumo nur kreskas.* Tio jes signifas, ke *15% de la tuta asocia kapitalo estas morta*" (*nia emfazo*).

Oni notos, ke kaj la oficiala kaj la komitataj revizoroj uzis la vortojn "kaŝi", "kaŝita formo", "manipulado". Ne estas dirite, kiuj "Esperanto-asocioj aŭ institutoj" ŝuldas la sumon de 270.505,95 gld., rigardatan de la revizoroj "morta kapitalo". Plej kredeble temas pri aliĝintaj landaj asocioj el la sovetia bloko kaj aliaj nepagipovaj landoj, kiuj deklaras altan membronombron, tiamaniere havigas tre grandan nombron da komitatanoj en la Komitato de UEA por povi ĝin regi pli sukcese, sed poste pagas eĉ ne tiun minimuman kotizon por siaj membroj. Se ni eraras, UEA ĝustigu per precizaj informoj pri tiu grandega ŝuldo – "morta kapitalo" – de pli ol 270.000 gld.

Oni povus atendi, ke tiujn grandegajn kostojn en kaŝita kaj nekaŝita formoj almenaŭ parte iel pravigas la glata funkciado de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam. Fakte ne estas tiel. Laŭ artikolo de Diccon Masterman, kiu dum kvar jaroj estis oficisto de UEA, en la CO regas ĥaoso kaŭzanta neplenumadon de taskoj kaj neallaseblajn prokrastojn. Kvankam la sanigaj rimedoj proponitaj en la artikolo ne ŝajnas al ni aprobindaj, tamen la artikolo estas la sola honesta prezento de almenaŭ unu aspekto de la nuna situacio, al kiu la hamburgaj eventoj kondukis la Asocion. Tiu rekomendinda artikolo tute surprize aperis en *Esperanto* de julio/aŭgusto 1986, verŝajne sen aprobo aŭ eĉ nur scio de la Estraro.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.6 de *Esperanto en Perspektivo*.

98 Plia parto de "Esperanto en Perspektivo" en la nederlanda

En 1980 Marc Vanden Bempt el Leuven, Belgio, tradukis en la nederlandan kaj publikigis ĉapitrojn 1 kaj 2 de la verko *Esperanto en Perspektivo* de Ivo Lapenna (ĉefred.). Temas pri "La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj" kaj "Faktoroj Influantaj la Lingvoevoluo", ambaŭ verkitaj de la ĉefredaktoro. Nun ĵus aperis la nederlanda traduko de ĉap. 12 "Uzo de Esperanto por Praktikaj Celoj", same tiel verkita de la ĉefredaktoro. La traduko de Marc Vanden Bempt estas publikigita en formo de 50-paĝa broŝuro kiel eldonaĵo de Esperanto 2000, Duisburgsestraat 12, 3030 Leuven-Heverlee, Belgio, ĉe kiu oni povas ĝin havigi.

Diference de aliaj, kiuj abunde utiligas tiun 842-paĝan verkegon de la antaŭhamburga Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj eĉ publikigas laŭvortajn tradukojn sen mencio de la fonto, kio egalas al intelekta ŝtelo, Marc Vanden Bempt honeste indikas kaj la fonton kaj la aŭtoron. La valora broŝuro certe kontribuos al disvastigado de Esperanto inter nederlandlingvanoj.

99 Esperanto en interancia lingvistika bibliografio

Denove aperis Esperanto-ĉapitro en la granda jara bibliografio de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA). Ĝus aperis la bibliografio por 1985. En kvin volumoj la kompilaĵo listigas pli ol 42.000 sciencajn artikolojn, kiuj aperis dum la jaro. La kvin volumoj traktas (1) literaturojn de anglalingvaj landoj (inkluzive neanglalingvajn minoritatajn literaturojn), (2) literaturojn de aliaj mondopartoj, (3) lingvistikon, (4) ĝeneralan literaturon (t.e. verkojn ne limigitajn al unuopaj literaturoj aŭ geografiaj lokoj) kaj (5) folkloron.

La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo. La ĉapitro "Helplingvoj. Internaciaj Lingvoj" enhavas 310 erojn, kiuj plejparte traktas la lingvistikon de Esperanto. Tio reprezentas ioman kreskon kompare kun antaŭaj jaroj (1982: 253 eroj; 1983: 241 eroj; 1984: 286 eroj). Por ĉiu ero aperas ĉiuj bazaj bibliografiaj informoj, kaj oni ankaŭ detale analizas ĉiun eron laŭ temo kaj subtemoj. Tiuj temoj kaj subtemoj estas siavice listigitaj en tema indekso por la tuta bibliografio. La tema indekso estas giganta: en presita formo ĝi ampleksas pli ol 3000 kolumnojn de grandformata volumo.

Kompilis la ĉapitron "Helplingvoj. Internaciaj Lingvoj" d-ro Humphrey Tonkin kaj d-rino Jane Edwards (Usono) kun helpo de d-ro W. A. Verloren van Themaat (Nederlando). La bibliografio, *1985 MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures*, estas konsultebla en ĉiuj ĉefaj esploraj bibliotekoj de la mondo.

Aldone al ĝenerala sekcio pri Esperanto, la Esperanto-ĉapitro traktas verkojn pri Esperanto laŭ la jenaj subsekcioj: dialektologio, gramatikaj kategorioj, prepozicio, pronomo, verbo, leksikologio, etimologio, leksikografio, terminologio, vortpruntado, morfologio, vortkonstruo, onomastiko, fonetiko, parolsintezo, fonologio, silabigo, pragmatiko, prozodio, semantiko, stilistiko, sintakso, aspekto, kazo, negado, voĉo, tradukado, maŝintradukado, ortografio, interpunkcio.

* * *

Al la supra informo, ricevita de UEA por publikigo, ni aldonas, ke en la bibliografio estas menciitaj ankaŭ pluraj artikoloj aperintaj en *Horizonto* kaj *Internacia Jura Revuo*, sed kelkaj tre gravaj estas ellasitaj. Estas bedaŭrinde, ke la titolo de la koncerna ĉapitro estas "Helplingvoj. Internaciaj Lingvoj", ambaŭ absolute malĝustaj el scienca vidpunkto. Tion ni pritraktis multfoje, partete ankaŭ en la ĉefartikolo en *Horizonto* n-ro 1/87.

100 Membraro de UEA en 1986

En n-ro 3/87 de *Esperanto*, ricevita meze de aprilo 1987, aperis statistiko pri la nombro de la membroj de UEA en 1986. La redakcio emfazas, ke en 1986 por la unua fojo UEA havis pli ol 40.000 membrojn, precize 40.589. Formale tiu aserto estas ĝusta, sed la fakta situacio estas jena:

100.1 Pri la aligitaj membroj

El la 40.589 membroj, 33.910 estis la t.n. aligitaj membroj, por kiuj la landaj asocioj pagas ridinde malaltan kotizon, dum nur 6.679 estis individuaj membroj. El la 33.910 aligitaj membroj, 5.110 estis aligitaj el Bulgario, 3.527 el Ĉeĥoslovakio, 400 el GDR, 3.080 el Hungario kaj 6.790 el Pollando, entute 18.907 el 5 orienteŭropaj landoj, kaj nur 15.003 el ĉiuj ceteraj landoj de la mondo! La nombroj de aligitaj membroj, kiujn la 5 orienteŭropaj landaj asocioj (LA) sciigas al UEA, estas nekontroleblaj, sed evidente arbitre troblovitaj. Estas eĉ dubinde, ĉu tiuj LA fakte pagas

al UEA la AM malaltegan kotizeton, aŭ UEA nur debetas ilian konton de jaro al jaro, kiel supozigis la revizora raporto por 1985. Ke la nombro estas tute arbitra, montras la ekzemplo de Pola Esperanto-Asocio (PEA). Laŭ S-ro Roman Dobrzyński, la nuna prezidanto de PEA, tiu landa asocio havas 10.000 membrojn (*Esperanto* 3/87, p. 45), sed laŭ la statistiko ĝi havas 6.790 AM kaj 167 individuajn membrojn (IM), da entute 6.957. Kial ne 10.000, se fakte estas 10.000? Aliflanke, laŭ oficiala atesto en *Pola Esperantisto* n-ro 4/86 (ricevita en aprilo 1987!), la eldonkvanto de la organo de PEA estas 1.000 (mil) ekzempleroj, kio signifas, ke minimume 9.000 membroj de PEA ne ricevas sian organon, se la aserto pri 10.000 membroj estus ĝusta! Sed, evidente, kaj la 10.000 membroj kaj la 6.790 anoncitaj AM estas tro-tro blovitaj nombroj, se oni konsideras la solan fidindan informon pri la eldonkvanto de PE en nuraj 1.000 ekzempleroj. Oni ne forgesu, ke tiu ege blovita nombro de preskaŭ 19.000 AM en 5 orienteŭropaj landoj, konsiderinde pli alta ol la nombro de AM de ĉiuj aliaj landoj, donas al la blokaj landoj neproporcie grandan nombron da Komitatanoj A en la Komitato de UEA.

100.2 Malkresko de la nombro de IM

Por artefarite kreskigi la nombron de individuaj membroj (IM) la Komitato de UEA eksperimente enkondukis por la jaroj 1986-1989 novan kategorion "Membro kun Gvidlibro" (MG). La kotizo de MG estas nur 12 ned. guldenoj jare, dum tiu de Membro kun Jarlibro (MJ) – la plej malalta kategorio de IM – estas 28 gld. Tiu MG ne ricevas la *Jarlibron*, sed ĉ. 100-paĝan represaĵon kun informoj pri UEA kaj la Esperanto-Movado ĝenerale, – ne la liston de delegitoj. MG estas plenrajta IM, t.e. li/ŝi havas la rajton elekti kaj elektiĝi al diversaj funkcioj kaj organoj de la Asocio. "Tiele, por la unua fojo ekde la fondiĝo de UEA en 1908, nun ekzistas IM, kiuj ne ricevas la *Jarlibron*, sed ian surrogaton.

En tiu ĉi rubriko de *Horizonto* (ero 91, n-ro 3/86) ni atentigis pri la manovro kaj antaŭvidis: "La rezulto estos, ke verŝajne iom kreskos la tiel manipulita nombro de IM, precipe per alflueto el Orienta Eŭropo, sed ke plu malaltiĝos la nombro de veraj, tradiciaj IM de UEA". Tiel fakte okazis. Laŭ la ĵus publikigita statistiko, la nombro de IM kreskis de 6.536 en 1985 al 6.679 en 1986, sed en tiuj 6.679 IM estas inkluzivitaj 409 membroj en la nova kategorio MG, kreita kun la sola celo artefarite kreskigi la nombron de IM. Se oni deprenas tiujn 408 MG, la nombro de tradiciaj IM malkreskis de 6.536 en 1985 al 6.270 en 1986. Ni rememorigas, ke en 1973, t.e. la lasta jaro antaŭ la hamburga puĉo, UEA havis 7.231 tradiciajn individuajn membrojn, kio signifas, ke en 1986 UEA havis preskaŭ 1.000

IM malpli, ol en 1973. Unu el la multaj negativaj sekvoj de la eventoj de 1974!

La nova direktoro de la C.O. de UEA, S-ro Osmo Buller, sincere rekonas la situacion, senprecedence ekde 1975: "UEA lastfoje superis 7.000 en 1973. Ke la nombro en 1986 estis je 143 pli ol en 1985, ŝuldiĝas al eksperimenta kat. MG; aliaj grupoj, krom MJ, malkreskis ..."

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)*.

101 La nova prezidanto de PEA pri neŭtraleco

En *Esperanto* n-ro 3/87 aperis intervjuo kun S-ro Roman Dobrzyński, la nuna prezidanto de Pola Esperanto-Asocio (PEA), en kiu li sensukcese klopodas malgravigi la jam bone dokumentitan politikan karakteron de la puĉo en PEA. Tiu demando jam estas sufiĉe pritraktita en *Horizonto*, *La Gazeto*, *Sennaciulo* kaj *Monato*, kaj ĉiu povas formi sian opinion surbaze de la prezentitaj nekonstateblaj faktoj. La principan starpunkton de *Horizonto* enhavas nia letero al *Monato* sub la titolo "Kiel Konduti ne Decas", kiun ni publikigas en tiu ĉi n-ro en la rubriko "Kion vi ne Legos Aliloke".

S-ro Dobrzyński prezentas sin kiel neŭtralulon inter la du konfliktintaj grupoj en PEA, kvazaŭe "egale kulpaj". Por ĉiuj konantoj de la politika klimato en nuna Pollando kaj de la antaŭa rolo de la nuna prezidanto estas klare, ke en ĉiu okazo li estas la homo, kiu ĝuas la fidon de la partiaj-ŝtataj aŭtoritatoj. En la tempo de la granda kampanjo kontraŭ la neŭtralecon de UEA, kiu fine kondukis al la hamburga partipolitika puĉo, M. Dobrzyński publikigis en *Kontakto* n-ro 1/1970 artikolon "Neŭtraleco", en kiu estis dirite, ke la "neŭtraleco trovis sian ekstreman, preskaŭ absurdan, esprimon en la Statuto de UEA kaj sekve en tiu de TEJO...". La aŭtoro asertis: "Neŭtraleco ne montras la vojon irendan, sed montras la vojon, kiun oni ne iru ... El neŭtraleco ne rezultas pozitiva programo de agado, ĝi mem estas programo de neagado ... Kvazaŭ ne memorante pri la taktika signifo de neŭtraleco, oni dotis ĝin per preskaŭ sakraj ecoj, tiel ke ĝi fariĝis en la Esperanto-Movado tabuo, iu nova versio de la interna ideo" (p. 7). En 1974 M. Dobrzyński estis komitatano de UEA kaj aktive partoprenis en la puĉo, kiu senigis UEA de ĝiaj aktiva neŭtraleco kaj sendependeco.

Tiom pri la kontraŭneŭtraleca starpunkto de la nova prezidanto de PEA kaj pri lia rolo en la hamburgaj eventoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.28 kaj 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)* kaj ĉap. 4.2 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

102 Pozitivaj signoj en la C.O. de UEA

En sia tre bona prezento de la nunaj 14 geoficistoj en la C.O. de UEA en Rotterdam, la nova talenta direktoro de la C.O., S-ro Osmo Buller, interalie skribis:

"Ankaŭ ĵurnalisme la revuo renoviĝas. Eble vi jam rimarkis en la redakta politiko de Mark /S-ro Mark Fettes, la nova, same talenta, redaktoro, *nia rim./* signojn pri ŝanĝoj taŭgaj por tiu ĉi periodaĵo – la plej influhava en la Movado, kaj tial aparte respondeca pri ĝia evoluo ... Estis eraro, ne kuraĝe alfronti jam dekomence tiujn kaj aliajn tiklajn, foje eĉ tabuajn problemojn. Malfermiteco estas forto, dum ĝia manko nutras putrajn evoluojn". (*Esperanto*, n-ro 3/87, p. 49).

La aserto pri la ŝanĝoj estas ĝusta. Ekde 1974 oni ne povis legi en *Esperanto* tiajn sincerajn rekonojn pri faritaj eraroj, nek tiel honestan alfrontadon de almenaŭ kelkaj el la negativajoj. Krome, por la unua fojo en la sama n-ro 3/87 la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz estas ne nur menciita en la listo de eventoj en 1987 (p. 56), sed ankaŭ pozitive pritaksita (kun 1-2 eraretoj pri faktoj) en artikoleto de Mark Fettes troviĝanta en la rubriko "Elstaraj Eventoj de la Jubilea Jaro", eĉ kun la foto de la monumento. En ĝi la redaktoro skribas, ke la "altrangaj sciencistoj" en la Internacia Honora Komitato kaj la "vaste konataj movadaj figuroj" inter la lekciistoj "formas imponan omaĝon al la iniciatinto de la Konferenco, Prof. D-ro Ivo Lapenna", tiel ke "la intelekta nivelo do plene indos je tiu korifeo de la Movado". Tiajn vortojn oni ne povis pli frue legi en *Esperanto*. Tute male, kiaj ajn agadoj ligitaj al la nomo de la redaktoro de tiu ĉi rubriko, eĉ la antaŭhamburgaj atingoj, estis krude prisilentataj aŭ misprezentataj ekde la eventoj de 1974.

Pri la kapabloj kaj sincereco de Osmo Buller kaj Mark Fettes ne povas ekzisti ereto da dubo. Alia afero estas, ĉu tiuj pozitivaj ŝanĝoj estas ilia propra iniciato, ev. kun aprobo de la Ĝenerala Direktoro, Simo Milojević, aŭ ili ĝuas ankaŭ la apogon de la Estraro de UEA. La proksima estonteco donos respondon al tiu demando. En ĉiu okazo, la pozitivaj ŝanĝoj, se daŭrigataj kaj laŭgrade ampleksigataj, povus havi tre utilajn sekvojn por UEA kaj por la Esperanto-Movado ĝenerale.

Ni aldonu, ke ankaŭ *TEJO-TUTMONDE*, la oficiala organo de la junulara organizaĵo de UEA, publikigis en n-ro 2/87 trafan informon pri la JEK en Graz kun la foto de la monumento kaj teksta mesaĝo laŭ la presajoj de ICNEM.

Tiu ĉi ero kompletigas precipe ĉap. 7. 9 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

NOMINDEKSO

A

Albault, André 96, 97, 105
Aleksiev, Nikola 101, 124, 130, 133, 151, 174
Argentieri, E. 16, 17
Atanasov, Atanas Dančev 19
Auld, William 94, 97, 105

B

Bachrach, Albert 143
Barbieri, Antonio María 35, 47
Bedečković, Danica 189
Bedečković, Danko 189
Belov, Jurij 73, 74, 78,
Berjoza, Anatolij Vasiljevič 153, 159
Bernard, Roger 98
Blanke, Detlev 77, 109, 133, 134, 135, 185
Blinkenberg, Andreas 40, 41, 42, 43, 44, 47, 48, 52, 53, 175, 176, 177, 178,
179
Bokarev, Jevgenij Aleksejevič 101
Borčić, Lucija 189
Borjan, Bude 189
Bormann, Artur 29
Bormann, Werner 54, 55, 110, 163
Bourdeaux, André 67
Bourgeois, Pierre 39, 40, 48, 49, 50,
Bráblík,, Alois 81
Brejnev, Leonid Iljič 73
Buller, Osmo 209, 210
Butcher, Ian 121

C

Campbell, Stuart 86
Canuto, Giorgio 30
Cao, Luis 42, 44, 46, 47, 48, 176, 177
Carlevaro, Tazio 30, 73, 74, 118
Carneiro, Roberto 39, 41
Carter, Jimmy 107
Cervantes Saavedra, Miguel de 177
Chappat, Claude 93
Ciancio, A. 164
Corsetti, Renato 129, 160, 181

Ĉ

Ĉandra, Romeŝ 160, 161, 181

D

Dante (=Aligieri, Dante) 71, 168, 177, 178
Dasgupto, Probal 185, 186
de Diego, Fernando 99
de Geus, Fred 205
Demidjuk, Grigorij 100
De Salvo, Antonio 83
Dinslage, gesinjoroj 136
di Prinzio, Riccardo 16
Dobrzyński, Marian 199, 209
Dobrzyński, Roman 208, 209
Doktoro Esperanto 87
Dostojevskij, Fjodor Mihajloviĉ 177
Dotter E. 87
Downes, William John 95, 97, 98, 105
Drezen, Ernest Karloviĉ 100

E

Edwards, Jane 207
Eichhorn, Hans 15
Eichholz, Rüdiger 105
Eliopulos, Kimon G. 77

Elvin, L. 51
Engels, Friedrich 92
Evans, Luther Harris 47, 49, 51

F

Fernández-Menéndez, Manuel 42, 177
Fettes, Mark 210
Forster, Peter C. 165, 166, 167, 169, 170, 171, 172, 173, 174, 175
Fradier, Georges 30, 71

G

Gacond, Claude 185
Gaj, Ljudevit 168
Gajić, Radoslav 116, 120
Garcia 47
Gastón, Inès 189
Gjivoje (Āivoje), Marinko 90, 115, 188, 189, 191
Godek, Ivo 189
Goethe, Johann Wolfgang von 177
Golden, Bernard 166, 185, 186
Goodheir, Albert 94, 97
Graetz, Rudi 53
Grandière, Roland 91
Gregor, Douglas B. 96, 97, 105
Gropuzzo, Ante 189
Gropuzzo, Nada 189
Grzębowski, Andrzej 199

Ā

ĀuĀev, Stojan 94, 97

H

Haarman, Harald 19
Harry, Ralph 90, 126
Hauptenthal, Reinhard 95
Hodler, Hector 31, 64, 112, 126, 137, 158, 190
Hohlov, Nikolaj IvanoviĀ 104

Holmes, Harry 136
Hoover, Herbert 151
Hordijk, L. 204
Hueter, Carlita 84
Huxley, Julian 195

I

Ibarourou, Juana de 49
Isaev , Magomet Izmailovič 62, 91

J

Jansson, Tove 15
Janton, Pierre 19
Jaruzelski, Wojciech 202
Jirous, Ivan 145
Joos, Louis C.D. 18

K

Karadžić, Vuk Stefanović 168
Kawasaki Naokazu 94
Kehlet, Eliza 133
Knol K. T. 93
Kočvara, Vlastimil 77
Koiči Jošimiči 73
Kolčinskij, Viktor 100
Kolker, Boris Grigorevič 33, 100
Koplan, R. B. 144
Křimský, Zdenko 79, 80, 81, 83, 85, 86
Kuzmič, Vladimir Savvič 88

L

Lapenna, Ivo 3, 13, 20, 30, 35, 63, 72, 86, 96, 97, 99, 109, 116, 117, 122, 136,
190, 206, 210
Leslie, John 173
Levin, R. 93
Lins, Ulrich 30, 31, 89, 100, 101, 118, 166, 185, 186
Liouville-Cash, Jeanne-Marie 15

Lloyd George, David 171
Low-Beer, G. A. 78
Lowenthal-Chlumecky, Max 37
Lukács, András 131, 132

M

Maertens, Grégoire 110, 118, 135, 136, 161
Malmgren, Ernfrid 34
Marx, Karl 92, 172
Maul, Stefan 153, 154, 159
M'Bow, Amadau-Mahtar 66, 67, 196
Menabene, A. 16
Mickiewicz, Adam 39
Milojević, Simo 210
Minnaja, Carlo 94, 118
Montagnier, Luc 48, 51
Moritz, Uwe Joachim 54, 64

N

Neergaard, Paul 94, 97
Nielsen, J. 42, 177

O

O'Donavan, Patrick 86, 87
Oljanov, Violin 134
Orel, V. N. 57

P

Pellaton, Jean-Paul 18
Pennacchetti, Fabrizio 94
Perko, Klaus 88
Pfeffer, Emil 177
Pickel, Ludwig 62
Pirlot, Germain 122
Piron, Claude 17, 18, 59, 93, 94
Pisk 83
Platt, Herbert Emil (Bert) 114, 115

Podkaminer, Semjon Naumovič 101
Pool, Jonathan 185
Popović, Boža 65, 79
Privat, Edmond 31, 190

R

Racine, Jean-Baptiste 177
Rašić, Nikola 116
Régulo Pérez, Juan 94, 96, 105
Rehorić, Zvonko 119
Revesz, Sándor 132
Rizzo, Pietro 93
Rolland, Romain 41
Röllinger, Hugo 182, 183
Rosa, P. 53
Rossetti, Reto 94, 95, 97, 105
Rytjkov, Nikolaj 101
Rýznar, Linhart 77, 84, 85, 104

S

Sapir, Edward 167
Saraggi, P. G. 17
Sassen 39, 41
Saver, Peter 129
Schulz, Richard 62
Sekelj, Tibor 111, 115, 190, 191, 193
Sevak, Gurgen 101
Shakespeare, William 177, 178
Sherwood, Bruce Arne 185
Silfer, Giorgio 34, 53
Simonnet, François 109, 110
Sommerfeld, Jonhannes 36, 38, 39
Söderberg, Karl Ludvig 93, 105
Srna, Vojtěch 81, 82, 82, 88, 89, 102
Stalin, Josif Visarionovič Ġugašvili 89, 92, 100, 101, 132, 171, 172, 202
Staar, R. E. 151
Stensgaard Larsen, Jens 176
Svane, Eskil 126
Symoens, Edward 185, 186

Szabó-Felső, Flóra 15,
Szawlowski, Richard 58
Szerdahelyi, István 116
Świstak, Stanisław 28, 199

Š

Šaponjić, Momčilo 65
Štimec, Spomenka 62, 115
Šváček, Miloslav 81, 82, 83, 88, 89, 102

Š

Šumilov, P. 88

T

Tarry, H. 137
Teruhisa Kojima 72, 73
Terwisga, P. H. van 180
Themaat, Verloren van W. A. 180, 207
Thierry, Jean 67, 93
Thomas, J. 51
Tito, Josip Broz 132
Tonkin, Humphrey 31, 32, 103, 116, 125, 149, 151, 156, 160, 181, 185, 207
Toynbee, Polly 114
Triolle, Renée 15

U

Ungaretti, Giuseppe 36

V

Vallarta 38, 45, 49, 50
Vanden Bempt, Marc 118, 206
Vedrine, André 137
Venhuizen, Bob 205
Vermaas, Marianne 34, 35, 64, 158
Veronese, Vittorino 39, 46
Vítek, Josef 77, 83

W

Waringhien, Gaston 73, 94, 95, 97, 99, 116,
Wells, John 94, 116
Wilson, Thomas Woodrow 171
Williams, N. 93
Wood, Richard E. 166

Y

Yoshimi Umeda 117

Z

Zamenhof, L. L. 14, 26, 30, 71, 87, 89, 93, 115, 151, 152, 168, 169, 172, 182,
183, 190, 193
Zavala Muniz, Justino 49, 50
Zielonka, Józef 82

Ż

Żelazny, Walter 198

Dankon

La redaktoro de tiu ĉi historia kaj valorega verko de Prof. D-ro Ivo Lapenna deziras tutkore danki al la verkisto, kompilisto kaj eldonisto, Josip Pleadin, pro lia grandega helpo rilate al la aperigo de tiu ĉi treege interesa verko – ne malpli interesa por estontaj generacioj! ...

Samtempe mi deziras same kore danki al mia filo, Pierre, miaj du nepoj, Lucas kaj Niclas, Mogens Rude Andersen, Torben Svendsen, Aleksandr Kogan (kiu aranĝis la filmojn kun Paroladoj kaj Prelegoj de Ivo Lapenna) kaj, fine, ankaŭ al la juna eminenta univ. studento, Steen Vester (kiu prizorgadas la hejmpaĝon de Fondaĵo Ivo Lapenna) pro la helpo per konsiloj kaj teknikaj problemoj.

Birthe Lapenna



STATENS ARKIVER

La Arkivo de Prof. D-ro Ivo Lapenna nun en la Dana Ŝtata Arkivo

La 19-an de novembro 2003 mi transdonis la Arkivon de Prof. D-ro Ivo Lapenna, mia edzo, al la Dana Ŝtata Arkivo, kiu situas en la koro de Kopenhago ĉe la Dana Parlamentejo en Kastelo Christiansborg.

Antaŭ 11 jaroj mi kontaktis la Direktoron de la Dana Ŝtata Arkivo kaj pensis, ke nun mi devas peti tiun institucion akcepti la arkivon de eksterlandano. Kutime oni akceptas materialon nur de danoj. La tiam juna direktoro demandis, pri kiu persono temas. Kiam li aŭdis la nomon, li tuj diris, ke Prof. Ivo Lapenna ja estas mondkonata sciencisto, kaj, kompreneble, kun plezuro ni akceptas lian Arkivon. Tiam mi diris, ke temas ne nur pri materialo, kiu koncernas la juron, sed ankaŭ pri materialo, kiu koncernas la Internacian Lingvon, Esperanto. La Direktoro respondis, ke Esperanto ja estas monda kultur-historio. Kiom da spaco vi bezonas, li demandis. Mi respondis, ke mi ne scias, sed temas pri sufiĉe multe da materialo. Li diris: Vi povas havi tiom da spaco, kiom vi bezonas, kaj ekde nun vi ne plu demandu nin, sed de tempo al tempo ni petos vin liveri la Arkivon. Dum proksimume unu hora interbabilado ni trinkis kafon en lia granda, bela salono sidante sur bluaj apogseĝoj. Mi estis tre feliĉa pro tiu ĉi bela akcepto.

La jaroj pasis ... kaj de tempo al tempo la ĉefo de la departemento de la Dana Ŝtata Arkivo telefonis al mi por demandi, kiam mi intencas liveri la Arkivon de Prof. Lapenna. Ĉiufoje mi devis informi, ke mi ankoraŭ bezonas ĝin pro la multaj sciencistoj el la tuta mondo (ekster la Esperanto-Movado) kaj ankaŭ pro la “Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna”, kiuj ĉiuj daŭre bezonas informojn. Malgrau tio, ke oni ankoraŭ petas informojn, mi tamen fine pretigis la Arkivon kaj vokis la ĉefon por diri, ke nun 16 grandegaj kestoj estas pretaj. Efektive oni estis tre kontentaj kaj tuj sendis ŝarĝaŭton de la Dana Ŝtata Arkivo por preni ilin.

Tuj post la akcepto de la Arkivo de Ivo Lapenna la ĉefo, kiu estas d-ro pri filozofio, sendis al mi belan dankleteron.

Kiam seriozaj historiistoj kaj aliaj personoj deziras konsulti la Arkivon de Ivo Lapenna, oni vokos min de la Dana Ŝtata Arkivo por aŭdi, ĉu mi permesas, ke tiuj personoj studu lian Arkivon.

Do, la Arkivo de Ivo Lapenna nun estas por eterne perfekte prizorgata. Mi antaŭĝojas al la momento, kiam aperos kompetenta kaj sincera historiisto, kiu kapablos verki aŭtentikan historion pri la Internacia Lingvo. Sendiskute la Arkivo de Ivo Lapenna estas vera trezoro, kiu - pro la abunda dokumentaro - facile povas “rebati” la daŭre multajn misprezentojn, kiujn de tempo al tempo oni povas legi en la Esperanto-gazetaro.

La fakto estas, ke la verko de Ivo Lapenna parolas per si mem kaj estas avide studata ne nur nun, sed ankaŭ - kaj tutcerte eĉ pli - en la estonteco.



La Dana Ŝtata Arkivo

“Dum preskaŭ 60 jaroj la plej grava kaj meritplena akcelanto de la Internacia Lingvo kaj ties kulturo depost D-ro L. L. Zamenhof”. 1952-1975: La iniciatinto kaj kunfondinto de “Centro de Esploro kaj Dokumentado” (CED), ĝia Honorofica Direktoro. 1952-1954: Grandaj kampanjoj lige kun la Peticio al UN/Unesko, kronitaj per la gravaj konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko kaj per la fama Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954 en Montevideo. Lige al tiu unika sensacio ĉe Unesko - la plej granda mejloŝtono de la Esperanto-Movado - miloj da artikoloj estis publikigitaj en la monda gazetaro. Post Montevideo ĉiuj gravaj atingoj de la Esperanto-Movado estas sekvo de tiu mejloŝtono. La Esperanto-Movado povas danki al la elstara personeco kaj la multflankaj talentoj de Ivo Lapenna, ke ĝi tiel mirinde sukcesis. I.a. li estis - kaj daŭre estas - la plej elokventa kaj karisma oratoro de la Esperanto-Movado. Ankaŭ en pluraj aliaj lingvoj li estis unu el la plej grandaj oratoroj. 1955-1974: Dum 9 jaroj Ivo Lapenna estis ĝenerala sekretario de UEA kaj dum 10 jaroj ĝia prezidanto. Ĝis sia lasta spiro Ivo Lapenna daŭrigis sian laboron por la Internacia Lingvo, Esperanto, same dinamisme kaj same energie kiel ĉiam en la spirito de D-ro L.L. Zamenhof.



ISBN 978-953-7818-06-7